

INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTAJ INSTRUISTOJ

La 42-a ILEI Konferenco en Krakovo
Julio 2009, Krakovo, Pollando

SCIENCAJ KAJEROJ (unua numero)



ILEI-simpozio pri la konferenca temo
„La pedagogio de Esperanto antaŭ la defioj de interkultura komunikado”

Lingva redaktoro: Adam Łomnicki
Teknika redaktoro: Robert Kamiński

Postkontrolo kaj prilaboro por la ILEI-eldono: Stefan MacGill

SCIENCA KOMITATO

Prezidanto

Zbigniew Paweł Kruszewski, Rektoro de la Altlernejo Paweł Włodkowic, Płock, Pollando

Sekretario

Iłona Koutny, gvidanto de Interlingvistikaj Studoj, Universitato Adam Mickiewicz,
Poznań, Pollando

Honora membro

Witold Stępniewski, vicrektoro de la Teknika Universitato, Lublin, Pollando

Membroj

Maciej Klakla, Pedagogia Universitato, Kraków, Pollando

Jurek Żabowski, Altlernejo Paweł Włodkowic, Płock, Pollando

Joanna Hawlena, Ekonomia Akademio, Katowice, Pollando

Aida Čižikaitė, estrarano de ILEI, Humanisma Fakultato en Kaunas, Vilnius Universitato, Litovio

ORGANIZA KOMITATO DE LA SIMPOZIO

Prezidanto

Włodzimierz Roszczyński, rektoro de WSZiB, Kraków, Pollando

Sekretario

Włodzimierz Opoka, ĝenerala sekretario de UMEA, Medicina Universitato, Kraków, Pollando

Membroj

Józef Duda, Min- kaj Fandindustria Akademio, Kraków, Pollando

Radojica Petrović, prezidanto de ILEI, Teknika Fakultato en Čačak, Universitato en Kragujevac,
Serbio

José Antonio Vergara, estrarano de UEA pri faka agado, Ĉilio

Lidia Ligęza, prezidanto de Krakova Societo Esperanto, Interlingvistikaj Studoj,
Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando

Adam Łomnicki, Pedagogia Universitato, Kraków, Pollando



Enhavo

1. <i>Renato Corsetti</i> - Szerdahelyi, Frank kaj <i>Springboard</i> : Kion komunan ili havas?	7
2. <i>Augusto Casquero</i> - Edukado en Ĉinio	19
3. <i>Duncan Charters</i> - La instruado de universalaj etikaj valoroj kiel porpaca pedagogio de Esperanto	23
4. <i>Nina Danylyuk</i> - Lingvokulturemoj en esperantaj tradukoj de ukrainaj tekstoj	25
5. <i>Michael Farris</i> - Ĉu vere ekzistas esperanta kulturo?	37
6. <i>Joanna Hawlena, Urbanek Joanna</i> - Rolo de sciencaj rondoj en la procezo klerigi studentojn de ekonomiaj altlernejoj	41
7. <i>Wanda Jakubaszek</i> - Nuntempa edukado kaj Esperanto	43
8. <i>Maciej Klakla</i> - Formoj de aktivigado de lernantoj dum didaktika procezo	47
9. <i>Małgorzata Jolanta Komarnicka, Piotr Nosek</i> - Bazaj faktoj de la historio de Pollando	51
10. <i>Ilona Koutny</i> - Rolo de Esperanto en la interkultura komunikado	55
11. <i>Zbigniew Paweł Kruszewski</i> - Premisoj por fondo kaj funkciado de Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj en la Altlernejo Włodkowic en Płock	59
12. <i>Bojidar Leonov</i> - Bazaj principoj de turismiko, religia kaj ekologia turismo	61
13. <i>Alicja Lewanderska-Quednau</i> - Perspektivoj kaj ŝancoj de estonta lernado	67
14. <i>Lidia Ligeza</i> - Julia Pióra – La mondo en meditado	71
15. <i>Adam Łomnicki</i> - Diversaj formoj de aktivigado de lernantoj dum esperanto-lecionoj	75
16. <i>Tomasz Malicki</i> - Sistema de edukado en Pollando	79
17. <i>Stano Marček</i> - Esperanto per rekta metodo	91
18. <i>Leszek Piekut</i> - Renoviĝeblaj fontoj de energio - ŝanco kaj defio	93
19. <i>Andrzej Pisowicz</i> - Esperanto kiel ŝanco por la kaŭkaza regiono?	97
20. <i>Hans Dieter Quednau</i> - Prahistorio de Poloj ekde la prahindeŭropanoj ĝis la reĝoj Mieszko I kaj Bolesław Chrobry	101
21. <i>Teruhiro Sasaki</i> - Esperanta Edukado en japanaj universitatoj - Mia Sperto	107
22. <i>Witold Stępniewski, Zofia Stępniewska</i> - Kiu lingvo por estonta Eŭropo kaj mondo?	109
23. <i>Kristin Tytgat</i> - EU-programoj: eblecoj por Esperanto	115
24. <i>Jerzy Żabowski</i> - La postdiplomaj studoj, kiel formo de la senĉesa klerigado	119

Enkonduko

En la kvindekaj kaj sesdekaj jaroj de la pasinta jarcento en Pollando relative multaj sciencistoj kun intereso kaj simpatio observis evoluon de la lingvo internacia Esperanto, de E-institucioj. Kelkaj eminentaj polaj profesoroj lernis Esperanton en sia juneco, kelkaj profunde ĝin ekkonis.

La 42-a ILEI Konferenco en Krakovo montris, ke ankaŭ nun oni povas trovi sciencistojn, kiuj konas Esperanton, aŭ almenaŭ apogas agadon por Esperanto. Kun Ilia helpo ni provas eldoni la unuan Sciencajn Kajeron, ligitan kun la Konferenca Simpozio. En estonteco valorus plialtigi ĝian scienca nivelon, eldoni nur recenzitajn artikolojn. Sed eĉ nun okulfrapas la evidenta scienca valoro de kelkaj artikoloj, do ni apogis la iniciaton aperigi ilin ne en postsimpoziaj materialoj, sed en Sciencaj Kajeroj. Ni esperu, ke en venontaj jaroj la sekvajn numerojn de la Sciencaj Kajeroj povus eldoni aŭ kuneldoni iu altlernejo en Pollando.

La unuaj paŝoj estas malfacilaj, eraroj estas neeviteblaj, sed stumbloj ne haltigu la evoluon de kontaktoj kun la scienca medio.

ILEI-Pollando

Renato Corsetti

(La Universitato “La Sapienza”, Romo, Italujo; sekretario de la Akademio de Esperanto)

Szerdahelyi, Frank kaj *Springboard*: kion komunan ili havas?

Resumo

Istvan Szerdahelyi jam en la 60-aj jaroj pripensis la problemojn de la lernofaciliga valoro de Esperanto. Tion li faris en teoria kadro kaj specife rilate al la problemoj de hungarlingvanoj, kiuj devis lerni hindeŭropan lingvon (en tiu momento temis ĉefe pri la rusa, aŭ la germana). Temis pri teoriaj pripensoj surbaze de la lernomaterialo en la unua lerno-jaro de fremdaj lingvoj. Li simple komparis la materialon troveblan en la lernolibroj.

Helmar Frank estis la gvidanto de grandskalaj projektoj por science esplori kaj mezuri la lernfaciligan valoron de Esperanto. Oni devas agnoski, ke en la lasta parto de la pasinta jarcento, ĉio ligita al ĉi tiu temo estas ankaŭ rekte aŭ nerekte ligita al Frank. Aliflanke la eksperimentoj de Frank, laŭdire bazitaj sur la antaŭaj ideoj de Szerdahelyi, fakte portis al iu ĝeneraligo de la prudentaj konstatoj de Szerdahelyi pri la lernofaciliga valoro de Esperanto.

Post Frank oni daŭre aplikis tiun esplor-modelon, sed pluraj komencis havi dubojn pri la pure lingvaj lernfaciligaj efikoj de Esperanto, kaj laŭgrade oni komencis esplori pri la efikoj de la lernado de Esperanto al la ĝenerala kompreno pri la funkciado de lingvoj, al la tiel nomataj prilingvaj kapabloj (metalingvaj kapabloj, laŭ la greka dialekto de Esperanto). Oni devas konsideri ke intertempe en eŭropaj lernejoj, pli en iuj landoj kaj malpli en aliaj landoj, oni ne instruas teoriajn konceptojn pri gramatiko same intense kiel oni faris antaŭ 50 jaroj, tiel ke infanoj apenaŭ komprenas la malsamecon inter, ekzemple, adjektivoj kaj substantivoj. *Springboard* estas la nuna projekto en Britujo, kiu provas mezuri la efikojn de instruado de Esperanto al malgrandaj infanoj.

1. Enkonduko

Se ekzistas unu esperantisto, kiu ne interesiĝis pri la lernofaciliga valoro de Esperanto, tiu estas Zamenhof mem. Fakte, kiom ajn tio povas ŝajni paradoksa, Zamenhof ne vere interesiĝis pri lingvoj, sed pri tio, ke homoj vivu en paco kaj harmonio inter si kaj kun la dioj, kiujn al si "ĉiuj malsame prezentas, sed ĉiuj egale en koro ... [ilin] sentas"¹. Li konsideris lingvojn nur komunikiloj kaj Esperanto plej facila internacia neŭtrala komunikilo. Laŭ lia opinio: "Fine ĉiu klera homo ja ankaŭ nun *devas* ellernadi kelkajn fremdajn lingvojn, kaj li certe ne elektas tiujn lingvojn, kiuj kvazaŭ estas konformaj al liaj organoj de parolado, sed nur tiujn, kiujn li *bezonas*; estas sekve nenio neebbla en tio, ke anstataŭ, ke ĉiu lernas *diversajn* lingvojn, ĉiuj ellernadu *unu saman* lingvon kaj sekve povu komprenadi unu la alian."² [La substrekoj per kursivigo estas en la originalo].

Sed jam en la komencaj jardekoj de la pasinta jarcento aliaj esperantistoj komencis okupiĝi per la ideo, ke kono de Esperanto faciligas la lernadon de postaj lingvoj. Tiel ni trovas la unuajn raportitajn eksperimentojn pri tio en la lernejo Green Lane School, in Eccles, Britujo, en 1920 kaj en la jaroj 1922-a-1924-a en Bishop's Elementary School in Auckland, Nova Zelando³. Ne hazarde oni interesiĝis

¹ El la poemo "Preĝo sub la verda standardo" legita de Zamenhof okaze de la unua kongreso en Bulonjo-ĉe-maro en la jaro 1905-a kaj represita en pluraj libroj.

² El la verko "Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia", raporto verkita de Zamenhof sub la kaŝnomo Unuel kaj legita de L. de Beaufront en la kongreso de l'Association Française pour l'Avancement de Sciences, en Parizo, en 1900.

³ Corsetti, R. (2005) The Rationale of the *Springboard* Project, inter la materialoj de la Projekto Springboard kaj en http://www.springboard2languages.org/documents/springboard_rationale.pdf

pri tio, en anglalingvaj landoj, en kiuj estis malfacile informi pri Esperanto kiel internacia lingvo konkurenca al la angla, kiu estis gajnanta tiun rolon, sed en kiuj estis normale instrui la francan al ĉiuj lernejoj.

Kaj efektive oni trovis, ke Esperanto estas efika por pretigi infanojn al la posta studo de la franca. Similajn ideojn sekvas la nunaj esperantistoj antaŭ la malfacilo konvinki homojn lerni Esperanton pro ĝiaj internaj valoroj kaj pro la hom-protekta potencialo, kiun ĝi havas.

Ĉi tiu artikolo pritraktas la ideojn pri la lernofaciliga valoro de Esperanto en la lastaj 50 jaroj kaj la aplikon de tiuj ideoj.

1. Szerdahelyi

Mi renkontis Profesoron Istvan Szerdahelyi multajn fojojn en la 70-aj jaroj en la medio de Esperanto-aranĝoj, ĝeneralaj aŭ de ILEI. Li estis granda fumanto, kiel mi en tiu periodo, sed ankaŭ granda konversacianto. En unu el tiuj konversacioj la temo estis pri instruado de Esperanto kaj li aludis je artikolo, kiun li aperigis en la 60-aj jaroj en franc-lingva revuo (Szerdahelyi, 1966)⁴. Tiu artikolo aperis poste ankaŭ en Esperanto (Szerdahelyi, 1970) en la nula prov-numero de Internacia Pedagogia Revuo.

Szerdahelyi, profunda konanto de la esploroj faritaj en Hungarujo kaj en la tiama Soveta Unio rilate al la problemoj de instruado de la rusa lingvo al hungaroj, en tiuj artikoloj ĝeneraligis la rezultojn de tiuj studoj kaj aplikis ilin al Esperanto⁵. Tute aparte li rimarkis, ke eksterordinaran valoron Esperanto havas kiel ponto-lingvo en la okazo de X = suom-ugra⁶ lingvo kaj Y = hindeŭropa lingvo⁷. Fakte li estis komparinta la lernomaterialon de la unua lernojarro de pluraj fremdaj lingvoj kun Esperanto kaj kun la hungara lingvo en la sinsekvo:

hungara - Esperanto - lingvo hindeŭropa

kaj li estis alveninta al la ĉi-sekvaj procentaĵoj, kiuj montras kiom Esperanto faciligas la lernadon de unu el la lingvoj franca, angla, germana, rusa, se ili estas intruataj post Esperanto:

<i>hungara - Esperanto - franca</i>	50%
<i>angla</i>	40%
<i>germana</i>	30%
<i>rusa</i>	25%

Tre pli malcerta estis lia ideo pri la lernofaciliga valoro de Esperanto inter hind-eŭropaj lingvoj kaj tute aparte inter "proksimaj" hind-eŭropaj lingvoj. Tia lernofaciliga valoro laŭ li ekzistas, sed li asertas tion nur kiel ĝeneralan principon sen iu ajn provo mezuri ĝin aŭ trovi procentaĵojn.

Nature, ĉar li laboris en Hungarujo, li ĉefe atentis la problemojn de nehind-eŭropanoj, kiuj devas lerni lingvon hind-eŭropan. Ĉi tiu, cetere, ŝajnis al li la vera problemo ankaŭ je monda nivelo, ĉar laŭ li en 90 elcentoj de la situacioj, en kiuj oni lernas fremdan lingvon, temas pri hind-eŭropa lingvo (angla, franca, germana, rusa, itala, hispana).

Ĉi tiuj ideoj de Szerdahelyi estis abunde mislegitaj en la Esperanto-movado, kie komencis cirkuli opinioj, ke laŭ eksperimento farita en Budapeŝto Esperanto ŝparigas 50% de la tempo bezonata por lerni la francan kaj 40% de la tempo bezonata pro lerni la anglan, ktp. Ne temas pri eksperimento, sed

⁴ Fakte tiu artikolo estis traduko de prelego, kiun li estis farinta en Esperanto la 21-an de julio 1965-a en Graz, Aŭstrujo, okaze de Internacia Studsemajno organizita de ILEI.

⁵ Szerdahelyi pritraktas ĉi tiujn studojn kaj ĝenerale la problemaron de instruado de fremdaj lingvoj al hungaroj en Szerdahelyi (1975).

⁶ Suom-ugra lingvo estas mia versio de tio, kion en la angla oni nomas Finno-ugric language kaj en Esperanto ofte finno-ugra lingvo.

⁷ Szerdahelyi uzas la literojn X kaj Y por indiki respektive la gepatran lingvon kaj la fremdan lernendan lingvon. Nuntempe oni preferas paroli pri L1 kaj L2.

pri praktika komparo de la lernounuoj en la lernolibroj por la unua jaro de lernado de la fremda lingvo. Kaj tiuj procentaĵoj rilatas nur al lernantoj, kies gepatra lingvo estas la hungara.

Mi ne komprenas, kiel tio povis okazi. Evidente temis pri deziro, kiu gvidis la interpreton. Mi citu nur unu fonton pri tiu misideo pri Szerdahelyi kaj lernofaciliga efiko de Esperanto. Temas pri Frank (1992:17).

Efektive la ideoj de Szerdahelyi estis pli nuancoriĉaj. Szerdahelyi mem ja gvidis eksperimentojn, eĉ plurnaciajn, sed ili celis esplori multajn faktorojn rilate al la lernado de Esperanto, ekzemple la lernofacilecon de Esperanto kaj ne nur ĝian lernofaciligan valoron. La plej konata estas la kvinlanda eksperimento de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI. Vidu pri tio en Sonnabend (1979).

Eksperimentoj pri la lernofaciliga valoro de Esperanto jes okazis tra la tuta pasinta jarcento, sed kiel ni vidos en la posta sekcio la rezultoj estas tute malsamaj kompare kun la procentaĵoj prezentitaj de Szerdahelyi por hungarlingvaj infanoj. Ĝenerale oni povas diri, ke oni estas tre malproksima de tiuj procentaĵoj, se entute oni povas havi ciferan rezulton.

2. Eksperimentoj laŭ la sinskevo indikita de Szerdahelyi: L1 – Esperanto – L2

Pluraj eksperimentoj estis faritaj ankaŭ pri lernantoj de tri lingvoj, kies dua lernata lingvo estas Esperanto.

Esperanto estas lingvo jam relative vaste parolata en mondo kaj sufiĉe pristudata, el pluraj aspektoj, sociologiaj, lingvistikaj, instruaj kaj eĉ rilate al denaska akirado de ĝi fare de malgranda nombro da infanoj. Ankaŭ ĝia gramatika strukturo estas interesa el la vidpunkto de komprenado pri funkciado de lingvoj, kiel jam rimarkis la iniciatinto de la lingvo mem.⁸

Ĉiuokaze la unuaj konsideroj pri la lernofaciliga valoro de Esperanto estas tre antikvaj, en 1908 fare de unu el unuaj verkistoj en Esperanto, Antoni Grabowski⁹. Fakte en la jaroj 1908–1914 Grabowski respondecis pri la unuaj Esperanto-kursoj en kelkaj lernejoj en Varsovio. En artikolo en 1908-a li priskribis la ecojn de Esperanto por enkonduki al la studo de la franca kaj de la latina, kio ŝajnis tre stranga al la tiutempa publiko.

Post tiuj unuaj observoj estis multaj praktika eksperimentoj ĝuste pri ĉi tiu temo.

Por doni ideon pri la multeco de la eksperimentoj sekvas listo ne-kompleta de eksperimentoj pri kiuj ekzistas bona dokumentado:

- Girls' Middle School en Bishop Auckland (Britujo)
- Bishop's Elementary School, Auckland (Nova Zelando)
- Wellesley College, Department of Psychology (Massachusetts, Usono)
- Columbia University, Nova Jorko (Usono)
- Public High School en Nova Jorko (Usono)
- Provincial Grammar School en Sheffield (Britujo)
- Egerton Park School, Denton (Manchester, Britujo)
- Middle School in Somero (Finlando)
- Internacia Pedagogia Eksperimento de ILEI en kelkaj eŭropaj landoj Lingva Orientado, Paderborn (Germanujo)
- Eksperimentoj en italaj elementaj lernejoj
- EKPAROLI (Melbourne, Aŭstralio)
- Springboard to languages (Britujo)

Ĉi tiuj estas nur parto de la eksperimentoj. Aliaj estas troveblaj en Corsetti kaj Latorre (1993) aŭ en Corsetti kaj Latorre (1995).

Oni povas havi dubojn pri la rezultoj de tiuj eksperimentoj, sed ili ĉiuj indikas al tio, ke lernado de tria lingvo fare de lernantoj de Esperanto estas pli sukcesa. Oni povas havi dubojn pri la scienca

⁸ Corsetti, R. (1987), Corsetti, R. (1993), Vesteeagh K. (1993), Wells, J. (1989), Zamenhof, L. (1903).

⁹ http://en.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski

kontrolo de kelkaj el ili, sed certe ne pri, ekzemple, la lastatempa en Aŭstralio, kontrolita de la Universitato Monash. Bedaŭrinde en ĉi tiu okazo, la eksperimento estis interrompita, kaj ni havas nur la indikojn el la intervjuoj kun la tre entuziasmaj lernantoj pri la plezuro lerni Esperanton.

Sen ebla dubo el la scienca vidpunkto ŝajnas al mi almenaŭ la rezultoj de la eksperimento farita en Britujo en la Provincial Grammar School en Sheffield, kaj kontrolita de J. H. Halloran, Universitato de Sheffield¹⁰, kies konkludoj estas inter la plej sobraj.

La eksperimento daŭris 4 jarojn, fine de la 40-aj kaj komence de la 50-aj jaroj. La lingvoj estis la angla, L1 de ĉiuj lernantoj, Esperanto kaj la franca, tria lingvo por la eksperimenta grupo kaj dua lingvo por la kontrol-grupo.

La eksperimenta grupo studis Esperanton dum unu jaro dum la kontrol-grupo rekte komencis studi la francan. Ekde la dua jaro Esperanto estis forlasita kaj la eksperimenta grupo transiris al studado de la franca.

La esploroj faritaj de Halloran fine de la kvar jaroj montris plurajn aferojn, sed tio, kio plej interesas nin en ĉi tiu kunteksto estas la jena:

“1. En la kazo de malpli inteligentaj lernantoj, tiuj, kiuj dediĉis la unuan jaron al Esperanto konis la francan pli bone (laŭ mezuroj faritaj per 11 malsamaj testoj), je la fino de 4 jaroj, ne dediĉante al la franca pli da tempo dum la postaj 3 jaroj”¹¹.

Ŝajnas al mi, kiel esploranto pri ĉi tiuj fenomenoj, ne eble ne akcepti almenaŭ ĉi tiujn konkludojn, kiuj simple rezultas el la fakto, ke Esperanto estas lingvo kiel ĉiuj aliaj, sed kun pli travidebla gramatika strukturo, kiu ebligas al lernantoj mem pripensi pri la funkciado de lingvoj inkluzive de la propra.

Multaj duboj estis daŭre esprimitaj de mi mem pri tio, ke neniu reprenis la komencan sugeston de Szerdahelyi pri la neceso konsideri la lingvojn unuan kaj trian kaj surbaze de ilia "proksimeco" inter si kaj kun Esperanto testi la efikon de Esperanto al la lernado de la tria lingvo fare de parolanto de difinita unua lingvo. Alivorte, se Esperanto helpas hungaran infanon lerni la francan, tio ne signifas ion pri la helpo de Esperanto al pola infano, kiu devas lerni la rusan.

Kompreneble la lernado de Esperanto havas iun pli ĝeneralan efikon. Lerninte facilan lingvon, la lernanto estas pli entuziasma alfronti la lernadon de nova lingvo. Tio validas por ĉiuj lingvoj.

Krome, kaj aparte por Esperanto, la facila strukturo de la lingvo ebligas kompreni rapide kelkajn bazajn lingvajn fenomenojn, helpas akiri pli grandan prilingvan konscion.

3. Similaj eksperimentoj en la neesperantista mondo

Se ni momente rigardas al la eksperimentoj faritaj en la neesperantista mondo, ni vidas, ke nur en la lastaj jaroj akumuliĝas esploroj pri lernantoj de triaj lingvoj kaj pri la efikoj de la unuaj du lernataj lingvoj al la tria, dum esperantistoj estis tre aktivaj en ĉi tiu kampo de la komenco de la pasinta jarcento.

Unua grupo de esploroj en neesperantista medio rilatas al la efikoj de dulingveco al la akirado de tria lingvo. Alivorte: ĉu dulingvuloj akiras trian lingvon pli rapide ol unulingvuloj akiras la saman lingvon, kiu por ili estas “nur” la dua?

En la multkulturaj eŭropaj situacioj oni aparte dediĉis sian atenton al infanoj dulingvaj pro vivado en regiono de etnaj malplimultoj. El tio oni havas ekzemplojn el regionoj kun dulingvuloj en la pola kaj germana, hungara kaj germana, franca kaj nederlanda, eŭska kaj kastilia, ktp.

La dulingvaj lernantoj, kiuj lernas la anglan aŭ la francan, estas komparataj kun unulingvaj lernantoj kiuj lernas la saman lingvon.

¹⁰ Halloran, 1952.

¹¹ En la originalo: *1. In the case of the less intelligent pupils, those who had devoted the first year's language study to Esperanto did better in French (as measured by eleven different kinds of tests), at the end of four years, without spending any extra time on French in the three years.*

Provante resumi multajn eksperimentojn per unu simpla frazo, ni utiligas frazon de Safont Jorda' (2005: 43), kiu diras: "Ĉiuj studoj cititaj supre raportas pri la pozitivaj efikoj de dulingveco rilate al akirado de tria lingvo."¹²

Alia grupo de eksperimentoj kaj esploroj rilatas al la efiko de la angla por neeŭropanoj kiel lernofaciliga faktoro por posta lernado de aliaj eŭropaj lingvoj. Oni argumentas, kaj pravas, ke ĉino lerninta la anglan lernas pli facile ankaŭ la germanan¹³.

Konklude, en la neesperantista mondo esploroj ĉi-rilate interesas ĉefe parolantojn de malplimultaj lingvoj, kiuj volas pruvi, ke infanoj, kiuj ankaŭ studas la malplimultan lingvon, poste estos en pli bona pozicio por lerni la anglan (la ĝenerale lernatan fremdan lingvon en Eŭropo kaj ankaŭ ekster ĝi). Esence la slogano povus esti: "Se vi konas ankaŭ la eŭskan, preter la kastilia, vi lernos pli bone la anglan. Do, lernu kaj parolu la eŭskan!"

La faciliga valoro de la angla (aŭ de ĉiu alia eŭropa lingvo) por poste lerni alian eŭropan lingvon, estas sufiĉe evidenta. Puŝas tiujn studojn la instruantoj de aliaj eŭropaj lingvoj (ne de la angla) ekster Eŭropo.

4. La rolo de Helmar Frank

Mi unue diru ion pri la persono Helmar Frank, ĉar li estis dum multaj jardekoj rimarkinda publika figuro ne nur en Esperantujo sed ankaŭ en Germanujo. Mi baziĝas ĉefe sur la informoj en Vikipedio¹⁴.

Helmar Gunter Frank naskiĝis la 19-an de februaro 1933 en Waiblingen. Li estis profesoro pri cibernetiko kaj prezidanto de AIS Sanmarino.

Frank studis matematikon, fizikon kaj filozofion en Stuttgart, Tübingen kaj Parizo de 1951 ĝis 1958. En 1956 li sukcesis en la magistrnivela ekzameno pri matematiko, en 1957 en la samnivela instruista ekzameno en matematiko kaj fiziko kaj en 1958 en doktora ekzameno kun Max Bernse pri filozofio. De 1958 ĝis 1961 li instruis matematikon kaj fizikon en gimnazioj. Kiel scienca laboraĵon por la pedagogia ekzameno Frank prezentis aplikon de la bazaj ideoj pri kibernetika estetiko el sia doktoriĝ-disertacio al la pedagogio. De 1961 ĝis 1963 li laboris en kibernetika esplorgrupo gvidata en Karlsruhe. Tiam Frank iniciatis la unuan germanan konferencon pri programita instruado kaj instru-aŭtomatoj ("Nürtinger Symposium" 1963). En la sama jaro la pedagogia universitato de okcidenta Berlino vokis lin kiel profesoron al kibernetika katedro. En 1984 li fondis tie la Instituton pri Kibernetiko kaj akceptis en 1972 vokon al la (tiutempe fondota) universitato de Paderborn.

Frank estas kunfondinto de AIS Sanmarino kaj ĝia prezidanto.

Dum kelkaj jaroj Frank estis estrarano de la kibernetika asocio "*Association Internationale de Cybernétique*" (AIC) kaj konvinkis ties prezidanton, ke Esperanto estu tria lingvo (apud la franca kaj la angla) ĉe la AIC-kongresoj.

Pro siaj meritoj Frank ricevis la unuaklasan meritkrucon de la Federacia Respubliko Germanujo kaj en la Espernato-mondo oni elektis lin Esperantisto de la Jaro 2004. Frank estis jam konata kiel sciencisto pri kibernetika instruado en neesperantistaj rondoj tra Eŭropo¹⁵, kiam li ekaktivis pri Esperanto.

Li, tamen, vivis en lando kaj en tempo en kiu la ĉefa problemo estis la lernado de la angla. Pro tio Frank estis devigata evoluigi teorion, kiu pravigus la uzon de Esperanto por posta lernado de la angla. Lia modelo estis prezentita en tre rafinite matematika maniero, kiu kovris la bazan ideon pri ŝparo de tempo per dediĉado de la unua periodo al lernado de Esperanto kaj nur poste de la angla.

¹² En la originalo: "All the studies quoted above report the positive effects of bilingualism in third language acquisition."

¹³ Hufeisen, B. (1991)

¹⁴ http://eo.wikipedia.org/wiki/Helmar_Frank

¹⁵ Enprenas lian kontribuon, ekzemple, itala sciencisto pri pedagogio, Franco Frabboni, en Frabboni, F. (redaktanto) (1980) *Scuola maggiorenni - Scuola dell'infanzia e nuovi contenuti educativi*, Firenze: Sansoni Editore. La kontribuo de Frank estas en la paĝoj 256-269: Frank, H. *L'influenza dell'istruzione propedeutica della "lingua straniera" per l'apprendimento nella scuola dell'infanzia*.

Frank profitis sian universitatan pozicion en la universitato de Paderborn por lanĉi en la 70-aj jaroj ambician programon, kies nomo estis "Lingva Orientado". La praktika eksperimento, kiu okazis en tiu kadro, estis instruado de Esperanto antaŭ ol instruado de la angla al klasoj en la unuagradaj lernejoj (tria kaj kvara jaroj) en la lernejoj de la germana landoparto Niedersachsen [Niderzachsen]. Entute partoprenis 556 lernantoj, kiuj lernis Esperanton (parto dum unu jaro kaj parto dum du jaroj) antaŭ ol lerni la anglan.

Oni mezuris la konon de la angla fine de la 5-a kaj 6-a jaro kaj oni komparis la rezultojn kun tiuj de kontrol-klasoj, kiuj ne estis lernintaj Esperanton. Laŭ Frank la rezultoj montras pli grandan konon de la angla je 20% aŭ 30% depende de la longeco de la tempo, en kiu la infanoj lernis Esperanton antaŭ ol lerni la anglan. La rezultoj estas efektive atentindaj en si mem. Al tiuj oni aldonu, ke la lernintoj de Esperanto havas ankaŭ pli grandajn prilingvajn kapablojn pri la germana mem. Ni parolos poste pri tiu efiko de la lernado de Esperanto. Sed, iom surprize, la eksperimentaj klasoj ŝajnas havi pli bonajn rezultojn ankaŭ pri geografio kaj matematiko¹⁶.

Frank kaŭzis sensacion en la Esperanto-mondo per ĉi tiuj tre favoraj rezultoj. Ne estas nia tasko nun paroli pri la mezuraj metodoj, kiuj eble parte respondecis pri la alteco de la favoraj rezultoj, sed certe la granda interesiĝo pri la lernofaciliga valoro de Esperanto en la lastaj jardekoj estas rekta merito de Frank mem. Ni aldonu la fakton, ke Frank havis grandan personecon kaj ke li estis tre aktiva ankaŭ ĉar li estis la kreanto de tuta movado ĉirkaŭ universitata instruado kaj Esperanto. Ni jam diris, ke li estis prezidanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj: AIS-Sanmarino, kiu kunordigis la utiligon de Esperanto por instruado universitatnivela.

Tio, kio ne sukcesis, estis la transirigo de ĉi tiuj studoj al la neesperantistoj. Mi mem ne sukcesis trovi eĉ unu mencion pri la agado de Frank aŭ de la ceteraj esperantistoj en la faka literaturo neesperantista.

Konklude la rolo de Frank por popularigi inter esperantistoj la koncepton, ke oni utiligu la lernofaciligan valoron de Esperanto por proponi instrui ĝin en lernejoj, estis giganta. Kvankam ILEI¹⁷ subtenis tion, ne estas duboj, laŭ mi, ke la plej granda merito estas tiu de Frank. Ne temas pri malgranda merito, se oni pensas, ke en tiu periodo la eŭropaj esperantistoj renkontis ĉiam pli da malfacilaĵoj proponi la instruadon de Esperanto al homoj, kiuj ĉefe volis lerni la anglan.

Mi mem restas tre skeptika pri la ĝenerala valoro de la rezultoj de la eksperimento de Frank. Tion mi jam diris en aliaj artikoloj¹⁸ kaj nun reasertas ĝin, sed tio nenion forprenas de la meritoj de li, kiel patro aŭ almenaŭ akuŝisto de ĉi tiuj konceptoj en la dua duono de la pasinta jarcento.

5. Preter Frank

Kiel mi jam diris, la neesperantista mondo tute ne ekkonis la rezultojn de Frank aŭ simple ignoris ilin. Grandega parto de la ignoro ŝuldiĝas al la manko de prestiĝo de Esperanto, pro kio, ĉio kunligita kun ĝi, eĉ se plej science ellaborita, emas ne esti eĉ legata. "Ni volas lerni la anglan, ne ludi kun eksperimentoj de la pasinteco" asertas la plej realismaj fakuloj, kiuj ne komprenas esti kaptitaj de sia tempo kaj de la ideoj de sia tempo.

Pro tio, dum daŭris la eksperimentoj laŭ la indikoj de Frank oni ankaŭ komencis evoluigi aliajn esplordirektojn. Unu el ili estas la prilingvaj kapabloj, tio estas la efiko de la lernado de Esperanto al la kapablo rezoni pri lingvoj, inkluzive de la propra nacia lingvo. Vi memoras, ke ankaŭ la infanoj esploritaj de Frank en Germanujo montris pli bonajn rezultojn en la germana.

5.1. Natura evoluo de prilingva konscio

Infanoj nature akiras lingvon kaj akiras konscion pri la lingvo, kiun ili uzas. Ni preterlasas en ĉi tiu artikolo detalan traktadon pri la konataj faktoj rilate al lingvo-akirado fare de beboj. Pri la prilingva

¹⁶ Frank, 1992: 17.

¹⁷ Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.

¹⁸ Corsetti, La Torre (1995).

konscio, ŝajnas esti kvar rimarkindaj momentoj, en kiuj la lingvoakirado stabiliĝas en gradoj daŭre kreskantaj:

- 3-jaraj beboj
- 5-jaraj infanoj
- 7-jaraj infanoj
- 12-jaraj knaboj.

Pluraj aŭtoroj konsentas pri tio ek de la klasikaj Vygotsky (1934), Piaget (1977) kaj Piaget kaj Inhelder (1955) ĝis la lastatempa Pinto (1999), kiu dividis la ilojn por mezuri la prilingvan konscion en tri partojn: TAM1, TAM2 kaj TAM3, respektive por la aĝoj: de 4 al 6 jaroj, de 9 ĝis 13 jaroj kaj de 14 kaj poste.¹⁹

La rapidiĝo de la prilingva konscio, kiun oni spertas, kiam oni ekiras al la lernejo, kaj komencas okupiĝi pri sia lingvo, okazas en ĉiuj kampoj de la kompreno pri lingvo-funkciado. Estas utile ankaŭ konsideri dulingvajn infanojn de la naksiĝo. Dulingvuloj havas konsiderindajn avantaĝojn pri la prilingva konscio.

Ni ne povas evidente pritrakti la tutan kampon de dulingveco, pri kiu estis faritaj multaj studoj en la dua duono de la pasinta jarcento. Ni limiĝu je kelkaj esencaj demandoj: kiu estas dulingva? Alivorte ekde kiu grado de kono de du lingvoj oni rajtas esti konsiderata dulingva. En la normala mondo troviĝas homoj kiuj en malsamaj kvantoj konas du aŭ plurajn lingvojn, de la perfekta kono tipa por denaskaj parolantoj ĝis kompreno kaj uzo de kelkaj vortoj kaj kelkaj frazoj en difinitaj kuntekstoj.

Ĝis antaŭ la jaro 1950-a, por doni malfajnan ĝeneraligon, oni emis konsideri dulingvaj homoj, kiuj havis perfektan konon de du lingvoj, alivorte homoj, kiuj estis akceptataj de, ekzemple, angloj kiel angloj kaj de, ekzemple, francoj kiel francoj. Alivorte oni ne povis distingi ilin de la ceteraj unulingvaj parolantoj de la du lingvoj.

Bedaŭrinde tiaj kazoj estas ege maloftaj en la reala mondo. Ni ne povas nun eniri la detalojn, sed sufiĉas malsamaj spertoj en malsamaj kampoj en malsamaj lingvoj, lernado de unu el la du lingvoj post la pubereco, kaj simile, por igi bonegajn parolantojn de ambaŭ lingvoj estis rekonataj kiel “aliaj” de la denaskaj parolantoj. Foje oni estas rekonata ankaŭ ĉar oni parolas tro bone, tro regule en tro norma variaĵo sen la dialektaj elementetoj, kiuj en multaj landoj enpenetras eĉ la paroladon de la plej superaj klasoj.

En la dua duono de la pasinta jarcento oni komencis akcepti kiel dulingvajn ankaŭ homojn kun malsama kapablo en la du lingvoj, kondiĉe ke ili havas la kutimon uzi ambaŭ lingvojn eĉ se en malsamaj cirkonstancoj, ekzemple se oni parolas france aŭ arabe kun sia patrino kaj itale en la lernejo. Evidente en tiu sitaŭcio oni ne povas rakonti en la hejma lingvo same flue tion, kion oni lernis en la alia lingvo en la lernejo. U. Weinreich (1968: 1) difinas la dulingvulon jene:

“La praktika fakto alterne uzadi du lingvojn estos nomata dulingveco, kaj la koncernata homo, dulingvulo”²⁰

Ni vidos poste, ke, rilate al niaj celoj, ankaŭ lernantoj de dua lingvo en lernejoj estas konsidereblaj dulingvuloj post la tute komenca lernomomento.

En la dua duono de la pasinta jarcento furoris ankaŭ studoj pri la mensaj efikoj de dulingveco je dulingvaj individuoj. Unu el plej konataj inter la unuaj estas Peal & Lambert (1962). La studoj furoris ĉar en la antaŭa duono de la sama jarcento pro tute aliaj politikaj ideoj ekzistantaj en la mondo (naciismo deklarita aŭ nedeklarita) dulingvaj homoj estis konsiderataj homoj kun disduigita menso kaj kun ŝanceliĝanta lojaleco.

¹⁹ La tri iloj aperis unue en ital-lingva libro: Pinto, M.A. (1999), *La consapevolezza metalinguistica. Teoria, sviluppo, strumenti di misurazione*, Pisa-Roma: Istituti Editoriali e Poligrafici Internazionali. Vidu ankaŭ Pinto (2002).

²⁰ En la originalo: “*The practice of alternately using two languages will be called bilingualism, and the person involved, bilingual*” (Weinreich, 1968:1)

Ĉiukaze la konkludoj de ĉiuj tiuj studoj estas, por resumi ilin mallongege, tiuj de Hakuta (1986:35):

“Prenu iun ajn grupon da dulingvuloj, kiuj estas proksimume samaj pri siaj kapabloj en L1 kaj L2, kaj komparu ilin kun unulingva grupo per aĝo, socia.ekonomia nivelo kaj kiu ajn alia variebla informo, kiu laŭ vi povas malpruvi viajn rezultojn. Nun elektu mezurilon pri mensa fleksebleco kaj mezuru ambaŭ grupojn. **La dulingva grupo respondos pli bone.**”²¹

La ekzistanta literaturo pri sciencaj studoj pri dulingveco estas tre vasta. Ankaŭ citi nur la ĉefajn titolojn estus troa tasko en ĉi tiu artikolo. Tamen interesiĝantoj povas komenci esplori ĉi tiun kampon en Baker & Prys Jones (1998).²²

Kompreneble studentoj de la fenomeno klopodis kompreni ĉu estas fakoj, en kiuj la plej granda mensa fleksebleco pro dulingveco, donas pli da avantaĝoj. Ni provas resumi tutan serion de aliaj studoj per unu frazo: La avantaĝoj rilatas al krea pensado kaj prilingva konscio. Ĉiuj esplorantoj konsentas ke la avantaĝoj rilatas al lingvoj kaj kunligitaj temoj, ekzemple literaturo, sed kelkaj el la esplorantoj kaj laŭ kelkaj eksperimentoj ankaŭ al fakoj kiel muziko kaj matematiko. En ĉi tiu lasta kazo la mensa fleksebleco estus la kerna elemento. Bialystok (2001) specife donas pruvojn pri pli granda prilingva konscio de dulingvuloj.

Sed ni rajtas demandi nin, ĉu tio vere rilatas ankaŭ al lernantoj de dua lingvo? Kiel ni vidis en antaŭa sekcio la rezultoj de la eksperimento *Springboard* ne ŝajnas konfirmi tion. Por respondi jese, ni ekzamenis malgrandan eksperimenton faritan en aliaj kondiĉoj kun pli grandaj infanoj kaj kun pli da instruotempo.

5.2. Eksperimento pri evoluo de prilingva konscio pro lernado de Esperanto

La eksperimento, pri kiu ni parolas ĉi tie, estas detale analizata en artikolo en la revuo *Language Problems & Language Planning*.²³

Temas pri eksperimento bazita sur individuoj, kiuj apenaŭ povus esti nomataj dulingvuloj, ĉar ilia grado de kono de la dua lingvo estis plene komencanta. La infanoj estis 12-jaraj lernantoj de itala publika lernejo en unu el la malbonaj periferiaj kvartaloj de Romo (Aprilia). La eksperimenta grupo estis instruata pri Esperanto du horojn semajne dum la normala lernojaro de oktobro ĝis la fino de majo. La kontrol-grupo apartenis al la sama lernejo, kaj temis pri infanoj samaĝaj, kun la sama socia-kultura nivelo de la familioj (malalta por ambaŭ grupoj) kaj kun la sama intelekta nivelo (mezurita per la matricoj de Raven²⁴).

Ili (kaj la eksperimenta grupo kaj la kontrol-grupo) estis esplorataj pri la prilingva kapablo per testo utiligata en pluraj landoj, la tiel nomata TAM (Test di Abilità Metalinguistiche)²⁵. Ili estis esplorataj per la itala versio de tiu testo rilate al la prilingvaj kapabloj **en la itala, kaj ne en la lernata dua lingvo**.

La testoj estis faritaj en la ĉi-sekvaj momentoj dum la lernojaro.

- unua testo en oktobro 1998
- dua testo en februaro 1999
- tria testo en majo 1999

²¹ La traduko estas mia. La originalo estas: “Take any group of bilinguals who are approximately equivalent in their L1 and L2 abilities and match them with a monolingual groups for age, socioeconomic level, and whatever other variables you think might confound your results. Now, choose a measure of cognitive flexibility and administer it to both groups. **The bilingual will do better.**”

²² Aliaj verkoj pri aspektoj de dulingveco, dulingveco en pluraj lingvoj kaj liongvoakirado fare de infanoj en pluraj lingvoj estas la jenaj: Saunders (1988), Slobin (1971), Slobin (1985), Steinberg, Nagata, Aline (2001)

²³ Pinto M. A. & Corsetti, R. (2001), *Ricadute metalinguistiche dell'insegnamento dell'esperanto sulla lingua materna dell'alunno*, in *Language Problems & Language Planning*, 25, 1: 73-90.

²⁴ Raven, 1982.

²⁵ Pinto, 1999.

La esploro de iliaj kapabloj en la itala ŝuldiĝas al la deziro mezuri la efikon de la malmultaj scioj pri la dua lingvo akiritaj en la malmulta lernotempo dediĉita al Esperanto.

Jen tre esence la rezultoj:

Tabelo 1-a

Meznombra poentaro akirita de la du grupoj pri la respondoj rilatantaj al prilingva konscio

	Kontrol-grupo	Eksperimenta grupo
• 1-a testo	24,85	24,98
• 2-a testo	27,08	27,96
• 3-a testo	30,76	47,02

La komparo de la du kolumnoj klare montras, ke el situacio de sameco la grupo, kiu lernis duan lingvon, akiris fine de la lernojaro konsiderindan superecon.

Tio cetere ne devas multe mirigi. La supereco de dulingvuloj rilate al unulingvuloj ŝuldiĝas, kiel ni diris antaŭe, al la fakto, ke ili devas daŭre kompari la malsamajn strukturojn de du lingvoj. Kaj tio, estas la samo, kion lernantoj estas devigataj fari en la lernejo, kiam ili lernas fremdan lingvon.

5. 3. Nuntempe: *Springboard*

Ĝuste pri la prilingva konscio koncentriĝas la esploroj de la universitato de Manchester pri la lernado de Esperanto en la projekto *Springboard to languages*. Bedaŭrinde tiuj esploroj estas ankoraŭ en la komenco, kaj la unuaj rezultoj ne ŝajnas indiki multon rilate al la lernfaciliga valoro de Esperanto. Eble temas pri tro malgrandaj infanoj, eble temas pri tro mallonga instru-tempo por Esperanto, sed oni trovas ankoraŭ tre malmultan efikon²⁶. Ĉi tie ni kopias la rezultojn el la dokumento de la Universitato de Manchester, kiu aperas en

<http://www.springboard2languages.org/Summary%20of%20evaluation,%20S2L%20Phase%201.pdf>²⁷.

Poste ni donos la tradukon al Esperanto.

"Does Springboard help to learn other languages?"

Pupils were invited to decode the French sentence: 'Les oreilles de l'éléphant sont très grandes et le nez est très long.' The only children to successfully translate the whole sentence were, interestingly, from School A; these 2 children used interesting metalinguistic decoding strategies (cognates, punctuation, context). School B children, also learning French, performed only marginally better than School A children.

- *71% of the children were able to identify plurals in other languages in at least 4 out of 6 cases, but there was a high nil-response (n/r) rate.*
- *53% were able to identify which 2 sentences (from 4, in Spanish, Romanian, Esperanto and English) meant the same. 9 n/r, all from School A.*
- *55% were able to identify which words in other languages resembled the corresponding Esperanto word, but again there was a high n/r rate. School B pupils' self-assessment on this skill was 65%, School A only 38%.*

²⁶ Ni informas ĉi tie pri la du lernejoj, pri kiuj oni okupiĝos en la postaj rezultoj:

- lernejo A: Publika Baza Lernejo, en loko kun signifa proporcio de lastatempaj enmigrantoj al Britujo.

- lernejo B: malgranda Baza Lernejo de la Eklezio de Britujo, en kiu 20 infanoj de la klasoj 3-a, 4-a, 5-a kaj 6-a estas instruataj kune en unu klaso. La loĝantaro estas ĉefe blanka kaj briuta.

En ambaŭ lernejoj oni instruas 30 minutojn po 2 fojojn semajne. Le lernejo A komencis en septembro 2006 kaj la lernejo B en januaro 2007. En lernejo B infanoj lernadas la francan de la 1-a klaso, dum en lernejo A ili lernas la francan post la programo *Springboard*.

²⁷ <http://www.springboard2languages.org/Summary%20of%20evaluation,%20S2L%20Phase%201.pdf>

Knowledge of grammar

Only 43% successfully identified the adjective in 4 word-pairs from 4 languages (33% n/r).

Knowledge of Esperanto

There was an overall 89% success rate in translating Esperanto words into English, and 85% for word pairs; only 63% success rate in forming plurals, but many misunderstood the question."

"Ĉu Springboard helpas lerni aliajn lingvojn?

La lernantoj estis invitataj kompreni la francan frazon: 'Les oreilles de l'éléphant sont très grandes et le nez est très long.' [La oreloj de la elefanto estas tre grandaj kaj la nazo estas tre longa] La solaj infanoj, kiuj sukcesis traduki la tutan frazon venis el la lernejo A. Interese! Ĉi tiuj du infanoj utiligis interesajn prilingvajn kompren-strategiojn (similaj vortoj, punktaro, kunteksto). La infanoj el la lernejo B, kiuj ankaŭ lernas la francan, sukcesis nur marĝene pli bone ol la infanoj de la lernejo A.

- 71% el la infanoj kapablis rekoni plurnombrajn vortojn en aliaj lingvoj en almenaŭ 4 el 6 okazoj, sed estis granda proporcio de ne-respondintoj (n/r).
- 53% kapablis la du frazojn (el 4, en la hispana, rumana, Esperanto kaj la angla), kiu havis la saman signifon. 9 ne respondis, ĉiuj el la lernejo A.
- 55% kapablis identigi tiujn vortojn en aliaj lingvoj, kiuj similas la kongruajn Esperanto-vortojn, sed ree estis alta proporcio de nerespondantoj. La memjuĝo de la lernantoj de la lernejo B pri ĉi tiu kapablo estis 65%, tiu de la lernejo A nur 38%.

Kono de gramatiko

Nur 43% sukcese identigis adjektivojn en 4 vorto-paroj en 4 lingvoj (33% ne respondis).

Kono de Esperanto

Estis ĝenerala sukces-proporcio de 89% pri tradukado de vortoj el Esperanto al la angla, kaj 85% rilate al vorto-duoj; nur 63% estis la sukces-elcentaĵo pri formado de plurnombraj vortoj, sed pluraj miskomprenis la peton."

Estas evidente, ke ni estas ĉe la komenco de la evoluo de la prilingva kapablo aplikebla al la propra kaj al fremdaj lingvoj. La rezultoj ankoraŭ necertaj de la projekto *Springboard* verŝajne ŝuldiĝas al la tro mallonga instru-tempo (du duonaj horoj en ĉiu semajno) en kombino kun la pli juna aĝo de la infanoj kaj eble ankaŭ kun la strukturo de la gepatra angla lingvo, kiu certe ne helpas kompreni la klarajn kategoriojn de Esperanto pri substantivo, adjektivo, verbo kaj adverbo.

5. Konkludo

Ne vere estas io por konkludi, krom ke la intuicio de Szerdahelyi ĝenerale montriĝas prava. Lernado de Esperanto helpas al lernado de dua lingvo. Tamen necesas multaj esploroj en tre rigoraj kondiĉoj por testi la kernan ideon de Szerdahelyi: kiujn avantaĝojn Esperanto donas al la parolantoj de kiu lingvo, kiuj volas lerni kiun alian lingvon. La malmultegaj indikoj ĉi-kampe montras ke nova generacio de esplorantoj povus trovi tre interesajn rezultojn. Ĉu samgrade Esperanto helpas ĉinojn kaj germanojn lerni la anglan kaj anglojn lerni la ĉinan aŭ la germanan?

Kiam temas pri la ĝenerala efiko de pliigo de la prilingva konscio pro lernado de Esperanto, ankaŭ tiukampe pliaj esploroj estas bezonataj ĉe infanoj de malsamaj lingvoj. Ĉu ankaŭ arabaj infanoj pro lernado de Esperanto akiras plian prilingvan kapablon pri la araba lingvo? Alivorte, se lingvo sekvas alian logikon rilate al Esperanto, kio okazas?

Eble ne hazarde la procentaĵo 71% de anglalingvaj infanoj, kiuj malkovris la pluralon en aliaj lingvoj estas tre pli alta ol tiuj, 43%, kiuj povis malkovri adjektivojn. Ĉu tio dependas de la fakto, ke en la angla la pluralo estas klare markita per -s dum la adjektivo ne estas markita per io klare rekonebla. En Esperanto kaj la pluralo kaj la adjektivo havas klarajn markilojn, sed tio, verŝajne efikas malsame depende de la ekzisto de markiloj en la unua lingvo.

Ni ne povas surbaze de la nunaj scioj respondi en defendebla maniero.

Bibliografio

- Baker, C. & Prys Jones, S. (1998), *Encyclopedia of bilingualism and bilingual education*, Clevedon, UK: Multilingual Matters.
- Bialystok, E. (2001), *Bilingualism in Development. Language, Literacy and Cognition*, Cambridge: Cambridge University Press.
- Corsetti, R. (1987), *L'Esperanto in pratica: istruzioni per l'uso*, en Chiti-Batelli, A. (ed.), *La comunicazione internazionale tra politica e glottodidattica*, Milano: Marzorati Editore, 178-180.
- Corsetti, R. (1993), *A mother tongue spoken mainly by fathers*, en *Language Planning and Language Problems*, 20, 3: 263-273.
- Corsetti, R. (2005) *The Rationale of the Springboard Project*, inter la materialoj de la Projekto Springboard kaj en http://www.springboard2languages.org/documents/springboard_rationale.pdf
- Corsetti, R., La Torre, M. (1993) *Paderborn e dintorni: Possibili condizioni per un esperimento sul valore propedeutico della lingua internazionale esperanto* in *Rassegna Italiana di Linguistica Applicata*, 3/1993: 115-136
- Corsetti, R., La Torre, M. (1995), *Quale lingua prima? Per un esperimento CEE che utilizzi l'esperanto*, en *Language Planning and Language Problems*, 19, 1: 26-46.
- Frank, H. (1992) *Propedeŭtika valoro de la Internacia Lingvo - Propedeuticka hodnota mezinárodního jazyka*, Dobruŭovice/Praha: Kava-pech.
- Gombert, J.E. (1990), *Le développement métalinguistique*. Parizo: PUF.
- Hakuta, K. (1986), *Mirror of language: the debate on bilingualism*, New York: Basic Books.
- Halloran, J. W. (1952), *A Four Year Experiment in Esperanto as an Introduction to French*, *British Journal of Educational Psychology*, 22, 3: 200-204.
- Hufeisen, B. (1991), *Englisch als erste und Deutsch als zweite Fremdsprache - Empirische Untersuchung zur fremdspachlichen Interaktion*, Frankfurt am Main: Peter Lang.
- Piaget, J. (1977), *Recherches sur l'abstraction réfléchissante*, Parizo: PUF
- Piaget, J., Inhelder, B. (1955), *De la logique de l'enfant à la logique de l'adolescent*, Parizo: PUF.
- Peal, E. & Lambert, W. (1962), *The relationship of bilingualism to intelligence*, en *Psychological Monographs*, 76/27: 1-23.
- Pinto, M.A. (1999), *La consapevolezza metalinguistica. Teoria, sviluppo, strumenti di misurazione*, Pisa-Roma: Istituti Editoriali e Poligrafici Internazionali
- Pinto, M. A. (2002), *Bilinguismo e sviluppo metalinguistico*, en G. Di Stefano, R.
- Vianello (a cura di), *Psicologia dello sviluppo e problemi educativi. Studi in onore di Guido Petter*, Florenco: Giunti, 280-295.
- Pinto, M. A. e Corsetti, R. (2001), *Ricadute metalinguistiche dell'insegnamento dell'esperanto sulla lingua materna dell'alunno: Un'esperienza nella scuola media italiana*, *Language Problems & Language Planning*, 25/1: 73-90
- Raven, J.C. (1982), *Progressive Matrices 1938. Manuale di Istruzione*, Florenco: Organizzazioni Internazionali.
- Safont Jordà, M.P. (2005), *Third language Learners – Pragmatic Production and Awareness*, Clevedon-Buffalo-Toronto, Multilingual Matters Ltd.
- Saunders, G. (1988), *Bilingual Children: From Birth to Teens*, Clevedon: Multilingual Matters.
- Slobin, D. I. (1971), *Psycholinguistics*, Glenview, Ill.: Scott, Foresman and Company
- Slobin, D. I. (ed.) (1985), *The Cross-linguistic Study of Language Acquisition*, 2 volumes, Hillsdale, N.J.: Erlbaum.
- Sonnabend, G. H. (1979), *Esperanto: lerneja eksperimento*, Pisa: Edistudio.
- Steinberg, D. D., Nagata, H., Aline, D. P. (2001), *Psycholinguistics – Language, Mind and World*, Harlow: Longman Linguistic Library
- Szerdahelyi, I. (1966), *Espéranto et propédeutique linguistique*, *Les langues modernes*, 60/3: 23-27.
- Szerdahelyi, I. (1970), *La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejoj studobjektoj*, *Internacia Pedagogia Revuo*, 0 (prov-numero): 5-9.
- Szerdahelyi, I. (1975), *Metodologio de Esperanto*, Budapest: Tankönyvkiadó Eötvös Loránd Tudományegyetem Bölcsészeti tudományok.
- Tunmer, W.E., Pratt, C., Herriman, M.L. (1984), *Metalinguistic Awareness in Children. Theory, Research and Implications*.

- Vygotsky, L.S. (1934), *Myslenie I rec' . Psichologiceskie issledovanija*, Moskvo-Leningrado.
- Vesteegh K. (1993), *Esperanto as first language Acquisition with a restricted input*, en *Linguistics*, 31: 539-555.
- Weinreich, U. (1968), *Languages in Contact: Findings and Problems*, The Hague: Mouton.
- Wells, J. (1989), *Lingvistikaj aspektoj de Esperanto*, Rotterdam: UEA
- Zamenhof, L. (1903) *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto*, 17th ed. Richmansworth, U.K.:Esperanto Publishing Company, 1954: 234-235.

http://en.wikipedia.org/wiki/Antoni_Grabowski

http://eo.wikipedia.org/wiki/Helmar_Frank

<http://www.springboard2languages.org/home.htm>

http://en.wikipedia.org/wiki/Propaedeutic_value_of_Esperanto



Augusto Casquero

Edukado en Ĉinio

Historio

Radikoj de la sistemo de formala edukado en Ĉinio atingas almenaŭ la 16-an jarcenton antaŭ Kristo, la dinastion de Shang (1523-1027 a.K.). Dum tiu periodo edukado estis la privilegio de nur kelkaj elitoj, kaj plejparte ekzistis por neniuj aliaj kialoj ol por 'produkti' ŝtatajn aŭtoritatulojn. Tiutempe, la edukprogramo baziĝis je tiel nomataj 'Ses Artoj': ritoj, muziko, arkpafado, Chairot-legado, historio kaj matematiko. Kvankam, bazita je instruado de Konfuceo (551-479 a.K.) dum Printempo kaj Aŭtuno kaj Statoj de Milito (770-221 a.K.), la edukprogramo laŭgrade liberigis la vojon por la sistemo bazita je 'Kvar Libroj' kaj 'Kvin Klasikstudoj'. Tiuj verkoj skizadis la principojn de socio kaj aŭtoritatoj, kodojn de persona konduto kaj kolektive difinis la filozofion de Konfuceo, kiu kaŭzis fundamentan influon al fakte ĉiuj aspektoj de la vivo, kaj certe al edukado, almenaŭ ĝis la Liberigo kaj kreskis je povo dum komunisma periodo komenciĝanta en 1949.

La sistemo, kiu edukis la elitklason estis determinata kaj firme subtenata, kaj por sekvantaj generacioj, la edukita elito baziĝis je amasa analfabetismo. La imperiaj aŭtoritatoj estis aktivaj je edukado nur se ĝi administris la variajn nivelojn de la imperia aŭ civil-serva ekzameno, kiu estis uzita por selekti inter la imperiaj oficuloj. La ekzamenoj mem konsistis el eseaj demandoj, kiuj testis la komprenon de la kandidato pri la instruado de Konfuceo. La studentoj povis prepariĝi por tiuj ekzamenoj per enskribiĝo al privataj institucioj, tiel nomataj *shuyuan* (en la ĉina), kiuj ekzistis nur por prepari studentojn por la ekzamenoj por civila servo. Unu rakonto travivis dum generacioj, traktanta la malfacilecon kaj konkurencon en tiuj ekzamenoj: la ambicia vilaĝano komencis prepariĝi por la ekzamenoj en la frua junaĝo kaj ne sukcesis esti akceptita ĝis kiam iĝis 54-jaraĝa. Antaŭ ol esti akceptita li porlonge estis malestimigita de la familianoj kaj amikoj – finfine lia sorto ŝanĝiĝis tiom drame ke li freneziĝis pro ĝojo.

Do, oni vidas, ke Ĉinio havas historion de selektado de talentoj en naciaj ekzamenoj kaj tiel la civitanoj traktis la gravecon de ekzamenoj tiom altestime.

Hodiaŭ

Nuntempe Ĉinio havas nacivastan sistemon de publika edukado, kiu inkluzivas bazlernejojn, mezlernejojn (junioran kaj senioran), kaj universitatojn. Naŭ jarojn de edukado estas teknike devigaj por ĉiuj ĉinaj lernantoj. La eduksistemo garantias senpagan bazedukadon dum ses jaroj (iuj provincoj povas certigi nur kvin jarojn por bazlernejo sed kvar jarojn por la mezlernejo), komencante je la aĝo sep aŭ ses, sekvatan per ses jaroj de la mezlernejo por lernantoj 12-18 jaraĝaj. Je tiu nivelo estas tri jaroj de la ordinara mezlernejo kaj tri jaroj de la alta lernejo. La Ministerio pri Edukado raportis 99% da frekvento por bazlernejoj kaj 80% por ambaŭ baz- kaj mezlernejoj. Ekde kiam senpaga edukado estis aboliciĝita en 1985 la kandidatoj al kolegioj kaj universitatoj devas konkuri por stipendioj bazitaj je akademias eblecoj. Privataj lernejoj estas permesitaj ekde fruaj jaroj post 1980.

Baza edukado:

Baza edukado en Ĉinio inkluzivas antaŭ-lernejan edukadon, bazedukadon kaj regulan mezlernejan edukadon. Antaŭlernejo, aŭ infanĝardeno, povas daŭri ĝis tri jaroj, kun infanoj partoprenantaj ekde aĝo tri ĝis aĝo ses, kiam ili kutime eniras bazlernejon. La lernojaro estas dividita je du semestroj.

La mezlerneja edukado estas dividita je akademia mezlerneja edukado kaj specializita/profesia/teknika mezlerneja edukado. La akademia mezlerneja edukado konsistas el akademias malsupraj kaj supraj mezlernejoj. La lernantoj finantaj la malsupran mezlernejon kaj dezirantaj daŭrigi la edukadon subiĝas al loke administrita enirekzameno, sur kies rezultoj ili havos eblecon aŭ daŭrigi en la akademia pli supra mezlernejo aŭ eniri la profesion mezlernejon. La profesiaj mezlernejoj ofertas 2- ĝis 4-jardaŭrajn programojn kaj trejnas meznivelajn laboristojn, farmistojn, krome estradan kaj teknikan dungitaron. La teknikaj lernejoj normale ofertas 4-jarajn programojn por trejni mezprogresintan dungitaron. “Lernejoj por Lertaj Laboristoj” kutime trejnas studentojn post juniora mezlernejo por postenoj postulantaj la spriton en produktado kaj operaciado. La trejnado daŭras normale 3 jarojn.

Supera edukado:

Supera edukado je subgrada nivelo inkluzivas 2- kaj 3-jarajn juniorajn kolegiojn (ofte ankaŭ tiel nomatajn mallong-ciklajn kolegiojn), 4-jarajn kolegiojn kaj universitatojn ofertantajn programojn en ambaŭ akademia kaj profesia studoj. Multaj kolegioj kaj universitatoj ankaŭ ofertas programojn gvidantajn al akiro de magistra aŭ doktora gradoj. Ĉina supera edukado je subgrada nivelo estas dividita je tri-jaraj kaj kvar-jaraj programoj. La unua estas oferanta ne nur mallong-cirklajn kolegiojn, sed ofte ankaŭ kvar-jarajn kolegiojn kaj universitatojn. La lasta estas oferanta kvar-jarajn kolegiojn kaj universitatojn sed ne ĉiam tio gvidas al bakalaŭriĝo.

Multaj eblecoj de alta edukado kreas ankaŭ la ĝeneralan kategorion de edukado por plenkreskuloj. La kategorio de edukado por plenkreskuloj kongruas kun ĉiuj supre menciitaj kategorioj. Porplenkreskula bazedukado inkluzivas Bazlernejojn por Laboristoj, Bazlernejojn por Kampanoj kaj skrib-kaj legkapabligajn klasojn. Porplenkreskula mezlerneja edukado inkluzivas radio- kaj televidspecializigitajn mezlernejojn, specializigitajn mezlernejojn por kadroj, specializigitajn mezlernejojn por dungitaro kaj laboristaro, specializigitajn mezlernejojn por kampanoj, instruad-trejnadajn lernejojn kaj korespondad-specializigitajn mezlernejojn. Porplenkreskula supera edukado inkluzivas radio/televidajn universitatojn, kadrajn institutojn, kolegiojn por laboristoj, porkampanajn kolegiojn, korespondadkolegiojn kaj edukadkolegiojn. Plejparto de la supre menciitaj ofertas ambaŭ tri-jarajn mallongajn edukprogramojn; nur kelkaj - subgradan edukprogramon.

Pozitivaj kaj negativaj flankoj de ĉina edukado

Pozitivaj:

- 1) Longaj studadhoroj - bonegaj kapabloj en testosolvado

Ĉina studentaro, kreskanta ĉe la skribotablo, estas bone preparita por ekzamenado, kiu kontrolas la bazan scion. La studentoj estas lertaj je enmemorigado de la teorioj kaj tre rapidaj dum solvado de matematikaj problemoj. Tial la ĉinaj studentoj superas la aliajn en ĉiaspecaj internaciaj ekzamenoj kiel ekzemple IELTS kaj GRE, eĉ se la taskoj estas en fremda lingvo kaj la test-preparantoj ne estas ĉinoj.

- 2) Longaj studadhoroj - pezlabora etiko

En supera lernejo (kaj eĉ en juniora supera lernejo), plejmulto de ĉina studentaro studas ĝis la fino de la studhoroj. Ili estas al kutimigitaj al longaj horoj de solvado de matematikaj problemoj aŭ skribado de eseoj ĉe la skribotablo, kio preparas ilin por peza labor-mondo kiu atendas la plejmulton de ĉinaj laboristoj, la profesiajn kaj tiujn kun la bluaj kolumoj. Jaroj de nokta studado iĝas la realeco de kromhoroj ekde kiam la tipa ĉino komencas laborvicon.

Negativoj:

- 1) Troa koncentriĝo je libroj, manko de praktiko

Ĉinoj strebas al alligo de la graveco al superaj rezultoj kaj la studentaro estas facile dividita al diversaj klasoj laŭ rezultoj. Tio montras, ke pri multaj aferoj decidas nur rezultoj, kiel ekzemple ‘triobla-A’ eminenta studento, kolegia agnosko kaj ŝatado. Konsekvence, la studento ligiĝas al siaj libroj por akiri altajn rezultojn, multaj el ili iĝas eĉ ‘librotineoj’. Sendube, tiu ĉi speco de la nur-libra kaj nur-porrezulta edukado havas larĝan fendon kun socia praktiko. Pro tiu kialo multaj studentoj trovas la malfacilaĵojn dum eniro al la socia aktivado kaj reala negocmondo post la fino de edukado.

- 2) Troa koncentriĝo je la scio mem, ne kiel gajni ĝin

Kompare al studentoj de evoluiĝantaj landoj, la ĉinaj studentoj estas pli pasivaj kaj malpli kreemaj. Kial? Pro la rezult-orientiĝo, la studentoj ne estas kuraĝigataj al demandado sed al memorigado. Instruistoj kaj gepatroj zorgas pli pri ‘Kion vi ellernis hodiaŭ?’ anstataŭ ‘Kiel vi ellernis tion?’. Kun bedaŭro oni trovas multajn ĉinajn studentojn kun alta IQ sed malalta EQ! Ĉinaj studentoj estas al kutimigitaj doni la ‘standardan respondon’ al la demando, pro tio ke oni postulas de ili enmemorigi la ŝlosilajn respondojn por la testo. Ili strebas lerni pasive anstataŭ pensi krie kaj kritike.

- 3) Troa koncentriĝo je gravaj profesiaj scioj, samtempe mallarĝaj horizontoj

Por travivi en moderna socio, la devo de kompetenta persono estas havi larĝajn horizontojn. Sed la realeco en la ĉina edukado estas vere frustriganta. Ekzemple, okazas ke la studento de medicino scias nenion pri la filozofio, historio aŭ arto.

- 4) Troa ŝarĝo per okupoj por permesi al studentoj (vere interesiĝantaj pri io) memlernadon

Ĉinaj studentoj ricevas tro multe da hejmtaskoj kaj premo ke ili akceptas la studadon kiel ŝarĝon. Ili estas pasivaj studentoj al kutimigitaj al tipaj, konvenciaj vojoj de pensado. Estas tre kredebla ke kiam ili forlasos ilian studentecon, ili fuĝos de la montoj de libroj por ĉiam. Studado dum la tuta vivo estas do pli universala en okcidenta mondo ol en Ĉinio.



Duncan Charters

(Principia College, Ilinojso, Usono)

La instruado de universalaj etikaj valoroj kiel porpaca pedagogio de Esperanto (resumo)

En Usono dum multaj jaroj la „Institute for Global Ethics“ (Instituto por Tergloba Etiko) faris studojn pri tio, ĉu ekzistas universalaj etikaj valoroj pri kiuj oni povas interkonsenti, kun la celo stimuli pensadon pri referencnormoj por persona, politika, kaj interkultura konduto. Tio celas interalie krei kadron de interkonsentitaj valoroj kiu rezultigos per la edukado de infanoj, gejunuloj kaj plenkreskuloj pli pacan mondon surbaze de kompreno kaj vivado de moralaj normoj kiuj transportas geografion kaj kulturojn.

Rushworth Kidder, direktoro de la Instituto, doktoriĝis pri angla literaturo kaj post kariero kiel universitata profesoro fariĝis ĵurnalisto por la usona ĵurnalo *The Christian Science Monitor*. Dum tiu tempo li raportis internacie pri mondproblemoj, kaj komencis pensi pri tio ĉu ekzistas universalaj etikaj normoj kiujn eblus instrui por ke la homaro rekonu kaj praktiku etikan konduton. Tio ebligus pli altajn normojn de persona kaj politika konduto, kaj pli paceman interagadon. D-ro Kidder kunlaboris kun fakuloj de diversaj disciplinoj, verkis plurajn librojn inkluzive la plej laste aperintan pri la moralo kaj la ekonomia krizo, kaj gvidis seminariojn por entreprenoj pri la apliko de etikaj normoj en komercaj aferoj kaj aliaj kampoj.

La prezentaĵo pritraktis la instruadon de universalaj etikaj valoroj je diversaj niveloj de la lingvoinstruado, kun aparta rilato al Esperanto kiel perilo de universalaj valoroj kiuj ebligu transpontadon de landoj, kulturoj kaj religioj por pli paca kunvivado en la terglobo. Kiel oni ebligu al lernantoj difini siajn valorojn individue kaj kolektive? Kiel tio helpas plifokusigi klason kiel kunlaborantan, reciproke sinestimantan grupon? Kiel instrui lingvon, kulturon, kaj literaturon surbaze de komune akceptitaj valoroj sen perforto de individuaj religiaj kaj moralaj konceptoj? Kiel elekti materialojn kaj pedagogion, kiuj servos kiel taŭgaj portantoj de universalaj etikaj valoroj, kaj kiel tiuj decidoj rilatas al la movado por „karakteredukado“ kiu plidisvastiĝas nuntempe en Usono? Kio estas la aparta kontribuo de Esperanto kiu ebligas pli paceman sintenon, kiam tradicia instruado de aliaj lingvoj povas ankaŭ refortigi antaŭjuĝojn pri aliaj kulturoj kaj malrespekton de diferencoj?



Nina Danylyuk

(Volinia Nacia Universitato Lesja Ukrainka, Ukrainio)

Lingvokulturemoj en esperantaj tradukoj de ukrainaj tekstoj

Aktualeco de la temo. La temo estas aktuala, ĉar en nuntempa lingvistiko oni aktive pristudas la leksikon kun kultura semantika komponento kadre de etnolingvistiko, lingvokulturologio, kognitiva lingvistiko, teorio de tradukado. Ĉi tiuj leksemoj estas rigardataj ne nur kiel apartaj lingvaj unuoj, sed en la strukturo de specifika monda lingvobildo de iu popolo. Estas tre grave teorie priskribi la nomitan leksikon, doni praktikajn konsilojn kaj kompili etnolingvistikajn, lingvokulturologiajn vortarojn. La prezentata laboraĵo estas la rezulto de la 15-jara okupiĝo pri lingvokulturemoj en la ukraina lingvo (flanke de scienca pristudado, instruado kaj tradukado) kaj la eldonon de la lingvokultura vortaro “Ukrainio en vortoj” (2004).

Ni devas substreki, ke la ideojn pri la specifikeco de respeguliĝo de ĉirkaŭaĵoj en etnaj lingvoj ni trovas en la verkoj de V. Humboldt (Humboldt 1995), O. Potebnja (Potebnja 1914, 1995), A. Veselovskij (Veselovskij 2004), J. Bartmiński (Bartmiński, 2004, 2007), T. Buligina, D. Smeljov (Buligina, Smeljov 1998) k.a. Pri esperantonimoj kiel la unika fenomeno skribis M. Ĝivoje (1973, 1979), A. Melnikov (Melnikov 2004, 2007), I. Koutny (2007) k.a. Esperantan frazeologion pristudis S. Fiedler (2002). Aliaj sciencistoj el diversaj landoj – S. Vlaĥov, S. Florin (Vlaĥov, Florin 1986), H. Tomaĥin (Tomaĥin 1988), R. Zorivĉak (Zorivĉak 1989), V. Koptilov (Koptilov 2003), T. Havriliv (Havriliv 2005) k.a. atentigis pri la problemo de tradukado de la leksiko kun kulturologia signifo. Diversaj aspektoj de traduko el kaj en Esperanton menciis F. de Diego (1979), G. Waringhien (1987), I. Ertl (1997), k.a.

Pro tio, ke esplorojn de tradukitaj Esperanten tekstoj de ukraina literaturo en la aspekto de lingvokulturemoj ni faras la unuan fojon kaj similaj verkoj ne ekzistas, ni konsideras la prezentatan laboraĵon novema. Sed tio kaŭzas multe da malfacilaĵoj: necesas elekti la leksikon kun kulturaj semaoj, trarigardante multe da beletraj kaj sciencpopularaj tekstoj kiel apartaj eldonaĵoj kaj en periodaĵoj; fari memstarajn iliajn analizojn kaj priskribadojn, traduki la ukrainlingvaj kaj la ruslingvaj citaĵojn Esperanten. Krome, en la laboraĵo ni uzis ne nur la tradukitajn verkojn de aliaj tradukistoj, sed ankaŭ la aŭtorajn tradukojn de kelkaj beletraj kaj folkloraj tekstoj. Kiel *la fonta bazo* de lingvokultura leksiko estis elektitaj E-tradukoj de ukrainaj popolaj kantoj, verkoj de T. Ŝevĉenko, Lesja Ukrainka, I. Franko, J. Hucalo, M. Voronij k.a., publicistaj priskriboj de etnaj popolaj festoj ktp. en revuoj “Ukraina stelo”, “Voĉo el Ukrainio”, “Helianto” k.a.

La termino “*lingvokulturemo*” en la prezentata laboraĵo estas uzata en la senco “leksiko kun kulturologia signifo” (ne nur unuopaj leksemoj, sed sintaksaj unuoj, frazeologiaj esprimoj, kiuj havas kulturologiajn semaojn).

I Kultursignifa leksiko kiel etna fenomeno

1.1. Graveco de belartaj tradukoj Esperanten

Laŭ „Plena vortaro de Esperanto kun suplemento” *traduki* signifas “*transigi iun tekston aŭ konversacion de iu lingvo en alian, anstataŭigante vortojn k esprimojn de la unua lingvo per samsencaj vortoj aŭ esprimoj de la alia*” (PVS 1964: 477). Do, la traduko estas la teksto, anstataŭiganta la unuan tekston per la teksto en alia lingvo. En tiu laboraĵo temas pri tradukoj de la ukrainaj folkloraj kaj beletraj (parte publicistaj) tekstoj Esperanten. La objekto de nia esploro estas ukrainaj lingvokulturemoj kaj ilia transdono pere de Esperanto.

Ni komprenas gravecon de tradukado kiel rimedo de pliriĉigo de Esperanto kaj konatigo de aliaj popoloj kun ukraina nacia kulturo. Des pli, ke en nia laboraĵo ni pristudas la tradukojn de altkvalitaj ukrainaj folkloraj kaj aŭtoraj verkoj. Se uzi la konatan klasifikon, kiu dividas ĉiujn tradukojn je tri grupoj: gramatika (estas uzata por lernado), lingvistika (plenumita de lingvisto por sciencaj celoj) kaj artisma (beletra), ni fakte analizas la tradukojn de la lasta grupo. „*Artisma traduko jam celas reprodukti ĉiujn estetikajn kvalitojn de la originalo kaj anstataŭi la originalon en la kulturo de la traduklingvo*” (Malovec 2000: 121).

Gravecon traduki Esperanten la plej bonajn verkojn de la monda literaturo komprenis L. Zamenhof, kiu en 1988 j. skribis: „*...Por ke lingvo eble pli rapide fortiĝu kaj riĉiĝu, oni devas eldoni kiel eble pli multe da verkoj en la lingvo internacia, originalaj kaj tradukitaj*” (Zamenhof 1929: 39). Ni scias, ke Zamenhof mem tradukis verkojn de W. Shakespeare, J.W.G. Goethe, la partojn el “La Sankta Biblio” (La Malnovan Testamenton) k.a. por montri grandajn eblecojn de novkreita Esperanto kaj riĉigi la lingvon. W. Auld tre alte pritaksis la agadon de la tradukantoj en la unua periodo. En “Enkonduko” por “Esperanta Antologio: Poemoj 1887 – 1957” li substrekis, ke tiuj poetoj “*vere laboregis kun matura kapablo kaj celkonscia talento por krei taŭgan poezian instrumenton...*” (Auld 1958: 15). Inter ili estis Antoni Grabowski, Vasilij Devjatnin, Boris Mirski, en pluaj jaroj Edmond Privat, Eŭgeno Miĥalski, Julio Baghy, Kalomano Kalocsay, Nikolaj Hohlov, Hilda Dresen, Lajos Tarkony, Reto Mario Rosetti, William Auld k.a. En Ukrainio ni povas nomi sufiĉe da personoj, kiuj tradukis el la ukraina kaj la rusa lingvoj Esperanten: Nadija Andrianova-Hordijenko, Andrij Rohov, Kostjantin Gusev, Volodimir Pacjurko, Oleksandr Logvin k.a. Krome, bonajn E-tradukojn de verkoj de ukrainaj aŭtoroj faris Miĥail Bronŝtein kaj Vladimir Samodaj el Rusio, Kris Long el Britio. Jam estas tradukitaj multaj ukrainaj popolaj kantoj (krome, aperis kelkaj bendoj), la verkoj de niaj klasikuloj Taras Ŝevĉenko, Lesja Ukrainka, Ivan Franko k.a. Dume kiel apartaj libroj, la verkoj de tri poetoj – Taras Ŝevĉenko, Lesja Ukrainka kaj Ivan Franko estas eldonitaj. Aliaj tradukoj aperis en periodaĵo. Nun estas preparata la speciala antologio de la ukraina literaturo danke al Volodimir Pacjurko kaj Viktor Pajuk. La aŭtoro la prezentata laboraĵo ankaŭ partoprenas en tiu projekto.

Laŭ nia opinio, taskoj de nuntempaj tradukoj estas ne nur pliriĉigi, sed evoluigi la lingvon kaj helpi en konatiĝo kun diversaj kulturoj kaj interkultura kompreniĝo de diversetnaj popoloj. I. Ertl menciis kelkajn „malkuraĝigajn apartaĵojn“ de Esperanta tradukado: „*Dum tradukado Esperanten, la translingviganton ne akompanas la sama hejmeco-sento, kiun li havas en la propra lingvo. Ofte lin helpas nur malperfektaj vortaroj, kiuj konfirmas lin ankaŭ ĉe maltrafaj elektoj... Lin minacas interfero, kiu kaŝas sin sub la masko de la menciita sintaksa-semantika muldebleco*” (Ertl, 1997: 133). Rilate al tradukado el la ukraina lingvo Esperanten ni diru pri fakte foresto de la granda ukraina-esperanta vortaro. Ĝi jam estas preparita por eldono danke al V. Pacjurko, sed dume aperis nur provekzemplero. Ĝis nun eblis uzi nur Ukrainan-Esperantan vortaron-minimumon (UEVM), kiu enhavas 5000 vortojn, geografiajn nomojn, skizan informon pri gramatiko kaj Esperanta movado, la literaturo kaj tradukoj Esperanten en Ukrainio. Kompreneble, ke la vortprovizo konsistas el la plej uzataj vortoj, inter ili ne multas lingvokulturemoj (ekz.: *barĉo, banduro, hopako, kozako, Kijiv (Kievo), Dnipro, Dnistro, Ukrainio (Ukrainujo)* k.a.). Krome, la tradukantoj ofte ne atentigas pri aldonaj signifoj de la leksiko kun etna komponento, kiuj estas klaraj por ukrainoj, sed plej parte nekonataj por alilingvanoj.

En nia tempo same aktualaj estas vortoj de M. Malovec: „*La tradukanto devas memori, ke li tradukas ne nur inter diferencaj lingvoj, sed ankaŭ inter diferencaj kulturoj. Ĉiu teksto vekas en la leganto asociojn, kiuj troviĝas kvazaŭ malantaŭ la vortoj ekster la teksto, kaj tiuj eksterlingvaj asocioj diferencas laŭ kulturoj historiaj aŭ geografiaj*” (Malovec 2000: 131). Tre multe tiuj ekstertekstaj asocioj dependas de leksiko kun kulturologia signifo, kiun ni pristudas en la prezentata laboraĵo.

1.2. Leksiko kun la kultura komponento

La lingvokultura leksiko formas tre gravan parton de la vorta konsisto de ĉiuj lingvoj. Tio ĉi estas vortoj, semantike kunigitaj kun la kulturo de la popolo. Kiam ni diras “kulturo”, ni komprenas ĝin en la vasta senco kiel tutecon de materialaj kaj spiritalaj atingoj, kiuj montras la nivelon de la evoluo de iu societo, homaro aŭ homo. La leksiko, kiu povas prezenti iun kulturon, dume ne havas unuigitan

nomon. Ni rigardos tiun ĉi leksikon el la vidpunto de leksika signifo. Kiel ni scias, “*leksika signifo – estas senco de la vorto, kiu reflektas en konscio kaj fiksas imagojn pri objekto, kvalito, procezo, aperaĵo k.t.p.*” (Lingvistika enciklopedia vortaro 1990: 261). La bazo de leksika signifo estas signifkato (koncepta senco), kiu korespondas kun denotato (reala objekto). Oni ofte pritraktas leksikan signifon kiel kunigon de koncepta kerno kaj pragmatikaj konotacioj. Konotacio estas komprenata kiel semantikaj komponentoj, kiuj aldoniĝas al koncepta (denotata) signifo (Komlev 1971, Telija 1986, Ufimceva 1986 k.a.).

La unuoj kun kultura komponento (kultura signifero, semao) en la signifkato de semantika strukturo formas specialan grupon – tiel nomatan lingvokultursignifan, fonan, “prilandscian” leksikon (Vereščagin, Kostomarov 1980, Bragina 1981, Voskresenskaja 1985, Ĉernov 1996, Rum 1999, k.a.). Alian grupon la sciencistoj kaj tradukistoj nomas “realaĵoj”, “senekvivalentaj vortoj”, ĉar ili apartenas nur al iu etna kulturo kaj ne ekzistas en aliaj (Vlaĥov, Florin 1986, Zorivčak 1989, Tomaĥin 1988, Mullagijeva 2001 k.a.). En ĉi tiuj vortoj kultursignifaj elementoj troviĝas en la denotato de semantika strukturo. Fine de la 20-a jarcento, kiam en la slavistiko aktiviĝis etnolingvistikaj kaj lingvokulturologiaj studoj, estas pli vaste uzataj terminoj “etnonimoj” (Tolstoj 1995, Jajvoronok 2007), “lingvokulturemoj” (Maslova 2001, Hrolenko 2001), “lingvaj stereotipoj” (Bartmiński 2004, 2007), “konstantoj” (Stepanov 2001), “signoj de kulturo” (Jajvoronok 2006) k.a. En la prezentata laboraĵo ni preferas la terminon “lingvokulturemoj”, per kiu ni nomas la kulturenhan leksikon de ambaŭ menciitaj grupoj. Jam aperis kelkaj specialigitaj vortaroj, en kiuj estas kolektitaj “prilandsciaj” vortoj (Ĉernov 1996, Rum 1999, Ukrainaj v slovaĥ 2004, Karpenko, Fedjko 2007), “realaĵoj” (Mullagijeva 2001), “etnonimoj” (Slavjanskije drevnosti 1995, 1999, 2004), “lingvaj stereotipoj” (Słownik stereotypów i symboli ludowych 1996, 1999/ T.1), “konstantoj” (Stepanov 2001), “signoj de kulturo” (Jajvoronok 2006) k.a. A. Wierzbicka (Wierzbicka 1992) komparis en diversaj lingvoj t.n. “semantikajn primitivojn” kaj montris diferencon en ilia semantika strukturo (Wierzbicka 1992). Al la kultursignifa leksiko apartenas geografiaj nomoj, etnografiaĵoj (nomoj de tipaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, vestaĵoj, loĝejoj, mebloj, vazaroj, laboraĵoj k.t.p.), nomoj de tradicia arto kaj folkloro, mitologio, kultoj, sociaj kaj politikaj realaĵoj, veturiloj ktp. kaj konataj eldiroj de famuloj, frazeologizmoj, proverboj k.a. En Esperanto, kiel montris en la doktora dicertacio A. Melnikov, eblas ankaŭ trovi preskaŭ ĉiujn nomitajn tematikajn vortgrupojn (Melnikov 2004: 370–522), kiuj ricevis specialan terminon „esperantonimoj“.

Jen ni nomos kelkajn vortojn de menciitaj supre du grupoj: 1) la vortoj, kiuj ne havas ekvivalentojn en alia lingvo kaj kulturo (ekz., *kimono* kiel nacia vestaĵo en la japana lingvo, *jurto* – en la lingvoj de nordaj popoloj ktp.); 2) vortoj, kiuj havas ekvivalentojn, sed diferenciĝas per semantika strukturo (ekz., *betulo* en la rusa lingvo estas ne nur arbo kun blanka trunko, sed simbolo de bela knabino kaj de Rusio kiel lando; *bovo* estas kutime besto por multaj, sed por hispanoj estas simbolo de la korido kaj forta naturo; *kriketo* estas konata por ĉiuj pilkludo, sed por britoj estas ekskluziva: en Britio la matĉo povas komenciĝi sabate kaj finiĝi sekvantsemajne sabate ktp.).

Ni prezentos kelkajn tradiciajn lingvokulturemojn, tre valorajn por ukrainoj. Do, la vorto *libero* estas tre grava, ĉar Ukrainio dum longa tempo ne estis sendependa, iliaj la plej bonaj gefiloj batalis por libero kaj nur en la jaro 1991 ĝi fariĝis sendependa lando. Post sendependiĝo multaj homoj sentas sin pli liberaj oficiale, sed malliberaj finance pro malgrandaj salajroj. En la ukraina lingvo vortoj *libero* kaj *sorto* formas rimon: *volja – dolja*, kiu signifas, ke sen libero ukrainoj ne imagas sian estontan sorton. En multaj popolaj kantoj kaj aŭtoraj versoj ni trovas ĉi tiujn rimitajn vortojn. Inter alie, ukrainoj kredas, ke homo ricevas la sorton dum naskiĝo, tamen ĝi ne estas kiel fatumo, sed dependas same de Dio kaj de la persono.

Kiel signoj de la ukraina kulturo estas uzataj vortoj: *pano* (ukr. *hlib*) – simbolo de riĉeco, gastemo, feliĉo; bele ornamitan panon ukrainoj donas al gastoj, preparas por edziĝfestoj, Pasko, naskiĝtagoj, por malproksima vojo; *barĉo* (ukr. *boršč*) – supo, kuirita el ruĝa beto, brasiko kaj aliaj pli ol 20 komponentoj; *kudrita kaj brodita bluzo* aŭ *ĉemizo* (ukr. *višivanka*) – parto de nacia kostumo; *brodita viŝilo* (ukr. *višitij ruŝnik*) – memfarita ornamaĵo el blanka brodita teksaĵo por la loĝejo, ankaŭ havas funkcion de gardanta talismano ktp.

Kiel simbolon oni perceptas la vorton *viburno* (ukr. *kalina*). Tiu ĉi arbusto kreskas apud preskaŭ ĉiuj domoj. Oni uzas ĝiajn berojn por kuraci, ornamu loĝejojn, prepari specialan drinkaĵon. Per beroj kun vinko ukrainoj ornamas edziĝfestan panon kaj la arbojn. Do, ĝi estas la simbolo de juneco, amo kaj virgeco. La arbusto povas kreski en tombejo kaj ĉi-okaze ĝi fariĝas la signo de tristo kaj memoro. Krome, *viburno* en nuntempa kulturo estas la simbolo de gepatra domo kaj Ukrainio. Oni proverbe diras, ke sen *viburno* kaj saliko ne ekzistas Ukrainio.

Fortan, kuraĝan, bravan viron ukrainoj nomas per vorto *kozak*. Tio ĉi estas historia nomo de batalanto por libero de Ukrainio en 13-17 j.c. La viron aŭ knabon kun samaj trajtoj tradicie oni komparis kun *kverko* (ukr. *dub*), *falko* (ukr. *sokil*). Belan, agrablan knabinon oni laŭ tradicio komparis kun *sovaĝa kolombino* (ukr. *horlicja*), *viburno* (ukr. *kalina*); la patrino, kiu lasis siajn infanojn – kun *kukolino* (ukr. *zozulja* ; same – en aliaj slavaj lingvoj). Paro de gekolomboj, gecignoj simbolas fidelajn amantojn, per iliaj figuretoj oni ornamas edziĝfestan panon.

Nuntempa kulturologia leksiko nomas ĉefajn trajtojn de Ukrainio - sendependa ŝtato : *Prezidento* (ukr. *Prezident*), *la ŝtata Blazono* (ukr. *trizub*), *la ŝtata Himno* (ukr. *himn*), *la ŝtata Flago* (ukr. *prapor*) k.a. Krome, kulturologian konotacion havas nomoj de politikaj, sociaj, sciencaj, kulturaj organizaĵoj, unuiĝoj: *Parlamento* (ukr. *Verĥovna Rada*), *Ministra Konsilio* (ukr. *Rada Ministriv*), *Supera Juĝistaro* (ukr. *Verĥovnij Sud*); *Akademio de Sciencoj de Ukrainio* (ukr. *Akademija Nauk Ukrajini*), *la kultura societo "Prosvita"* (ukr. *"Prosvita"*) ktp. Gravaj ankaŭ realaĵoj de ĉiutaga vivo, kiuj iomete diferencas de tiuj, kiuj ekzistas ĉe aliaj popoloj: *bazaro* (ukr. *jarmarok* – bazaro, dediĉita al iu religia festo aŭ iu fama loko, ekz. *jarmarok en vilaĝo Soroĉinci*, priskribita de N. Gogol kaj renovigita nun) k.a. Kiel la signoj de la nacia kulturo servas la geografiaj nomoj: *Kijiv*, *Ljviv*, *Poltava*, *Beresteĉko*, *Krim*, *Dnipro* k.a.

La kulturologian signifon ricevas eldiroj de konataj personoj, proverboj, ekz.: *"Batalu kaj vi venkos"* (Taras Ŝevĉenko), *"Contra spem spero"* (Lesja Ukrajinka), *"Vivon travivi – ne kampon trairi"* (popola proverbo) k.a.

Tre gravas historiaĵoj, kiuj respegulas la pasintajn travivaĵojn de la popolo kaj jam bezonas aldonajn klarigojn (ekz. *Kijiva Rusjo*, *Zaporoga Siĉ*, *hetmano*, *ĉumako* k.a.). Necesas komenti mitologiajn kaj demonologiajn nomojn (*Kupalo*, *Mareno*), tradiciajn popolajn festojn (*Kolada*, *Sanktojohana festo*), kiuj ofte konservas paganajn imagojn, festajn realaĵojn (*kutaja*, *pisanko*), nomojn de muzikaj instrumentoj (*kobzo*, *banduro*), popolaj dancoj (*hopak*, *kozaĉok*, *horlicja*) ktp.

Pri la leksiko kun kultura signifo ni skribis en kelkaj artikoloj, inter ili estas esperantlingvaj (Daniljuk 2005, 2007). En la prezentata laboraĵo ni elektis tematikajn grupojn de la lingvokulturemoj, kiuj ankoraŭ ne estis pristuditaj, sed estas ofte uzataj en E-tradukoj kaj bezonas pliiĝustigajn komentojn: 1) Landnomo *Ukrainio* kaj ĝiaj variantoj; 2) Nomo de la ĉefurbo *Kijivo*; 3) Nomo de la riveroj *Dnipro*, *Dnistro*; 4) Nomoj de la etnografiaj regionoj; 5) Naciaj simboloj; 6) Historia nomo de la ŝtato *Kijiva Rusjo*; 7) Nomoj de la tradiciaj popolaj festoj kaj iliaj realaĵoj.

1.3. Lingva bildo de la mondo

Bildo de la mondo (sinonimoj – modelo, tipo, strukturo de la mondo) estas tuteco de la homaj imagoj pri ĉirkaŭaĵo, kiu aperas kiel rezulto de viva sperto aŭ tuteco de homaj scioj de iu popolo aŭ homaro pri ĉirkaŭaj fenomenoj kaj procezoj (Lingvistiĉeskij enciklopediĉeskij slovarj, 1990: 17). *Lingva bildo de la mondo* estas la rezulto de nomiĝo "de aĵa kaj koncepta mondo per lingvaj rimedoj – per vortaraj kaj gramatikaj unuoj (Jermolenko, Bibik, Todor 2001: 93). Pensojn pri lingvaj diversecoj, dependaj de specifaj imagoj pri ĉirkaŭa mondo kaj karaktero de popolo ni trovas en verkoj de V. fon Humboldt (Humboldt, 1995), O. Potebnja (Potebnja, 1993), L. Ŝĉerba (Ŝĉerba, 1974), B. Whorf (Whorf, 1966) k.a. Pri etna lingva bildo de la mondo skribis G. Kolŝanskij (Kolŝanskij, 1990), V. Ivanov, V. Toporov (Ivanov, Toporov, 1965), T. Civjan (Civjan, 1990), N. Tolstoj (Tolstoj, 1995), J. Bartmiński (Bartmiński, 2000) k.a.. Al la folklora lingva bildo de la mondo ni dediĉis specialan artikolon (Daniljuk, 1996).

La sciencistoj substrekis, ke lingva bildo de la mondo havas specifajn etnajn trajtojn. Ekzemple, L.Ŝĉerba atentigis: „Mondo, kiu estas donita al ni per nia senpera sperto, estanta ĉiam la sama, estas

ekkonanta per diversaj manieroj ĉe diversaj lingvoj, eĉ ĉe tiuj, per kiuj parolas popoloj, kiuj havas definitan unuecon koncerne de la kulturo (Ŝĉerba, 1974: 69). Tio signifas, ke parto de lingvaj unuoj havas malsamajn semantikajn strukturojn, precipe lingvokulturemojn, kiuj formas specifecon de lingva bildo de la mondo.

Por pristudi arkaikajn slavajn lingvajn modelojn de la mondo V. Ivanov, V. Toporov (Ivanov, Toporov, 1965), T. Civjan (Civjan, 1990) proponis la metodon de semantikaj opozicioj, ekz.: *blanka – nigra, vivo – morto, proksima – malproksima, supro – malsupro, tago – nokto, ĉielo – tero, vira – femina k.a.* Ili formas specifajn astralan, kreskaĵan, faŭnan, antropomorfan, koloran k.a. kodojn, bone videblajn en simbolaj sistemoj dum tradukado. Aliaj sciencistoj uzas la metodojn de semantikaj unuoj, tematikaj grupoj aŭ t.n. kampoj. Ekzemple, en la rusa etnolingvistika vortaro “Slavjanskije drevnosti”, kies 3 volumoj aperis sub gvido de N. Tolstoj en Moskvo, estas prezentitaj jenaj tematikaj grupoj: I. Substantivoj. 1. Produktiloj. 2. Vazaro. 3. Vestaĵoj. 4. Manĝaĵoj. 5. Objektoj – atributoj de homo kaj besto. 6. Kultaj objektoj. 7. Ritualaj objektoj. 8. Substancoj. 9. Elementoj kaj naturaj procezoj. II. Kreskaĵoj. III. Bestoj. IV. Personoj. Nomoj. V. Kalendaro. VI. Lokativoj. VII. Atributivoj. VIII. Tempo (Slavjanskije drevnosti, 1995). Simila metodo de la tematika priskribo estas uzata en la pola etnolingvistika vortaro “Słownik stereotypów i symboli ludowych”, kiun preparas la kolekto sub gvido de J. Bartmiński en Lublin. En la unua parto estas priskribitaj la “kosmaj” konceptoj (*ĉielo, astrolumiloj, fajro, ŝtonoj*) (Słownik stereotypów i symboli ludowych, 1996/1.1) En la dua parto ni trovas la “terajn” konceptojn (*tero, valo, monto, akvo, puto, rivero, lago k.a.*) (Słownik stereotypów i symboli ludowych, 1999/1.2). En jam nomitaj libroj pri traduko de realaĵoj ankaŭ estas montritaj tematikaj grupoj (Vlaĥov, Florin 1986, Tomaĥin 1988, Zorivĉak, 1989). Ni opinias, ke tematika principo estas la plej oportuna por komparaj studoj. Pro tio en la prezentata laboraĵo ni priskribas ukrainajn lingvokulturemojn, kiuj formas gravan parton de ukraina lingva mondobildo, elektitajn el esperantaj tradukoj laŭ kelkaj temgrupoj.

II. Ukrainaj lingvokulturemoj en tradukitaj tekstoj Esperanten

2.1. Landnomo *Ukrainio* kaj ĝiaj variantoj

En esperantaj tradukoj estas uzataj kelkaj variantoj de la landnomo: *Ukrainio, Ukrainujo, Ukrainio, Ukrainjo, Ukraino, Ukraini’, tero Ukraina, lando Ukrainia*. Ekz.: *La 24-an de aŭgusto estis deklarita la sendependeco de Ukrainio* (art. “Ukrainio sur mapo de Eŭropo”, trad. V. Pacjurko (US, 1994/ 1: 6)); *Beleco de Ukrainio, Podoljo* (L.Ukrainka. Beleco de Ukrainio..., trad. A. Rogov, K. Rabinoviĉ (LUkr: 10)); *Iru, filoj miaj, hejmen, Al Ukrainio* (T. Ŝevĉenko. Pensoj miaj..., trad. K. Gusev (TŜ: 18)); *Dolĉega Ukrainjo, karega patrin’!* (L.Ukrainka. Sep kordoj. Do. Himno, trad. A.Koba (LUkr: 14)); *Ukrainon amas vi, Do gajnas la honoron...* (I. Franko. Al la grizkapulo, trad. M. Bronŝtejn (IF: 30)); *Por Ukrainio, kun arda brulo, Ek, ho bravuloj, Al batal’* (M.Voronij. Por Ukrainio! Trad. Denteto (US, 1991/6: 2))* En E-traduko de la ukraina nacia himno ni vidas la formon *Ukrainio: Ne jam mortis Ukrainio, nek liber’, nek gloro. Kaj ankoraŭ al ni, fratoj, venos sortfavoro* (trad. V. Jaskovec kaj V. Pacjurko (US, 1991/ 4: 3). Ni konsentas kun la postnoto de V. Jaskovec: *Ukrainio – la tolerebla en poezio formo de la vorto “Ukrainio”* (US, 1991/ 4: 5). Esperantigita teksto de “Preĝo” havas la varianton *Ukraini’*: *Di’, Ununura, Majesta, Gardu Patrujon por ni. De la libero radiojn Sendu al Ukraini’* (O. Konyskij. Preĝo (US, 1991/1: 2)).

Kiel landnomoj estas rekomenditaj vortformoj *Ukrainio, Ukrainujo* ([vidu](#): PIV 2005: Ukrain - ujo, - io - E – Eŭropa regno (Kievo)). Ni povas konstati, ke en nuntempaj oficialaj tekstoj pli ofte troveblas la formo *Ukrainio*, sed en beletraj (precipe, poetikaj) verkoj uzeblas variantoj, kiuj ofte dependas de frazoritmo kaj rimo.

*Inter alie, ni menciuj, ke la formon *Ukrainjo* uzis K. Kalocsay en la poemo “La dua fronto” (Tra la ŝtormo 1939-1945: 35): *martir’ Ukrainjo krias kaj milmiloj da ombroj nukpafitaj kaj gasitaj, la tomboj de l’ viktimoj mem fositaj, la arboj hontaj esti pendigitaj!* Krome, ni trovas ĝin en la poemo de

A.Logvin “Lubni” (fragmento el la poemo “Ukrajno”// Sur la vivovojo 1964: 47-49): *Ukrajno kara, ĉarmo mia, azil' de najtingala jun', Ho venu al popolo via Feliĉa vivo sub la sun'.*

2.2. Nomo de la ĉefurbo *Kijivo*

Antaŭ la 1991 j., kiam Ukrainio estiĝis sendependa ŝtato, oni uzis la formon *Kievo* kiel la nomon de la ĉefurbo (laŭ ekzemplo de la rusa *Kiev*). En la originaj kaj tradukitaj tekstoj ni ĝin trovas ofte, ekz.: *La ĉefurbo de Ukrainio estas Kyjiv (esperantigita formo – Kievo), kiu situas sur la bordo de la rivero Dnipro* (art. “Ukrainio sur mapo de Eŭropo”, trad. V. Pacjurko (US, 1994/ 1: 6)). La grafika (ortografia) varianto *Kyjiv* aperis por pli ĝuste transdoni la ukrainan vokalon [u], kiu estas pli malalta kaj pli meza ol esperanta [i]. Uzante la fonetikan sistemon de E, nuntempa formo de substantivo *Kijiv* kaj derivita adjektivo *Kijiva*, kiuj estas disvastigitaj en la ukraina E-periodaĵo, laŭ nia opinio, estas pli taŭgaj por la ukraina vorto *Kijiv*. Ekz.: *La sekvantan tagon M.Lineckij estis invitata al scienc-praktika konferenco..., kiu okazis en Kijiva nacia universitato de kulturo kaj arto* [H, 2009/ 1-2: 5]. Do, nuna formo *Kijivo* estas rekomendinda same en tradukitaj tekstoj.

2.3. Nomo de la riveroj *Dnipro, Dnistro*

La plej uzataj estas nomoj de la riveroj *Dnipro* kaj *Dnistro*. En la tradukoj ni trovas la komenton pri ili, ekz.: *Dnipro, Dnister (esp. Dnipro, Dnistro) – la plej grandaj riveroj de Ukrainio, ambaŭ enfluas la Nigran maron* (art. de R. Ivanĉenko “La princepoko”, trad. Poĉopo (US 1995/ 1:8)). En la tradukitaj tekstoj ekzistas la variantoj *Dnepro* (rusa *Dnepr*): *Brulegas, ĝemas Dnepro vasta* (trad. B.Berin) kaj *Dnipro: Bruegas Dnipro, grandrivero* (trad. E.Miĥalski) (T. Sevĉenko. Frenezulino [TŜ: 5-6]). La formo *Dnipro* estas pli taŭga por la ukraina riveronomo *Dnipro*.

2.4. Nomoj de la etnografiaj regionoj

En E-tradukoj estas uzataj nomoj de la etnografiaj regionoj de Ukrainio: *Volinio, Podolio, Halicio, Transkarpatio, Bukovino, Huculio* k.a. Ofte en la tekstoj estas la klarigoj pri la regiono, ekz.: *Volinio – “nordokcidenta provinco de Ukrainio”* (art. de R. Ivanĉenko “La princepoko”, trad. Poĉopo (US 1995/ 1: 8)); *Galicio, Transkarpatio, Bukovino – “la okcidentsudaj regionoj de Ukrainio”* (art. “La Doŭbuŝrokojo”, aŭt.V. Pacjurko (US 1994/ 1: 14)). Parto de ili havas kelkajn variantojn: *Podolio – Podolujo, Podoljo; Halicio – Galicio, Galicujo; Bojkio – Bojkujo; Huculio – Huculjuo, Guculio, Guculujo*, ekz.: *Beleco de Ukrainio, Podoljo ! Vi ĉarmas la koron* (L.Ukrainka. Beleco de Ukrainio..., trad. trad. A. Rogov, K. Rabinoviĉ (LUkr: 10)); *Por ĉiuj de ili estas elektita koncerna fono: Huculujo dislokiĝis sur altaĵo, Bojkujo – sur submonto, Podolujo – en valo* (art. de I. Sova “Muzeoj de popola konstruarto”, trad. A. Rudĉik (Tra soveta Ukrainio 1970/1 : 28)). En la artikolo “Notoj pri Halicio / Galicio” de O. Kerzjuk (US 1991/ 2: 14) la aŭtorino menciis, ke la formo *Halicio* estas pli ĝusta por la ukraina nomo *Haliĉina*. Same ni diru pri la formo *Huculio* (ukr. vorto *Huculŝĉina*). En la revuo “Ukraina stelo” estis konstanta rubriko “Haliciaj anekdotoj”, kies titolo tute prave havas la adjektivon *Halicia*. Sed, ekzemple, en la antaŭartikolo de V.Pajuk “Ivan Franko – poeto de l’ nacia honoro” el la libro de la tradukitaj verkoj de I. Franko (2008) estis uzita la formo *Galicio: Ivan Franko naskiĝis en orienta Galicio...* (IF: 5).

2.5. Naciaj simboloj

Tradiciajn simbolojn en la slavaj lingvoj pristudis F. Mikloŝiĉ (Mikloŝiĉ 1895), A. Afanasjev (Afanasjev 1995), M. Kostomarov (Kostomarov 1905), O. Potebnja (Potebnja 1914, 1995), I. Ohijenko (Ohijenko 1995), A. Veselovskij (Veselovskij 2004) k.a. La simboloj de diversaj popoloj estas kompilitaj en kelkaj enciklopedioj (ekz.: Bauer, Djumotc, Golovin 2000). Pri lingva specifikado de la poetika simbola sistemo skribis nuntempaj ukrainaj sciencistoj: S. Jermolenko (Jermolenko 1987), V. Kononenko (Kononenko 1996), O. Simoviĉ (Simoviĉ 1999) k.a. Ĉefaj grupoj de la ukrainaj

tradiciaj simboloj estas jenaj: arketipaj (*tero, akvo, aero, fajro*), astralaj (*suno, luno, stelo*), kreskaĵaj (*viburno, saliko, ĉerizo, kverko*), ornitologiaj (*kolombo, aglo*). Ni ilin prikonsideris en nia anglalingva artikolo (Danylyuk 2008), niaj laboraĵoj pri lingvokultura leksiko kaj en la prelego dum la Simpozio, dediĉita al la 10-jara jubileo de Interlingvistikaj Studoj en UAM (Poznań, 2008). En la prelego ni komparis vortojn-simbolojn en la ukraina folkloro kaj Esperanto, trovinte komunajn trajtojn. Ni substreku, ke A. Melnikov dediĉis al E-simboloj parton de la doktora monografio "Lingvokulturologiaj aspektoj de la planitaj internaciaj lingvoj (sur la fono de la etnaj)" (Melnikov 2004). Ĉi tie li precipe montris la simbolojn *verda stelo, verda standardo, himno, Esperantio (Esperantujo)*. Ni opinias, ke ĉiujn simbolajn vortojn necesas pritrakti ne nur kiel stilistikajn figurojn, sed kiel la produktojn de kultura kaj historia evoluo de la popolo (eĉ imagebla, kiel esperanta popolo), kiuj respeguliĝas en la lingvo.

En la prezentata laboraĵo ni parolos pri la ŝtataj simboloj de la sendependa Ukrainio, kiu estis deklarita la 24-an de aŭgusto de 1991 j.: la Himno, la Blazono, la Flago. Troveblas du variantoj de la Himna titolo: "Ankoraŭ ne mortis Ukrainio" (red. art. "Ukrainio sur la mapo de Eŭropo" (US 1994/1: 6)) kaj "Ne jam mortis Ukrainio" (trad. V. Jaskovec kaj V. Pacjurko (US 1991/ 4: 3). Ni citos la lastan strofon de la dua sufiĉe bona traduko: *Vervo kaj labor' fava plibonigos ĉion Kaj eksonos liberlando en Ukrainio, Trans Karpatoj ĝi reeĥos kaj al step' parolos, Ukrainia glor' vastiĝos inter la popoloj* (US 1991/ 4: 3). En la artikolo "Ukrainia nacia kanto", kiu postsekvas la tradukon, V. Jaskovec donas gravan informon pri la historio de la himno, kreita laŭ la vortoj de P. Ĉubinskij (varianto – Ĉubynskij) kaj la muziko de M. Verbickij (Verbyckij) en la 19 j.c. kaj akceptita kiel la ŝtata Himno de Ukrainio en 1992 j. (US 1991/ 4: 4-5).

Pri la Blazono kaj la Flago temas en la redakcie esperantigita artikolo de M. Sulima (Sulyma) "Tom pri la ukrainaj naciaj simboloj" (US 1991/ 2: 1-3). Klarigante diversajn teoriojn pri la signifo de la tridento (tiel oni nomas la formon de la Blazono), la aŭtoroj substrekas, ke sciencistoj ne havas unuaniman opinion: *Ekzistas multaj teorioj, kio estas tiu signo – simbolo de la ŝtata potenco, militista aŭ religia emblemo, monogramo, geometria ornamo aŭ io alia* (US 1991/ 2: 2). La plej interesa de nia vidpunkto estas supozo, ke *la tridento estas stiligita Mondarbo – universala mitologia bildo, kiu ekde la bronzepoko de antaŭbudhisma kaj antaŭkristanisma periodoj de la kulturevoluo, en tradicioj de ĉiuj kontinentoj signifas la modelon de la Universo* (US 1991/ 2: 2). Tiel nomata Malgranda Blazono de Ukrainio estis konfirmita en 1992 j.

La informoj pri la Flagkoloroj en la menciita artikolo estas sufiĉe plenaj: *La blua kaj flava (ora) koloroj aperas unufoje sur la standardoj de haliciaj regimentoj, kiuj partoprenis en la Grunvalda batalo en 1410... La blu-flavajn flagojn estis ankaŭ inter la kozakaj standardoj dum la liberiga milito de la ukraina popolo sub gvido de B. Hmelnyckij (1648-1654)... La blua kaj flava koloroj vastiĝis ankaŭ en la XVIII jc... La 22-a de Marto 1918 la blu-flava flago estis konfirmita de la Centra Konsilio kiel la ŝtata flago de Ukraina Popola Respubliko* (US 1991/ 2: 2-3). La nuntempa Flago de Ukrainio estis konfirmita en 1992 j.: *la elekto de la koloroj motiviĝas jene: la simboloj de Ukrainio estas pura ĉielo – simbolo de paco (la blua koloro) kaj tritikkampo – la simbolo de riĉeco (la flava koloro)* (US 1991/ 2: 3).

2.6. Historia nomo de la ŝtato *Kijiva Rusjo*

Tio ĉi estas historia nomo de la regno kun la centro en urbo Kijiv, kiu ekzistis en la teritorio de nuntempa Ukrainio, nordokcidenta parto de Belorusio kaj orientsuda parto de Rusio ekde la 9-a ĝis la 13-a jarcento. Post la disfalo en ĝia okcidenta parto aperis Haliĉ-Volinia princejo, kiu ĝis la 14-a jarcento daŭrigis la tradiciojn de Kijiva ŝtato. En E-tradukoj ni trovas kelkajn variantojn de la landnomo: *Kieva Rusjo, Kieva Rutenio, Kievio, Kyevio, Kyjiva Rusjo, Kijiva Rusjo, Rusjo*, ekz.: *Kieva Rusjo (Kievio, ukraîne "Kyjivska Rusj") estis la unua potenca ŝtato de l'ukraina popolo* (art. de R. Ivanĉenko "La princepoko", trad. Poĉopo (US 1995/ 1: 8)). En la redakcia artikolo "Vilaĝo, en kiu naskiĝis titano" ni vidas la formon *Rusjo: malnova Rusjo – lando de la orientaj slavoj* (US 1994/ 1: 10). La nomo Rutenio kun la signifo "okcidenta Ukrainio" en polaj libroj troveblas ĝis la komenco de la 20-a jarcento.

Se oni konsentus konstante uzi la formon *Kijivo*, tiam necesus elekti la varianton *Kijiva Rusjo* kiel pli ĝustan por la ukraina vortunuoj *Kijivsĵka Rusj*.

Ofte uzeblas la historia frazeologizmo-kromnomo por la urbo *Kijivo* – *patrino de urboj rusaj*, ekz.: *Patrino de urboj rusaj – tiel nomis ĝin la unua Kieva princo Oleg en la jaro 882* (red. art. “Kievo – ĉefurbo de Ukrainio” (VU 1991/nov : 78)). Laŭ nia opinio, ĝi devus aspekti tiel: *Kijivo – patrino de urboj rusaj*. Se ni uzas la adjektivon *rusaj*, tio signifas, ke temas pri *rusoj* kaj *Rusio*, kiuj tiutempe ankoraŭ (same, kiel *ukrainoj*) ne elapartiĝis.

2.7. Nomoj de la tradiciaj popolaj festoj kaj iliaj realaĵoj

Multaj ukrainaj tradiciaj festoj kunigas elementojn de pagana kaj kristana religioj, havas multe da etnografiaj trajtoj. Pli bone ili estas konservataj en la okcidenta parto de Ukrainio, precipe, en la regiono de Karpatoj. Tre gravaj ĉi rilate por ukrainoj estas festoj: *Kristnasko-Kolada*, *Malnova Nova jaro* (Nova jaro laŭ malnova ortodoksa stilo), *Pasko*, *Sankta Triuno* (nomata de ukrainoj Verdaj festoj), *Festo de Sankta Johano (Festo de Ivan Kupalo)*. En originaj kaj tradukitaj tekstoj ĉi tiuj nomoj kaj iliaj realaĵoj bezonas specialajn klarigojn. Ekzemple, en la artikolo de V. Pacjurko “Kristnasko revenas kaj restas” estas informo pri duecaj trajtoj de la festo: *Kristnasko kuniĝis kun pagana (antaŭkristanisma) festo de Kolada, la tutslava diino de la ĉielo, patrino de la Suno, edzino de Daĵboh (la dio de la suno, lumo kaj bono), por kiu niaj prauloj celebris la plej mallongan en la jaro tagon kaj la renaskiĝkomencon de la sunforto* (US 1991/1: 5). Grave, ke en la teksto estas uzataj nomoj de la pagana dio *Daĵboh*, la deino *Kolada* kun detalaj klarigoj. Nomoj de la festaj realaĵoj ankaŭ havas specialajn komentojn, ekz.: *diduĥ – La plej grava estas la tritikarbo, nomata „diduĥ”... Ĝi ankoraŭ de la paganaj tempoj prezentas la spiriton de la prauloj, kiuj venas dum Kristnasko gaste* (US 1991/1:5); *koladkoj – Kristnaskaj kantoj, glorantajna naskiĝon de Jesuo, plenigitaj per bondeziroj al la domgemastroj* (US 1991/1: 7); *kutja – kuiritaj tritikgrajnoj kun papavo kaj mielo, foje kun juglandoj kaj aliaj aldonoj* (US 1991/1: 7). En la teksto estas nomoj de aliaj tipaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj: *barĉo* (sen klarigo, ke estas la supo, kuirita el ruĝa beto, brasiko k.a. legomoj) *kun „oreletoj” (pastofolioj, farĉitaj per fungoj), varenikoj* (sen klarigo, ke estas manfaritaj el pasto duonrondaj formoj, farĉitaj per kazeo, terpomoj, fungoj k.a.), *holubci (farĉitaj brasikfolioj), kompoto el la sekigitaj fruktoj* (sen la specia nomo „uzvar”) k.a.

Dum Kristnaskaj festoj ĝis nun en okcidentaj regionoj de Ukrainio eblas vidi *vertepon*. En la teksto troviĝas komento, ke tio estas *la migranta folklorteatro, nomata „vertep”, en kiu ludas amatoraj aktoroj* (US 1991/1: 8). Necesas aldoni, ke per la vorto „vertep” oni same nomas la teatraĵojn: *Tradiciaj rolantoj en la vertepo estas paŝtistoj, la tri reĝoj, anĝelo, morto, Herodo. La ĉefa temo de tiuj teatraĵoj, prezentataj en la loĝdomoj, estas Kristnasko. La vertepanoj portas „staleton” – majstre faritan maketon de la betlehema stalo, kie naskiĝis Jesuo, kompreneble kun la figuroj de eta Jesuo, Maria, Jozefo, paŝtistoj, bovoj kaj aliaj* (US 1991/1: 8). Pli detalan priskribon de *vertepo* legantoj povas vidi en la artikolo „Vertepo” (la aŭtoro-tradukisto Poĉopo (US 1994/1: 17)).

La rakonto „En la Sanktjohana nokto”, esperantigita de V. Pacjurko, enhavas nomojn de paganaj dioj kaj simbolaj kreskaĵoj (US 1995/1: 20-22). Estas uzataj variantoj de la festonomo: *Festo de Sankta Johano, Festo de Johano la Baptisto, Festo de Ivan Kupalo* kun jena informo: *De pratempoj en Ukrainio oni nomis ĝin festo de Ivan Kupalo. Tio estas mirinda celebrado de du sanktuloj – la kristana Johano (aŭ ukraine Ivan) kaj de Kupalo – la pagana dio de l’teraj fruktoj...* (US 1995/1: 20). En la teksto ni trovas ne nur la komentojn pri 2 speciale faritaj figuroj, uzataj dum la festo (ekz. *Marena – simbola diino de l’morto*), sed detalajn priskribojn pri ilia aspekto. Pri *Marena*: *Oni faras ĝin malsame en diversaj lokoj. Ie preferatas la pajloŝtopita figuro, simila al birdtimigilo, aloloke – argila pupo. En la naskovilaĝo de Oksana ĝi estas arbeto, vestita en virinĉemizo kaj ornamita per rubandoj* (US 1995/1: 21). Pri *Kupalo*: *Ankaŭ Kupalo estas bela: la salikbranĉo, ornamita per floroj kaj kronetoj* (US 1995/1: 21). Ni devus aldoni, ke la figuro de *Kupalo* pli ofte estas lignopajla, kaj ĝin fine de la festo oni ĵetas en la fajron. La ornamitan arbeton de *Marena* oni dronigas en la rivero aŭ lago. La simbolo de la festo krome estas magia *filikfloro*: *Oni diras, ke en la sanktjohana nokto mirakle ekfloras filiko, kaj homo, trovinta ĝian floron, estos feliĉa dum la tuta vivo* (US 1995/1: 21). Ni

substreku, ke oni kredis, ke tiu persono komprenus „lingvon“ de ĉiuj kreskaĵoj, bestoj, birdoj kaj povus facile trovi trezoron en la tero.

Multe da mitologiaj kaj demonologiaj nomoj estas uzataj en la dramo de Lesja Ukrainka „La Arbara Kanto“, fragmente tradukita de V. Pacjurko (US 1991/2: 5-9). La tradukisto mem diris pri malfacileco de ilia esperantigado kaj trovitaj vojoj en la intervuo de N.Vološin: „*Plej malfacilis tio, ke la rolantoj de la dramo, krom ordinaraj homoj, estas plejparte estaĵoj el la ukraina mitologio kaj demonologio, tute ne konata al la internacia legantaro. Estas en la verko akvo-, arbar-, kamp-feoj kaj nimfoj, diversaj „obskuraj fortoj“ – diabloj, „En la rok’ sidanto“ k.a. ... La plej bonan eliron mi dume ne trovis, mi uzas parte neŭtralajn vortojn, fiksitajn en PIV aŭ en aliaj vortaroj: ekzemple akvoŝeĉo, Diabl(et)o, Delogulo, parte – paŭseojn, ekzemple „Digrompanto“, „En la rok’ sidanto“, kaj, parte, transliterante ukrainajn realojn, ekzemple Rusalko, klarigante ilin en la piednotoj“* (US 1991/2: 5). Ni citas: *POTERĈOJ* (du malgrandaj infanetoj en blankaj ĉemizetoj elnaĝas el inter rufaĵoj)... *LA UNUA*: Kiun trovi vi penas? „*LA DIGROMPANTO*“: Rusalkon-belulinon, mian kordestinon. *Akvreĝino mia estas plej simpatia!* (US 1991/2: 6). En la komenco de la prologo estas la priskribo de „La digrompanto“ – *juna, tre blonda, bluokula, kun larĝaj kaj samtempe fluaj movoj: lia vesto kolorŝanĝiĝas...* (US 1991/2: 5). Postnotoj klarigas la vortojn *poterĉo* – *en la ukraina popola demonologio: ne baptita, dronigita de la patrino bastardo, iĝinta poste marĉa fajreto; rusalko* – *en la ukraina mitologio estas akva feino* (US 1991/2: 6). Kaj similaj ekzemploj povas esti daŭrigotaj.

Konkludoj

1. Lingvokulturemoj formas gravan parton de la vortprovizo de etna lingvo. Per la termino „lingvokulturemo“ en la prezentata laboraĵo ni nomas leksikon kun kulturologia signifo. De la struktura flanko tio estas ne nur unuopaj leksemoj, sed sintaksaj unuoj, frazeologiaj esprimoj, kiuj havas kulturologiajn semaĵojn.

2. De la semantika flanko lingvolkulturana leksikon eblas dividi je 2 grupoj: 1) vortoj, kiuj ne havas ekvivalentojn en alia lingvo kaj kulturo (ekz., *barĉo, vertepo, koladko, ĥato* k.a.); 2) vortoj, kiuj havas ekvivalentojn, sed diferenciĝas per semantika strukturo (ekz., *viburno, aglo, falko* k.a., simbolaj vortoj, nomoj de koloroj ktp.).

3. De la historia vidpunkto lingvokulturemoj estas nomoj de nuntempa vivo de ukrainoj (ekz. *Blazono, Himno, Flago, marŝruta buseto*) kaj historiaĵoj (*kozako, Zaporoga Siĉ* k.a.). Aparta grupo konsistas el geografiaj nomoj (*Ukrainio, Huculio, Dnipro*) kaj nomoj de famaj personoj (*Hrihorij Skovoroda, Taras Sevcenko, Lesja Ukrainka* k.a.).

4. Lingvokulturemoj formas etnan specifikon de lingva bildo de la mondo.

5. En la prezentata laboraĵo ni pristudis jenajn tematikajn grupojn: 1) Landnomo *Ukrainio* kaj ĝiaj variantoj; 2) Nomo de la ĉefurbo *Kijivo*; 3) Nomo de la riveroj *Dnipro, Dnistro*; 4) Nomoj de la etnografiaj regionoj; 5) Naciaj simboloj; 6) Historia nomo de la ŝtato *Kijiva Rusjo*; 7) Nomoj de la tradiciaj popolaj festoj kaj iliaj realaĵoj.

6. Trarigardante elektitajn lingvokulturemojn en la kuntekstoj, ni trovas jenajn manierojn por transdoni ilin en E-tradukoj – uzado de: 1) kutimaj vortoj, fiksitaj en E-vortaroj (ekz.: *akvoŝeĉo*); 2) paŭseoj, (ekz. „*Digrompanto*“); 3) transliteracio (ekz.: *Ukrajno, rusalko*); 4) kuntekstaj komentoj (aldona informo de la tradukisto); 5) postnotoj (piednotoj) k.a. Fakte, estas uzataj la rimedoj, rekomenditaj de profesiaj tradukistoj (ekz. Zorivĉak 1989: 14–15), malgraŭ ke parton de E-tradukoj faris tradukantoj. Ni ne pritaksis aliajn kvalitojn de la tradukoj, ĉar temis nur pri kultursignifaj unuoj.

7. Eblas nomi jenajn mankojn en tradukado de la kultursignifa leksiko: 1) ne ĉiam tradukantoj donas bezonajn kulturologiajn informojn; 2) estas uzataj multe da ortografiaj, morfologiaj kaj sintaksaj variantoj de geografiaj nomoj kaj familnomoj de famuloj (ekz.: *Ukrainio, Ukrainujo, Ukrainio, Ukrajno, Ukraino, Ukraini’, tero Ukraina, lando Ukrainia; Kievo, Kijivo; Dnepro, Dnipro; Lesja Ukrainka, Lesja Ukrajinka* k.a.). Tio signifas, ke ukrainaj tradukantoj Esperanten devas esti pli atentaj por adekvate transdoni kulturenhan leksikon kaj ellabori unuopajn postulojn.

8. Tradukantoj el aliaj naciaj lingvoj Esperanten devas memori pri neceso plej bone traduki la leksikon kun etna komponento por la plej bone transdoni etnan bildon de la mondo.

9. Por tradukoj de belartaj (precipe poeziaj) tekstoj tre gravas du trajtoj: fideleco kaj belsoneco, por aliaj tekstoj la ĉefa estas ĝusta transdono de la senco, signifo.
10. Tradukarto en Esperanto bezonas plurajn teoriajn kaj praktikajn pristudojn kaj preparon de rekomendoj por tradukantoj el diversaj lingvoj, precipe koncerne al kulturenhavaj unuoj.

Bibliografio

- Afanasjev, Aleksandr N. (1995): Poetiĉeskije vozzrjenija slavjan na prirodu 'Poetika vidpunkto de slavo al naturo', Moskva: Sovremjennij pisatelj (la reeld. de 1865–1867jj.)
- Auld, William (1958): Enkonduko. En: Esperanta antologio. Poemoj 1887-1957. W. Auld (red.), J.Regul-eldonisto: La Laguna, p.11-27
- Bartmiński, Jerzy (2006): Językowe podstawy obrazu świata 'Lingvabazo de mondobildo', Lublin: Wydawnictwo Uniwersytetu Marii-Curie Skłodowskiej
- Bartmiński, Jerzy (2004): Etnolingwistyka słowiańska – prób bilansu 'Slava etnolingvistiko – provo de resumo'. En: Etnolingwistyka: Lublin, 2004 / 16
- Bartmiński, J. (2000): Językowe podstawy obrazu świata. – Lublin: Wyd. Uniwersytetu Marii Curie-Skłodowskiej
- Buligina, Tatjana V, Smeljov, Dmitrij (1997): Jazykovaja konceptualizacija mira 'Lingva konceptigo de mondo (en la materialo de la rusa gramatiko), Moskva: Jazyki russkoj kulturi
- Bauer, Volfgang, Djumotc Irmtraud, Golovin Sergius (2000): Ensiklopedija simvolov 'Enciklopedio de simboloj', G.Gajev (trad. el la germana lingvo), Moskva: Kron-Press
- Bragina, Alla A. (1981): Leksika jazika i kultura strani. Izuĉeniye leksiki v lingvostranovedĉeskom aspekte 'Leksiko de lingvo kaj kulturo de lando. Pristudo de leksiko en lingvoprilandscia aspekto', Moskva: Russkij jazik
- Civjan, Tatjana V. (1990): Lingvistiĉeskije osnovi balkanskoj modeli mira 'Lingvistika bazo de la balkana modelo de mondo', Moskva: Nauka
- Ĉernov, Grigorij V. (red.) (1996): Amerikana: Anglo-russkij lingvostranovedĉeskij slovarj 'Amerikana: Angla-rusa lingvoprilandscia vortaro', Moskva : Poligramma
- Daniĵuk, Nina (1996): Nacionalno-movna kartina svitu v ukrajinskij narodnij pisni 'Nacia-lingva bildo de la mondo en ukraina popola kanto'. En: Materialoj de III Internacia kongreso de ukrainistoj, Harkiv
- Daniĵuk, Nina (2005): Lingvokultura leksiko en la instruado de denaskaj kaj fremdaj lingvoj. En: Internacia Pedagogia revuo 2005/2, p. 9–13.
- Daniĵuk, Nina (2007): Lingvokultura leksiko en la ukraina lingvo kaj Esperanto. En: Materiali naukovopraktiĉnoji konferenciji "Esperanto: stan i perspektivi rozvitku. Do 100-riĉĉja knihi M.Jurkiva „Pidručnik miĵnarodnoho jazika Esperanto" 'Materialoj de la sciencpraktika konferenco " Esperanto: stato kaj perspektivoj de evoluo. Dediĉita al la 100-jariĝo de la libro de M.Jurkiv „ Lernolibro de internacia lingvo Esperanto', Trenopil: TPU, p.21–25.
- Danylyuk, Nina (2008): Symbolic Words in the Ukrainian Folk Poetry Texts. En: Respectus Philologicus / Vilniaus universiteto Kauno humanitarinis fakultetas; Akademia Świętokryska im. Jana Kochanowskiego w Kielcach, Wydział Humanistyczny 2008/ 13 (18) A, p. 106–109.
- De Diego, Ferdinand (1979): Pri Esperanta tradukarto, Saarbrücken: Iltris
- Ertl, Istvan (1997): Traduko el kaj en esperanto(n), En: Koutny, Ilona, Kovacs, Marta (red.) (1997) Struktura kaj Socilingvistika Esploro de Esperanto. Memore al profesoro Istvan Szerdahelyi, Budapest: Steleto& ILEI
- Fiedler, Sabine (2002): Esperanta frazeologio, Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio
- Ĝivoje, M (1973): Esperantonimoj, Milano
- Ĝivoje, M (1979): Esperantonimoj, Pizo
- Jermolenko, Svitlana J. (1987): Foljklor i literaturna mova 'Folkloro kaj literatura lingvo', Kijiv: Naukova dumka
- Jermolenko, Svitlana, Bibik, Svitlana, Todor, Olha (2001): Ukrajinsjka mova. Korotkij tlumaĉnij slovník linhvistiĉniĥ terminiv 'Ukraina lingvo. Mallonga eksplika vortaro de lingvistikaj terminoj', Kijiv: Libidj
- Jajvoronok, Vitalij V. (2007): Ukrajinsjka etnolinhvistika: Narisi 'Ukraina etnolingvistiko: Skizoj, Kijiv: Dovira
- Jajvoronok, Vitalij (2006): Znaki ukrajinsjkoj etnokulturi: Slovník-dovidnik 'Signoj de ukraina etnokulturo: Vortaro-gvidlibro', Kijiv: Dovira
- Havriliv, Timofij (2005): Tekst miĵ kulturami: perekladoznavĉi studiji 'La teksto inter kulturoj: traduksciencaj studoj', Kijiv : Kritika

- Hrolenko, Aleksandr T. (2001): Lingvokulturovedenije 'Lingvokulturologscioj', Kursk: Regional. otkrit. social. institut
- Humboldt, Vilhelm (1995): Karakter jazyka i karakter naroda 'La karaktero de lingvo kaj la karaktero de popolo' En: Jazyk i filozofija kultury. A.Huliga kaj H. Ramišvili (trad.), Moskva: Progress.
- Ivanov Vjačeslav V., Toporov, Vladimir N. (1965): Slavanskije modelirujuščije sistemi (drevnij period) 'Slavaj modeligaj sistemoj (antikva periodo)', Moskva:
- Karpenko, Vadim, Fedjko, Jurij (2007): Francija: Movno-krajinoznavčij slovník 'Francio: Lingvoprilandscia vortaro', Kijiv: Vid. V. Karpenko
- Kolšanskij Georgij V. (1990): Objektivnaja kartina mira v poznaniĵi i jazike 'Objektiva bildo de la mondo en scioj kaj lingvo', Moskva: Nauka
- Kononenko, Vitalij (1996): Simvoli ukrajinsjkoĵi movi 'Simboloj de la ukraina lingvo', Ivano-Frankivsĵk: Plaj
- Komlev, Nikolaj G. (1971): Semantičeskaja struktura slova 'La semantika strukturo de vorto', Moskva: Nauka
- Koptilov, Viktor (2003): Teorija i praktika perekladu 'Teorio kaj praktiko de tradukado', Kijiv: Junivers
- Kostomarov, Nikolaj I. (1905/ Kn. 7, T. 21): Sobranije sočinjenij. Istoričeskije monografiji i issledovanija 'Verkaro: Historiaj monografioj kaj pristudoj', Sankt Peterburg
- Koutny, Ilona (2007): Pragmalingvistiko. Lecionoj dum Interlingvistikaj Studoj en UAM
- Lingvističeskij enciklopedičeskij slovarj (1990) 'Lingvistika enciklopedia vortaro' V.N. Jarceva (red.), Moskva: Nauka.
- Malovec, Miroslav (2000): Gramatiko de Esperanto. Praha: Kara-Pech.
- Maslova, Valentina A. (2001): Lingvokulturologija 'Lingvokulturologio', Moskva: Akadĵemija nauk.
- Melnikov, Aleksandr S. (2007): Esperanto – lingvo de kulturo kaj personeco, Poznan; Moskvo; Rostov-na-Donu: Eld. de la Eŭropa Jura Universitato « Justo »
- Melnikov, Aleksandr S. (2004): Lingvokulturologičeskije aspĵekti planoviĥ mĵejdunarodniĥ jazikov (na fonĵe etničeskĵiĥ) 'Lingvokulturologiaj aspektoj de la planitaj internaciaj lingvoj (sur la fono de la etnaj)', Rostov-na-Donu: Izd-vo Rostovskogo gos. ped. universiteta
- Miklošič, Francisk (1895): Izobrazitjelnije sredstva slavjanskoho eposa 'Figuraj rimedoj de slava eposo', A. Gruzinskij (trad.), Moskva
- Mullagijeva, Lejla K. (2001): Realiji ruskoj kulĵturi: Lingvokulturologičeskij slovarj 'Realajoj de rusa kulturo: Lingvokulturologia vortaro', Ufa : BIRO
- Ohijenko, Ivan (Mitropolit Ilarion) (1995): Istoriĵa ukrajinsjkoĵi literaturnoĵi movi 'Historio de la ukraina literatura lingvo', Kijiv: Libidj
- Plena vortaro de Esperanto kun Suplemento (1964), Paris: SAT
- Potebnja, Aleksandr A. (1993): Misľ i ĵazik 'Penso kaj lingvo', Kijiv: Sinto
- Potebnja, Aleksandr A. (1914): O nĵekotoriĥ simvolaĥ v slavjanskoj narodnoj poeziji 'Pri kelkaj simboloj en slava popola poezio', Harĵkov
- Potebnja, Oleksandr (1985): Pojasnennja malorusĵkiĥ i sporidneniĥ pisenj 'Klarigo pri malorusaj kaj similaj kantoj'. En: Potebnja, Oleksandr (1985): Estetika i poetika slova, Kijiv: Mistectvo
- Rum, Andrian L.U. (1999): Velikobritanija: Lingvostranovedčeskij slovarj 'Granda Britio: Lingvoprilandscia vortaro', Moskva: Russkij ĵazik
- Simovič, Olha (1999): Poetična simbolika ukrajinsjkoĵi narodnoĵi tvorčosti: linhvstičnij aspekt 'Poetika simbolaro de ukraina popola verkaro: lingvistika aspekto', Lviv: VC Lvivsĵkoho universitetu.
- Slavjanskije drevnosti: Etnolingvističeskij slovarj 'Slavaj antikvaĵoj: Etnolingvistika vortaro'. N. Tolstoj (red.) / T.1 (1995), T.2 (1999), T.3 (2004), Moskva: Mĵejdunarodnije otnošenija
- Słownik stereotypów i symboli ludowych 'Vortaro de stereotipoj kaj popolaj simboloj' (1996/1.1; 1999/1.2), Lublin: Wydawnictwo Uniwersitetu Marii Curie-Skłodowskiej
- Stepanov Jurij (2001): Konstanti: Slovarj ruskoj kulĵturi 'Konstantoj : Vortaro de rusa kulturo', Moskva : Akademičeskij Projekt
- Sčerba, Lev V. (1974): Ĵazikovaja sistema i rečevaja deĵatelnostj 'Lingva sistemo kaj parolado', Leningrag: Nauka, LO
- Telija, Viktor N. (1986) Konnotativnij aspekt semantiki nominativniĥ jedinic 'Konotativa aspekto de semantiko de nominativaj unuoj', Moskva: Nauka.
- Tolstoj, Nikita I. (1995): Ĵazik i narodnaja kultura. Očerki po slavjanskoj mifologii i etnolingvistike 'Lingvo kaj popola kulturo. Skizoj pri la slava mitologio kaj etnolingvistiko', Moskva: Nauka
- Tomahin, G.D. (1988): Realiji-amerikanizmi 'Realajoj-amerikanismoj', Moskva: Viššaja škola.
- Ufimceva Aleksandra A. (1986) Leksičeskoĵe značenije 'Leksika signifo', Moskva, Nauka.
- Vereščagin Jevgenij M., Kostomarov Vitalij G. (1980): Lingvostranovedčeskaja teorija slova 'Landopriscia teorio de vorto', Moskva: Russkij ĵazik.

- Veselovskij, Aleksandr N. (2004): Istorĉeskaja poetika ‘Historia poetiko’, V.M. Jirmunskij (red.), 2-a eld., Moskva: URSS (reeld. de 1940 j.).
- Vlaĥov, Sergej, Florin Sidor (1986): Neperevodimije v perevode ‘Netradukebla en traduko’. 2-a eld., Moskva : Viŝaja ŝkola.
- Zamenhof, Ludoviko L. (1929): Originala verkaro, J. Dietterle (kol.), Leipzig: Ferdinand Hirt& Sohn.
- Zorivĉak, Roksolana P. (1989): Realiji i pereklad ‘Realaĵoj kaj tradukado’, Lviv: Vid-vo Lvivjskoho universitetu.
- Waringhien, Gaston (1987): Eterna bukedo: La tradukarto. En: Beletro, sed ne el katedro, Atverpeno
- Wierzbicka A. (1992): Semantic, culture and cognification, New York.
- Whorf, Benjamin L. (1966): Language, Thought and Reality, John B. Carroll (ed.), Cambridge; Massachusetts

Mallongigoj de la fonta bazo

- H – Helianto (1997– 2009): Organo de Ukraina Esperanto-Asocio.
- IF – Ivan Franko (2008): Verkoj en internacia lingvo Esperanto. La biblioteko de “Helianto”/ vol.1, V. Pajuk (komp.), Lucjko: Nadstirja.
- LUKR – LESJA UKRAINKA (1971): LIRIKO, N.ANDRIANOVA (KOMP.), KIEVO-MOSKVO: KOMISIONO PRI INTERNACIAJ LIGOJ DE UKRAINIAJ ESPERANTISTOJ.**
- PIV 2005 – Plena Ilustrita vortaro de Esperanto (2005), Rotterdam:UEA.
- PVS 1964 – Plena vortaro de Esperanto kun Suplemento (1964), Paris: SAT.
- TŜ – Taras Ŝevĉenko (1990): Dumoj miaj, kantoj miaj (30 poemoj, tradukitaj en Esperaton, kaj 21 ties variantoj), V. Pacjurko (komp. kaj red.), Kievo: Literatur-tradukista sekcio de UkrEA.
- TSU (1970) – Tra Soveta Ukrainio: Presbulteno de la Ukraina societo de amikeco kaj kulturaj rilatoj kun eksterlando.
- UPK – Ukraina popola kantararo (1989), V. Pacjurko (komp. kaj red.), Kievo: Literatur-tradukista sekcio de UkrEA.
- UEVM – Ukraina-Esperanta vortaro-minimumo. Kun skizo de Esperanta gramatiko (1998), V. Pacjurko (komp.), V. Stanoviĉ (eld.), Drohobiĉ
- US – Ukraina Stelo (1991 – 1997): Gazeto de Ukraina Esperanto-Asocio.
- UU– Ukraina Universitato (1991 – 1993): Ĉiumonata esperantlingva revuo ĉe Tutunia Instituto de Administro.
- VU – Voĉo el Ukrainio (1991 – 1995) Ĉiumonata esperantlingva revuo ĉe Tutunia Instituto de Administro.

Dankoj

Mi dankas al Olga Kerziouk, la estro pri la ukraina kaj Esperanto-librokolekto en Brita biblioteko pro helpo kaj gravaj konsiloj.

Dankon al doktorino hab. Ilona Koutny, la estrino de Interlingvistikaj Studoj en Lingvistika Instituto de Universitato Adam Mickiewicz, kaj Michael Farris, la preleganto, kiuj atente tralegis la tekston kaj donis utilajn rekomendojn.



Michael Farris

(Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando)

Ĉu vere ekzistas esperanta kulturo?

Enkonduko

La celo de ĉi tiu prelego estas iomete esplori simplan demandon: Ĉu oni rajtas diri, ke la Esperanta komunumo havas propran kulturon? Ofte oni aŭdas kritikon de Esperanto kiel lingvo sen kulturo, do bone estus pripensi la demandon kaj trovi bonajn respondojn. La respondo, tamen, ne estas tiom simpla, ĉar kiam oni provas trovi respondon, problemoj tuj aperas. La unua problemo estas: Kion signifas la vorto kulturo? Eble ĉiu lingvo de Eŭropo havas sian version de tiu vorto, kiu devenas de la latina kaj havas nuntempe diversajn signifojn. Ofte oni uzas vorton kulturo por indiki aron de mensaj produktoj de specifa socio aŭ civilizo (literaturo, muziko, folkloro ktp). Tiu senco ne estas la temo de ĉi tiu prelego, kvankam estas klare, ke la Esperanta komunumo havas kulturon en tiu senco.

Alia signifo de la vorto kulturo devenas de la uzo de antropologoj kaj sociologoj. Ene de tiuj kampoj la vorto ankaŭ diversmaniere estas difinita, sed ĝenerale temas pri manieroj laŭ kiuj homoj interagas ene de specifa socio. Kritikoj de Esperanto kiel lingvo sen kulturo ankaŭ ŝajnas temi pri tiu senco. La filmreĝisoro Bechtel (2008), kiu uzis Esperanton en sia filmo *Ne Plu Pikniko* diris "Al mi estis la perfekta lingvo de fremdiĝo. Esperanto ne havas antikvan pasintecon ... ne ekzistas tabuoj aŭ ceremoniaj ritoj, ne ekzistas naciismo."

Ĉi tie, necesas menci, ke oni povus havi diversajn opiniojn pri la neceso de kompleksa kulturo ene de komunumo, kies lingvo servas antaŭ ĉio por esti ponto inter diversaj landanoj, inter kiuj ĉiu jam apartenas al propra kulturo. Ne konsiderante tiun demandon tamen indas scii je kioma grado oni povas apliki modelon de kulturanalizo al la Esperanta komunumo.

Modelo de Hofstede

Ĉi tie, mi uzos difinon de la nederlanda sociologi-antropologo Geert Hofstede, kies teoria modelo estos priskribata kaj aplikata al la Esperanta komunumo. Tio ne signifas, ke lia modelo estas la plej bona aŭ la plej taŭga laŭ ĉiuj kriterioj, sed ĝia avantaĝo estas, ke ĝi estas escepte alirebla kaj servas kiel tre bona enkonduko al demandoj pri interkultura komparado. La difino de Hofstede estas: *Kulturo estas mensa programaro, kiu distingas unu grupon aŭ kategorion de homoj de aliaj*. En tiu modelo, kulturo estas ĉiam kolektiva aŭ grupa afero. Unuopa homo ne havas kulturon, homo apartenas al specifa kulturo (aŭ pli bone specifaj kulturoj, ĉar en tiu modelo membreco en unu kulturo ne kontraŭdiras membrecon en aliaj).

Tiu modelo ne estas reduktema kaj ne postulas kulturan determinismon. Estas grave memori, ke ĉiu kulturo enhavas la tutan gamon de homa konduto kaj valoroj. Tio, kio malsamas, estas procentoj de homoj, kiuj havas specifajn valorojn aŭ kiuj kondutas specifmaniere en diversaj socioj.

Kulturo laŭ tiu koncepto havas du partojn, videblan kaj nevideblan (Hofstede, 1994). La videbla parto de kulturo estas *praktikoj*. Inter ili oni trovas simbolojn, heroojn kaj ritojn. *Simbolo* estas iu ajn, kiu havas kulturspecifan signifon por samkulturanoj, ekzemple flago, speciala manĝaĵo, ktp. *Heroo* estas homo, viva aŭ morta, reala aŭ imaga, kiu servas kiel modelo de bona aŭ malbona konduto ene de la kulturo. *Rito* estas kolektiva ago, kiu ne necesas objekte por atingi celon, sed kiu estas ene de kulturo socie necesa. Ekzemploj estas manieroj laŭ kiuj oni salutas, montras respekton aŭ partoprenas en sociaj aŭ religiaj renkontiĝoj ktp.

Klare, la Esperanta komunumo havas komunajn simbolojn (verda stelo, krokodilo, finvenko ktp). Ĝi havas komunajn heroojn pri bona konduto (Zamenhof, Cseh, Auld, Piron ktp) kaj malbona konduto

(Kabe, kreintoj de Ido, ktp). Ankaŭ ekzistas ritoj komunaj (kongresoj, klubaj renkontiĝoj ktp). Do evidente la Esperanto komunumo havas videblan kulturon. La demando restas, ĉu ĝi havas la nevideblan parton de kulturo, kiun Hofstede nomis valorojn.

Valoro estas tendenco preferi unu situacion al la alia. Kontraŭe al praktikoj, kiujn oni povas observi, valoroj estas nevideblaj. Ekzistas kelkaj metodoj por determini ilin. Oni povas ekzemple observi konduton kaj konkludi kiuj valoroj instigis ĝin. Ĉar oni lernas valorojn senkonscie, oni ne povas klarigi ilin, kaj kiam oni demandas rekte pri valoroj, la respondo ofte estas pri io kio nomiĝas *dezirindaĵo* (kion oni pensas, aliaj devas fari) kaj ne pri tio, kio nomiĝas *dezirataĵo* (tio, kion oni vere volas).

Por iom eble eviti tiun problemon, Hofstede uzis enketilojn kun nerektaj demandoj formulitaj por eviti respondojn pri *dezirindaĵoj*. Li esploris je la nivelo de landa kulturo, ekzemple en liaj verkoj kaj hungaroj kaj slovakoj ene de Slovakio ne estas distingitaj. Li konsiderus ambaŭ grupojn kune kiel slovakianojn. Li rekonas aliajn nivelojn de kulturo, sed simple trovis la landan nivelon la plej taŭga pri internacia esploro. Tio ankaŭ signifas, ke lia modelo estas bone aplikebla al la Esperanta komunumo, kies membroj devenas de diversaj etnaj grupoj. Hofstede esploris kvin *kulturdimensiojn*. Kulturdimensio estas socia respondo al fundamenta problemo de la homa ekzistado, pri kiu ĉiu homa socio devas trakti. Li trovas metodon por mezuri tiujn sociajn respondojn cele kompari ilin interkulture. Malsupre ili estas priskribitaj laŭ ekstremoj por pli facila kompreno, la plimulto de socioj tamen troviĝas ie meze.

Potencdistanco temas pri malegaleco, kaj mezuras la gradon, al kiu la malplej malfortaj membroj de socio akceptas malegalecon. En socio je *malgranda potencdistanco*, estas malgranda akecepto de malegaleco, kaj diversaj tipoj de povo ne devas kunokazi. En lando je malgranda potencdistanco, la meza klaso estas granda. Politike, ĉiu devas havi la samajn rajtojn. En socio je *granda potencdistanco* estas pli granda akcepto de malegaleco kaj tiuj, kiuj havas malpli da potenco devas montri respekton al la pli potencaj (infanoj al gepatroj, lernantoj al instruisto ktp). En lando je granda potencdistanco la meza klaso estas malgranda (aŭ praktike ne ekzistas). Dominas ideo, ke la fortaj havas privilegiojn.

Individueco mezuras en kiu grado la socio *ne* sekvas tradician modelon de la granda familio kaj temas pri la interrilato inter individuo kaj la grupoj al kiuj tiu apartenas. En tiu modelo individuema kaj kolektivema ne havas politikan signifon. La granda plimulto de la homaro vivas en *kolektivaj* socioj, en kiuj dominas tradicia granda familio (iam eĉ inkludante nivelon de klano, tribo, ktp). Infano lernas pensi pri "ni" kaj trovas grandan parton de sia identeco kiel familiano, klanano, tribano ktp. La grupo protektas membron, kaj postulas reciproke sendemandan lojalecon. Privata vivo preskaŭ ne ekzistas kaj opinioj estas decidataj per la grupo. Socia harmonio gravas, kaj sociaj iloj kiel honto kaj 'vizaĝo' ekzistas por puni aŭ rekompenci individuon laŭ ties konduto. Malplimulto de homoj vivas en *individuemaj* socioj en kiuj infano naskiĝas ene de nuklea aŭ netradicia familio kaj lernas pensi pri "mi". Esprimo de propra opinio gravas kaj sociaj iloj por puni aŭ rekompenci, estas bazitaj sur kulpeco kaj memrespekto, kiuj dependas de individua kaj ne socia identeco.

Maskleco mezuras la gradon, en kiu virinoj havas la samajn aŭ malsamajn valorojn kiel virinoj kaj temas pri sentemaj kaj durecaj valoroj en socio. Ĉar valoroj de virinoj estas pli similaj en diversaj socioj oni mezuras valorojn de viriĉoj. En *femala* socio viriĉoj kaj virinoj havas similajn valorojn, kaj gravaj valoroj inkluzivas prizorgon kaj konservadon de la natura medio, femala socio estas permesema kaj oni devas solvi konfliktojn per kompromiso kaj intertraktado. En *maskla* socio viriĉoj havas malsamajn valorojn ol virinoj, gravas sukceso kaj progreso, socio estas pli limigema kaj oni solvas konfliktojn per forto kaj eĉ fizika batalo.

Evitado de necerteco mezuras, en kiu grado la socio perceptas necertajn aŭ novajn situaciojn kiel minacajn. En socio je *malalta evitado de necerteco* tio, kio estas nekonata estas interesa kaj estas malalta nivelo de socia premo. Dominas opinio, ke ne necesas multaj reguloj sed ĉiu devas respekti regulojn, kiuj ekzistas. Estas pli da toleremo pri diversaj opinioj. En socioj je alta evitado de necerteco tio, kio estas nekonata, estas danĝera. Oni spertas altan gradon de socia premo kaj serĉas por strukturo pere de multaj, precizaj reguloj (kiujn multaj ne respektas). Ofte estas maltoleremo pri opinioj de malplimulto.

Longa temporientiĝo estas la kvina dimensio, kaj ne estas parto de la origina esploro de

Hofstede. Ĝi devenas de aparta esploro pri tradiciaj ĉinaj valoroj. Ĝi mezuras la tempskalon, laŭ kiu socio faras planojn, sed ankaŭ temas pri relativa graveco de virto (deca kaj digna konduto) kaj vero (ĝusta kredo). En socio je mallonga temporientiĝo vero pli gravas ol virto kaj oni ne devas ŝanĝi tradiciojn kaj oni pensas pri moderneco kiel minaco. Oni elspezas pli ol oni ŝparas kaj rezultoj de nova entrepreno devas okazi rapide. En longa temporientiĝa socio virto pli gravas ol vero, oni ŝparas la plej eble kaj rezultoj de nova entrepreno povas okazi post longa tempo. Oni povas adapti tradiciojn al nova kunteksto kaj moderneco ne estas minaco, sed nova ŝanco por plibonigi la vivon.

Hofstede ankaŭ esploris la valorstrukturon de organizaj kulturoj, speciale tiun de firmaoj (2001). Li trovis ses dimensiojn por priskribi diferencojn inter ili. Kvankam liaj esploroj pri kulturaj diferencoj inter landoj temas antaŭ ĉio pri valoroj, lia esploro de organizaĵaj kulturoj, temas pli pri praktikoj kiuj dominas en diversaj firmaoj (ĝenerale ĉiu tipo de organizaĵa kulturo troviĝas en iu ajn nacia kulturo).

Procedo kaj rezulto temas pri relativa graveco de maniero laŭ kiu oni agas, kaj kion oni faras. Se pli gravas procedo, la maniero laŭ kiu oni agas, pli gravas. Se rezulto pli gravas oni pensas nur pri la finrezulto.

Dungito kaj posteno mezuras, ĉu firmao pli zorgas pri personoj aŭ postenoj. Se dungito pli gravas, la firmao pensas pli pri ties kontentigo. Se posteno pli gravas, la firmao havos regulojn pri tio, kion la dungito povas kaj ne povas fari.

Parokeca kaj profesia temas pri identeco de organizaĵano. En parokeca firmao ties identeco devenas de la organizaĵo mem. En profesia firmao identeco devenas el ekstere de la organizaĵo.

Malfermita kaj fermita sistemo temas pri facileco aliĝi al organizaĵo. Tio facilas en malfermita organizaĵo, en kiu nova dungito povas facile trovi lokon, sed en fermita sistemo ne ĉiu homo konvenas.

Malstrikta kaj strikta kontrolo temas pri etoso ene de firmao. Je malstrikta kontrolo dominas facilanima etoso kaj spirito de improvizo. Je strikta kontrolo akurateco pli gravas kaj la etoso estas pli serioza.

Normema kaj pragmatika orientiĝo temas pri fonto de instigo. En normema organizaĵo instigo devenas de ideologio kaj en pragmatika organizaĵo ĝi devenas de la merkato (aŭ alia ekstera forto).

Apliko de tiu modelo al la Esperanto komunumo

Ekzistas certaj problemoj je la apliko de la modelo de Hofstede al la Esperanta komunumo. Antaŭ ĉio, tio devenas de la fakto, ke la pli multo de la komunumanoj ne pasigas multe da tempo kune, kaj preskaŭ neniuj anoj naskiĝis ene de la komunumo. Sed ekzistas aliaj kulturhavaj malplimultoj, kies anoj ne naskiĝas ene de la grupo, ekz surduloj kiuj uzas naturajn gestolingvojn. Oni ofte parolas pri 'surda kulturo' (Padden, Humphries, 1989) por klarigi la diferencojn inter la normoj de la surda malplimulto kaj tiuj de la aŭdanta plimulto. Estas do precedenco por apliki kulturan analizon al neetna grupo.

Estas grave memori, ke sen metodologia esploro oni ne povas certe diri ion konkretan. Do la sekva taksado estas nepre provizora kaj prezentas antaŭ ĉio la konjekton de la aŭtoro dum lia sperto en la Esperanta komunumo.

Apliko de la naciaj dimensioj

Oni perceptas diversajn nivelojn de aplikeblo de la dimensioj al la Esperanta komunumo. La plej taŭga kaj eble la plej klara estas potencdistanco. Ŝajnas klare, ke la Esperanta komunumo montras indikilojn de escepte malgranda potencdistanco. Estas malgranda akcepto de hierarkio kaj eĉ tiuj, kiuj tenas altajn postenojn ene de la movado ne atendas montron de respekto (aŭ simple ne ricevas ĝin).

Oni povas provizore hipotezi, ke la Esperanta komunumo estas ankaŭ sufiĉe individua. Ŝajnas, ke la plimulto esperantiĝis laŭ la propra iniciato, kaj kompletaj familioj ene de la komunumo estas la esceptoj.

Pli malfacile estas taksi la gradon de maskleco. Tio estas la grado, kiu eble malplej aplikas al la Esperanta komunumo.

Eĉ pli malfacile estas taksi la gradon de evitado de necerteco, sed je alia kaŭzo, nome la indikoj (sen pli detala esploro) estas sufiĉe memkontraŭdiraj. Ĝenerale la movado ŝajnas esti tolerema kaj malfermita al novaj spertoj. Sed aliflanke, la aliro al la lingvo (la bazo de la komunumo) estas pli simila al tio de socio de alta evitado de necerteco. Ekzistas akademio de la lingvo kaj akcepto al la Fundamento estas eksplicita valoro. La baza lingva valoro do estas preskriba kaj lingva kreivo devas esti limigata ene de jam ekzistanta strikta gamo.

Se temas pri la kvina dimensio, la komunumo ŝajnas havi longtempan orientiĝon. La plimulto ne atendas vidi la tielnomatan finan venkon (iama centra kredo de la movado) dum sia vivo. Nova teknologio kaj ŝanĝoj en la mondo ĝenerale ŝajnas esti akceptitaj kiel ŝanco por fortigi kaj pligrandigi la movadon kaj ne estas perceptata kiel minaco.

Apliko de organizaĵaj dimensioj

Ĉar la Esperanta komunumo ne estas etna grupo laŭ tradicia kompreno de tiu termino, eble la apliko de la organizaĵaj dimensioj ne plene validus. Ĝenerale ĉi tie, la apliko ŝajnas esti malpli taŭga, sed iuj de la dimensioj estas aplikeblaj.

Procedo kaj rezulto ne estas speciale rilata, sed eble lingve oni povus diri, ke procedo pli gravas ol rezulto. Dungito kaj posteno ŝajnas esti ne rilataj. La dimensioj pri parokeca kaj profesia taŭgas, se temas pri identeco. La identeco kiel esperantisto ŝajnas esti sufiĉe forta fakto, kiu sugestas ke la komunumo estas pli parokeca. Ĉar ĝenerale novaj esperantistoj devas adaptiĝi al la normoj de la movado, oni povas supozi ke la komunumo estas pli fermita ol malfermita. La komunumo ŝajnas ankaŭ esti pli malstrikta ol strikta kaj ĝenerale la etoso ene de la komunumo estas pli facilanima ol serioza. Fine, se temas pri normema kaj pragmatika orientiĝo, ŝajnas ekzisti diferenco inter ĝenerala normo (pli pragmatika) kaj aliro al la lingvo (pli normema).

Diskuto kaj konkludo

La plej granda demando pri kulturesplorado ene de la Esperanta komunumo temas pri la ekzistado de komunaj valoroj. Ĉar la granda plimulto de membroj esperantistiĝis kiel plenkreskuloj, oni povus imagi ke kiam ekzistas komunaj valoroj, ili ne akiris ilin pere de interago kun la komunumo. La plej probabla klarigo estus, ke la komunumo ne formas valorojn sed pli ĝuste, tiuj, kiuj jam havas certajn valorojn, pli probable iĝas komunumanoj. Tia hipotezo sugestus, ke tiuj, kiuj ne havas valorojn similajn al tiuj de la jam ekzistantaj membroj ne trovas partoprenon en la movado kontentiga kaj forlasos ĝin. Kiel antaŭe dirite, ankoraŭ ne ekzistas detala esploro uzanta modelon de Hofstede, sed ĝi povas klarigi multajn demandojn pri la movado kaj ebla pligrandiĝo.

Bibliografio

BECHTEL, J. (2008), Award-winning Comic Esperanto Film, Ne Plu Pikniko, Released on DVD by Indieflix Sept. 9. <http://www.free-press-release.com/news/200809/1220891234.html>

HOFSTEDE, G. (1994), *Cultures and organizations: Software of the mind: Intercultural cooperation and its importance for survival*. HarperCollins. Londono.

HOFSTEDE, G. (2001), *Culture's consequences, comparing values, behaviors, institutions and organizations across nations*. Sage: Thousand Oaks, Kalifornio.

PADDEN, C. kaj HUMPHRIES T. (1988), *Deaf in America: Voices from a culture*. Cambridge, Massachusetts: Harvard University Press.

Joanna Hawlena

(Ekonomia Akademio, Katowice, Pollando)

kaj *Joanna Urbanek*

(studentino de Ekonomia Akademio, Katowice, Pollando)

Rolo de sciencaj rondoj en la procezo klerigi studentojn de ekonomiaj altlernejoj

Ekonomiaj studoj ne povas sin apogi sole sur transdonado de la teoria scio; tiu devas esti kompletigita je aspektoj praktikaj. Tia bezono estas prezentata precipe de elstaraj studentoj. Ĉiaspekte larĝan spektron de interesiĝdisvolvado ebligas partopreno en laboroj de scienca rondo. Oni devas priatenti kelkajn bazajn direktojn de ilia agado:

1. partopreno en scienca esplorado kaj kunlaboro kun entreprenoj de elektita sektoro,
2. akiro de praktikaj scipovoj per preparado kaj organizado de konferencoj,
3. preparado de studentoj komenci doktoriĝajn studojn, precipe per ebligo fari publikaĵojn,
4. plilarĝigado de la interesiĝoj pere de laŭtemaj vojaĝoj.

La membroj de la Studenta Scienca Rondo de Transporto, aktivanta ĉe la Katedro de Transporto en la Ekonomia Akademio Karol Adamiecki en Katowice, okupiĝas pri ĉiuj menciitaj aspektoj de agado. En la jaroj 2007-2008 ili partoprenis en esplorado de priservo en aviadiloj de la pol-hungara flugkompanio Wizzair, flugante al unuopaj eŭropaj ĉefurboj. Dank' al la farita de ili aŭdito konsiderinde pliboniĝis la kvalito de la enaviadila priservo kaj kreskis la ĉi-koncernaj enspezoj de la firmao. En la jaro 2009 estis faritaj kvantaj kaj kvalitaj esploroj en la aŭtobusoj apartenantaj al la Urba Transporta Servo en Zawiercie (Pollando).

La utilo de la esploroj, krom la ekkona aspekto, havas ankaŭ mezureblan ekonomian profiton por la studentoj. Tiuj utiligis la aŭdiron por fari privatajn vojaĝojn. La flugenketoj plej ofte okazis per dupersonaj grupoj kaj ebligis surlokan restadon daŭrantan de tri ĝis kvar tagojn. Ili necesigis nur apartan atenton dum la flugo kaj plenigon de demandaro, kio daŭris ĉirkaŭ 20-30 minutojn. Dum la esploro en Zawiercie la studentoj ricevis honorarion kaj por la enketado, kaj por la plenigado de la demandaroj.

Regule estas aranĝataj tutlandaj konferencoj, en kiuj partoprenas reprezentantoj de sciencaj rondoj el aliaj superaj lernejoj. La antaŭlasta renkontiĝo okazis en Wisła sub la titolo „Transporto, ekspedado, loĝistiko. Novigado kiel strategia defio al la merkato“, kaj en la pasinta studjaro, ankaŭ en Wisła, okazis tutlanda studenta konferenco sub la titolo „Disvolvo kaj funkciado de transportaj, ekspedaj kaj loĝistikaj entreprenoj en la ŝanĝiĝantaj merkataj kondiĉoj“. Venis al ĝi prizorgantoj de sciencaj rondoj kaj ties membroj el la Komerca Ĉeflernejo en Varsovio, Politekniko de Poznań, Ekonomia Akademio en Poznań, Politekniko de Radom, Universitato de Gdańsk, Teknik-Humanisma Akademio en Bielsko-Biała, Sanktakruca Akademio en Piotrków Trybunalski kaj Ekonomia Akademio en Krakovo.

Grava elemento de la agado estas la metodoj de ĝia financado. Ĝis la pasinta jaro ni ricevadis de la altlernejaj aŭtoritatoj 1 000 zlotojn por la agado (por la jaro 2009 la subvencio kreskis ĝis 1 500 zlotoj). En la jaro 2010 ŝanĝiĝos la sistemo atribui la monrimedojn. Ilia alteco dependos de la agado de la rondo en la antaŭa jaro. Ĉiu formo de aktivado estos premiata per de 1 ĝis 3 punktoj. Inter tiuj formoj estas:

1. recenzita scienca publikaĵo de la rondo,
2. organizo de la landa aŭ internacia konferenco,
3. venko en la landa aŭ internacia konkurso,

4. partopreno kun referaĵo en konferenco,
5. organizo de seminario,
6. organizo de eksterscienca entrepreno por la Ekonomia Akademio en Katowice.

La rondo havas ankaŭ konstantajn sponsorojn, kiuj finansas elektitajn projektojn. Ili estas:

1. Speciala Ekonomia Zono de Katowice, Akcia Kompanio,
2. Entrepreno de Fervoja Transporto kaj Ŝtonmastrumado, Akcia Kompanio,
3. Polaj Fervojaj Linioj, Akcia Kompanio,
4. Aŭtovojo de Malgrandpolujo, Akcia Kompanio *Stalexport*.

Sen ilia helpo la agado de la rondo devus esti grandparte limigita. La organizo de konferenco kostas kelkmil zlotojn. Nur tiu ĉi ekzemplo montras, ke la monrimedoj atribuitaj de la altlernejo ne estus sufiĉaj eĉ por organizi konferencojn, por ne menciigi aliajn iniciatojn, kiuj estis i. a.:

1. organizo de la scienca feriado en Grekio,
2. pramveturadoj al Kopenhago kaj Karlskrona ligitaj kun ekkono de la funkciado de la marhaveno en Gdynia,
3. konatiĝo kun la punkta infrastrukturo de la transporto en la flughaveno de Pyrzowice,
4. analizo de la reguloj de la funkciado de la loĝistika sistemo en la Opel - Fabriko en Gliwice,
5. vizito al la historia stacio de la etŝpura fervojo en la vilaĝo Rudy.

La membroj de la rondo publikigas artikolojn en tutlandaj revuoj: la kvaronjara revuo *Perrela transporto* — statistikoj kaj analizoj kaj la monatrevo *Fervoja merkato*. Aŭtune aperas ankaŭ la recenzita postkonferenca publikaĵo *Funkciado kaj disvolvo de entreprenoj de la TELmerkato*.

La anoj de la Studenta Scienca Rondo de Transporto penas partopreni en konferencoj, kiuj rezultas per recenzita publikaĵo. Ekzemplo de tia publikaĵo estas tiu titolita *Ekologiaj kaj ekonomiaj aspektoj de loĝistiko*, en kiu la artikolo titolita „Limigo de negativa influo de transporto al la medio en la aspekto de la projektoj *EcoTransIT* kaj *EcoPassenger*“ estis verkita de la aŭtorino de tiu ĉi referaĵo, la prezidantino de la rondo, Anna Urbanek. Ŝi gajnis la konkurson pri plej bona prezentiĝo dum la 4-a Inter-Altlerneja Forumo de Junaj Logistikistoj sub la titolo „Ekologiaj kaj ekonomiaj aspektoj de logistiko“, organizitan de la Politekniko de Poznań kaj Supera Lernejo de Logistiko en Poznań en la tagoj 19-20.03.2009.

Dum tiu ĉi konferenco la membroj de la rondo gajnis ankaŭ la duan lokon en konkurso pri plej bona studaĵo je la temo „Efika direktado de produktado kiel ŝanco por sukceso en kondiĉoj de krizo“.

La anoj de la Studenta Scienca Rondo de Transporto faras novajn iniciatojn. Unu el ili estas organizo de scienca feriado en Bavario. Ni esperas, ke la nuna krizo ne igos nin rezigni pri la projektoj postulantaj konsiderindajn monrimedojn necesajn por ilia financado.

Tradukis: Edward Malewicz



Wanda Jakubaszek

(Pedagogia Universitato, Kraków, Pollando)

Nuntempa edukado kaj Esperanto

Edukado de la homo de ĉiam estis ligita kun la kultura tradicio de generacioj, en kiu scio kaj viva sperto estis suplementitaj de universalaj tuthomaj valoroj kaj dialogo.

Senescepte, ĉu la edukprocezo akceptis karakteron de individua evoluo de la unuopulo en natura familia au socia medio, aŭ ĝi estis procezo laŭcela (intencita klerigado kaj edukado – T.Hejnicka-Bezwińska 2008, p. 35)), ĉiukaze oni edukformis la homon, liajn sociajn kunligojn, je skalo de aspiroj de la epoko kaj ligita kun ĝi civiliza transformo.

Edukado en la XXI jarcento – laŭ opinio de la eminenta reprezentanto de pedagogia penso prof. K.Denek – ankaŭ devas procedi en simila dimensio, tamen kun diferenca aspekto dependa en realigado, de *novum* en internacia skalo, kiun [*la novum*] determinas unuiĝo de la Eŭropo (Denek 2005, p. 29).

Laŭ opinio de prof. Z. Kwieciński en la nova realeco post la unuiĝo de Eŭropo „la plej grava devo de la publika edukado estas formi kompetentecon de ĉiu unuopulo al kritika pensado kaj al kreiva kunagado je komuna bono” (Kwieciński 2005. p.17). Ĉar alvenis tempo de „holisma pensado en humanisma aspekto, pri la homo, lia medio kaj kulturo, anstataŭ servema rezonado pri la ĉefaj tendencoj de la edukado stirataj de profitemo, regemo kaj agrableco.”

Nuntempa edukado prenis sur sin defiojn, kies bazo okazis postuloj formulitaj de Internacia Komisiono por aferoj de Edukado en la XXI jarcento en la raporto titolita: *Edukado. En ĝi estas kaŝita la trezoro*.

La postuloj konstituas kolonojn por edukaj transformoj en erao de globaligo en humanismo kaj en „globa vilaĝo” (kiu nuntempe fariĝis Eŭropo), kies radikojn oni devas serĉi en sugestoj de McLuchan kaj en kultura aktiveco de homo kaj liaj kompetentecaj aspiroj (Pilch 2005, p. 181) dispartiĝantaj je:

1. Simbola faligo de Berlin’a Murego kiel rezulto liberigi mondon de la dikotomia [dupolusa] ideologio – estinta konsekvenco de de politikaj decidoj internaciaj, post Dua Mondmilito.

2. Evoluo de landoj de ekster Okcidenta civilizo, t.n. postkomunismaj “aziaj tigroj de kapitalismo”.

3. Kreskanta potenco de modernaj rimedoj de la teknika komunikado, ĝenerala teknokratio de la vivo kaj fenomeno de informadika revolucio, kiuj kaŭzas ke „fonto de scio” fariĝas nelimigita ankaŭ en sfero de la tempospaca alirebleco.

Unua kolono de la raporto – **lerni, por scii** – devas ebligi al unuopulo kompreni sin kaj la mondon kun samtempa eksento de kontento esti *homo sapiens*.

Prezenti sin pensanta subjekto, al kiu ĉiu scienca ekkono konstituas senapelacie memcelan valoron kun samtempa preferado de la vivestima sinteno kaj akceptado de la defioj en kunteksto de memrealigado kiel individuo.

Kreado en bazaj sferoj de la spertata vivo la aŭtonoman mondkoncepton, kiun rezultigas eksento de potenco de la propra intelekto.

Lerni, por agi – la kolono laŭpremise devas prepari la unuopulon al efika agado en ĉiuj sferoj de la vivo (kultura, faka, socia) per formigo de tia personeco, kiu garantias al individuo adaptiĝon al novaj kondiĉoj kun samtempa reformema rilato al si mem kaj al la ĉirkaŭanta realeco.

La plej gravan klerigan defion de la XXI jarcento konstituas kolono: **lerni, por vivi komune**.

Ĝi konstituas „fundamenton” por konstruado de la socia solidareco, por formigo de malferma sinteno kaj estimo al ĉiuj simptomoj de „malsameco”, al toleremo kaj pluralismo.

Ĝi konstituas enkondukon en la mondon de la valoroj per eliminado de homaj kondutoj simptomojn de ksenofobio, homofobio, stigmatigo aŭ rasismo, estintajn rezulto de malalta socia kulturo, de manko kompreni aliajn kaj de ekzistotimo determinista per la pasinteco.

Plena disfloro de la personeco postulas ŝanĝon de viva mentaleco de la unuopulo, postulas serĉadon de la vivosenco kaj respondon al la demando: kiu mi estas ?, kiu mi volas esti ? Je tia defio respondas lasta kolono de la raporto stiranta edukan reformon de la XXI jarcento, nome – **lerni, por esti**.

Vizio de la edukado, propagata de la raportokreintoj (antaŭ ĉio J. Delors – la prezidanto de la Komisiono de Ekspertoj), en praktiko – laŭ eksperto de pedagogiaj problemoj, prof. M.Szymański – donas ŝancon al eduksistemo direkita al nova globalisma edukado. Ĝi povas kontribui al egaligo de edukaj ŝancoj de la juna generacio, al klerigo de konsciaj, raciaj kaj emancipitaj socioj (vidu: Szymański 2008, p.120 k. sekvaj).

Baza senco de la nova edukado ŝajnas transiro, en eduka formado de identeco, el nacia identeco al Eŭropa identeco.

Pensante kaj parolante pri la homo en dimensio de eŭropa globalismo, neeble estas ne alvoki la unuan Aŭtoron de mondokoncepto pri Eŭropo kaj la mondo sen limoj, Ludovikon Zamenhof, kreinton de la internacia lingvo – Esperanto, lingvo apogita sur la unua alfabeto de la homaro – latino kaj sur kulturaj leĝoj kaj valoroj de la homo, lingvo nuntempe konata en ĉiuj kontinentoj kaj aplikata en eduka praktiko de multaj landoj kun bona rezulto (pri kio atestas dokumentoj estantaj rikolto de ĉiujaraj Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj Internaciaj Konferencoj de ILEI).

Oni ne povas eviti signifan rolon de la lingvo Esperanto en propagado de kultura heredaĵo de la mondo, la lingo, kiu sin esprimas almenaŭ en tradukaĵoj de la epopeoj, naciaj majstroverkoj, en internacian lingvon. Sekve Esperanto ekestas la lingvo de homara koro, intelekto kaj profunda spiriteco. Ĝi enskribiĝas do en ĉefan kolonon de la XXI-jarcenta edukado, en scion pri nacia komuna kunekzistado kaj en scion pri formado de personeco apogita sur valoroj implikantaj homon, „**esti**”, en ĉi tiu homa dimensio.

Formado de la moderna eŭropa identeco laŭ filozofia-pedagogia vidpunkto de J Szmyd apogas sin „je ... eksento de spirita komuneco, t.e. je konscio de homogena kulturdeveno, parenceco de tradicioj kaj proksima najbareco, poste koincido de intereso kaj komuna profito, fine komunaj perspektivoj kaj danĝeroj, taskoj kaj celoj ...”(J.Szmyd 2002, p.60). Aperas demando, per kiuj instrumentoj oni povas profiti tiajn efikojn de la eŭropa integriĝo ? Respondo ŝajnas banale simpla, oni devas komenci de bona interhoma komunikado, de la dialogo, nomata „Nova Pakto” kies ĉeftemo: Pensado - Saĝeco – Amo, esprimita estos en lingvo de nenies nacio, por ke ĝi ne minacu principon de sekureco kaj statuson de la egalrajteco de ĉiu nacio paktanta integriĝon. Por konstruado de la internacia konfido kaj solidareco la plej konvena ŝajnas esti lingvo neutrala, lingvo de la paco, lingvo kies instruado-lernado ne postulas signifajn financajn elspezojn, nek specialajn lingvajn kapablojn. Samtempe lingvo, kiu povas esti bona portanto de ĉiuj komunikoj – de scio, emocioj, vero, valoro kaj homaj bezonoj. Lingvo havanta en sia „informa kodo” mesaĝon al ĉiuj nacioj de la mondo nome, ke evoluigado de eŭropa kaj komuneca konscienco, pere de ĝi, neniel minacas suverenan nacian identecon de la individuo kaj neniel minacas deformiĝon de kultur-civilizaj fontoj de de la homaro en ĉiuj tempospacaj dimensioj. Tia lingvo estas aktuale Esperanto.

Profesoro Czesław Banach analizante eŭropan estontecon en kunteksto pri edukado diras, ke „en instrumaterialoj de la eŭropuniaj landoj dominas edukaj celoj kiel: edukado por defendo de homaj rajtoj, edukado por demokratio, ekologia edukado ligita kun ekonomio kaj kun prepariĝo al laboro, lernado de fremdaj lingvoj, kultura edukado kaj porsana kaj civitana edukado” (Banach 2001 p.53). Tiel diferencigitaj eduktemoj de la socia vivo estas aprobitaj en eduka praktiko kaj povas esti sukcese prezentitaj ankaŭ en lingvo liberigita de ĉiuj naciismaj aŭ politikaj premoj, des pli ke nuntempa Eŭropo surprizas per malfacilaj demandoj koncernantaj edukadon de socioj en nova unuigita konstelacio.

„En nuntempa Eŭropo ĉiuj naciaj eduksistemoj havas „manojn plenajn de laboro”, ĉar ĉiu eŭropeano individue kaj ni ĉiuj kune devas ĝin [optimuman sistemon] denove malkovri, nomi kaj adapti je skalo de niaj povoj valorojn akiritajn en tradicio judea-greka-kristana” (Banach 2001, p. 53). Al tiu komuneca kompreno oni povas ankaŭ utiligi Esperanton, kiu kiel artefarita lingvo ne estas ŝarĝita de religiaj kuntekstoj kaj per ĉi fakto povas servi al serĉado de vereco de la kredo kaj konstruado de ideologia-religia ordo, kies ununura determinanto de serĉado estos la ideo de libera, justa kaj pensanta homo.

Jarcento la **XXI-a** havas ŝancon kontinui nefinitan verkon, komencitan de Esperanto-Socio en la XIX-a jarcento, enkondukon de la lingvo Esperanto en ĉiujn lernejojn de la mondo (Sygnarski 1947, p.6). Nur per tiu vojo eblos alkonduki homon al sento plenumi sian rolon, per kiu la homaro estas filogeneze ŝarĝita, tio estas, al racia utiligo de intelekto por bono de la homaro.

Bibliografio

- Banach Cz. (2001), Edukacja. Wartość. Szansa; Kraków
Denek K. (2005), Ku dobrej edukacji; Toruń-Leszno
Hejnicka-Bezwińska T. (2008), Pedagogika Ogólna; Warszawa
Pilch T. (2005), Nadzieje i zagrożenia globalizacji – artykuł en M. Dziemianowicz: B. D. Gołębiak; R. Kwaśnica – Przetrwanie i rozwój jako niezbywalne powinności wychownia; Wrocław
Sygnarski M. (1947), Kurs elementarny esperanta; Kraków
Szymański M.J. (2008), W poszukiwaniu drogi. Szanse i problemy edukacji w Polsce; Kraków

Esperantigis Jerzy A. Walaszek (2009)



Maciej Klakla

(Pedagogia Universitato, Kraków, Pollando)

Formoj de aktivigado de lernantoj dum didaktika procezo

1. Enkondukaj rimarkoj

Precizigitaj dum jarcentoj ĝeneralaj principoj de edukado (kiel ekzemple: pligrandigado de malfacilaĵoj, kunigado de teorio kun praktiko, ĉu scienceto) plenumas fundamentan rolon ankaŭ nuntempe kaj malgraŭ provoj de ties modifoj ĉu kompletigoj, formas nekontesteblan elirpunkton dum efektivigado de la diversaj konceptoj de edukado. Tio koncernas ankaŭ la instruadon de matematiko. En tiu sfero de la instruado tamen unu el tiuj principoj, nome la principo de la konscia kaj aktiva agado de lernanto en la procezo de instruado, plenumas specialan rolon, donante al lernanto pozicion de la subjekto dum diversaj didaktikaj penadoj. Anna Zofia Krygowska (mond fama pola didaktikistino de matematiko) suprenlevis tiun ĉi principon ĝis la ĉefa, la plej grava en la instruado de matematiko. Aplikado de tiu ĉi principo emfazas la rolon de la instruisto-organizanto de la procezo de lernado.

Direktado de tiuspeca edukado postulas konon de sinsekvo de lernadprocezoj kun profunda kompreno de karakterizaĵoj de la lernobjekto kaj de la celoj de ties instruado. Interalie nepra estas trovo de motivoj konvenaj al aĝo kaj intelekta nivelo de lernantoj kaj ties influo al preparo de projektataj didaktikaj okupoj.

Parolante pri la aktivigado de lernantoj, ni pensas kompreneble pri ilia aktivigado intelekta. Dum la edukado de plenaĝuloj, kiuj prenas sur sin la taskon de lernado, sufiĉan motivigon donas konscienca decido altigi posedantajn kvalifikojn, kaŭzita pro eksteraj cirkonstancoj (ekz. emo ŝanĝi laborlokon por akiri pli bonajn kondiĉojn aŭ pli leĝeran laboron). Se temas pri infanoj, ne posedantaj klaran konscion de bezono de sia disvolviĝo, trovo de aliaj motivoj krom intelektaj, estas tre grava.

En la instruado de ĉiu lernobjekto, valora estas realigado de ne nur edukaj celoj por ĝi specifaj, sed realigado de celoj ligitaj kun disvolvigado de intelektaj agoj kaj reagoj, kiuj povas esti formataj en lernobjekta instruado, kaj aplikataj en aliaj vivsitacioj, dank' al supozebla transfero. Al tiuj celoj de instruado apartenas interalie formado de aktiva sinteno rilate al aperantaj problemoj, disvolvigado de kapableco labori en grupo kunlaboranta aŭ konkuranta, formado de kapableco diskuti, disvolvigado de scipovo legi kun kompreno kaj interkompreniĝi (en tio prezenti sian opinion por grupanoj).

2. Metodo de ekspertoj – priskribo kaj analizo

Unu el la efikaj formoj de la aktivigado de lernantoj dum la procezo de lernado estas t.n. “metodo de ekspertoj”, permesanta realizi karakterizajn celojn de instruado, paralele kun la stimulado de sintenoj kaj intelektaj agoj, gravaj por efika funkciado de la homo en nuntempa demokratia socio.

Por kurte priskribi tiun ĉi formon de aktivigado de lernantoj, ni supozu, ke dum la lernejoj okupoj ili devas trovi solvojn de sendependaj problemoj.

Ni priskribos tiun ĉi formon de la organizado de okupoj, turnante specialan atenton je:

- procezoj de komunikado dum tiuj okupoj,
- realigado de principo: plenumu la taskon, klarigu kaj priskribu ĝin.

Tiu ĉi lasta principo koncernas jenajn tri situaciojn, en kiuj la lernanto povas sin trovi:

- situacio, en kiu lernanto mem atakas kaj solvas la problemon,
- situacio, en kiu lernanto devas klarigi al aliaj personoj, kiamaniere trovis la solvon, aŭ ĉiĉeroni en procezo de serĉado de problemsolvo,
- situacio, en kiu lernanto devas prezenti koncize redaktitan solvon de la problemo.

Por fiksi nian atenton, ni supozu, ke ni realizos okupojn, dum kiuj oni devos plenumi kelkajn, sendependajn taskojn – problemojn (ekz. kvar – tiun nombron mi fiksos en la sube prezentata priskribo). Depende de la lernobjekto ĉi-problemoj povus aspekti diverse: se temas pri matematiko – tio povus esti kvar problemaj taskoj por lernantoj, en la kazo de historio oni atendus la analizon de agado de kvar elstaraj personoj, en la kazo de pola lingvo – lingvan analizon de kvar fragmentoj de literaturaj verkoj, en la kazo de fiziko oni postulus la preparon kaj efektivigon de kvar eksperimentoj.

Ni priparolu unue la plej simplan varianton, kiam la problemoj por solvo estas relative simplaj kaj trovo de la solvoj ne bezonas pli ol 15 minutojn. La okupojn ni dividu je kelkaj etapoj.

Etapo 1 (informa)

En tiu etapo instruisto montras al lernantoj la planon de la leciono, dispartigas ilin je kvar grupoj (numeritaj I,II,III,IV), informante, ke en ĉiu grupo oni devos trovi la solvon de ricevota problemo, sed ne nur tion. La instruisto eksplikas, ke ĉiu lernanto ne nur devos koni la solvon, sed devos pretiĝi por esti eksperto de tiu problemo en la dua etapo, por anoj de aliaj grupoj. La rolo de la eksperto en tiu dua etapo estos: klarigo – se necesos – de detalaĵoj kaj duboj, koncernantaj la problemsolvon, kaj ankaŭ taŭga ekspliko – en la kazo, kiam la aliuloj mem ne trovos la solvon – de indikoj faciligantaj al la anoj de ceteraj grupoj memstaran trovon de la solvo. Instruisto disdonas antaŭe elektitajn kvar problemojn P I, P II, P III, P IV por ĉiu el la kvar grupoj. Lernantoj komencas laboron.

Tiu unua etapo devas daŭri ĉirkaŭ 5 minutojn.

Etapo 2 (de serĉado)

Por tiu etapo ni dediĉu ĉirkaŭ 15 minutojn. Dum tiu tempo lernantoj en ĉiu grupo serĉas la solvon de la ricevota problemo. La instruisto observas ilian laboron, donante - se necesas - koncernajn indikojn. Intervenado de la instruisto povas esti esenca por enkonduki lernantojn al ekkono de la problemsolvo. La rolon de la instruisto en tiu etapo ni precizigu jene: stimulado de la esplora aktiveco de lernantoj, diskreta kontrolo de la ĝusteco de proponataj solvoj kaj demandado, provokanta detalajn eksplikojn kaj argumentadon fare de lernantoj.

Etapo 3 (laboro de ekspertoj)

Tiun etapon ni komencas dividante denove kaj alimaniere lernantojn je grupoj. Pro tio, ke lernantoj en la dua etapo serĉis en kvar grupoj solvojn de kvar problemoj, nun ni dividas ilin je kvar grupoj: A, B, C, D (se ili estus serĉintaj solvojn de ses problemoj, ni dividus ilin je ses grupoj). Ni zorgas pri tio, ke en ĉiu nova grupo troviĝu almenaŭ unu lernanto de la grupo I, kiu en la dua etapo estiĝis eksperto de la unua problemo, almenaŭ unu de la grupo II, kiu en la dua etapo estiĝis eksperto de la dua problemo, almenaŭ unu de la grupo III – eksperto de la tria problemo kaj almenaŭ unu de la grupo IV – eksperto de la kvara problemo. Tiamaniere en ĉiu el kvar novaj grupoj A,B,C,D estas ekspertoj de ĉiu problemo solvita en la antaŭa etapo.

Nun la lernantoj de ĉiu el grupoj A,B,C, D devas solvi ĉiun el kvar problemoj. Por tio ili havas nur 20 minutojn, sed ili povas – se tio necesos – peti la helpon de ekspertoj kaj postuli ricevon de sufiĉaj klarigoj. La instruisto, kiel antaŭe, observas la laboron de lernantoj en grupoj, ekzamenante inter alie, ĉu la ekspertoj bone plenumas sian rolon.

Etapo 4 (prezentado)

Dum tiu etapo lernantoj prezentas la solvojn de la problemoj antaŭ la tuta klaso. Por la prezentado la instruisto indikas po unu lernanto de ĉiu grupo, sed tiel, ke la prezentanta la problemsolvon lernanto ne estu eksperto de tiu problemo. Kiam la taskoj, kiujn devos plenumi lernantoj ne postulas multan tempon, la prezentado povas estiĝi la lasta parto de la leciono.

Tiu la plej simpla varianto, ebla por efektivigo dum unuhora leciono, estas konvena por la klasoj I, II, III, kiam la taskoj – problemoj por lernantoj ne estas tro malfacilaj kaj penigaj, kaj la prezentado por la tuta klaso povas okazi dum la sama leciono.

En la klasoj por pli aĝaj lernantoj kaj en klerigado de plenaĝuloj, kiam la taskoj – problemoj por studentoj estas pli malfacilaj, valoras prilabori la varianton kun asistantoj. Tiucele (unu semajnon antaŭ la planitaj okupoj) oni elektas inter la lernantoj kelkajn personojn, tiel nomatajn asistantojn (tiom da ili, kiom ni proponos problemojn), atingantajn antaŭe bonajn rezultojn dum lernado, precipe memstara. La instruisto montras al ili problemojn P I, P II, P III, P IV kaj laborante kun ili individue, direktas la procezon de la problemsolvado. Dum la lasta semajno antaŭ la planata leciono ili estus devintaj solvi ĉiujn kvar problemojn kaj pridiskuti la solvojn kun la instruisto. Kiam dum la leciono kun la tuta klaso komenciĝas la dua etapo, asistantoj aliĝas al koncernaj grupoj, plenumante tie la rolon de la instruisto, la rolon priskribitan supre. En la sama tempo la instruisto havas la okazon observi kaj lernantojn laborantajn en la grupoj kaj asistantojn, gvidantajn la laboron de lernantoj en la grupoj.

Dum la tria etapo asistantoj helpas al la instruisto organizi novajn grupojn kaj observas laboron de lernantoj - ekspertoj en la grupoj. Oni povas tion profituzi por organizi konkuradon kaj ekz. elekton de la plej bona eksperto aŭ sisteman pritaksadon de la laboro de ekspertoj. En la lasta etapo ekspertoj povas ankaŭ plenumi la funkcion de ĵurio opinianta pri la preparado de la prezentadoj.

Ni analizu nun la procezon kaj organizadon de la proponitaj supre okupoj el la vidpunkto de premisitaj celoj de la edukado. Antaŭ ĉio ni substreku, ke dum la okupoj ĉiun proponatan por solvo problemon, lernanto renkontas trifoje, ĉiam en alia situacio. En la dua etapo li serĉas la solvon. En la etapo tria, la tasko de la lernanto estas: klarigi al alia persono solvon de unu el la problemoj kaj kompreni aliajn problemojn, dank' al eksplikoj de ceteraj lernantoj. En la kvara etapo la lernanto "ricevas" la prezentadon de problemsolvoj aŭ prezentas trovitan solvon.

En la unua etapo okazas informtransmisio de instruisto al lernanto. Tia situacio ofte regas dum la instruado, speciale dum la instruado tradicia. Instruisto estas tiam la fonto kaj "relajso" de informoj. Lia komunikaĵo, bazita sur propra vivsperto kaj la faklingvo, kiun li uzas, devas atingi lernantojn, se nur ne estas misformita per neeviteblaj en tia situacio perturboj, kaj se lernantoj deziras percepti. Malgraŭ tio ĝi povas okazi nekomprenebla por lernantoj, ĉar iliaj vivspertoj kaj lingvo, kiun ili uzas, esence diferencas de la lingvo kaj vivspertoj de la instruisto. Se ni tamen dezirus, ke parolturnoj de la instruisto estu modelo por lernantoj, li ne limigu sian "faklingvon" al la nivelo de lernantoj. Tiu skemo de la komuniko de informoj ne favoras ekeston de rekupligo inter ekspedanto kaj adresato – lernantoj estas neaktivaj ricevantoj de la informoj, kaj eĉ se ili povas demandi (kaj tio ne estas facila en la ĉeesto de la tuta klaso, ĉar tio malkaŝas ilian nescion), ja nur en limigita grado, sen espero de la ricevo de individuigitaj respondoj.

En la dua etapo la situacio de komunikado ŝanĝiĝas. Lernantoj serĉante la problemsolvon, diskutas en malgrandaj grupoj. Ili uzas sian lingvon kaj alvokas siajn kompareblajn vivspertojn kaj interveno de la instruisto, se necesas, pli facile estas akceptata kaj komprenata. Nun estas pli bona okazo sin turni al la instruisto kun individuaj demandoj, kiuj plifaciligas plenumon de la tasko de la unua etapo – fariĝi eksperto de la solvata problemo.

La tria etapo laŭ vidpunkto de komunikado similas al la antaŭa, sed ĉiu lernanto devas en la kazo de bezono, prezenti sian opinion antaŭ la tuta grupo, en la rolo de eksperto. Jen do estas la etapo, dum kiu oni devas efektivigitan laboron klarigi al aliaj personoj.

Se inter la etapo tria kaj kvara - dediĉita al prezentado, ekestos libera tempo por pripenso, indus serĉi certan sintezon kaj kompletigon de la laboro farita en antaŭaj etapoj. Lernantoj destinitaj por la prezentado povas nun ekparoli antaŭ la tuta klaso.

La tre konciza, prezentita supre, analizo de premisitaj celoj de la metodo de ekspertoj, povas esti la elirpunkto por serĉado de tiuj formoj de la organizado de okupoj dum eduka procezo, kiuj helpas al ĉiuflanka intelekta aktivigado de lernantoj.

Małgorzata Jolanta Komarnicka kaj Piotr Nosek

Bazaj faktoj de la historio de Pollando

La unua pola reganto – princo Mjeŝko la Unua de la dinastio Piast unuigis Pollandon pli ol mil jarojn antaŭe. La ĉefurbo tiutempe estis Gniezno – la historia ĉefurbo de la tribo Polanoj. De Polanoj devenas la nomo Pollando (en la pola lingvo “Polska”). Polanoj loĝis en la teritorio de la hodiaŭa centro-okcidenta Pollando, kiu nuntempe nomiĝas “Wielkopolska”. La simbola dato por la unuiĝo de Pollando estas la jaro 966. Tiam Mjeŝko la Unua estis baptita. Verŝajne li akceptis kristanisman ne nur pro religiaj kialoj, sed ankaŭ pro la politikaj. Germanoj perforte konvertadis al kristanismo la okcidentajn slavajn tribojn kaj Mjeŝko ne volis esti la sekva. Li edziĝis kun la kristana ĉeĥa princino Dobrava kaj frue li mem fariĝis kristano. La teritorio de tiama Pollando verŝajne ankoraŭ ne ampleksis Krakovon kaj la provincon Małopolska, kie reĝis Boleslao, la filo de Mjeŝko la Unua.

Post la morto de Mjeŝko en 992, Boleslao iĝis la sekva reganto de Pollando kaj li famiĝis kiel la unua reĝo de Pollando (Mjeŝko estis nur princo). Tiam granda amiko de Boleslao estis la germana imperiestro Otto la Tria. La imperiestro en la jaro 1000 vizitis Gnieznon kaj kronis la polan princon. Boleslao estis rekonita kiel amiko de Germanio kaj eĉ kiel imperiestra frato. En la sama jaro estis fonditaj 3 episkopejoj, i. a. unu en Krakovo, la sekva ĉefurbo de Pollando. La morto de la imperiestro Otto la Tria komencigis multjarajn militojn inter Pollando kaj ĝiaj najbaroj, kiuj ripetiĝis multfoje dum la miljara historio de Pollando, pro diversaj kialoj.

Inter la reĝado de Boleslao kaj de la famega Kazimiro la Granda estas longa intervalo de preskaŭ tricent jaroj, dum kiuj Pollando kelkfoje dividiĝis je malgrandaj dukaĵoj kaj kelkfoje denove reunuiĝis. Kazimiro estis filo de la pola reĝo Ladislao Ĥokietek, kiu komence de la 14-a jarcento unuigis Pollandon post longa periodo de malunuiĝo. Kazimiro la Granda estis tiom kapabla kaj bona reĝo, ke laŭ kutima diro „li trafis al ligna Pollando kaj lasis ĝin masonitan”. Komence de lia regado en la jaro 1333, Pollando estis malgranda kaj malgrava ŝtato, ĉirkaŭita de ĉefe malamikaj najbaroj. Post preskaŭ kvardek jaroj, la teritorio de Pollando pligrandiĝis trioble, la ŝtata trezorejo estis plena, la leĝaro bone reformita, pligrandiĝis nombro de urboj kaj vilaĝoj, evoluis komerco ktp. En 1364 li fondis la Krakovan Akademion – la duan plej malnovan universitaton en la centra Eŭropo, kiu nuntempe nomiĝas Jagelona Universitato. Dum lia regado judoj ĝuis favorajn rajtojn. Kazimiro ne lasis viran posteulon, kiu povintus esti la sekva reĝo. Li havis tri filojn kaj kvin filinojn, sed liaj filoj estis eksterleĝaj. Kazimiro promesis al la hungara francdevena dinastio Anĵuoj, ke se li mortos sen legitima posteulo, la hungara reĝo Ludoviko, kiu estis lia nevo, transprenos la polan tronon. Kaj tiel okazis en 1370.

La reĝo de Pollando fariĝis Ludoviko la Hungara (en Hungario nomita Ludoviko la Granda, Lajos Nagy) el Anĵua dinastio. Sed post la morto de Ludoviko la Hungara la situacio ripetiĝis, ĉar li ne havis filojn, sed nur filinojn. Finfine unu el liaj filinoj Hedvika (pole Jadwiga) estis kronita kiel REĜO de Pollando (ne reĝino!), kiam ŝi havis apenaŭ 11 jarojn. Ŝi estis tre saĝa, prudenta kaj matura. Ŝi parolis kvin fremdajn lingvojn, estis talenta diplomatino kaj bonege rajdis surĉevalo. Kiel 13-jaraĝa knabino ŝi edziniĝis kun la litova princo Jogajlo (pole Jagiełło), kiu decidis konvertiĝi al kristanismo kaj dank' al sia edziĝo kun Hedvika, li iĝis la pola reĝo, fondante la novan polan dinastion, nomitan Jagelonoj (aŭ Jogajlidoj). Dank' al la edziĝo kun Hedvika, Jogajlo fondis la longdaŭran union inter Pollando kaj Litovio. Dum la bapta ceremonio li akceptis la nomon Ladislao kaj ekde tiam li estis konata kiel Ladislao Jogajlo (pole Władysław Jagiełło). Bedaŭrinde, lia bela kaj saĝa edzino Hedvika mortis pro la akuŝkomplikaĵoj post la nasko de sia unua filino. Hedviko estis fama pro sia pieco kaj bonfaremo, do kiam ŝi mortis, ŝi estis agnoskita kiel sanktulino. Oficiale ŝi estis kanonizita de la papo Johano Paŭlo la Dua nur en 1997.

Post Ladislao Jogajlo venis kelkaj aliaj litovaj reĝoj. Valoras mencii la reĝon Sigismondo la Maljuna, kiu regis en la unua duono de la 16-a jarcento. La tempo de lia regado estas nomata “la ora epoko” en Pollando. Li estis fama kiel granda protektanto de arto. Dank' al li, la renesanca arto disvolviĝis en Pollando pli frue ol en preskaŭ ĉiuj aliaj eŭropaj landoj. Li rekonstruis laŭ la renesanca stilo la reĝan kastelon en Krakovo, post tio havantan la plej grandan renesancan korton en Eŭropo. La Sigismonda Kapelo en la Katedralo, kiun li fondis, estas nomata “perlo de la toskana renesanco norde de Alpoj”. La dua edzino de Sigismondo la Maljuna estis italino Bona Sforza d’Aragona, ege ambicia virino, kiu havis grandan influon al sia edzo. Ŝi enkondukis en Pollando makaroniojn kaj antaŭe nekonatajn legomojn. La filo de Sigismondo la Maljuna kaj Bona Sforza, kiu nomiĝis Sigismondo Aŭgusto, estis la lasta reĝo de la Jagelona dinastio, ĉar li ne havis viran posteulon.

Post la morto de Sigismondo Aŭgusto la politika situacio en Pollando estis tre komplika, ĉar la lasta reĝo ne elektis sian posteulon. Finfine oni decidis, ke nova reĝo estos elektita per voĉdonado de nobeloj. Tiel komenciĝis la longa periodo de elektataj reĝoj, kiu finiĝis fine de la 18-a jarcento per dekadenco de nia ŝtato kaj divido de Pollando inter tri najbaroj – Prusio, Aŭstrio kaj Rusio. La unua elektita reĝo estis Henriko el la franca dinastio Valezianoj. La pola trono estis por li sufiĉe ekzotika, sed li havis pli aĝajn fratojn, do li ne povis atendi pli favoran postenon en la franca kortego. Li havis strangajn kutimojn kaj ofte pro siaj kostumoj kaj kondutoj elvokis ŝokon. Lia kariero de pola reĝo ne daŭris longe. Kiam li ricevis informon pri la morto de sia frato, la reĝo de Francio, li simple fuĝis al Francio kaj neniam revenis, ĉar li sukcesis gajni la francan kronon.

Inter la famaj elektitaj reĝoj valoras mencii ankoraŭ tri aliajn. En 1587 sveda Sigismondo Vasa iĝis la reĝo de Pollando. Dum certa tempo li estis samtempe la reĝo de Svedio, kreante personan union inter Pollando kaj Svedio. Li estas precipe grava por la historio de Krakovo kaj Varsovio, ĉar en 1596 li translokiĝis kun sia kortego al Varsovio, malgraŭ tio, ke Krakovo restis la oficiala ĉefurbo. Alia fama elektita reĝo estas polo Johano la Tria Sobieski, konata kiel reĝo-heroo pro sia venko apud Vieno kontraŭ la Otomana Imperio en 1683, dank' al kio li efike haltigis la ekspansion de turkoj al Eŭropo.

La lasta reganto de Pollando, ĝis la definitiva dispartigo de la ŝtato, estis Stanislaŭo Aŭgusto Poniatowski. Li ne estis komplete sendependa reganto, ĉar lia elekto estis apogita per Rusio. Malgraŭ la dependeco, dum lia regado estis enkondukitaj multaj gravaj reformoj, sed estis jam tro malfrue por savi sendependecon de Pollando. Unu el la plej elstaraj reformoj estis la fondo de Komisiono de Nacia Edukado, kiu estis la unua en la tuta mondo centralizita organo de kleriga aŭtoritato, kiel Ministerio pri Nacia Klerigado. La komisiono verkis multajn lernolibrojn, prilaboris fakajn terminarojn kaj kreis defundamente la novan polan sistemon de klerigado. En 1791 la pola parlamento proklamis la konstitucion, kies ĉefa aŭtoro estis Stanislaŭo Aŭgusto Poniatowski. La pola konstitucio estis la unua en Eŭropo kaj la dua en la mondo, post la konstitucio de Usono. En 1794 kontraŭ Prusio kaj Rusio okazis ribelo, kies gvidanto estis la fama Tadeusz Kościuszko, kiu antaŭe famiĝis kiel usona nacia heroo. Unu monaton post aprobo de la usona Deklaro pri Sendependeco li vojaĝis al Usono kaj batalis por sendependeco de Nordameriko. Omaĝe al liaj meritoj la Usona Kongreso avancigis lin, donante la rangon de brigada generalo de la usona armeo. Laŭ lia nomo estis nomita i.a. la plej alta monto en Aŭstralio.

En 1795 Pollando estis definitive dividita inter Prusio, Aŭstrio kaj Rusio, kaj perdis la sendependecon por pli ol cent dudek jarojn. Malgraŭ la forta opozicio kontraŭ aneksantaj ŝtatoj, Pollando liberiĝis nur post la unua mondmilito. Dum tiuj jaroj estis periodoj de limigita aŭtonomio kaj ankaŭ periodoj de forta subpremo. La pola kulturvivo kaj oficiala uzo de la pola lingvo estis limigitaj, sed la situacio ne estis la sama en ĉiuj tri okupitaj partoj. La pola kulturo povis pli facile disvolviĝi en la suda Pollando, kiun aneksis Aŭstrio. Multaj poloj elmigris al aliaj landoj, precipe post kelkaj ribeloj, kies rezulto estis politikaj kaj kulturaj persekutoj. Ĝis hodiaŭ oni povas trovi la polajn setlejojn en preskaŭ ĉiuj anguletoj de la mondo.

Bonŝance en la fino de la unua mondmilito Pollando regajnis la sendependecon kaj la plej fama persono de tiu periodo estis marŝalo kaj la unua ŝtatestro de nova Pollando – Józef Piłsudski, kiu sukcese batalis kontraŭ Sovetunio. Sed la sendependeco ne daŭris longe. La 1-an de septembro 1939 Germanio komencis la militon kontraŭ Pollando kaj post dek sep tagoj Sovetio invadis la orientan Pollandon. Dum la jaroj de la dua mondmilito, kvankam Pollando estis okupita, agadis la pola armeo

eksterlande. La armeo estis neordinara, ĉar ĝi batalis en preskaŭ tuta Eŭropo, Norda Afriko kaj Proksima Oriento. La polaj trupoj nur en Francio havis 85 mil soldatojn. Kelkdek mil polaj soldatoj batalis en Britio. Precipe gravaj dum la fama Aerbatalo por Britio estis la polaj pilotoj, kies nombro atingis 144. Poloj havis ankoraŭ alian gravan kontribuon en la venko super la kontraŭhitlera koalicio. Tri polaj sciencistoj gvidataj de la matematikisto Marian Rejewski en la jaro 1932 sukcese deĉifris la germanan ĉifrilon Enigma kaj somere de 1939 la poloj transdonis la kolektitan scion al britoj. Multaj historiistoj opinias, ke la deĉifrado de Enigma mallongigis la duan mondmiliton je pli ol du jaroj.

Bedaŭrinde, post la dua mondmilito, laŭ la decidoj de la Jalta Konferenco, Pollando enfalis en la sferon de sovetaj influoj, kaj tio ŝanĝiĝis nur en 1989. Valoras substreki ke la ŝanĝoj en la centra kaj orienta Eŭropo en la jaro 1989 komenciĝis ĝuste en Pollando, kiam la amasa libereca movado reprezentita de la sindikato “Solidareco”, sub la gvido de Lech Wałęsa, venkis elektojn kaj tio provokis la ondon de ŝanĝoj en Eŭropo kaj la falon de la Berlina Muro. La netroigeblan rolon en la ŝanĝoj ludis la papo Johano Paŭlo la Dua. Li vekis en multaj poloj esperon pri ŝanĝoj kaj sen Lia kontribuo la hodiaŭa mondo verŝajne ne estus la sama.

Bibliografio

- Budrewicz O.* (2000), *Polska dla początkujących*, Warszawa
Ligeza L. (2008), *Legende pri Krakovo*, Krakovo
Michał Rożek M. (2005), *Kraków magiczny*, Kraków
Why Poland [praca zbiorowa], Warszawa 2004
Davies N. (2006), *Boże Igrzysko*, Kraków
Pilikowski J. (2001), *Szkolny Słownik Historii Polski*, Kraków



Ilona Koutny

(Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando,

Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino, membro de la Akademio de Esperanto)

Rolo de Esperanto en la interkultura komunikado

Enkonduko

Interkultura komunikado havas diversajn aspektojn de la kultura tra sociologia kaj psikologia ĝis lingva aliroj. Ju pli granda estas la kultura diferenco des pli da problemoj povas ekesti inter la komunikantoj kaj pli granda interkultura kompetento necesas por transponti la diferencojn. La esperantan movadon karakterizas, ke homoj el la plej diversaj kulturoj interkomunikas.

Estas ĝenerale akceptata (ekz. Samovar), ke efika interkultura komunikado necesigas (a) konscion pri la valideco de la propra kulturo kaj pri la kulturaj diferencoj; (b) malfemitecon, sentemon, empation por la kulturo de la alia partnero kaj (c) kunlaboran komunikadan sintenon, strategion.

Koncerne la lingvon de interkultura komunikado la sekvaj bazaj situacioj eblas, se ni ne konsideras ĉi tie la komunikadon inter malsamkulturaj grupoj kun la sama gepatra lingvo (ja tiuj elvokas aliajn problemojn, kiel tiun de minoritataj kaj subkulturoj) supozante internacian kuntekston:

1. Uzo de unu el la gepatraj lingvoj de la komunikantoj
2. Komuna etna lingvo alia ol la gepatra
3. Komuna neŭtrala lingvo.

La unua solvo kutime kreas situacion, kie la elektita gepatra lingvo manifestas ankaŭ la kulturajn normojn ligitajn al ĝi kaj la partnero devas kaj provas adaptiĝi al tiuj normoj. Ekz. iu veturas al Germanio, tiam komunikanta en la germana lingvo, validas la germanaj kulturaj normoj. Simila situacio ekestas, se germana delegacio veturas al Pollando kaj la rektaj interparoloj okazas en la germana.

La dua formo realiĝas, se du malsamnaciaj neanglalingvanoj interparolas angle. Kiomgrade devigas la kulturaj normoj ligitaj al la angla lingvo? Se iomgrade jes, tiam leviĝas la sekva demando, kiu anglalingva kulturo: la angla, usona aŭ iu alia? Lastatempe disvastiĝas movado por la *Angla kiel Internacia Lingvo* (ĝiajn celojn prezentas Jenkins 2000), ĉar en la nuna tempo pli multaj homoj uzas la anglan kiel internacian lingvon ol gepatran lingvon (la datumoj pri la uzo de la angla en la mondo tre varias de 500 milionoj al 800 aŭ eĉ pli, v. ekz. Weber 1998–2008).

La tria solvo realiĝas, se iuj interparolas esperante (ni ne kalkulas la denaskulojn, kiuj estas malmultaj kaj kies alia gepatra lingvo ĉefe determinas ilian kulturon). La lingvaj kaj kulturaj aspektoj de esperantlingva komunikado estos ĉi tie analizataj kompare kun tiuj de la angla (pli detalan lingvan komparon v. Koutny 2005).

Interkultura komunikado per esperanto

Kulturo en vasta senco inkludas ĉion, kion la homoj kreis, objektojn kaj instituciojn, la pensmanieron kaj valorjuĝojn de la membroj de la donita kulturo. La unuaj estas videblaj, alireblaj (ili estas la pinto de la glacimonto laŭ Hall) kaj la du lastaj kaŝiĝas en la homoj. Tio ĉio speguliĝas en la lingvo de la parolkomunumo, kaj siavice la lingvo certgrade determinas la pensadon de siaj parolantoj. Oni lernas la gepatran lingvon kaj la rilatan kulturon, mondkoncepton dum la ensociiga procezo.

Kaze de fremda lingvo oni devas konsciiĝi pri la relativeco de sia propra kulturo, esti malfermita por alia kulturo, kiun oni nur parte akiras. Esperantistoj ne trairas similan lernprocezon kiel por la gepatra, tiel la e-kulturo diversgrade manifestiĝas ĉe ili.

La naciaj kulturoj estas *ekskludaj*, ili difinas sin mem kompare kun aliaj: ni estas tio, kio diferencigas nin de la aliaj (ofte tiuj iĝas la fremduloj). Auld (1986) difinas la e-kulturon *inkluda*, ĉar ĝi riĉiĝas per aliaj kulturoj. La esperanta kulturo entenas ankaŭ iuspecan internacian kulturon, kiu devenas de la komuna homa naturo kaj de la efiko de tutterigo. Trie, ne plu eblas neglekti la propran kulturon de esperanto, kiu elfomiĝis nature dum sia pli ol centjara ekzistado (kp Melnikov 1992, 2007 Koutny 1998, Fiedler 2002). La kulturaj valoraroj kaj videbla parto de e-kulturo ne kontesteblas, sed ĉu estas komunaj valoroj kaj pensmaniero? – tiun demandon provas analizi ankaŭ Michael Farris laŭ la kategorioj de Hofstede (en la sama volumo). Li opinias, ke homoj, kiuj aliĝas al e-o, havas jam iujn similajn valorojn.

Kiel aspektas la internacia komunikado en la angla kaj e-lingva kunteksto? Kiuj normoj validas?

La angla lingvo

- havas multajn kultur-ŝarĝitajn elementojn, kiujn lingvolerninto ofte ne regas, tiel ofte ankaŭ ne kaptas ilian signifon en la interparolo,
- kolokaĵoj, riĉa frazeologio estas rigidaj kaj ofte ne travideblaj.
- Kiam iu parolas angle, devas adapti sian direndaĵon al la sistemo de la angla lingvo.

Esperanto

- havas malmultajn kultur-ŝarĝitajn elementojn kompare kun la angla lingvo, kvankam sen kultura scio ne eblas kompreni la signifon de krokodilo, kabei, verda stelo, kongresa edzino ktp. (Melnikov kolektis tiujn specialajn elementojn, Fiedler analizis la frazeologiaĵojn de e-o).
- Ĝia strukturo estas fleksebla: povas esprimi diversajn strukturojn (*veturi per taksio, taksii, sidiĝi al tablo, altabligi*) kaj travideblas (esperantonimo kiel *ellitiĝi* kompreneblas el siaj elementoj).
- Se iu parolas esperante, pli flekseble povas transmeti siajn pensojn, ĉar la lingvo adaptiĝas al la parolanto. La kreiva lingvouzo (Piron analizas tion) pli helpas la sukcesan interparolon.

Kompreneble, la komuna lingvo ne malaperigas la kulturajn diferencojn (temas pri la kaŝita jam aŭtomata parto), tamen ekzistas faktoroj, kiuj fortigas la senton “aparteni al la sama grupo” kiu kreas iuspecan *solidarecon*, kiu helpas la kunlaboran komunikadon. Tiuj estas ekzemple la memelektita aparteno al la lingvokomunumo, la komuna ideo pri la internacia lingvo, kiu helpas solvi la problemojn de internacia komunikado, malfermiteco kaj interesiĝo pri aliaj kulturoj. La aparteno al la sama grupo superas, ofte forigas la fazon de eblaj konfliktoj.

Do, tiel aspektas la paŝoj dum la interkultura ekkomunikado en esperanta medio:

- interesiĝo pri aliaj kulturoj, homoj, lingvoj
- malfermiteco
- komuneco, solidareco.
- konsciiĝo pri la diferencoj
- difino de la propra pozicio

Kaze de komunikado pere de aliaj lingvoj ofte la vicordo estas alia, la interesiĝo kaj malfermiteco estas rezulto.

Ekzistas *riĉkuntekstaj* kaj *malriĉkuntekstaj* kulturoj (Hall & Hall 1990: *high and low context cultures*): en la unua ne ĉio estas eksplice dirita dum la konversacio, ja la homoj konas la kuntekston kaj mem povas aldoni la neeldiritajn informojn. La komunikado baziĝas sur multaj komunaj scioj, do funkcias certaj antaŭsupozoj (pli ofte en aziaj kulturoj); en la dua la kunteksto devas esti pli eksplice

donita (ekz. usona kulturo). Konversacioj en la du malsamtipaj kulturoj alie aspektas, en la unua multe pli estas komunikata ol dirata. Esperanta medio necesigas pli eksplicitan formulon de la direndaĵo. Antaŭsupozoj ne ĉiam funkcias pro la malsamaj fonaj scioj de komunikantoj, al kiuj povas aludi la komunikaĵo. Ankaŭ la konotacioj estas malsamaj (ekz. malsama kompreno de *prezidento*, *profesoro* kiel ‘instruisto’ aŭ la ‘plej altgrada universitata instruisto’).

Interkultura dialogo

La strukturo kaj formo de komunikado obeas al socilingvistikaj normoj ene de lingvokomunumo. Tiuj normoj dependas de la socia statuso, aĝo, sekso kaj intimeco de la rilatoj de la interparolantoj. Gravas ne nur tio kion oni diras, sed ankaŭ tio, kiel oni diras. La **ĝentilecformoj** (saluto, alparolo, formo de peto kaj rifuzo ktp.) traplektas nian konversacion, ilia neuzo aŭ malĝusta uzo riskas la sukceson de la komunikado (ekz. plenumon de peto). Tiu ĉi normaro varias de kulturrondo al kulturrondo (ekz. la kutima pli familiara pola alparolo “sinjoro Peĉjo” estus ridinda hungare, sed aŭdeblas en la interparolo de polaj esperantistoj).

Tiuj normoj ne estas devigaj en Esperantio, ĉar la jam menciita kriterio „aparteno al la sama, memelektita grupo” estas pli forta. La uzataj formoj pro tio estas pli familiaraj (v. la esploron en Koutny 1998), titoloj malofte uzatas dum kongresoj, kunvenoj, ja entute la okazo estas malpli formala, sed ili estas rigore uzataj en AIS-rondoj, kie la kontaktoj estas pli formalaj pro la akademia sistemo. La renkontiĝoj kaj interparoloj dum renkontiĝoj estas ofte hazardaj, tiel ne necesas instali iun hierarkion.

Ankaŭ la **enhavo** certgrade dependas de la lingvokomunumo, certaj temoj (ekz. seksa vivo, malsanoj, religia kredo, financa stato) povas esti tabuaj, do ne tuŝeblaj publike, aliaj temoj estas oftaj kiel societaj enkondukoj (ekz. la vetero, politika situacio). Alie aspektas konversacio en japana kaj usona kunteksto, eĉ la silento havas malsaman rolon (en aziaj kulturoj ĝi esprimas respekton, en eŭropa kaj usona kunteksto plie kontraŭstaron).

En Esperantio priparolatas tipaj temoj kiel la lernado de la lingvo, esperantistoj, e-klubo en la ĉirkaŭaĵo de la interparolanto, korespondado, vojaĝoj, la aktualaj programoj ktp.

La **metakomunikado** akompananta la lingvan komunikadon same havas siajn kulturdependajn variantojn. Ne elformiĝis speciala e-versio.

Komunikado povas havi diversajn **celojn** kiel: babilado, informado, komuna solvo de taskoj. En Esperantio pli oftas la unua kaj poste la dua. La komuna solvo de taskoj, interkonsentoj postulas pli precizan komunikadon. Tie la kultura diverseco havas influon, kvankam ofte nekonscian. La malfermiteco kaj toleremo, komuneco en la baza celaro helpas trovi solvon. Tamen necesus pli granda atento al la malsamecoj en Esperantio, sed tio estas la tasko de instruado.

Edukado al interkultureco per esperanto

Esperanto bone kaj efike funkcias de pli ol 120 jaroj en interkultura komunikado. Tiujn spertojn necesus pli detale esplori por vidi la klaran rolon de esperanto. Konstateblas la idea komuneco (kiel malfermiteco) de la interparolantoj kaj la bona rego de la fleksebla lingvo (ne fremda, sed propra lingvo!) kiu pli taŭgas por esprimi sian kulturon) kiuj kontribuas al pli memcerta komunikada strategio, toleremo al la aliaj kaj entute al la sukceso en la komunikado.

Dum la realigo de la Projekto Interkulturo por lernejoj klasoj tiuj pozitivaj ecoj de la esperantlingva komunikado estis eluzataj por ekkoni la kulturon de aliaj lernejoj grupoj kaj prezenti la propran.

Necesus pli multe konsciiĝi pri la kultura diverseco ankaŭ en e-medio (por ke la eŭropa-usona modelo ne altrudiĝu), ties instruado, kiu kontribuas al pli efika komunikado ne nur dum konferencoj, sed ankaŭ en aliaj cirkonstancoj.

Bibliografio

- Auld, W. (1986): *Kulturo kaj internacia lingvo*. Chapeco: Fonto
- Fiedler, Sabine (2002): *Esperanta frazeologio*. Roterdamo: UEA
- Hall, E. T.; Hall, M. R. (1990): *Understanding cultural differences*. Yarmouth, Maine: Intercultural Press
- Jenkins, Jennifer (2000): *The Phonology of English as an International Language*. Oxford: Oxford University Press
- Koutny, Ilona (1998): Interkultura komunkado. En: Wandel, A. (red.): *Internacia Kongresa Universitato*. Rotterdam: UEA. <http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/artikoloj/INKO-03.htm>
- Koutny, Ilona (2005): Interkultura komunikado en Eŭropo: la angla kaj esperanto kiel alternativaj komunikiloj. En: Simpozio pri interkultura komunikado. Ch. Kiselman (red.). Dobrichovice: Kava-Pech. 115-132. http://www.staff.amu.edu.pl/~interl/artikoloj/interkultura_komunikado%20.html
- Melnikov, A. (1992): *Specifaj kulturaj scioj de la Esperantista kvazaŭetno kaj ilia respeguliĝo en la koncerna lingvaĵo*. Rostov-na-Donu: la aŭtoro
- Melnikov, A. (2007): Esperanto – lingvo de kulturo kaj personeco. Moskvo: Eldonejo de la Eŭropa Jura Universitato „Justo”.
- Phillipson, Robert (2003): *English-only Europe? Challenging language policy*. London and New York: Routledge, Abstract: http://www.uea.org/vikio/Summary_Of_English-Only_Europe
- Piron, Claude: Psychological Aspects of the World Language Problem and of Esperanto. http://www.ikso.net/pironejo/Psychological_aspects.html
- Projekto INTERKULTURO: <http://host.uniroma3.it/progetti/kler/info/ikbr1eo.PDF>
- Samovar, Larry A.; Porter, Richard E. (2000): Understanding Intercultural Communication: An Introduction and Overview. En: Samovar, L. A.; Porter, R. E. (red.): *Intercultural Communication. A Reader*. 9-a eld. Belmont, CA: Wadsworth Publishing Company
- Weber, George (2008): Top Languages. The World's 10 most influential languages. <http://www.andaman.org/BOOK/reprints/weber/rep-weber.htm>



Zbigniew Paweł Kruszewski
(Altlernejo Włodkowic, Płock, Pollando)

Premisoj por fondo kaj funkciado de Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj en la Altlernejo Włodkowic en Płock

La Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj estis fondita en kunlaboro inter la Altlernejo Włodkowic en Płock kaj Pedagogia Universitato en Jaroslav (Rusio) surbaze de la interkonsento, datita la 30-an de oktobro 2006. Tiu ĉi Instituto ekestis por helpi la komprenon kaj forigon de la kulturaj barieroj, trarompi la kulturan diversecon kaj negativajn stereotipojn formiĝintaj dum la pasintaj homaj kontaktoj.

Nuntempe en la unuiĝanta mondo oni sentas fortan bezonon de interkultura komunikado. Kontaktoj inter civitanoj el la ŝtatoj strikte najbaraj kaj ankaŭ malproksimaj, kaj defioj, kiuj pro tio efektiviĝas, fariĝas ĉiam pli oftaj. Kreskas la nombro de homoj vojaĝantaj eksterlanden; multaj el ili decidas resti tie dum relative longa periodo por labori, studi, vivi. Ankaŭ la moderna tekniko donas eblecojn de facilaj kontaktoj kun la tuta mondo.

La taskoj de la Instituto estas: didaktikaj, sciencaj kaj esploraj en la tereno de multkultureco, antropologio, historio, pedagogio, psikologio, juro, ekonomio kaj entreprenemo, pli detale:

1. fondo kaj gvidado de Postdiplomaj Studoj,
2. organizado de kursoj kaj de faka trejnado por realizi permanentan klerigadon,
3. instruado de fremdaj lingvoj, uzataj en la landoj kunlaborantaj kun la Instituto,
4. inspiro por fondo kaj gvidado de sciencaj esploroj kaj tradukado de sciencaj publikaĵoj,
5. inspiro kaj organizado de sciencaj kongresoj, konferencoj, simpozioj, seminarioj, konkursoj kaj kunsidoj,
6. konsultado en la sfero de scienco, ekonomio, juro; opiniado en ĉi-sferoj,
7. preparado de eduk' kaj instruprogramoj,
8. organizado de praktikoj kaj staĝoj en altlernejoj kaj aliaj institucioj,
9. organizado de interŝanĝoj por studentoj kaj akademiaj instruistoj el altlernejoj kunlaborantaj kun la Instituto.

La ĉefa celo de la agado de la Instituto estas fondo de Postdiplomaj Studoj kaj konstanta klerigado. Kio do estas la celoj de tiuj Studoj? Por trovi la respondon indas turni nian atenton je kelkaj aktualaj problemoj mondaj kaj eŭropaj. Al ili apartenas:

- universalismo,
- eŭropa integriĝo – ŝancoj kaj defioj, interkulturaj diferencoj,
- ŝanĝoj en komunikado (retaliro); multkulturo,
- nuntempa kompreno de edukado kaj klerigado,
- ligoj interkulturaj, sociaj, regionaj, ekonomiaj, naciaj, moralaj, religiaj,
- novaj ekonomiaj defioj kaj universalismo,
- kunlaboro en socigrupo kaj krizoj ekonomiaj, religiaj, nacionalismaj.

Sur tiu fono naskiĝas volo al kunlaboro en la sfero de interŝanĝo de valoroj karakterizantaj ekvivalentajn kulturojn, sociojn kaj naciojn. Sukceso en ĉi-kunlaboro kaj kunlaboro en la sfero ekonomi-socia povas esti minacita, kiam la kulturaj diferencoj transformiĝos en barierojn, ekz. la ekzistantajn ĉe ambaŭ flankoj de la ŝtatlimo- multnombrajn stereotipojn, foje stimulataj en la mas-informiloj.

Ĉi tiuj problemoj povas fariĝi la fundamento de sciencaj esploroj, didaktika laboro kaj diversaj staĝaj kaj seminariaj okupoj. Gvidante ekzemple internacian kunlaboron en diversaj sferoj, oni nepre devas posedi scion koncernantan naciajn kulturojn. Oni devas ekkoni la landon, obligajn en ĝi leĝojn kaj morojn, por gvidi tiom diversan agadon – inter alie ekonomian.

Variĝo de cirkonstancoj politikaj kaj sociaj, kun tempodaŭro pli intensiviĝos. Ekonomia evoluo, malfermo de landlimoj, fluo de edukitaj fakuloj, ekspansio de entreprenoj, devigos la firmaojn serĉadi homojn pli universalajn, kapablajn kaj reformemajn. Favoros tion, jam en la daŭro de studoj, formado de inkubatoroj de inventemo, ankaŭ por elimini kulturajn barierojn jam ekde la ekesto de la firmao. Alia grava problemoj ligiĝas kun aliĝo de Pollando al la Eŭropa Unio kaj transformiĝoj en nia lando, kiuj instigis revoluciajn ŝanĝojn en la konceptigo de la ŝtatfunkciado post la jaro 1989. Ĉi-komplekso entenas aron da lernobjektoj kulturpedagogiaj kaj sociologiaj.

Multajn studhorojn oni dediĉos al socia pedagogiko, sfero de edukaj procezoj kaj analizo de kondiĉoj ebligantaj kontentigon de homaj bezonoj dum diversaj etapoj de la vivo kaj diversaj vivsituacioj.

En la Instituto oni entreprenos interesajn problemojn de multkultureco kaj edukado en unuiĝinta Eŭropo, gravajn temojn el la sfero de klerigo kaj kulturo en preskaŭ 500 miliona socia fandujo. Ekestos do la temo por disputoj el la vidpunktoj sociologia kaj kultura, kun ebla rezulto – konscio de efiko de kultura kunlaboro sur la bazo de diversaj formoj de socia komunikado. Resume oni povas diri, ke Internacia Instituto de Interkulturaj Rilatoj celos science-didaktikan agadon:

A.kultur-edukan,

B.kultur-soci-ekonomian kun elementoj de sociologio.

Ni serĉos solvojn de diversaj problemoj, kiuj ekestis antaŭ niaj socioj, same en Pollando, kiel en Rusio. La Pedagogia Universitato en Jaroslav interesiĝas pri kunlaboro en la edukado de fakuloj en diversaj branĉoj de la soci-ekonomia vivo por nuligi la nuntempajn vivdefiojn, al kiuj apartenas sendube informatika revolucio, krizo de moralvaloroj, kaŭzita per rapidaj, revoluciaj ŝanĝoj, ligitaj kun transiro al merkatekonomio. Por tiuj ŝanĝoj en Rusio necesaj estos fakuloj, kiuj povos utiligi niajn, polajn, preskaŭ 20-jarajn spertojn en la sfero de konstruado de nova tipo de ŝtato, plena de pozitivaj kaj negativaj sociaj konsekvencoj.

Por niaj venontaj studentoj multaj problemoj havos la interdisciplinan karakteron, ligitan ĉefe kun la perspektivoj de kunlaboro. Unuflanke ekestos kontaktoj kun laboristoj kaj institucioj de unuiĝinta Eŭropo, aliflanke kreskanta nombro de serĉataj oriente de Pollando specialistoj kaj specialistoj serĉantaj tie laboron en eksterlandaj polaj entreprenoj.

Kreskas turisma movado, do nepra estos interkultura scio.

En antikva epoko oni opiniis, ke „navigare necesse est”. Nuntempe ni celas la moton „trafa kono de kulturaj rilatoj en Eŭropo – garantios sukceson”.

Esperantigis *Adam Lomnicki* (2009)



Bojidar Leonov

(Internacia Universitato, Karlovo, Bulgario)

Bazaj principoj de turismiko, religia kaj ekologia turismo

Dum la lastaj jardekoj grandan rolon en la internaciaj rilatoj okupas la turismo, kiu fariĝis ne nur hobia kaj rimedo por ripozo, sed ankaŭ grava, intense evoluigata branĉo de la ekonomio de ĉiuj landoj.

La turismo okupas gravan lokon en la libera tempo de la homoj, ĉar post la streĉa laboro, dum sia libera tempo ili deziras ripozi, enirante la naturon, vizitante siajn geamikojn, konatojn, diversajn historiajn, kulturajn lokojn, sportas kaj sekve de tio ĉiam estas en kontakto kun la naturo kaj la ĉirkaŭa medio kaj tre ofte kaŭzigas grandan malpurigon de la medio. Tre ofte la celoj de la aktiva ripozo estas ligitaj kun la vizitado de montaj, ekologie puraj regionoj.

En la lastaj jardekoj aperis tute nova scienca branĉo - turismiko, kiu okupiĝas science pri la problemoj de la turismo kiel agado.

Kunlige kun la statistikaj informoj pri la internaciaj veturadoj, nombro de la veturantoj kaj la celo de la veturado, aperis la unuaj difinoj de la nocio "turismo". La difino de "turismo" estis bazo por la aktiva diskuto dum multaj internaciaj, sciencaj kaj turismaj konferencoj de apartaj sciencaj kaj turismaj organizacioj, kiel ekz. de la konferencoj de la Internacia Asocio de la oficialaj turismaj organizacioj: Dublino 1950, Londono 1957, Internacia konferenco pri turismo - Romo 1963, Kongreso de la Internacia Turisma Asocio - Manilo 1986 k.a. Interesa estas la difino, akceptita en la jaro 1992 de la komisiono pri la statistiko ĉe Unuiĝintaj Nacioj - en ĝi la turismo estas difinita kiel vojaĝado kaj restado en la lokoj for de la konstanta loĝloko de la vojaĝanto dum la periodo de ne pli ol 12 monatoj kun la celo ripozi, amuzi, konatiĝi kun kulturaj vidindaĵoj, eventuale kun diversaj profesiaj celoj, sed sen la celo labori kaj akiri monon en la loko de la provizora loĝloko. En la teorio de turismiko ekzistas multaj difinoj de la nocio "turismo" kiel ekzemple:

- Turismo estas speco de ripozo per veturado kaj konsumado de turismaj servoj
- Turismo estas ekonomia agado, direktita al kreado, propono kaj realigo de varoj kaj servoj, kiuj formas la turisman produkton
- Turismo estas veturado kun celo aŭ sencele al lokoj for de la loko de la konstanta loĝloko
- Turismo estas ĉefe piedmarŝado al la naturo por ripozi, kuraci, ofte ligita ankaŭ kun klereca celo
- Turismo estas veturado al la monto, maro, historiaj kaj kulturaj centroj, lande kaj eksterlande kun celo ripozi, kuraci aŭ ricevi novajn konojn pri tiuj lokoj.

La homoj strebas turismi al la montoj, puraj riveroj, maro kaj lokoj, kie ne estas grandaj industriaj entreprenoj, ĉar tie la aero estas freŝa kaj tio estas utila por ilia sano.

Returnante al la historio de la turismo en la mondo, oni povus klasifiki ĝin en kelkaj etapoj :

1-a etapo: ekde antikveco ĝis la 18-a jarcento. Ekzistas multaj historiaj faktoj pri la apero de la unuaj turismaj paŝoj en la antikveco, ligitaj kun la komercaj, ofica k.a. ekskursoj kaj vojaĝoj tra la mondo ĝenerale en Ĉinio, Antikva Greklando, Roma Imperio ktp. Ĝenerale la tiamaj vojaĝoj havis komercan-edukan kaj sportan karakteron. Ekzemple en la unuaj Olimpiaj ludoj dum la jaro 776 antaŭ la nova erao partoprenis pli ol 500 vizitantoj-turistoj kaj nur 30 sportistoj! Dum la antika tempo kaj Renesanco fariĝis mondfamaj maraj vojaĝoj /de Magelano Kolumbo k.a./.

2-a etapo: Dum la 18-a jarcento en Germanio, Francio, Italio aperis la unuaj vojaĝoficejoj, kiuj organizis turismajn vojaĝojn. La unua turisma agentejo estis fondita en la 1841 j. de Thomas Cook. Ekde tiam komenciĝis la organizita turisma agado kun la edukaj, komercaj, kulturaj, amuzaj k.a. celoj.

3-a etapo post la 2-a mondmilito ĝis la 1980 j.: La turismo jam fariĝis ne nur hobia kaj rimedo por ripozo, sed kreiĝis la tuta turisma industrio - amaso da agentejoj en la mondo organizadis la turismajn vojaĝojn. Eŭropo fariĝis la centro de la internacia turismo.

4-a etapo post la 1980 j. ligita kun la globaligado de la monda ekonomio. Ekde tiam fondiĝas en diversaj landoj organizacioj okupiĝantaj pri la turisma agado.

La nuntempa turismo estas kompleksa soci-ekonomika kaj kultura fenomeno kun multflanka signifo. Tiun signifon oni povus grupigi en kelkaj direktoj:

- Signifo por la sano: Amaso de turistoj tutmonde turismas kun la celo zorgi pri sia sano aŭ resaniĝi. Tio ne estas hazarda fakto por la evoluo de la bankuraca turismo en la regionoj riĉaj je fontoj de minerala akvo, utila por la kuracado de diversaj malsanoj. Gravan rolon por la resaniĝo ludas la sporta kaj piedmarŝa turismo.
- Ekonomika signifo: Multaj regionoj en la mondo fariĝis ekonomie fortaj pro la evoluo de tiuj turismaj regionoj.
- Eduka signifo: Pere de la turismo, nacia kaj internacia, la homo pliriĉigas sian kulturon.
- Sociala signifo: La evoluo de la turismo en diversaj turismaj regionoj kontribuas al la plibonigo de la sociala stato de la loĝantoj en ĉi tiuj regionoj. Ili laboras en diversaj turismaj firmaoj, donante siajn domojn por la loĝigo de turistoj. Surbaze de la informoj de la Monda Turisma Asocio en Aŭstarlio, Kanado, Usono, Francio, Germanio, Italio, Japanio k.a. landoj, la loĝantaro, kiu profesie okupiĝas pri la turismo, estas tro multnombra, kompare kun la aliaj profesioj.

Surbaze de la diversaj kriterioj oni povus klasifiki la turismon jene:

- Landoj, kie oni turismas: enlanda, internacia turismo
- Nombro de turistoj: grupa, familia, individual turismo
- Uzataj veturiloj: pieda, bicikla, ĉevala, aŭtomobila, busa, vagonara, ŝipa, aviadila turismo
- Celoj: komerca, sporta, ofica, amuza, ripoza, kongresa, eduka, kultura, religia, ĉasista, ekologia, resaniga, bankuraca turismo
- Loko: montara, mara, rivera, grota, vilaĝa turismo.

Ĉefaj kriterioj, kiuj karakterizas ĉiujn landojn turismike, estas: situo, kategorio de turismo, litoj, membroj de enlandaj kaj eksterlandaj turistoj, elspezoj por la turisma agado, enspezoj de la turisma agado, celo de la turismo, preferindaj landoj por eksterlanda turismo, turismaj regionoj.

Surbaze de la globaligado de la monda ekonomio, nuntempe en la mondo aperis diversaj turismaj regionoj. Surbaze de la statistiko videblas, ke la militoj, terorismo kaj kataklismoj, kiuj okazas en diversaj partoj de la mondo, malbone influas la evoluon de turismo en la koncernaj regionoj. En la statistiko ankaŭ videblas, ke la grava turisma regiono en la mondo estas Eŭropo. Analizante la statistikajn informojn oni povus konkludi, ke la celo de la turistoj en Eŭropo estas la okcidenta kaj suda regionoj. Tie estas koncentritaj ĉirkaŭ 90% de la turismaj veturadoj kaj 70% de la enspezoj. Plej multaj veturantoj estas al Francio, Hispanio, Italio. La enspezoj same estas la plej multaj en tiuj landoj. Analizante la informojn, oni povus konkludi pri la balanco de la turisma agado en diversaj eŭropaj landoj. La plej profitaj dum la lastaj jaroj denove estas la triopo de turisme evoluitaj landoj: Francio, Hispanio, Italio.

Gravan rolon por la evoluo de la turismo dum la lasta jardeko ludis la konstruado de multaj modernaj hoteloj kaj disponado de pli kaj pli da litoj por la organizitaj kaj individuaj turistoj. Ankaŭ gravan rolon por la evoluo de la turismo kaj la turisma merkato ludas la ĉiujaraj internaciaj turismaj foiroj, organizitaj en diversaj landoj.

En la historio de la monda civilizacio la religio ludis gravan rolon por la evoluo de la kulturo de la popoloj. La monakejoj, preĝejoj kaj aliaj objektoj de la religia pilgrimo al sanktaj lokoj ligitaj kun la diversaj religioj en la mondo estiĝis monumentoj de la arkitekturo, kulturo de diversaj popoloj, kunlige kun ilia religia aparteneco. En la mondo ekzistas 6 gravaj religioj: kristana religio, islamo, hinduismo, budismo, judaismo kaj sikhismo. La pilgrimo en la pasinteco kaj nun ludis gravan rolon por la evoluo de la religia turismo. Bazaj principoj de tiu speco de la turismo estas konatiĝi kun la religiaj objektoj, ligitaj kun la evoluo de la apartaj religioj. Bazaj internaciaj objektoj de la religia turismo estas

Jerosalimo, Vatikano, Atona duonisulo en Greklando, Istambulo, Mekka, budismaj centroj en Japanio, Ĉinio, Hindio k.a. Nun registaroj de diversaj ŝtatoj turnas sian atenton al la evoluo de religia turismo en siaj landoj.

La problemoj ligitaj kun la influo de la turismo al la malpurigo de la naturo estiĝis unu el la ĉefaj direktoj en la agado de multe da scienculoj, fakuloj, internaciaj turismaj organizacioj kaj la registaroj en multaj landoj. La problemoj tiel akriĝis kaj la scienculoj konstatis, ke se ne ĉesiĝos tiu proceso de malbona influo al la naturo kaj ĉirkaŭa medio, por la homaro estos danĝero de tiel nomata "mortigo pere de la turismo". La problemoj ligitaj kun la influo de la turismo al la naturo estiĝis ĉefa temo de la diskutado kaj observado en diversaj gravaj internaciaj forumoj. Ĉefa temo de la 21-a Kongreso de la Internacia asocio de la turismaj ekspertoj okazinta en la 1971 j. en Puerto /Hispanio/ estis la problemoj ligitaj kun la rilatoj turismo - medioprotektado. Ĉefa celo de la okazinta en la 1974 j. en Londono Internacia konferenco "La turismo kaj la medioprotektado" estis helpi al la turismaj fakuloj tiel, ke ilia agado estu en la direkto de medioprotektado. Post tio preskaŭ ĉiujare estis organizitaj internaciaj forumoj kaj sekve de tio faris la unuajn paŝojn la nova branĉo en la turismo - la ekologia turismo. La ĉefa principo de tiu faka turismo estas: "turismu, sed ne malpurigu la ĉirkaŭan medion!" - tre konciza, mallonge dirita, sed plena de senco principo.

En la teorio de la turismiko ekzistas kelkaj difinoj de la ekologia turismo, kiel ekzemple :

- "La ekoturismo estas turismo en regionoj, kie la homoj gardas la purecon de la naturo kaj devas kontribui por la konservado de la naturo kaj por la garantigo de ekologiipuraj vivkondiĉoj de la loka loĝantaro."
- "La ekologia turismo estas turismo en la naturo, kie la turistoj serĉas la fenomenojn de la mondo kaj diversajn naturmiraklojn, konatiĝas kun lokoj gravaj por la tutmonda historio kaj kulturo"
- "La ekologia turismo estas memstara speco de la turismo en la protektataj naturteritorioj"
- "La ekologia turismo estas tiu, kiam la turistoj ligas siajn interesojn por amuzo kaj ripozo kun la ekologiaj interesoj por protekto de la naturo kaj klereco por la naturo en la protektaj teritorioj".

Bazaj principoj de tiu turismo, kiuj estiĝis parte ankaŭ kiel regularo por ĉiu organizita kaj klera turisto estas :

- La homoj strebas turismi al la montoj kaj protektaj teritorioj, ĉar tie estas freŝa aero kaj estas utila por ilia sano
- Turismante al la montoj, riveroj, maro, ne forgesu la gravan principon - gardu la naturon, ne malpurigu, ĵetu la rubaĵojn en la specialajn lokojn
- Ne lasu senzorge fajron, ĉar oni povas kaŭzigi brulegon en la arbaro
- Limigu la veturadon al la naturo per aŭtoj, kiuj kaŭzigas malpurecon de la aero, konstruon de novaj vojoj en la montarregionoj, sekve de tio estas likvido de arbaroj. Vi povus veturi bicikle aŭ uzante azenojn, ĉevalojn
- Turismu kun la celo - edukado al lokoj ligitaj kun la historio kaj kulturo de diversaj popoloj
- Vizitu diversajn rezervejojn kaj protektajn teritoriojn
- Limigu la ĉasistan turismon nur al la lokoj por tio destinitaj en koncernaj landoj, tiamaniere estos protektotaj diversaj birdoj kaj aliaj bestoj
- Turismante al la monto ne likvidu la malofte renkontatan kaj protektatan de la leĝoj plantaron.

Ekde la pasinteco oni parolas pri la jura defendo de la natur- kaj medio-protektado. Tiu agado havas longjaran historion, ligitan kun la multjara historio de la homaro. Ekde la antikveco ekzistis regularoj kaj leĝoj de apartaj landoj, ligitaj kun la problemoj de la natur- kaj medio-protektado.

En la mondo nun ekzistas pli ol 40000 protektaj teritorioj kaj la fakuloj klasifikas ilin surbaze de jenaj ĉefaj kategorioj:

- Kompleksaj rezervejoj - tio estas teritorioj kun absoluta protektado. Tie entute estas malpermesita la influo de la homo al la naturo. La eniro en tiuj rezervejoj estas permesata por esploraj, sciencaj ekspedicioj.

- Naciaj parkoj - al ili apartenas granda teritorio kaj la celo estas protektado de la naturo, ligita kun la naturprotektata ekologia klerco kaj ili estas ĉefaj objektoj por la ekologia turismo. Baza principo de la naturprotektado en tiuj parkoj estas surbaze de la internacia Konvencio akceptita en la 1933 j. en Londono.
- Profilaj rezervejoj - en ili estas protektataj nur apartaj specoj de la plantaro kaj faŭno. La homagado tie estas permesita nur tiam, kiam ne malhelpas al la celoj ligitaj kun la protekto de tiu plantaro kaj faŭno.
- Specialaj rezervejoj - ili estas kreitaj kun speciala protekto de certaj elementoj de la biologia komplekso. Tiaj ekzemple estas la rezervejoj por la ĉasado kaj fiŝkaptado.

Dum la lastaj jaroj la problemoj ligitaj kun la naturprotektado estiĝis grava faktoro ne nur en la enlanda, sed ankaŭ en la eksterlanda politiko de multe da landoj en la mondo. La nuna ekologia situacio en la mondo karakteriziĝas per dinamika evoluo de diversaj vivkondiĉoj, kiuj influas ne nur al apartaj landoj, sed havas grandan internacian karakteron. La internacia kunlaboro inter la diversaj landoj tutmonde havas gravan rolon por solvo de diversaj ekologiaj problemoj, kiuj rilatas ne nur al apartaj landoj, sed al grandaj regionoj tutmonde. La historio de tiu kunlaboro, surbaze de kiu estis kreitaj diversaj leĝoj, kontraktoj inter la apartaj landoj, devenas ankoraŭ de la 19-a jarcento.

Ekzistas multe da Internaciaj konvencioj kaj kontraktoj inter apartaj ŝtatoj ligitaj kun la natur-kaj medioprotektado. Surbaze de tiuj internaciaj Konvencioj ĉiuj ŝtatoj, kiuj subskribas kaj aliĝas al ili kreas siajn ŝtatajn leĝojn por natur - kaj medioprotektado kaj tiamaniere prezentas sian nacian politikon kaj rilaton al tiu grava ekologia problemo de la homaro, surbaze de la lokaj kondiĉoj en la apartaj landoj.

La registraro en Bulgario dum la lastaj jardekoj havas pozitivan rilaton al la natur - kaj medio protektato aligante la landon al ĉiuj gravaj konvencioj. En Bulgario nun estas ĉirkaŭ 500 objektoj de la ekologia, kultura kaj religia turismo, situataj en diversaj partoj de la lando kaj protektataj leĝe de la ŝtataj institucioj. Famaj objektoj de religia turismo estas: Rila monakejo, Baĉkova monakejo, Trojana monakejo k.a. La plej famaj celoj de la ekologia turismo estas: rezervejoj "Srebarna", "Kamĉia", naciaj parkoj Vitoŝa, Centra Balkano k.a. Pli granda parto de tiuj naciaj parkoj, rezervejoj kaj objektoj de la ekologia, religia kaj kultura turismo estas en regionoj, kiuj ne estas industri - evoluitaj kaj la loĝantaro en tiuj regionoj estas malriĉa, kompare kun la loĝantaro en la evoluitaj regionoj. Havante antaŭvide la ekonomian kaj socialan signifon de la turismo, la gvidantoj de ĉiuj regionoj en Bulgario strebas evoluigi la ekologian turismon en siaj regionoj, fondante parkojn kaj aliajn protektajn teritoriojn.

Literaturo

1. Leonov, B. (2002), Ekologio kaj turismo, Aktoj de Internacia Universitato Karlovo, Karlovo
2. Leonov, B. (2002), Juraj aspektoj de ekologio, KAEST Praha
3. Leonov, B. (2004), Evoluo de la internacia kaj ekologia turismo en Eŭropo, KAEST Praha
4. Leonov, B. (2005), Enkonduko en la turismiko Karlovo
5. Leonov, B. (2005), Bazaj principoj de la ekologia turismo Karlovo
6. Leonov, B. (2006), Religio kaj turismo- Karlovo
7. Leonov, B. (2007), La rolo de la ekologia scienco en la moderna mondo. B. Luka
8. Leonov, B. (2007), Juraj aspektoj de ekologia turismo - Internacia konferenco Sibiu
9. Marinov, Hr. (1984), Diferenco de la nuntempa ekologio, Ekofuturo Sofio
10. World Tourism Organisation 2002
11. Леонов, Б. (2001), Основи на екологията МУ-Карлово
12. Леонов, Б. (2001), Екология и право МУ Карлово
13. Леонов, Б. (2001), Екологичен туризъм МУ Карлово
14. Леонов, Б. (2005), Правна защита на резерватите и националните паркове МУ-Карлово
15. Леонов, Б. (2004), Международен екологичен туризъм. Състояние и перспективи за развитие МУ- Карлово

16. Соколов, Леонов, Б. (2000), Теория и практика решения природоохранных задач
Тула
17. Жечев, В. (1999), Туристическо природоползване и екологичен туризъм С
18. Сборник със закони и нормативни актове за опазване на околната среда - София 1998
19. Бжезински, В. (1979), Правовая охрана окружающей среды Москва
20. Екологизация на общественото производство - Свищов 1981
21. Бъчваров, М. (1996), Основи на туризма София
22. Костов, Е. (1992), Туризм и природна среда София
23. Роналд, Ф. (1981), Основы прикладной экологии Л
24. Монтексано, М. (1997), Структура туристического рынка М
25. Великов, В. (2002), Международен туризъм ВТ



Alicja Lewanderska-Quednaŭ

(Akademio Internacia de la Sciencoj, San Marino)

Perspektivoj kaj ŝancoj de estonta lernado

Enkonduko

En nuntempa instruado oni aplikas multflankajn metodojn. Kaŭzas tion rapideco de teknikaj ŝanĝoj kaj manko de tempo. Influo de amasmediaj rimedoj, al kiuj pli multaj homoj al kutimiĝas, influas al simpla vivo kaj instruado. La ĉefa celo estas nun modernigo de la instruado per uzado de diversaj specoj de novaj, modernaj instrumentoj – interalie de aŭdvidaj metodoj.

Antaŭ iom da tempo oni favore rekomendis la pertelevidan instruadon. Danke al la pola televido oni konstruis lecionojn por instruistoj, studentoj kaj lernantoj, kiuj studis ekstere kaj tiamaniere ricevis en televido paŝon post paŝo la bezonatajn partojn por finstudado kaj ekzameno. Ili ofte loĝis malproksime kaj ne povis surloke partopreni lecionojn. Nun en Pollando tio malaperis, kaj tre forta iam metodika centro ĉe la Silezia Politekniko en Gliwice estas preskaŭ likvidita, same la ununura Filma Altlernejo kaj Studenta Radiostacio. En la ŝtata TV, kiel pertelevida instruado, restis nun la t.n. Infanĝardenaj renkontiĝoj, sed la metodika utileco kaj pedagogiaj valoroj malaperis.

Nuna agado kaj distanca studadperspektivo

Malaperis pluraj edukcentroj, sed restis problemoj kaj neceso ilin solvi.

Ekzistas junuloj, kiuj loĝas en malgranda setlejo, malproksime de superaj lernejoj.

Ĉu por ili estas neniŭ ŝanco?

Ĉu aperis nova diskriminacio?

Ĉu oni dispartigos homojn al grupoj A kaj B?

Kia estas ŝanco por ili akiri altlernejan diplomon?

La tiel nomata elektronika lernado (*E-learning*), estis kreita ĝuste kun penso pri ili. La sistemon povas utiligi aktivaj kaj laborokupaj homoj, sed ankaŭ tiuj, kiuj jam studas, aŭ finstudis, sed tamen ankoraŭ volas altigi siajn kvalitojn kaj elektas duan fakultaton. Laŭ opinio de multaj metodikistoj *E-learning* (ofte oni nomas ĝin virtuala studado) ligas novajn teknologiojn kun tradiciaj formoj de studado.

Por komenci studi laŭ tiu ĉi tekniko, studento bezonas havi komputilon kun eniro al reto aŭ eblon uzi ĝin en iu loko. Por la studentoj kaj lernejoj el Gliwice, servas tion senpage la aŭditoria loko en la Instituto pri Automatiko kaj Robotiko en la Silezia Politekniko, ĉu en kunlaborantaj kun ili popol- kaj mezlernejoj, kie oni havas ĉu informatikan fakultaton ĉu ĉambron.

Virtuala studado (kio estas ĝi)

Mi jam klarigis, ke devas esti komputilo (minimуме 28-B). La ĉefa afero estas interaktiva kontakto kun lekciisto per certigaj okupoj on-line. En Pollando en la *E-learning* sistemo, oni povas studi interalie en la Silezia Politekniko, privata altlernejo pri marketingo en Katowice, Rybnik, Kraków, Białystok, en la Universitato de Maria Curie-Skłodowska, en la Orienta Universitato en Warszawa, aŭ en la Supera Human-Ekonomia Lernejo en Łódź.

Komencante aŭ decidante studi oni devas registri sin kaj ricevi la t.n. studplano (syllabus), en kiu troviĝas la bazaj, necesaj informoj, kiujn oni bezonas frue legi. Tio estas la enkonduka tasko kaj prepara neceso. Post tio sekvas eblo de aktiva partoprenado en la duka kaj instrua procezoj.

La lernprocezo aspektas poste jene: oni devas komence de la okupoj ligiĝi per interreto kun lernplatformo, ĉar la lernado estas absolute individua kaj la progres-rapidecon, regulas la studento mem.

Por tio oni bezonas CD-diskon kaj personan signalvorton. La personan signalvorton ricevas ĉiu studento aparte kiam oni anoncas sin por studado kaj registras sin.

Agadprocezo

Sur la disko estas elementoj de la sistemo *E-learning*, kiuj ebligas al studentoj partoprenon en okupoj, kiuj estas trassendataj de la instruisto per la interreta kanalo. Krome ĉiuj ricevas ankaŭ mult-median lernolibron. Havante la mult-median lernolibron, la studento povas partopreni kaj komenci lernadon sen bezono ligiĝi kun interreto.

Kutime oni aplikas du formojn de la eduk-lernada sistemo, rektajn kaj ripetadajn. Rektaj estas krome nomataj „je vive” (real-tempaj) okazanta en la indikita tempo, cerigantaj kontaktojn kun lekciisto kaj aliaj studentoj. Inverse dum la ripetado oni povas labori sole laŭ propra tempo, sen rekta kontakto kun instruisto kaj alia grupo. Tio iomete similas (kaj eĉ pluraj instruistoj, reale aplikas tre utilajn teknikojn) al la antaŭa „programita instruado”.

Okupojn „je vive” oni kutime faras je simila skemo. Studentoj laboras aparte en kelkaj grupoj, devas prezenti aŭ partopreni en la lernado praktike, do ili partoprenas en multimedia prezentado, kiu utiligas ekz. tridimensiajn animaciojn, filmojn, simulaciojn kaj interaktivajn ekzercojn. Kutime ĉiuj tiaj okupoj daŭras du horojn. Tiujn du horojn oni dividas je du partoj: seminario-praktika kaj destinita por propra laboro.

Dum prezentado de la temo, lekciisto donas al partoprenantoj mallongajn testajn demandojn, por kontrolcelo kaj post la fino de la leciono, li transdonas al ili konkretajn taskojn kaj studentoj devas trovi solvon, ĝi estas la vera ĝusta respondeco.

Sekvas la dua parto, dum kiu utiligata estas komputila interparolado (*chat*). Dum tiu parto la informon aŭ respondon de konkretaj, sinsekvaj studentoj en dialogfenestro vidas kaj povas legi en reala tempo ĉiuj aliaj studentoj kaj la instruisto.

Alia formo de okupoj estas *E-learning* konsultoj. Konkretaj studentoj individue aŭ grupe povas starigi demandojn kaj sendi ilin al la lekciisto. Ĝis 48 horoj - per reto- venas respondo aŭ helpsolvado de konkreta, neklara problemo aŭ komplika demando.

Ĉiu studento kaj grupo havas prizorganton, kiu devas helpi al li studi. Tiu tipa studado bedaŭrinde libera je tempo, tamen ne estas facila, ĉar ĝi devigas la homojn al granda memdisciplino kaj regula laborado; specialistoj konsilas dediĉi por tio ĉiutage po du horojn, kaj krome esti aktiva kaj eniri en diskutformoj kaj engaĝi sin en realigado de taskoj kaj projektoj kaj uzado de helpmaterialoj, kiujn oni ricevas en formo de materialoj multimediaj.

La finkontrolon kaj ekzamenojn oni necese faras tradicie antaŭ lekciistoj. Kutime ekzamenoj okazas skribe (tio ne estas kutima en la pola eduksistemo). Oni opinias, ke almenaŭ kelkfoje dum la studadperiodo devas okazi la persona, rekta kontakto: instruisto-lernanto.

Perspektivo

Do, la nuna studado kun apliko de *E-learning*, devas tamen baziĝi sur la efikaj elementoj de ĝisnuna kaj tradiciaj sistemoj en la metodiko. Oni devas memori, ke ĉefa principo de la moderna metodiko de instruado estas principo de ĉiuflankeco. Esplorobjektoj kaj eksperimentoj estas antaŭ ĉio la procezo de instruado mem kaj ĝiaj bazaj ĉeneroj. Oni ne forgesu, ke instruado estas kunigita kun edukado. Do, strebante al aplikado de tekniko:

- ne forgesu pri la homo,
- memoru pri la grava rolo de instruisto,
- ne disrompu la longdaŭran tradicion,
- ne disrompu la ligan inter lernanto kaj instruisto,
- memoru pri la grava rolo de la personeco de la instruisto.

Literaturo

Dawid, J. (1946): O duszy nauczyciela. Warszawa

Szyszkowski, W. (1959): Metodyka i metodycy. Kraków.

Kruszewski, W. (1970): Kształcenie w szkole wyższej. Warszawa.

Krejcy-Lewanderska, A. (1978): Elementy dydaktyki i wychowania. COM. Gliwice.

Krejcy-Lewanderska, A. (1972): Teorio de didaktikaj ludoj kaj uzado de ili por studado en humanistikaj kaj teknikistaj universitatoj. Pola Esperantisto.

Krejcy-Lewanderska, A. (1975): Przewodnik metodyczny do zajęć z socjologii, politologii dla studentów szkół wyższych i pomaturalnych. Gliwice, Katowice, Warszawa

Wegrzyn, S. (1970): Informatyka czasu rzeczywistego. Gliwice-Paryż-Montreal.



Lidia Ligeza

(Universitato Adam Mickiewicz, Poznań, Pollando)

Julia Pióra – La mondo en meditado

La baza tasko de historiisto estas memori. Similan taskon havas historiisto de literaturo. Mi deziras rememorigi la verkan silueton de Julia Pióra, tre interesa, pola poetino kaj novelistino. Ŝi naskiĝis en la jaro 1902; esperantistiĝis en 1956. Ŝiaj verkoj aperadis en dek signifaj Esperanto-revuoj, kiel ekz. “Norda Prismo”, “Fonto”, “Monato”, “Pola Esperantisto”.

Pro la diversaj krizaj situacioj dum sepdekaj kaj okdekaj jaroj de la 20-a jarcento oni ne sukcesis eldoni libroforme ŝian abundan akiraĵon. Feliĉe kaj konsekvence prizorgis tion ŝia filo Jan Pióra, kiu sukcesis almenaŭ multobligi laŭ la plej simpla, hejma maniero novelojn kaj poemojn en ok esperantlingvaj, tri pollingvaj kaj unu germanlingva volumoj. Tiuj libroj sub la komuna titolo “La mondo en meditado” troviĝas en biblioteko de Hodler, ĉe UEA, en Roterdamo. Kiel oficialaj eldonaĵoj aperis novelaro *El tero kaj etero* (1964), novelaro *Hieroglifo* (1974) kaj noveloj kaj poemoj *Fenestro kristala* (1981). Planitaj estis ankoraŭ du volumoj: *Malnova legendo* kaj *Ora abelo*.

Pri la tuta vivo de Julia Pióra mi ne multe scias. En sepdekaj kaj okdekaj jaroj ĝis la morto en 1988 jaro ŝi loĝis kun la filo en Piastów apud Varsovio, kie antaŭ la 1980 jaro mi dufoje ilin vizitis, ĉar tiam ni esperis eldoni ion ajn. Tio finfine okazis, sed ne en Pollando. Lina Gabrielli, la itala poetino kaj eldonistino aperigis en Ascoli Piceno en la j.1981 volumon “Fenestro kristala”. Menciinda estas, krom la enhavo, favora antaŭparolo de Lina, kiu kiel poetino ekkomprenis profunde sian verkantan klientinon kaj ankaŭ la kovrilo – foto de Jan montranta formitan inter branĉaro de la fotita aleo “fenestron”, trans kiu kristala surfaco ŝvebis penso de lia eksterordinara patrino.

De tiuj du vizitoj mi memoras etan, maljunan jam virinon, kvietan, koncentritan, malbabileman, montrantan ne nur per la verko, sed ankaŭ per la konduto, ke pli gravas la ena mondo, ne tiu ĝene nin ĉirkaŭanta, kaj ke ne nepre oni ĝin devas malkovri ĉiam kaj antaŭ ĉiu.

Julia Pióra, klera humanistino, interesiĝis ĉefe pri religioj. Spuroj de tiu plaĉo ni povas observi en preskaŭ ĉiuj ŝiaj verkoj. Surfone de la profunda kaj larĝa scio pri religioj, de antikveco ĝis nuntempo, estis konstruata pens-mondo de la aŭtorino, kiu senĉese meditas pri la homa vivo kaj sorto, komparante kaj eĉ kolizianta mondkonceptojn devenantajn de la religia diverseco. Enkadre de budhismo ŝi la plej favore traktas jogon de fajro (agni-joga). Fajro kaj brilo regas en multaj ŝiaj poemoj, kiuj emanis per multkolora kaj deversforta lumo.

“Sur la spegul-asfaltoj
kruciĝas spadoj de neonoj –
jen aleo de lumoj“
(Vespero en la urbo)
„inter sunradioj saltas ĝojo
en lukso brila kaj belega“
(La somero)
„Lumo de flagretantaj fulmoj
kiu iluminas miraĝon“
(La vundo ne povas cikatriĝi)
„kiam ekbrilos lumoj de urboj
lume estos en via domo...“
(La domo)

La mitologia temo de la verko estas facile rekonebla, sed neniam realigata laŭ principoj, al kiuj ni al kutimiĝis. Ĝi servas por rimarki alian flankon kaj aspekton de la situacio, ŝanĝante la simplan, laŭvican aludon al antikveco, kiun jam proponis multaj literaturistoj en bildon de imagoj kaj pripensoj de la aŭtorino, kiu scipovas ĉiam senbanaligi niajn pensmanierajn stereotipojn.

Ĥarono de poemo de Julia Pióro nur supraĵe troviĝas en situacio konata de greka mitologio. Li gvidas mortinton al la alia bordo de rivero Stikso, sed en brulego de la granda milito perdas sencon la konvinkoj pri la digna morto kaj reliefigas kruela sorto de la individuo, kiu strebas elekti la ĝustan, fiksitan de gentoj vojon, sed ĉi elekto estas forte limigita:

„Mi gvidas vin
al renkonto kun la morto ...
vi rifuzas? ... ĉio paliĝas
antaŭ tiuj rondoj de dancanta lumo,
antaŭ tiu fajro interregna,
kie flamas tero, ĉielo, kaj steloj
en la komuna brulego ...
sed vi rifuzas ...
blinde vagas Ĥarono
inter lumaj kaskadoj,
ne povante distingi mortintojn ...
la boato fluas malplena
sur ondpoĵoj de venkita Stikso ...
sed vi rifuzas ...
vi volas stari
kun frunto apogita
je ne transirebla muro
kaj atendi ...
ĝis kiam brutala mano
frakasos vian vizaĝon“
(Blinda Ĥoraro)

Temoj de noveloj ofte estis elĉerpitaj el diversaj antikvaj kulturoj. Neniam temas en ili pri la okulfrapa rakonto kaj detaloj konataj de enciklopedio. Surfone de la profunda kaj larĝa scio pri religioj de antikveco ĝis nuntempo, pri moroj de homoj konfesantaj deversajn religiojn la aŭtorino kondukas nin tra komplikita eno de la homa animo, ties valoroj kaj elektoj. La plej interesaj aferoj okazadas ĉe la limzono de nacioj, religioj, situacioj ... Do ekz. dialogas reprezentantino de la romia okupacianto kun filo de la konkerita egipta nacio en novelo *Diino en embarasoj*:

„- Tia estas la sorto de la okupantoj, ke ili devas timi antaŭ la subpremitaj popoloj! Bona leciono de la historio kaj ankaŭ konsilo ...

- Klaŭdio meritas la galerojn. Kiel li aŭdacas kritiki la suverenojn de Egiptujo? [...] en ĉeesto de la edzino de la perfekto!”

En novelo *La timo* juna kristanino novbaptita de misiistoj provas orienti sin en principoj de la propra pagana, antaŭ nelonge forĵetita religio, religio de la famaj, sur la najbara insulo loĝantaj Kahunoj kaj instruoj de la kristanaj misiistoj. La serĉado de la vero ne estas simpla.

Celestina, antaŭnelonge Sanso-Ponso, ĉar ŝi tiel nomiĝis antaŭ la bapto, demandas la patron apartenantan al Kunveno de la Maljunuloj:

- Ĉu necesas ke ĉiuj timu vin? – ricevas la respondon: - La homoj devas esti obeemaj al la leĝoj kaj fino! – Se ĉiuj estos obeemaj, ĉu ili fariĝas feliĉaj? – Ne por la feliĉo estas la leĝo.”

„Timo kaj oboe ... Kio estas pli granda? Ĉu la oboe tiras post si la timon, ĉu la timo tiras post si la obeon? Kiel strange estas organizita la mondo” – meditas la knabino.

La vilaĝa ŝamano kontribuas al tiu meditado dirante “Ĉiuj min estimas kaj ŝatas, ĉar mi per magia bastoneto haltigas fore la malbonajn spiritojn. Mi nenion alian faras ol agas laŭ ilia naturo. Nur vi kontraŭstaras ne tremante ... “

Dum interparolo kun misiisto, patro Jozefo Celestina riproĉas al li nekonsekvencon de la nova religio – “Kial vi ĉiam pentris bildojn pri infero” Kial la bona kaj amata Patro Ĉiela ĵetas la pekulojn en inferan fajron? Vi ĉiuj amas la timon [...]. Vi gvidas homojn al senĉesa timemo, al la tremado antaŭ ĉiu superulo, vi ne estas amikoj por la homo, vi estas malamikecaj!”

Admonita severe de patro Jozefo Celestina provas tamen atentigi lin, ke la gento de Kahunoj vivas konkorde kun la naturo, scipovas mobilizi fortojn de la spirito kaj per forta energio nutras sian Grandan Mion aŭ Veran Lumon similan al la Spirito Sankta, kaj kvankam ne parolas pri la Ĉiela Patro vivas noble kaj al neniuj faras maljustaĵojn.

“Ili estas sentimaj, banas sin en feliĉo kaj ĝojo, ili estas gajaj, senzorgaj, ili ne konas la inferon. Niaj homoj ĉiam, senĉese ion timas! Timas, kiam mia patro parolas al ili en ŝelo de leono, timas kiam nia sorĉisto faras magiaĵojn, timas ankaŭ en preĝejo, kiam vi rakontas pri la infero ... La mondo estas stranga. Kiu povus diri, ke ĝin komprenas?”

Poezio de Julia Pióra abundas je galerio de fantaziaj figuroj formantaj propran mitologion de la aŭtorino. Do sur paĝoj de la poemoj kaj noveloj ni renkontas Anoniman Princinon de la nokto, Feinon sur ora tapiŝo, Majan Patrino, Fratinon Spacon, La bluan drakon, Florantan Branĉon de Sentempo...

Multaj versaĵoj transportas nin en kosmon sentatan kiel fonto de ĉio, kio rilatas al la homo:

„Kosmo – fajrujo
de kreantaj energioj –
kanto de senfina Amo
esprimo de Volo
bazo de la Vivo
Kosmo – nia Patro kaj Patrino”
(Defendo de kosmo: vol. FUGO)

„Grandegulo – Kosmo
trafluganta super nia planedo
kun bruego!
kiu nin nutras kaj ŝirmas
kaj ni vin ne komprenas”
(Kosma poezio: vol. FUGO)

„Inter dancrondoj de steloj
sub ŝirmo de magnetosfero
ni iras al sia destino
flagretas vojo en stellumo –
foraj mondoj
en kronoj de fajraj erupcioj
balanciĝas sur ondoj kosmaj ...”
[Vojoj lumaj ; vol. La magneto]

Ĉarmaj kaj trafaj estas metaforoj uzataj ŝpareme, do kun la pli forta efiko:

„... velura kato – nokto
tuŝis la fenestron
trinkis el nevidebla pota
fridan lakton
(Kolora nokto)
... la domo kaŭras en malhelo

... kiel kribriĝas tempo en manoj de Vanteco!
... luno, bona kuracisto
alvenas por sanigi vundojn,
... Sur sojlo meditas aŭtuno kun manoj interplektitaj ...”

Valoras pli profunden eniri en la poezian mondon de Julia Pióra, netipe observi kun ŝi jarsezonojn, momentojn de la tago, aŭ nokto, en urbo aŭ sur pli vasta spaco. Ŝia verko ne nur per Esperanto apelacias al la ĝeneralhomaj valoroj. Ĝi tion faras ankaŭ pro alkondukado al sia intima mondo de la sentoj kaj travivaĵoj – la plej valorajn filozofiajn kaj etikajn principojn de Oriento kaj Okcidento.

Kaj finfine la ora penso de Julia Pióra, kiu povas akompani ankaŭ al niaj agoj:

„Demetu kovrilon de via koro! Alvenas la inspiro.”



Adam Łomnicki

(Pedagogia Universitato, Kraków, Pollando)

Diversaj formoj de aktivigado de lernantoj dum esperanto-lecionoj

1. Teorio kaj praktiko. Sciencaj esploroj

Por la sukceso en la eduka procezo estas nepra, inter alie, aktiveco de la lernanto, nepra ĉiam, sendepende de la lernobjekto kaj de la tipo de lernejo aŭ aĝo de la lernanto. Spontanean aktivecon oni notas en la unuaj klasoj de fundamentaj lernejoj. Kio do okazas, ke kun la daŭro de la lernado, kun kresko de aĝo de lernantoj, tiu aktiveco malgrandiĝas? Ĉu eble ni, instruistoj, faras erarojn, tro obeante ĝeneralajn principojn de la edukado, principojn science ekzamenatajn de multaj jaroj, sed en specialaj kondiĉoj, kiuj ne permesas – laŭ mia opinio – tiom grandan ĝeneraligon. La rezultoj de la scienca esploro bazita sur eksperimento tre forte dependas eĉ mem de tio, ke ĉiu persono ligita kun tiu eksperimento tro emas ion pruvi, aŭ tro helpas al tiu pruvo. Kompreneble sperta pedagogo-sciencisto, didaktikisto, ne permesas al si starigi fortajn konkludojn. Tuj mi devas substreki, ke mi ne neigas bezonon de scienca observado de diversaj elementoj de la eduka procezo. Tiu observado de E-lecionoj povus esti fonto de sciencaj disertacioj, vojo por akiri sciencajn titolojn en pedagogiaj fakoj i.a. en altlernejoj.

Praktikan, grandan valoron, ankaŭ scienca, oni trovas en disertacioj, kiuj enhavus didaktikan proponon de iu koncepto ekz. de lernolibro aŭ ties fragmento, kun klarigoj de inventita vojo, la antaŭvidataj konsekvencoj, dependoj. Ni E-instruistoj estu kuraĝaj kaj malavaraj, skribante pri propraj spertoj kaj ekzemploj de „bona praktiko” (vidu [6], paĝo 9).

2. Kial ni ĝeneraligas?

Kial ni uzas la saman E-lernolibron por kursanoj-plenaĝuloj kaj por junularo en mezlernejoj aŭ eĉ en fundamentaj lernejoj? Simpla respondo – ĉar ni ne havas alian. Tiu situacio dum lastaj jaroj ŝajnas fariĝi ankoraŭ pli malbona.

Evidente oni ne povas aktivigi malgrandan infanon same kiel plenaĝulon. Alimaniere ni instruu plenaĝulon, kiu deziras ofte vojaĝi eksterlanden kaj flue paroli, alimaniere tiun, kiu deziras legi librojn en E, aŭ tiun, kiu deziras fariĝi tradukisto.

Ne estas facile troveblaj, aŭ ne estas eldonitaj (skribitaj) lernolibroj tiom specifaj. Neniu forĵetus monon por eldoni libron dediĉitan al malgranda grupo de aĉetantoj (ĉu ĉiam malgranda?). Estas raraj esceptoj – ekz. Prof. Szerdahelyi skribis libron por 10-14 jaraj infanoj (plenan de didaktikaj lertaĵoj, 1965 j). Kiamaniere eliri el tiu pata punkto? En altlernejoj por instruistoj oni povus proponi al studentoj jenajn temojn de disertacioj: projekto de E-lernolibro (aŭ ties fragmento) por antaŭlernejoj, por studentoj, por gvidantoj de ekskursoj, projekto de enkonduko de akuzativo dum unuaj lecionoj de elementa kurso por fundamentaj lernejoj en Pollando (do ankaŭ io tre preciza). En ĉiu projekto povas esti proponataj aktivigaj metodoj, aktivigaj ekzercoj, konvenaj por la aĝo de kursanoj, por la kursodaŭro, por la celo de instruado. Kompreneble tiun disertacion povus skribi studento, kiu finis E-lektoraton kun serioza programo (ekz. dujaran, po 4 horojn semajne).

Valorus adapti al E-edukado konatajn principojn de edukado, akiraĵojn de didaktikistoj de diversaj lernobjektoj (profunde evoluis ekz. didaktiko de matematiko).

3. Pri konataj instrumetodoj

Ni revenu al la temo, al postulema aktiveco de la lernanto, forte mi substreku – aktiveco intelekta. Konataj estas de pli ol kelkdek jaroj aktivigaj metodoj de la instruado de fremdaj lingvoj, ankaŭ de esperanto, kiuj havas praktikan valoron. Oni devas pri ili memori, oni povas ilin modifi, adapti al la moderna vivo.

La unua precize difinita metodo elformiĝis tiam, kiam oni komencis instrui la latinan lingvon en eŭropaj lernejoj (kaj poste aliajn fremdajn lingvojn) kaj ricevis karakterizan nomon: gramatika-traduka metodo.

La mekanika-aŭtomata metodo de Ollendorf estas tute kontraŭa al la gramatika metodo. En ĝi gramatiko estas kaŝita en ekzemploj. Psikologie oni pruvis valoron de tiu metodo per la fakto, ke frazo ne estas konscia kombino de vortoj, sed ke la esprimado kutime funkcias aŭtomate. Ollendorf asertis, ke la lernanto memoras des pli bone la lernendajn frazojn, ju pli sensencaj kaj absurdaj ili estas. En kelkaj E-lernolibroj oni adaptis tiun metodon enkondukante tamen la frazojn el la ĉiutaga vivo. Eble ion komunan kun tiu metodo havis la kurso de la franca lingvo, kiun mi partoprenis antaŭ jaroj, dum kiu la partoprenantoj aŭskultis multfoje la samajn fragmentojn de la sonbendo, por iom kompreni terure malfacilan por komencantoj ĉiutagan francan lingvon. La kursanoj ripetis la frazojn, lernis volenevole ilin parkere, sen konscio pri gramatiko, ankaŭ sen kono legi kaj skribi. Tiu vojo tre bone aktivigis kursanojn, gvidis ilin rapide al facila interkompreno en la franca lingvo kun fremdlandanoj. Memorante pri tiu vojo al aktivigado, ni ne povas forgesi grandegan avantaĝon de esperanto – facilan gramatikon. Tamen tro malofte dum E-lecionoj ni aŭskultas fragmentojn de paroladoj de elstaraj esperantistoj kaj konversacias pri ties enhavo (por aktivigi tiamaniere niajn lernantojn).

La analiza aŭtomata metodo de Schliemann estas tre konvena por personoj kun tre bona memorkapablo. En ĝi oni proponas i.a. lerni parkere la fremdan tekston de la libro, kies precizan tradukon oni samtempe posedas kaj povas uzi. Ĉu tute forĵeti tiun metodon en E?

Delfi Dalmau en [2] skribas:

Esperanton scipovas ne tiuj, kiuj konas nur ĝiajn elementojn, sed tiuj kiuj legante, aŭdante, imitante, alproprigas al si la lingvon kreitan de la poeto Zamenhof kaj ceteraj poetoj de Esperanto. La bonaj instruantoj lernigas la lingvon, la esprimojn, la frazojn, elokventajn diraĵojn. Ĉiuj bonaj esprimoj kaj tekstoj kaj paroladoj estas la vivanta Esperanto, kiun ne povas krei, sed nur lerni la novaj esperantistoj...

Mi memoras ĝis hodiaŭ la proverbojn, kiujn enkondukis Prof. Żytyński dum E-kursoj en krakovaj liceoj en la 60-aj jaroj de la XX jarcento. Dum ĉiu nova leciono – nova proverbo. Post unu jaro lernantoj konis multegajn proverbojn (kiuj en E jam de dro Zamenhof estas perloj). Tio perfekte aktivigis la lernantojn – ili havis la okazon pensi, kompari la esprimojn en esperanto kaj en la nacia lingvo, aŭ en konataj fremdaj lingvoj. La aktiveco de la lernantoj havis la formon malpli videblan, ili ne parolis, sed pensis. Same valorus ellerni parkere aforismojn, fragmentojn de versaĵoj, de oraj pensoj ktp. Prof. Żytyński traktis la proverbon, kiel elirpunkton por konversacio – lernantoj devis starigi kiom eble plej multajn demandojn, ligitajn kun la proverbo, samtempe do lernis konversacii.

Plej sukcese oni povas aktivigi lernantojn, memorante pri karakterizaj ecoj de la Cseh-metodo (Andreo Cseh, hungaro, pastro, nask. 1895), bazita sur la rekta metodo (1882 j). Ni menciu laŭ la [4], ke la rekta metodo proponas i.a.

- neuzadon de nacia lingvo, klarigadon de novaj vortoj per la jam instruitaj,
- instigadon al tio, ke la lernantoj eltrovu la regulojn de la lingvo kaj ke ili mem konstruu gramatikan sistemon.

Okulfrapas eblecoj de intelekta aktivigado de lernantoj. Dum matematikaj lecionoj oni alte pritaksas konstruadon de propra matematiko de lernanto (kun helpo de la instruisto), retrovon de tio, kion ja iu trovis ofte antaŭ 2000 jaroj. En la rekta metodo oni agas simile – oni eltrovas, retrovas, proponas (kaj la instruisto akceptas aŭ ne, konfirmas, estas eksperto). Tiun bonegan eblecon de aktivigado ni substreku ĉiam, speciale se temas pri la edukado de junaj homoj (Vidu ankaŭ [7], paĝoj 12-16).

En la libro [8] ni trovas traŝan priskribon de la rekta metodo (nomata ankaŭ senpera, natura, imita, indukta). Inter alie ni legas:

- *La gramatiko estu instruata unue subkonscie per praktika ekzercado de kontinua teksto kaj poste formulita laŭ indukta metodo (konkludi el apartaj faktoj al ĝenerala leĝo). Oni praktiku la analogion.*
- *La instruado estu varia: la prezentado okazu kun viva aktiveco, la legaĵojn oni ripetu en dialogoj, ĉe rakontoj oni dividu la rolojn, faru malgrandajn scenojn, kreu konforman medion, laboru laŭ la principo de laborkuniĝoj.*
- *La legaĵoj ampeksu la modernan literaturon kaj konigu al la lernanto la ecojn de la fremda popolo.*

Nenion pli bonan oni povus elpensi por aktivigi lernantojn (Vidu ankaŭ [2], paĝo 88: „*La artikolo komenciĝas per aludo al la lingvaj konoj kaj studoj de Zamenhof, rakontante la okazon kiam li ekvidis la gravecon de afiksoj por ŝpari al lernanto la akiron de multaj unuopaj vortoj. (...) dro Zamenhof ĉu intence, ĉu nekonscie elektis afiksojn kiuj havas similaĵojn en pluraj diversaj lingvoj, do faciligas la memoradon de vortoj ĉe multaj popoloj. Pro tiu interligo de okcident- kaj orienteŭropaj lingvoformoj Esperanto estas efektive >>optimume<< internacia*).

Dum kelkdek jaroj de la pasinta jarcento, gvidis E-lektoratojn en Krakovo Prof. Sygnarski. En tiuj kursoj oni povis trovi multajn karakterizajn ecojn de la Cseh-metodo; ne tiom multajn en la lernolibroj de Prof. Sygnarski (ĉar tie ni trovas tekstojn por traduko, polan lingvon ktp.). En Bulgario mi vidis perfektan aktivigadon de diversnaciaj kursanoj dum E-lecionoj, kiujn gvidis doc. Dimov kaj aliaj instruistoj en Pamporovo kaj Smoljan (ankaŭ la aŭtoro de ĉi tiu artikolo).

Iom antaŭ la 1970 j. Prof. Szerdahelyi, prelegante en Krakovo por instruistoj de diversaj lingvoj, proponis mezuri, kiom longe dum unu lerneja horo parolas instruisto, kiom longe lernantoj, kiom longe oni parolas en E, kiom longe en nacia lingvo kaj difini la proporciojn – dividi i.a. la tempon de la parolado de instruisto per la tempo de la interparoloj de lernantoj. Klare estas videbla, kio estus postulinda. Lernantoj estu do aktivaj, kaj instruisto organizu nur ilian laboron, variigante kaj instrumentadojn kaj instruhelpilojn (inter ili teknikajn helpilojn). La modernaj teknikaĵoj ne ĉiam aktivigas, do ni evitu la situacion, en kiu la formo kovras la enhavon kaj povas doni la malveran bildon de aktiveco de niaj lernantoj.

En Pedagogia Universitato en Krakovo gravan rolon en la edukado de instruistoj havas praktikoj en lernejoj. Ekzemple studentoj de matematiko aktiviĝas kaj – ni diru – maturiĝas, kiam povas observi kaj analizi lecionojn (kune kun didaktikistoj de matematiko) en diversstipaj lernejoj, poste mem plani lecionon, skribi ĝian scenaron kaj laŭ tiu scenaro instrui. Ofte dum tiuj okupoj studentoj pliprofundigas siajn teoriajn (!) sciojn; rare dum la studoj ili estas tiom aktivaj kaj kontentaj pro sia laboro. Simile organizitaj praktikoj estus ege valoraj por venontaj E- instruistoj.

Parolante pri aktivigado de lernantoj dum E-lecionoj vole-nevole mi tuŝis la bezonon eduki E-instruistojn same profesie, kiel instruistojn de aliaj lernobjektoj. Didaktiko de esperanto rapide evoluos, kiam ni trovos lokon por E en la strukturoj de altlernejoj.

Bibliografio

1. Collinson, W.E. (1950), The Internationality of some Esperanto Affixes; Esperantologio nro 2; Danlando
2. Dalman, D. (1956), Dialekto, dialektiko; Barcelona
3. Klemensiewicz, Z. (1965), Czy warto się zajmować esperantem?; Warszawa
4. Kokeny L., Bleier V. (1933), Enciklopedio de Esperanto; Budapeŝto
5. Pechan, A. (red.) (1966), Gvidlibro por supera ekzameno; Budapeŝto
6. Szerdahelyi, I. (1970), La didaktika loko de la Internacia Lingvo en la sistemo de lernejaj studobjektoj; Internacia Pedagogia Revuo; Nurnbergo
7. Szerdahelyi, I. (1971), Lerneja instruado; Sofia
8. Zlatnar, P. (red.) (1959), Esperanto kaj ĝia instruado en lernejoj; Ljubljana

Tomasz Malicki
(*Kraków, Pollando*)

La sistemo de edukado en Pollando

Edukado estas unu el la sferoj de la vivo, kiuj ne konvenas al unuigo. Ĉiu ŝtato povas libervole fondi sian edukon sistemon. Oni devas memori, ke en unuiĝinta Eŭropo junaj poloj serĉados laborlokojn kaj konkurados je lokoj en altlernejoj kun samaĝuloj el aliaj landoj. La pola eduka sistemo devos do esti tiel konstruita, ke ni havu ŝancojn trovi niajn lokojn en Eŭropo.

En la jaro 1999 komenciĝis en Pollando la multjara kaj ampleksa reformado de programoj kaj metodoj didaktikaj-edukaj kaj de lernejoj strukturoj. Ĝi celis plibonigi la eduksistemon kaj adapti ĝin al bezonoj de la mastrumado apogita je scio, garantii por la tuta loĝantaro aliron al la sistemoj de konstanta lernado kaj proksimigi ligojn inter altlernejoj kaj bizneso, kies estado en aliaj landoj favoras teknologiajn transferon.

En la duono de la 90-aj jaroj de la XX-a jarcento en Pollando, superan edukiĝon posedis 6,8 % da loĝantaro, postmezlernejan (duonsuperan) - 2,6 %, mezan - 50,5 %, fundamentan - 33,7 % kaj ne finitan elementan aŭ nenian - 6,3 %. Inter la jaroj 1988 kaj 2006 la procento de la personoj posedantaj: superan edukiĝon en la tuta loĝantaro pligrandiĝis de 6,5% ĝis 14,6%, mezan edukiĝon pligrandiĝis de malpli ol 25% ĝis 35%. En la jaro 2006 la universaleco de la edukiĝo la meza kaj pli alta estis en Pollando procente pli alta ol tiu universaleco en la landoj de la Eŭropa Unio.


En la plimulto de eŭropaj landoj la lerneja devigo komenciĝas en la sesjariĝo, sed estas esceptoj: pli frue ĉar en la aĝo de 5 jaroj komencas lernejan edukon infanoj en Nederlando kaj en Britujo kaj plej frue ĉar jam en la aĝo de 4 jaroj – en Norda Irlando. Ĝenerale en landoj de Eŭropo Orienta pli malfrue komenciĝas la lerneja devigo – en la aĝo de 7 jaroj. La sama situacio estas ankaŭ en Pollando, kio kaŭzas, ke multaj polaj infanoj kaj gejunuloj havas jam pro la eduka leĝpremiso pli malgrandajn ŝancojn por bona lerneja eduko. En la mondo oni sukcese praktikadas plilongigon de la periodo de restado de infanaro en lernejoj. La lasta eduka reformo en Pollando, en la jaro 1999, ankaŭ sekvis ĉi tiun spuron kaj oni enkondukis la 6-jaran elementan lernejon kaj ankaŭ devigan 3-jaran gimnazion, anstataŭ la ĝisnunan 8-jaran elementan lernejon. Tio plilongigis la periodon de la eduka sistemo je unu jaro.

En la plimulto da landoj lernantoj frekventas lernejojn dum kvin tagoj semajne (ses en Luksemburgio kaj en kelkaj regionoj de Italio). Depende de la lando, de la tago de semajno kaj de la aĝo de lernantoj diversa estas ankaŭ la taga kvanto da lernejoj okupoj. Ekzemple la lernojara kvanto da okupoj por lernantoj en la aĝo ĉirkaŭ 10 jaroj en Nederlando estas 1000 horoj kaj en Latvio nur 490 horoj. En la landoj de Orienta Eŭropo la jara kvanto estas ĉirkaŭ 600 horoj. En unu el ĉi tiuj landoj, kiuj kune kun Pollando aliĝis al la Eŭropa Unio estas averaĝe granda nombro da horoj; ĝi estas Cipro kun 812 horoj. En Pollando la jara kvanto estas 635 horoj, tiel do en komparo kun Okcidentaj Landoj tio estas malpli je 350 horoj dum la jaro, malpli je ĉirkaŭ 2 horoj ĉiutage.

La sistemo de edukado reformita en 1999 en Pollando konsistas el du partoj (skemo sekvas):

- la eduksistemo,
- la sistemo de supera edukado.

SISTEMO DE EDUKADO EN POLLANDO



La tri unuaj gradoj de la sistemo de edukado: antaŭlernejo, elementa lernejo kaj gimnazio donas homogenan edukan oferton por la infanoj en la aĝo ekde 6 ĝis 16 jaroj. La diferenco de la oferto ekestas je la grado de la postgimnaziaj lernejoj. Postgimnaziaj lernejoj estas jenaj:

- trijaraj ĝeneralklerigaj liceoj, kies finigo ebligas ricevon de abiturienta atestilo;
- trijaraj profiligitaj ĝeneralklerigaj liceoj, kies finigo ebligas ricevon de la abiturienta atestilo;
- kvarjaraj teknikumoj, kies finigo ebligas ricevon de la abiturienta atestilo;
- faklernejoj 2-3 jaraj, kies finigo ebligas ricevon de la diplomo konfirmanta fakajn scipovojn kaj ankaŭ ebliganta daŭrigon de la klerigo en dujara liceo aŭ en trijara teknikumo;
- dujaraj liceoj, por la diplomitoj de bazaj faklernejoj, kies finigo ebligas ricevon de la abiturienta atestilo;
- trijaraj teknikumoj kompletigaj, por diplomitoj de bazaj faklernejoj, kies finigo ebligas ricevon de la diplomo konfirmanta fakajn kvalifikojn kaj ankaŭ ebliganta ricevon de la abiturienta atestilo;
- postliceaj ĝis 2,5 jaraj lernejoj, kies finigo ebligas al personoj posedantaj mezan klerigon ricevon de la diplomo konfirmanta profesiajn kvalifikojn;
- trijaraj specialaj lernejoj por lernantoj kun la psikaj handikapo kaj por lernantoj kun la kompundaj handikapo, kies finigo ebligas ricevon de la atestiloj konfirmantaj lertecon por laboro.

La sistemo de la edukado entenas ankaŭ aliajn ejojn eduk-lernigajn, de la konstanta edukado, de la praktika edukado, centrojn de la aldona klerigo kaj de la faka plibonigado, artismajn centrojn, konsilantejojn psikologi-pedagogiajn, junularajn centrojn edukigajn, junularajn centrojn de socioterapio, specialajn lernoedukigajn kaj edukigajn prizorgejojn, Voluntigajn Labortaĉmentojn, ejojn por edukigo kaj ejojn de la plibonigado de geinstruistoj, pedagogiajn bibliotekojn, kolegiojn de laboristaj sociaj servoj.

Konsente kun la preskriboj de la Konstitucio de Pollando ĉiu civitano havas la rajton al edukiĝo. La edukado estas deviga ĝis la 18a vivojaro. La edukado en publikaj lernejoj estas senpaga. La inkluziva tempo de la lernado ĝis la momento donanta eblecon ekzameniĝi abiture egalas al 12-15 jaroj. Post la abituriĝo diplomitoj ricevas abiturientajn atestilojn rajtigantajn pretendi al altlernejoj.

Kiel aspektas la sistemo de supera edukado?

En Pollando ekzistas ŝtataj (publikaj) altlernejoj kaj kreataj ekde la jaro 1999 neŝtataj altlernejoj. Neŝtataj altlernejoj estas fondataj surbaze de la permeso de Ministerio de Nacia Edukado kaj Sporto kaj ricevas leĝan subjekton post la enskribo al la registro de neŝtataj lernejoj, gvidata fare de tiu ministerio.

Ekde la jaro 1998 estiĝas ŝtataj kaj neŝtataj fakaj altlernejoj. La esenca ero de la pretiĝo de la diplomitoj por la plenumo de diversaj profesioj estas la lernado dum praktikoj en la daŭro de 15 semajnoj. Studado povas esti dumtaga, vespera, perkoresponda aŭ foresta. La principa sistemo de la studado estas la tagaj studoj, escepte nur se la statuto de altlernejo determinas alie.

Por la enskribiĝo al altlernejo povas klopodi personoj, kiuj akiris la abiturientan atestilon. La principoj de allasoj al la 1-a studjaro estas difinitaj memdecide de altlernejoj. Kelkaj altlernejoj aranĝas akceptajn ekzamenojn, aliaj allasas por sudoj surbaze de konkurso de pritaksoj troviĝantaj sur la abiturienta atestilo, ankoraŭ aliaj - nur surbaze de la registro.

Oni diferencigas ŝtatajn altlernejojn je: universitatoj, politeknikoj, agrikulturaj altlernejoj, ekonomiaj altlernejoj, pedagogiaj altlernejoj, medicinaj altlernejoj, altlernejoj de marmastrumado, altlernejoj de fizkulturo, artaj altlernejoj, teologiaj altlernejoj, fakaj altlernejoj, altlernejoj de la Ministerio de Nacia Defendo kaj altlernejoj de la Ministerio de Enlandaj Aferoj kaj krome neŝtataj altlernejoj kaj en ĉi tiu aro neŝtataj fakaj altlernejoj. Ĉiuj supre menciitaj tipoj de altlernejoj povas havi la statuton de la altlernejoj, se almenaŭ unu konvena organizaĵo enkadre de ilia strukturo posedas leĝrajton por distingado per la scienca grado - doktoro.

La leĝo el la 27a de julio 2005 "Leĝaro pri altlerneja sistemo" difinas du sistemojn de studado: la ĉeestan kaj forestan. La principa sistemo de studado estas la ĉeesta studado, escepte nur se la statuto de altlernejo difinas tion alimaniere. La ĉeesta studado en la ŝtata altlernejo estas senpaga, escepte de la ripetado de didaktikaj okupoj kaŭze de malkontentigaj rezultoj en lernado.

En la jaro 2008 en Pollando funkciis 464 altlernejoj (publikaj kaj nepublikaj), en kiuj studis 1 937,4 miloj da personoj en:

- 18 universitatoj;
- 18 politeknikoj;
- 5 ekonomiaj altlernejoj;
- 6 pedagogiaj altlernejoj;
- 7 agrikulturaj altlernejoj;
- 6 altlernejoj de fizkulturo;
- 34 ŝtataj fakaj altlernejoj;
- 7 teologiaj altlernejoj;
- 151 nepublikaj altlernejoj;
- 179 nepublikaj fakaj altlernejoj;
- 11 medicinaj altlernejoj;
- 7 belartaj altlernejoj;
- 8 muzikaj altlernejoj;
- 2 altlernejoj de polico kaj ŝtatlima gardado.

Kiajn fakajn titolojn oni povas akiri en Pollando?

La fakaj titoloj donataj al diplomitoj de altlernejoj povas esti jenaj:

- * licenciulo - post la fakaj studoj, kiuj daŭras 3 jarojn aŭ 3,5 jarojn,
- * licenciulo de flegado aŭ licenciulo de akuŝarto,
- * inĝeniero - por diplomitoj de superaj teknikaj studoj, se la teknikaj studobjektoj estiĝas ne malpli ol 50% da tuto de didaktikaj okupoj,
- * inĝeniero arkitekto,
- * magistro, magistro de arto, magistro inĝeniero, magistro inĝeniero arkitekto, kuracisto, kuracisto dentisto, kuracisto de veterinario, magistro de flegado, magistro de akuŝarto post la 4,5 - 6-jaraj magistrasj studoj.

La fakan titolon magistro povas akiri licenciuloj kaj inĝenieroj ankaŭ post la 2-2,5-jaraj kompletigaj magistrasj studoj. Por akiri la supre menciitajn fakajn titolojn studento devas sukcese trapasi ĉiujn lernobjektojn kaj praktikojn laŭ la plano de studado, prepari kaj defendi la diploman disertacion kaj sukcesi dum la diploma ekzameno.

La diplomito de altlernejo ricevas la diplomon de la fino de studoj en la difinita fako de studado, kaj ankaŭ – post sia propono – la kopion de la diplomo en la fremda lingvo.

Kiaj estas en Pollando sciencaj gradoj kaj sciencaj titoloj?

La sciencaj gradoj estas doktoro kaj doktoro habilitiĝinta en la difinita scienca kampo. La gradoj en la arta kampo estas doktoro kaj doktoro habilitiĝinta en la difinita sfero de arto. La gradon de doktoro oni aljuĝas al la persono posedanta la fakan titolon – magistro aŭ magistro inĝeniero, kuracisto aŭ alia samnivela, kiu sukcesis dum doktora ekzameno en la sfero difinita fare de la konvena organizaĵo, kaj pretigis kaj defendis la doktoran disertaĵon.

Al la procezo de habilitiĝo povas esti allasita persono, kiu posedas sciencan gradon – doktoro – kaj konsiderindan sciencan aŭ artisman akiraĵon, kaj krome prezentis konvenan disertaĵon. La agoj de tiu ĉi procezo finiĝas per la decido de la konsilantaro de la konvena organizaĵo aljuĝi la gradon doktoro habilitiĝinta.

La gradoj doktoro kaj doktoro habilitiĝinta estas donataj en la organizaĵoj de altlernejoj kaj en aliaj sciencaj organizaĵoj, kiuj posedas la rajton aljuĝi ĉi tiujn gradojn. La scienca titolo estas profesoro de la difinita scienca kampo, aŭ profesoro de la difinita kampo de arto. La titolojn de profesoro donas la Prezidanto de Pollando.

Populacio de lernantoj

En la jaro 2006 en Pollando la nombro de la personoj malpli ol 29-jaraĝaj egalas al 14 865 914, kio estis 39,0 % de la tuto de la loĝantaro, la nombro de infanoj en la aĝo de lernodevigo egalas al 4 954 097, kio estis 13 % de la tuto de la loĝantaro. La lingvo de instruado estas la pola.

Administrado kaj financado de edukado

En la lernojaro 2007/08 preskaŭ ĉiuj lernantoj (98%) frekventadis publikajn lernejojn. La plimulto da la monrimedoj por edukado devenas el la ŝtata buĝeto. Konsente kun la leĝo pri la sistemo de edukado, lernejoj dividiĝas je la publikaj, proponantaj senpagan instruadon kaj lernejoj nepublikaj. Nepublikaj lernejoj estas jenaj: sociaj, lernejoj de konfesiaj asocioj kaj lernejoj privataj. Nepublikaj lernejoj povas posedi aŭtorajn programojn de instruado, konfirmitajn de la Ministerio de Nacia Edukado. Ili povas esti financataj el lernejaj pagoj de la gepatroj de la lernantoj. Nepublikaj lernejoj povas ankaŭ ricevi financajn rimedojn el aliaj fontoj, ekzemple el privataj entreprenoj aŭ fondaĵoj. Nepublikaj lernejoj en Pollando posedantaj leĝon de publikaj lernejoj rajtas al kleriga subvencio atribuita al ĉiu lernanto. La alteco de tiu subvencio egalas al 100% de la meznombra elspezo kalkulita

por la edukado de lernanto en publika lernejo. Nepublikaj lernejoj rajtas eldonadi atestilojn agnoskatajn en publikaj lernejoj kaj en altlernejoj. Ili diferenciĝas de publikaj lernejoj per individuigitaj programoj de instruado kaj per pli alta nivelo de la instruado de fremdaj lingvoj.

La 5an de majo 2006 organiziĝis du apartaj ministerioj: la Ministerio de Nacia Edukado kaj la Ministerio de Scienco kaj Supera Edukado. La Ministerio de Nacia Edukado respondecas por la tuta sistemo de edukado krom tiu en la altlernejoj, kiuj estas subordigitaj al la Ministerio de Scienco kaj Supera Edukado.

Fakaj lernejoj, kiuj pli frue estis subordigitaj al aliaj ministerioj, nun subordiĝas al la Ministerio de Nacia Edukado. Nur belartaj lernejoj (en la sfero de artaj fakoj) kaj korektodomoj estas subordigitaj konforme al la Ministerio de Kulturo kaj al la Ministerio de Justeco, respektive.

La reformo de la administracio kaj sistemo de la edukado konjektas, ke la edukpolitiko estas kreata kaj gvidata ŝtatcentre, kaj administracio kaj gvidado de lernejoj, antaŭlernejoj kaj aliaj edukejoj estas malcentraligitaj. La respondeco por la administrado de antaŭlernejoj, elementaj lernejoj kaj gimnazioj estas delegita al lokaj aŭtoritatoj. La administraciaj kaj organizaj aferoj kaj decidoj koncernantaj profitigon de financaj rimedoj fare de lernejoj estas la objekto de konsultiĝoj inter la lernejo kaj la organizaĵo gvidanta la lernejojn, tio estas municipo (kaze de antaŭlernejoj, elementaj lernejoj kaj gimnazioj) aŭ distrikta instanco (enkaze de mezlernejoj).

Pedagogian inspekton de lernejoj garantias senpere la Ministerio de Nacia Edukado, kaj en ĝia nomo taskojn en ĉi temo plenumas vojevodiaj kuratorejoj de edukado. La esencan konsultan rolon ĉe la kreado de la politiko pri supera instrusistemo en Pollando plenumas la Ĉefa Konsilantaro de Supera Edukado.

Antaŭlerneja edukado

Ĉi tiu nivelo de edukado estas la unua grado de la eduksistemo. La antaŭlerneja edukado koncernas infanojn en la aĝo de 3 ĝis 6 jaroj. Ekde la lernojaro 2004/05 infanoj en la aĝo de 6 jaroj devas fini tiel nomatan nulan klason, pretigantan por la lernado en elementa lernejo. Nulaj klasoj funkcias en antaŭlernejoj aŭ en elementaj lernejoj kaj la gvidado de ili apartenas al la taskoj de la municipo.

Konsente kun la leĝo pri la sistemo de la edukado unu el la taskoj de la municipo estas organizado kaj gvidado de publikaj antaŭlernejoj kaj garantiado en ili la senpagajn okupojn enkadre de la programa fundamento de la antaŭlerneja eduksistemo, en la tempoperiodo ne pli mallonga ol po 5 horojn tage. Gepatroj de la infanoj restantaj en antaŭlernejo pli longtempe ol 5 horojn pagas por la pli longa restado kaj por la aldonaj okupoj. Krom tio municipoj organizas diversforman helpadon por la familioj kun etaj infanoj, vivantaj en precipe malfacilaj vivkondiĉoj.

En la lernojaro 2007/08 funkciis 16 902 antaŭlernejoj, al kiuj frekventis 871,9 mil da infanoj, kio egalas al 59,4% da infanoj en la aĝo 3-6 jaroj (ĉi tiu nombro en urboj: 75,2%, en vilaĝoj: 39,0%) el kio 94,9% estis sesaĝuloj en nulaj klasoj kaj 47,3% infanoj en la aĝo 3-5 jaroj. Ĉi tiuj estas la plej malaltaj indikoj de la disvastigo de la antaŭlerneja edukado inter la landoj de la Eŭropa Unio. Eĉ en 539 komunumoj estas nek unu antaŭlernejo. Popularigo de la edukado de malgrandaj infanoj, inter tio – garantio por ĉiuj infanoj kvinaĝaj la rajton je senpaga antaŭlerneja edukado, estas unu el la ĉefaj taskoj de la Ministerio de Edukado, planataj por la jaroj 2009-2011.

La deviga edukado

La deviga edukado estas senpaga, daŭras dek jarojn kaj komenciĝas en la aĝo de ses jaroj (ekde 01.09.2009 en la aĝo de 5 jaroj).

a) Etapoj

	Ĝis 31.08.2009	Ekde 01.09.2009
nula klaso	Aĝo:6 jaroj	Aĝo:5 jaroj
elementa lernejo	Aĝo: 7-13 j.	Aĝo: 6-12 j.
Etapo 1 - integriga instruado, 7-10 j.	Etapo 1 - frulerneja instruado, 6-9 j.	
Etapo 2 - lernobjekta instruado, 10 -13 j.	Etapo 2 - lernobjekta instruado, 9 – 12 j.	
gimnazio	Aĝo: 13-16 jaroj	Aĝo: 12-15 jaroj
Etapo 3 – lernobjekta instruado	Etapo 3 - lernobjekta instruado	

b) Kriterioj de akceptoj

La ununura kriterio de la akcepto al elementa lernejo estas aĝo. Akcepto al gimnazio okazas surbaze de la atestilo, kiun ricevas lernanto post la fino de elementa lernejo (necesa estas ankaŭ la ĉeesto de la lernanto dum ekstera ekzameno post la 6-a klaso). Gepatroj estas devigitaj enskribi infanon al lernejo aŭ - en la kazo de la nula lernojar - al antaŭlernejo, kiuj estas situataj plej proksime de la loĝloko.

En la lernojar 2007/08 funkciis 14 330 elementaj lernejoj kaj 7 142 gimnazioj, al kiuj frekventis respektive 2 375,2 kaj 1 453,2 mil da lernantoj.

c) Taga/semajna/jara kvanto de okupoj de lernanto kaj instruisto

La lernojar daŭras ĉirkaŭ 185 tagojn, ekde septembro ĝis junio kaj estas dividita je du jarduonoj. Lecionoj de la devigaj lernobjektoj (maksimume 23 lecionoj po 45 minutoj semajne je la unua etapo kaj maksimume 28 kaj 31 lecionoj semajne, respektive je la 2-a kaj 3-a etapoj) estas ĝenerale displanitaj dum kvin tagoj de la semajno.

La deviga leĝostato se temas pri la taskoj de lernejo kaj indikitaj formoj de la efektivigado de ĉi taskoj, montras, ke oni ne povas rigardi lernejon kiel la institucion realigantan siajn funkciojn nur enkadre de la plano de instruado dum la semajna deviga labortempo de instruistoj (pensumo). Tial do la labortempo de la instruistoj ne estas difinita nur surbaze de pensumo, sed (rezulte de la difino de rolo kaj taskoj de lernejo en la artiklo 42 de la statuto Ĉarto de Instruistaro) kiel netranspasanta 40 horojn semajne. Enkadre de la tiel difinita labortempo kaj fiksita por ĉi tiu labor-rekompenco instruistoj estas devigitaj realigi okupojn didaktikajn, edukajn kaj protektajn kun lernantoj aŭ edukitoj por ilia bono; aliajn agojn kaj okupojn montritajn en statutoj de lernejoj, kun precipa konsidero de prizorgaj kaj edukaj okupoj elfluantaj el bezonoj kaj interesiĝoj de lernantoj, okupojn ligitajn kun preparado de lecionoj, memedukado kaj faka perfektigado.

d) Nombrecio de klasoj, divido de lernantoj je klasoj

En la lernojaro 2006/07 la proporcio de la nombro de lernantoj al la nombro de instruistaro en bazelementa lernejo kaj gimnazio egalas al 13:1. Leĝoj ne difinas normojn de la nombrecio de klasoj. La baza kriterio de la divido de lernantoj je klasoj estas la aĝo.

Je la 1-a etapo de edukado preskaŭ ĉiujn lernobjektojn (krom fremdan lingvon kaj religion) instruas unu instruisto. Ekde la 4-a klaso lecionojn gvidas instruistoj de diversaj lernobjektoj.

e) Programoj kaj enhavoj de edukado

La programa bazo por la integriga instruado estas la sama por ĉiu lernanto (kaj simile por la lernobjekta instruado).

Lernejoj (instruistoj) povas elekti klerigprogramojn kaj lernolibrojn el la listo oficialigita fare de la Ministerio de Nacia Edukado, kaj ankaŭ memstare decidi pri aplikataj metodoj de instruado kaj kontrolo de la instrurezultoj. Ili povas ankaŭ prilaboradi proprajn programojn de instruado, surbaze de programa bazo kaj prezenti ilin al la Ministerio de Edukado por akcepto.

f) Pritakso de lernantoj, promocio en pli superan klason

Pritakso de scio kaj de kapabloj de lernantoj dum lernojaro ne estas unuecigita en la tuta lando kaj restas tute en la kompetenco de instruistaro. Taksadon oni faras surbaze de regulaj proviloj skribaj kaj buŝaj. Rezultoj akiritaj de lernantoj je la fino de ĉiu duonjaro devas esti konfirmitaj fare de pedagogia konsilantaro de la koncerna lernejo. Lernantoj, kiuj ne akiris kontentigajn rezultojn ripetas klason laŭ la decido de la pedagogia konsilantaro. La sistemo de la ekstera pritakso enkadre de la deviga edukado entenas laŭvicajn unuecigitajn provilojn kaj ekzamenojn:

- 1) Je la fino de 6-jara elementa lernejo (nuntempe lernantoj 13-jaraj) - ĝenerala, deviga provilo de kapablecoj postulitaj en la programa bazo, malhavanta selekcia funkcion. Alpaŝo al ĉi provilo ebligas komenci lernadon en gimnazio, kaj ĝiaj rezultoj havigas al lernantoj, iliaj gepatroj kaj al ambaŭ lernejoj, tio estas al elementa lernejo kaj al gimnazio, informon pri la nivelo de atingoj de lernantoj. Ĉi provilo estis farita unuafoje en la jaro 2002.
- 2) Je la fino de 3-jara gimnazio (nuntempe lernantoj 16-jaraj) - ĝenerala, deviga ekzameno, kies rezultojn oni anoncas en la gimnazia atestilo. Ĉi ekzameno permesas kontroli kapablecojn, scipovojn kaj sciojn de lernantoj en la sfero de humanismaj lernobjektoj kaj lernobjektoj ekzaktaj (kaj de la fremda lingvo ekde 2008/09). Unuafoje la eksteran gimnazian ekzamenon oni okazigis en la jaro 2002. Rezultoj de ĉi ekzameno kune kun la pritaksoj troviĝantaj sur la fina atestilo decidas pri la allaso al mezlernejoj.

Ĉiujn ekzamenojn kaj provilojn organizas speciale kreitaj institucioj: 8 Distriktaj Ekzamenaj Komisionoj, helpataj kaj kontrolataj fare de Cefa Ekzamena Komisiono.

Mezlerneja instrusistemo kaj postlicea

a) Bazaj statistikoj

En la lernojaro 2007/08 oni registris 2 398 ĝeneralklerigajn liceojn, kiujn frekventis 713,3 mil da lernantoj, 3 417 teknikumojn kaj profiligitajn liceojn, kiujn frekventis 652,5 mil da lernantoj, 1769 fundamentajn fakajn lernejojn, kiujn frekvetis 235,6 mil da lernantoj kaj 3337 postliceajn lernejojn, kiujn frekvetis 301,6 mil lernantoj. En septembro de la 2004-a jaro oni enkondukis du ĝenrojn de lernejoj: kompletigan ĝeneralklerigan liceon kaj kompletigan teknikumon.

b) Kriterioj de akceptoj al postgimnaziaj lernejoj

Pri la akcepto de lernanto al mezlernejo decidas la nombro de punktoj sur la gimnazia atestilo (kalkulita sur la bazo de notoj el difinitaj lernobjektoj kaj aliaj atingoj), sumigita kun la nombro

de punktoj akiritaj dum la gimnazia ekzameno. Detalaj principoj de la akceptoj estas difinitaj fare de postgimnaziaj lernejoj.

c) *Programoj de instruado*

La Ministerio de Edukado difinas la programan bazon por ĉiu ĝenro de lernejo kaj por ĉiu lernobjekto. Instruistoj povas elektadi programojn de instruado kaj lernolibrojn el la listo, pretigita en Ministerio, kaj memstare decidi pri la aplikataj metodoj de instruado kaj kontrolo, enkondukadi modernajn metodojn de instruado. Ili povas ankaŭ prilaboradi proprajn programojn de instruado, apogitajn sur la programa bazo kaj prezenti ilin por akcepto al Ministerio.

d) *Atestiloj de lernantoj, promocio en pli superan klason kaj kvalifikoj de diplomitoj*

Je ĉi nivelo de eduksistemo, oni kontrolas la instruezultojn de lernantoj dum la tuta jaro similmaniere, kiel enkadre de la deviga instruado. Por la fino de lernado (escepte de fundamentaj faklernejoj) oni organizas abiturientajn ekzamenojn. Lernantoj de ĝeneralklerigaj liceoj, liceoj profiligitaj, kompletigaj liceoj kaj teknikumoj, kiuj bonŝancis dum abiturienta ekzameno, ricevas abiturientan atestilon (devigan por akcepto al altlernejo). Fundamentaj faklernejoj eldonas atestilojn de la finiĝo de fundamenta faka lernejo (rajtigantajn diplomitojn entrepreni la laboron). Postliceaj lernejoj pretigas lernantojn por la faka laboro. La finekzamenoj de mezlernejoj estas unuecigitaj kaj eksteraj.

La abiturienta ekzameno, kies plenumo estas deviga por la akcepto al altlernejoj, konsistas el du partoj: skriba ekzameno (pretigata kaj pritaksata fare de eksterlernejaj ekzamenaj komisionoj) kaj enlerneja buŝa ekzameno (pritaksata fare de la lerneja instruistoj).

Fina ekzameno en fundamentaj faklernejoj, teknikumoj kaj postliceaj lernejoj konsistas el du partoj: la parto skriba, kontrolanta scion kaj kapablecojn, ligitajn kun difinita profesio kaj entrepreno de ekonomia agado, kaj la praktika parto, kontrolanta kapablecojn necesajn por plenumado de koncerna profesio.

Ĉiuj proviloj kaj ekzamenoj estas gvidataj fare de speciale kreitaj institucioj - 8 Distrikta Ekzamenaj Komisionoj, helpataj kaj kontrolataj fare de Cefa Ekzamena Komisiono.

Klerigado de neplenkapabla lernantaro (tiel nomata speciala klerigado)

La speciala klerigado konstituas la integralan parton de la pola eduksistemo, kio trovas respeguliĝon en ĉiuj komunaj leĝoj, koncernantaj klerigadon. Infanoj estas delegitaj por la speciala klerigado surbaze de opinioj eldonataj fare de kolegio de specialistoj en psikologiaj-pedagogiaj konsultejoj aŭ de konvena alia kolegio surbaze de rezultoj de psikologiaj, pedagogiaj kaj kuracistaj esploroj. La plimulto de infanoj kun la specialaj edukaj bezonoj kleriĝas en specialaj lernejoj aŭ en specialaj klasoj en lernejoj ĝenerale alireblaj (la nombro de ili egalas al 1,78 % da tuteco de lernantoj prizorgataj per deviga klerigado). En specialaj klasoj en elementaj lernejoj, gimnazioj kaj postgimnaziaj lernejoj en la lernojaro 2005/06 lernis 11,7 % da tuta lernantaro neplenkapabla. Klerigado de la infano havanta specialajn bezonojn, en la ĝenerale alirebla lernejo estas ebla nur post la pozitiva opinio de la konvena kolegio kaj la konsento de la gepatroj.

Instruistaro

Instruistoj devas posedi la superan klerigon, fini la superajn studojn, kiuj dependas de tio, je kiu nivelo de edukado ili laboros.

- I. La nivelo de elementa lernejo: instruisto devas fini studojn de unua aŭ dua grado (daŭrantajn 3 aŭ 5 jarojn kaj finiĝantajn, konvene, per la profesia titolo licenciulo aŭ magistro) aŭ porinstruistan kolegion (daŭrantan 3 jarojn kaj finiĝantan per diplomo).
- II. La nivelo de gimnazio: deviga estas la profesia titolo licenciulo aŭ magistro.
- III. La nivelo de postgimnazia lernejo: deviga estas la profesia titolo magistro.

La necesa kondiĉo de instruado en ĉiuj niveloj de edukado estas ankaŭ la finiĝo de la kvalifika pedagogia kurso. Laŭ la devigaj normoj de la klerigado, instruisto devas posedi pretigon pedagogian, pretigon por instruado de du lernobjektoj, kapablecon uzi komputilon kaj koni unu fremdan lingvon (je la nivelo B2 aŭ B2 + laŭ *Common European Framework of Reference for Languages* - Eŭropa Sistemo de Priskribo de Lingva Edukado).

La nove ligita Ĉarto de Instruisto, voĉdonita la 18-an de februaro de la jaro 2000, enkondukis kvar laŭvicajn gradojn de la profesia avanco de instruistaro:

- instruisto staĝanto,
- instruisto laŭkontrakta,
- instruisto nomumita,
- instruisto diplomita.

Instruistoj diplomitaj kun certaj atingoj povas ankaŭ ricevi la titolon de la honora profesoro de edukado. Instruistoj staĝantoj kaj instruistoj nomumitaj havas la statuson de laboristoj dungitaj surbaze de la kontrakto (en la kazo de instruistoj staĝantoj tio estas la kontrakto por la nedifinita tempoperiodo, en la kazo de laŭkontraktaj instruistoj - por la difinita tempoperiodo); instruistoj nomumitaj kaj diplomitaj laboras surbaze de nomumigo.

En la lernojaroj 2007/08 en Pollando estis dungitaj 490 500 instruistoj plenetataj, en ĉi nombro: 27 300 instruistoj staĝantoj (5,6%), 84 800 instruistoj laŭkontraktaj (17,3%), 193 300 instruistoj nomumitaj (39,4%) kaj 185 100 instruistoj diplomitaj (37,7%).

Novaj reformoj

Ĉefaj celoj de aktualaj ŝanĝoj en la edukado:

- plifortigo de la profesia posteno de instruisto;
- plivastigo de la antaŭlerneja edukado por infanoj 3-5-jaraĝaj, inkluzive de la devigo de unujara antaŭlerneja pretigo por infanoj 5-jaraĝaj;
- garantio de la pli bona allaso al edukado de plej junaj infanoj per plimalatigo de la aĝo de la komenco de la lerneja devigo al la aĝo de 6 jaroj, kio ebligas utiligon de potencialo de la instrusistemo por egaligo de ŝancoj de infanoj kaj por frua malkovrigado de iliaj kapabloj;
- la programa reformo de la antaŭlerneja edukado kaj de la ĝenerala klerigado direktita al la preciza priskribo de la rezultoj de klerigado je ĉiu eduketapo kaj pligrandigo de la aŭtonomio de lernejoj en la kreado de la eduka procezo;
- plibonigo de la kvalito de la faka klerigado, plenumado de specialaj edukaj bezonoj kaj kondiĉoj de lernado dum la tuta vivo;
- malfermo de la pola eduksistemo al la mondo, agadoj por la integriĝo de fremdlandanoj en la pola eduka sistemo kaj apogado de instruado de polaj infanoj ekster la limoj de Pollando;
- plibonigo de la kvalito de edukado pro senburokratismo de la pedagogia inspektado kaj klara divido de taskoj inter la organoj gvidantaj lernejojn kaj de la organoj organizantajn pedagogian inspektadon, estanta la ero de racionala malcentraligo de la parto de ŝtatkompetencoj en la sfero de edukado.

Ekde la lernojaroj 2009/10 infanoj de la sesa vivojaro ekhavas rajton komenci realigon de la lernodevigo en elementa lernejo. Infanoj en la aĝo 3-5 jaroj komencos la antaŭlernejan edukon en pli vasta grado. Ekde la jaro 2010/11 ĉiuj kvinjaruloj estos devigitaj trapasi la unujaran pretigon antaŭlernejan. La enkonduko de la malpli alta aĝo de la komenco de lernado estas planata por tri lernojaroj - 2009/10, 2010/11, 2011/12.

Oni prilaboris la novan reformon de la edukprogramo. La celo de ĉi reformo estas adapti la enhavon de programo por la aĝo de lernantoj lige kun la malpli altigo de la lerneja aĝo kaj pli altigo de la kvalito de klerigado kaj adaptigo de la programo al la konstante pligrandiĝanta nombro de la personoj volantaj akiri mezan edukon. La reformo estas planata por la jaroj 2009-2015. La reformo de la programoj de la antaŭlerneja edukado estas direktita je la preciza priskribo de la rezultoj de la

klerigado en ĉiu eduka etapo kaj pligrandigo de aŭtonomio de lernejoj en la kreado de la efektiva klerigprocedo. Al tio servos speciale:

- kunigo de programaj bazoj kun standardoj de postuloj, estantaj la bazo por testiloj kaj ekzamenoj, en unu dokumenton – la programan bazon, formulitan en la postulema lingvo, danke al kiu instruistoj scios, kion ili instru, kaj la gepatroj – kion devas scipovi ilia infano, por bonŝance ekzameniĝi;
- restarigo al geinstruistoj la rajton libere elekti – konvene al bezonoj kaj kapabloj de gelernantoj – programojn de instruado kaj lernolibrojn.

La preciza priskribo de la postuloj je la fino de ĉiu etapo de klerigado ebligas ankaŭ certigon de unuigo de la instruprocedo en la sfero de lerneja sistemo. La nova programa bazo estos deviga ekde la lernojaro 2009/2010, kun rimarko, ke ĝi estos adaptata laŭpaŝe, tio estas:

- ekde la lernojaro 2009/2010 en antaŭlernejoj, antaŭlernejaj filioj en elementaj lernejoj kaj en aliaj formoj de antaŭlerneja edukado;
- ekde la lernojaro 2009/2010 en unuaj klasoj de elementaj lernejoj kaj en unuaj klasoj de gimnazioj;
- ekde la lernojaro 2012/2013 en unuaj klasoj postgimnaziaj.

La reformo antaŭvidas la mildan transiron de antaŭlerneja edukado al la instruado en la klasoj I,II,III, en kiuj devas lerni po ne pli ol 25 infanoj. En elementa lernejo estas planata disvastigita oferto de aldonaj okupoj por lernantoj postulemaj la specialan apogon kaj por kapablaj lernantoj.

Oni planas enkonduki du fremdajn lingvojn je la ŝtupo de gimnazio; unu el ili devus esti la sama fremda lingvo, kiel enkondukita en la elementa lernejo. Ekde la lernojaro 2008/09 ekestos la deviga ekzameno de fremda lingvo je la fino de gimnazio.

Laŭleĝe de la interkompreniĝo inter la Ministerio de Nacia Edukado kaj la Ministerio de Nacia Defendo, en gimnazio estos enkondukata la nova lernobjekto "edukado por sekureco", kiu anstataŭigos la ĝisnunan oferton de la defendiga prepariĝo kaj estos kontinuata en postgimnaziaj lernejoj. La ŝanĝo intencas la konvenigon de programoj al la postuloj de nuntempo, ĉar la tasko de lernejo estas pretigo de lernantoj al la sekura vivo en pacaj kondiĉoj, kaj ne en milita danĝero. Gimnazianoj ekscios do pri danĝeroj aperantaj dum incendio, inundo, trafikaj katastrofoj. Ili eklernos donadi la unuan helpon, estingi brulantan veston sur homo, estingi fajrofonton, evakuadi la propran lernejon kaj ankaŭ helpi en la kazo de manĝotoksigo aŭ kemia toksigo, elektrokutiĝo, brulvundo, frostigo aŭ trovarmigo de homa organismo. En liceo kaj teknikumo estos lecionoj pri la profilaktiko HIV kaj pri la seksa perforto.

En la nova programbazo, kiu en pli granda grado akcentas pretigadon de lernantoj por raciaj kaj konsciaj elektoj, apud la deviga instruado ĝenerala je la nivelo de gimnazio oni proponas elekti el aro de okupoj sportaj, artaj kaj teknikaj (po 2 horoj semajne).

Aliaj proponataj ŝanĝoj estas jenaj: plibonigo de la kvalito de ĝenerala klerigado en faklernejoj kaj teknikumoj kaj ebligo elekti lernobjektojn kaj aldonajn okupojn en liceoj kaj gimnazioj. Je la kvara etapo de edukado – en liceo – oni enkondukas profiligadon, do la lernadon de du aŭ tri lernobjektoj kun la plivastigita programo kaj aldonajn okupojn disvolvigantajn interesiĝojn: okupojn el la sfero ICT, humanismajn kaj sportajn okupojn. Teknikumo ofertas pretigadon al plenumado de konkreta fako, bonan ĝeneralan klerigon, en tio lernadon de du fremdaj lingvoj kaj lernadon de du lernobjektoj kun la plivastigita programo. La kompletiga ĝeneralkleriga liceo donos eblecon plialtigi la ĝeneralan klerigon akiritan en faklernejo, lerni du fremdajn lingvojn kaj du aŭ tri lernobjektojn kun la plivastigita programo. La baza faklernejo pretigos por la konkreta fako, ofertas klerigon ĝeneralan je baza nivelo kaj lernadon de unu fremda lingvo.

Estas planitaj ŝanĝoj en la sistemo de eksteraj ekzamenoj. Krom supre menciita ekzameno de fremda lingvo post gimnazio, oni proponas enkonduki matematikon kiel la devigan lernobjekton de la abiturienta ekzameno ekde la lernojaro 2009/2010. Malaperos do la deviga skriba ekzameno de la elektita fare de lernantoj lernobjekto. Tiamaniere ĉiu lernanto ekzameniĝos laŭ la sama aro da bazaj lernobjektoj. Krome lernanto povos elekti de unu ĝis tri aldonajn lernobjektojn, je kiuj ekzameniĝos je

la nivelo baza aŭ plivastigita. Ĉi tiu elekto dependas de la postuloj de altlernejo, en kiu la koncerna diplomito celas studi.

La projekto de ŝanĝoj en la statuto pri la instrusistemo antaŭvidas la eblecon transdonadi rajtojn por la gvidado de publikaj lernejoj al la asocioj, fondaĵoj kaj aliaj privataj organizoj. La registro de la projekto klarigas, ke tia lernejo devas plu esti la publika, tio signifas senpaga kaj alirebla por ĉiuj, kaj ankaŭ kontrolata de la ŝtato laŭ pedagogia vidpunkto. Nun en Pollando agas jam 580 tiuj lernejoj.

Ekde la lernojaro 2009 estas planitaj ŝanĝoj en la Instruista Ĉarto. Konsente kun tio al ĉiuj instruistoj, senkonsidere de la grado de ilia profesia avanco, kreskos salajroj. Sen ŝanĝoj restos la semajna laborhoraro (pensumo), kaj enkadre de 40-hora semajna labortempo, ĉiu instruisto gvidos aldonajn okupojn, enkadre de kiuj realigados aldonajn okupojn kun infanoj, egaligante iliajn edukajn ŝancojn, disvolvigante iliajn kapablojn kaj talentojn, patronajn okupojn kaj la kunvenojn por la plej junaj infanoj.

La Ministerio de Scienco kaj Altlerneja Edukado planas la reformon de la sistemo de scienco kaj supera edukado, kies plej grava celo estas transformigo de polaj altlernejoj. Enkadre de la reformo polaj altlernejoj planas plibonigi la kvaliton de klerigado kaj de esploroj, simpligi la longan kaj komplikajn vojon de avanco kaj enkonduki mekanismojn devigantajn altlernejan instruistaron al konstanta scienca aktiveco, plibonigado de la kvalito de la sciencaj esploroj kaj de didaktiko distingiĝanta per pli alta nivelo. La projekto planas pligrandigon de la stipendioj por la plej malriĉaj studentoj, por likvidi parton de la barieroj en la allaso al la supera edukado kaj enkondukon de la financado de studoj per la sistemo de kreditoj ŝtatgarantiataj. La projekto antaŭvidas la ŝanĝojn en didaktiko. Klerigado estos pli ligita kun mastrumado tra tiel nomitaj menditaj fakoj - prioritataj por ŝtato, strategiaj el la vidpunkto de mastrumado. Volontigos por lernado je ĉi tiuj fakoj altaj stipendioj por la plej bonaj gestudentoj. La reformo antaŭvidas solvojn, kiuj ebligas al studentoj pli individue kaj konforme kun la personaj preferoj elektadi la ampleksojn kaj formojn de klerigado. Estos ankaŭ enkondukataj plifaciligoj por eksterlandaj studentoj en studado en Pollando kaj signifaj agoj por la plibonigo de la kondiĉoj de studado por la studentoj-handikapuloj.

Rezultoj de la financaj projektoj kun la partopreno de la resursoj el Eŭropa Unio realizitaj fare de Ministerio de Nacia Edukado en la jaroj 2005-2008

Enkadre de la projektoj financataj el la resursoj de Eŭropa Unio dum la financa perspektivo de la jaroj 2004-2006 Ministerio de Nacia Edukado realigis en la jaroj 2005-2008 la programon de modernigo de la pola edukado. Ekzemploj:

- a) "Pligrandigo de la allaso al edukado - la promocio de la klerigado dum la tuta vivo".
Oni elspezis 1 057 807 020,45 zlotojn kaj atingis interalie jenajn rezultojn:
 - en 802 novorganizitaj ejoj oni komencis la antaŭlernejan edukadon de infanoj el vilaĝaj teritorioj,
 - 3127 lernejoj, al kiuj frekventas infanoj el la vilaĝoj, realigis proprajn programojn de evoluo,
 - 11 741 bibliotekojn lerneajn kaj pedagogiajn oni ekipis per komputiloj kaj informatika ilaro,
 - estis kreitaj en vilaĝoj 1114 ejoj de la foresta klerigado.
- b) "Plialtigo de la kvalito de la edukado rilate al la bezonoj de labormerkato"
Oni elspezis 1 236 458 224,29 zlotojn kaj atingis inter alie jenajn rezultojn:
 - oni ekipis 19 954 lerneajn komputilajn laborejojn (en ĉi nombro 392 laborejojn por lernantoj handicapuloj) per 249 013 komputilaj laborlokoj,
 - oni ekipis 29 907 ejojn por la ekstera ekzamenigado
 - 10 184 instruistoj akiris rajton por ekstera ekzamenigado,
 - 565 psikologiaj-pedagogiaj konsultejoj ricevis modernan ilaron,
 - 14 916 klerigaj instancoj ricevis apogon en la formo de didaktikaj kaj metodikaj helpiloj,
 - 966 personojn oni pretigis por la gvidado de la konstanta klerigado je distanco,

- 70 519 kursoj, postdiplomaj studoj kaj aliaj formoj de la profesia perfektigado de instruistoj estis financiitaj el la resursoj el Eŭropa Komisiono.

Bibliografio

1. Raporto de la Ministerio de Nacia Edukado (MEN) el 24.09.2008 j.
2. Raporto - Pola Buroo Eurydice - februaro 2009; bazo de informoj EURYBASE: <http://www.eurydice.org>
3. Informa bulteno de Ministerio de Nacia Edukado (MEN)
<http://www.men.gov.pl>
<http://www.menwaw.pl/szk-wyz/wykaz/uniwersytety.php>
4. Informa bulteno de Centra Ekzamena Komisiono - CKE: <http://www.cke.edu.pl>
5. Klakla, M. (2001) "Strukturo de la nova eduksistemo en Pollando"
Образование без границ № 1.2001 (La internacia scienca revuo - redakcio Krim, Ukraino).
6. Perspektivoj de mastrumado sur bazo de scio en Pollando - (en la pola lingvo) - rezultoj de la raporto de Monda Banko, Komitato de Sciencaj Esploroj - KBN, 2004.
7. Bulteno "Polska " (Pollando) - <http://www.poland.gov.pl/nauka>
8. Buroo de la agnoskado de klerigo kaj de internacia interŝanĝo - junio 2002.
9. Zahorska M., Walczak D., Pola eduksistemo kaj labormerkatoj en Eŭropa Unio - Instituto de Publikaj Aferoj - Analizoj kaj opinioj numero 51
10. Leĝo (7 septembro 1991) pri la eduksistemo (la teksto unuparta: Dz.U. 2004,Nr 256, poz. 2572, kun ŝanĝoj);
11. Leĝo (27 julio 2005) pri la supera lerneja sistemo (Dz. U. 2005, Nr 164, poz. 1365);
12. Leĝo (14 marto 2003) pri la sciencaj gradoj kaj titoloj kaj pri la gradoj kaj titolo en arto (Dz. U.2003, Nr 65, poz. 595);
13. Ordono de MEN (23 decembro 2008) pri la programa bazo por antaŭlerneja edukado kaj pri la edukado ĝenerala en laŭvicaj tipoj de lernejoj (Dz. U. el 2009 Nr 4, poz.17);
14. Ordono de MEN (el 6 januaro 2009) pri la permeso por lerneja uzado de la programoj de la antaŭlerneja edukado, programoj de klerigado kaj de lernolibroj (Dz. U. el 2009 Nr 4, poz. 18);
15. Ordono de MEN (30 aprilo 2007) pri la kondiĉoj kaj manieroj de taksado, klasifikado kaj promociado de lernantoj kaj studentoj kaj organizado de proviloj kaj ekzamenoj en publikaj lernejoj (Dz. U. 2007 Nr 83, poz. 562 kun ŝanĝoj).

Esperantigis *Stanisław Śmigielski* (2009)

Stano Marček

Esperanto per rekta metodo

Esperanto per rekta metodo estas riĉe ilustrita rektmetoda lernolibro por komencantoj, taŭga ne nur por kursoj, sed ankaŭ por memlernantoj, al kiuj ĝi, danke al multaj ilustraĵoj, parte anstataŭos rektan kontakton inter la instruisto kaj la lernanto.

La lernolibro unue aperis en la slovaka, kaj dum tri jaroj ĝi estis eldonita en dudek du lingvoj. La 22-lecionan lernolibron, ilustritan de Linda Marčeková (mia filino), akompanas praktikaj didaktikaj materialoj: 500 instruaj bildoj por rektmetoda instruado (A5-formataj, kartonaj bildkartoj de la kursomaterialo, en du praktikaj kofretoj po 250 bildoj), KD kun la 500 instruaj bildoj por rektmetoda instruado (en PDF-formato, por komputila projekciado) kaj plia KD kun modela elparolo (MP3-registraĵo kun voĉlegitaj Esperantaj tekstoj de la libro).

La studmaterialo baziĝas sur rekta, tiel nomata indukta metodo: konkludi el konkretaj faktoj ĝeneralan leĝon, laŭ kiu la lernantoj – helpe de bildoj kaj analogio – subkonscie ricevas la klarigojn de la novaj elementoj kaj poste – en tekstoj kaj ekzercoj – rerenkontas kaj ekzercas ilin ĝis alproprigo. En lecionoj, kie la akirita vortprovizo permesas klarigi novan vorton per la jam konataj, en la paĝgranda bildvortaro aperas klarigo en Esperanto.

Post la rektmetoda leciono venas la sekcio Gramatiko, en kiu nacilingvaj klarigoj firmigas la jam intuicie komprenitan materialon.

La lernolibra vortprovizo respektas la oficialan ofteco-liston (Baza Radikaro Oficiala, Aktoj de la Akademio II), kiun AdE rekomendas por ĉiuj lernolibroj de Esperanto. Ĝi ĉerpas la 750 pleje uzatajn vortelementojn (morfemojn) – komence la plej ofte uzatajn ktp – kaj garantias, ke la lernanto unue lernu la plej ofte uzatajn kaj pleje bezonatajn vortelementojn, por povi interkompreniĝi en plej oftaj situacioj de la ĉiutaga vivo. Ankaŭ la gramatikaj elementoj estis anticipe dividitaj laŭ sia graveco kaj en la libro ili aperas en tiu vicordo. La unuopaj gramatikaj eroj estas alproprigataj en apartaj „paŝoj“ kaj klarigataj per indukta metodo. Surbaze de la jam posedataj konoj, helpe de ilustraĵoj, simboloj, analogio kaj kunteksto la lernanto komprenas la novan elementon subkonscie, intuicie. La „paŝo“ prezentas la novan elementon en diversaj situacioj kaj tipaj uzoj.

La komprenon de la leksikaj elementoj helpas la kontinua bildvortaro, la paĝgrandaj filmstrieckaj desegnaĵoj, en kies kadroj aperas la ilustraĵoj de la entekste per ciferoj markitaj leksikaj aŭ gramatikaj eroj, kaj sekve, fine de ĉiu leciono, aperas subteksta vortareto – nacilingvaj tradukoj de la novaj vortoj (se la lernanto tamen ne bone komprenis iun nocion). Fine de la lernolibro aperas dulingva vortaro. Ĉiu vorto havas indkson, etan ciferon, kiu montras, en kiu leciono la vorto aperis la unuan fojon.

La lernolibro prilaboras la plej gravajn prepoziciojn kaj afiksojn, la problemon de -ig, -iĝ, participojn kaj refleksivon, kaj multajn ĉiutagajn paroltemojn, kiel familio, aĉetumado, homa korpo (eĉ dufoje), tagordo, naturo, sezonoj-tempoj, kalendaro ktp. La tekstoj estas priskribaj, monologaj kaj inter la didaktikcelaj materialoj legeblas ankaŭ proverboj, kelkaj fabeloj kaj literaturaĵoj.

La ekzercoj legigas, skribigas, respondigas kaj atentigas pri parkerigindaĵoj. Utila parto estas la librofina parto „La ĉiutaga Esperanto“, en kiu troveblas laŭtemaj listoj de plej oftaj parolturnoj de la lingvo. Kvankam ene de la libro ne troveblas informoj pri la movado, antaŭ la ferma enhavtabelo aperas listo de utilaj naciaj kaj internaciaj retejoj.

Kaj ankoraŭ unu freŝa novaĵo: Inspirita de la aŭstralia koresponda kurso, kiu uzas mian lernolibron *Esperanto by Direct Method*, mi lanĉis en Slovakio Korespondan kurson de Esperanto por

komencantoj. Ĝi baziĝas sur mia lernolibro "Esperanto priamou metódou" (slovaka versio de "Esperanto per rekta metodo"). Informo pri la kurso troviĝas sur la retpaĝaro de Slovaka Esperanto-Federacio: <http://www.esperanto.sk>.

La materialoj, kiujn per poŝto ricevas la aliĝinto, konsistas el:

- Papera dosierujo A4 kun kolora kovrilo (vidu la bildon)
- La lernolibro "Esperanto priamou metódou"
- La KD "Modela elparolo" (3-hora registraĵo kun voĉlegitaj E-tekstoj de la lernolibro)
- Instrukcioj kiel uzi la kurson kaj skribaj taskoj por la lecionoj 1 ĝis 7 (la ceterajn ricevados la kursanoj rete).

Pri la koresonda kurso jam ekinteresiĝis la kolegoj el Pollando kaj Danio. La rezulto estas ke ankaŭ en tiuj du landoj estas lanĉitaj similaj korespondaj kursoj.



Leszek Piekut
(Plock, Pollando)

Renoviĝeblaj fontoj de energio - ŝanco kaj defio

De komenco de sia estado, homaro, por realigi siajn vivnecesajn bezonojn estis devigata uzi naturajn provizojn kaj transformi la naturon. La natura medio estas sola fonto de energiaj krudaĵoj, de akvo kaj de nutraĵoj, pro tio homoj estas senlime dependaj de la natura medio. Rilato de la homo al la naturo estis kaj estas reflektado de grado de publika konscio kaj formiĝantaj sociaj kaj ekonomiaj rilatoj. Komence homoj utiligis naturaĵojn nur en minimumaj kvantoj, kiuj satigis iliajn tiamajn bezonojn. Tamen jam tiam ekestis bezono de protekto de iuj elementoj de naturo. Kreiĝis la ideo de diigo de la naturo.

Dum la tempopaso la situacio transformiĝis. Turnopunkto en intenseco de ekspluatado de la naturaj provizoj sekvis en la XIX jarcento kune kun forta plirapidiĝo de evoluo de tekniko kaj signifa pligrandiĝo de la nombro de loĝantaro de la tero. Kaŭzita per la deknaŭjarcenta kapitalismo tempo de progreso en mastrumado necesigis pli vastan akiron de la naturaj provizoj. Komenciĝis intensa kaj videbla ekspluatado de ili. Drasta malgrandigado de naturprovizoj ligita kun la progreso de industrio kaŭzis misformigon kaj degradon de iliaj valoroj.

Nuntempe malfacile imagebla estus la vivo sen uzado de la elektra energio, kiu estis, estas kaj estos necesa por la homoj en ilia vivo. Profitigo de la elektra energio povas esti diversa, antaŭ ĉio ni bezonas ĝin ĉe industria produktado, transporto, hejtado aŭ lumigado.

Komence energion liveradis natura medio en formo de naturaj stokoj de netransformitaj brulmaterialoj kiel ekzemple ligno, karbo, lignito, petrolo aŭ gaso. Tamen konstante kreskanta bezono por energio, malgrandigado de stokoj de naturaj energikrudmaterialoj same kiel ekologiaj kaj ekonomiaj motivoj starigas antaŭ homoj novajn taskojn kaj defiojn. Precipe en la lastaj jaroj oni serĉas novajn, efektivajn metodojn de obtenado de la elektra energio el tiaj renoviĝeblaj fontoj de energio kiel radiado de Suno, movo de akvo aŭ natura varmo de eno de Tero. Avantaĝoj kaj atrakcieco de tiuj fontoj de la energio ĉiam pli forte estas ekkonsciataj de iliaj uzantoj. Energio estas unu el la plej gravaj materiaj vivbezonoj de homoj kaj ludas gravan rolon en certigo de ekonomia kaj sociala ekvilibro de la mondo. Nivelo de kulturo, civilizacio, ekonomia stato de mondo kaj de individuaj landoj dependas de produktado kaj ekspluatado de la energio. Kreskanta kvanto de loĝantaro de Tero kaj soci-ekonomia progreso kaŭzas pligrandiĝantan mendon por la energio. Konsidere al kreskanta minaco ligita kun ŝanĝoj de la klimato oni devas strebi al eble la plej vasta aŭ eĉ universala aplikado de renoviĝeblaj fontoj de la energio. Je nocio “energio devenanta el renoviĝeblaj fontoj” ni komprenu energion de ventoj, sunradiado, movo de akvo en maroj kaj riveroj, varmegan akvon el eno de Tero kaj energion de biogaso, kiu estas akirata el biologiaj substancoj en procezoj de iliaj forbrulado aŭ putrado.

Nuntempe en Pollando energio devenanta el renoviĝeblaj fontoj estas akirata en malgranda grado. Ĝia partopreno en la tuta eluzo de la energio estas ĉirkaŭ 4,5%. Dum la tempo de la “Dua Pola Respubliko” do ekde 1918 ĝis 1939j. en Pollando ekzistis relative multaj instalaĵoj profitigantaj energion de vento aŭ energion de movanta akvo kiel akvomueliloj aŭ ventomueliloj, segejoj kaj eĉ malgrandaj elektroprovizaj instalaĵoj eluzantaj tiuspecan energion. Dum la germana okupado inter jaroj 1939-1945 kaj poste dum la periodo de komunisma reĝimo (1945- 1989) tiuj instalaĵoj estis intence preskaŭ totale detruitaj, pro ideologia malamikeco al polaj privataj produktiloj.

Nur post la ŝanĝo de la politika sistemo, do en la dua duono de la naŭdekaj jaroj de la dudeka

jarcento oni eknotis eksplicitan kreskon de eluzo de la energio devenanta el renoviĝeblaj fontoj. Tiam investistojn kaj produktistojn de instalaĵoj apogis financaj institucioj subtenantaj porekologian agadon kaj lokaj aŭtonomiaj aŭtoritatoj respondecaj pro energia planado sur loka nivelo. Nur en oktobro de la jaro 2005 oni enkondukis kompleksan sistemon de helpo al la produktado de la energio el renoviĝeblaj fontoj. De tiu ĉi momento oni notas konstantan, dinamikan plimultiĝon de produktado de la “verda energio”.

Energetikaj sistemoj tiel en Pollando kiel en multaj landoj de la mondo egale en sektoro de amasaj kiel individualaj ricevantoj de la elektra aŭ varmuma energio baziĝas nun antaŭ ĉio sur elfoseblaj brulmaterialoj. Karbo, tergaso kaj nafto kovras nuntempe 80 % de energibezonoj. Konataj rezervoj de tiuj materialoj, ĉe aktuala tempo de elfosado, sufiĉos, kiel oni taksas, por ĉirkaŭ cent jaroj, tial en la lastaj jaroj oni intensivigis same en Pollando kiel en la tuta mondo sciencajn esplorojn de profitigado de la renoviĝeblaj fontoj de energio (RFE). Laŭ taksado, en tutmonda skalo la renoviĝeblaj fontoj de energio en esenca grado estas pli grandaj ol stokoj de la tradiciaj portiloj de energio tamen pro tre multaj diversaj kondiĉoj, nur parto de ili estas aktuale utiligata en praktiko.

Partopreno de la renoviĝeblaj fontoj de energio en bilancoj de la uzata energio en apartaj landoj estas tre diversa. En Eŭropo la plej altan gradon de eluzo de renoviĝeblaj fontoj de energio oni notas en Svedio, Aŭstrio, Finnlando kaj Portugalio kaj la plej malaltan en Britujo kaj Belgio. Kun la celo pligrandigi partoprenon de la renoviĝeblaj fontoj de energio en ĉiuspeca konsumo de la energio kaj brulmaterialoj en Eŭropa Unio oni akceptis en 1997 dokumenton “Blanka Libro – Energio por Estonteco - Renoviĝeblaj fontoj de energio”. Oni akcentis en ĝi, ke baza avantaĝo ligita kun profitigado de la renoviĝeblaj fontoj de energio estas kreskado de la energetika sekureco. Oni prognozis en tiu dokumento, ke partopreno de la renoviĝeblaj fontoj de energio en bilancoj de uzata energio en 2010 jaro atingos 12% (de elektra energio mem - 7,5 %) kaj partopreno de la renoviĝeblaj fontoj de energio nur en produktado de la elektra energio kreskos en 2010 jaro el 14,3 % ĝis 23,5 %. Oni prognozis ankaŭ, ke produktado de la varmumenergio pligrandiĝos pli ol duoble kaj eluzo de la renoviĝeblaj fluaj brulmaterialoj eĉ sesdekoble.

La celo de proponitaj per Eŭropa Unio solvoj estis antaŭ ĉio venko de malfacilaĵoj en la pligrandigado de uzo de la renoviĝeblaj fontoj de energio. Membrolandoj de Eŭropa Unio ankaŭ estas devigitaj enkonduki jurajn, financajn kaj impostajn regulojn plifaciligantajn kreskon de la energetiko bazita je la renoviĝeblaj fontoj de energio. Racia strategio de la energetika loka mastrumado estas ŝanco tiel por kreskado de partopreno de la renoviĝeblaj fontoj de energio en energetika bilanco, kiel ankaŭ por pli dinamika kresko de ekonomia progreso kaj plibonigo de vivkondiĉoj de lokaj civitoj. Necese enkonduki en Pollando eŭropajn energetikajn regulojn, kaj precipe neceso de limigado kaj malgrandigado de liverado de energio el eksterlando, pligrandigo de efikeco de utiligado de la energio, bezono de ŝparo de la energetikaj krudmaterialoj kaj ankaŭ plibonigo de la stato de la natura medio, kaŭzas pligrandigon de interesigo por energio el netradiciaj fontoj. Esencan signifon en tiu problemo havas internaciaj sindevigoj de Pollando en la sfero de gardo de aero, precipe rezultantaj el la Kadra Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Afero de Ŝanĝoj de Klimato kaj la Protokolo el Kioto al tiu konvencio, kiu devigas Pollandon al redukto de emisio de varmigaj gasoj je ĉirkaŭ 6% ĝis la jaro 2012 rilate al la jaro 1988.

Pritakso de graveco de akirado de la energio el renoviĝeblaj fontoj havas tutmondan signifon. Pritakso de la lokaj fontoj de tiu energio estas la loka problemo. Eksploatado de la renoviĝeblaj fontoj de energio en iu ajn regiono povas esti agado de privataj investistoj, kiuj interesiĝas pri tiaspecaj entreprenoj aŭ agado gvidata per aŭtonomiaj estraroj, kiuj realigas investadon, modernigadon aŭ ankaŭ komercan agadon sur sia teritorio.

La renoviĝeblaj fontoj de energio formas gravan elementon, kiu povas esti enkadrigita en projektoj de la loka evoluo. Tio rezultas same el postuloj de leĝo kiel ankaŭ el profitoj akireblaj per konsidero de la renoviĝeblaj fontoj de energio en energetikaj planoj.

Realigado de tiuj agadoj donos evidentajn profitojn, kiel profitojn por medio, kiuj efikos per plibonigo de kvalito de vivkondiĉoj kaj stato de sano de loĝantoj. Signifaj estos ekonomiaj profitoj

kaŭzitaj per ŝparo de la energio. Al la sociaj profitoj oni enkadrigu kreadon de novaj laborlokoj per realigado de investaĵoj per lokaj fortoj kaj, per uzado de lokaj fontoj de energio, utiligado de terenoj pli frue neuzablaj kaj pro tio ne alportantaj profitojn al siaj propruloj.

Planado de la disvolvo de investaĵoj en kadro de la renoviĝeblaj fontoj de energio estas ankaŭ grava lige kun atavdata ŝanĝo de la prezoj de brulmaterialoj. Planado de investaĵoj aŭ modernigado de varmigaj sistemoj estas plej ofte farata surbaze de la aktuala nivelo de la prezoj de energiportiloj kaj tio kaŭzas grandajn malfacilaĵojn okaze de signifaj ŝanĝoj de prezoj de energiportiloj. Oni rajtas esperi ke verŝajne prezoj de lokaj biobrulmaterialoj ne ŝanĝiĝados tiel forte pro ilia loka deveno kaj nedependeco de la tutmonda merkato.

La plej malnova kaj la plej vaste nun uzata renoviĝebla fonto de energio estas biomaso. Laŭ difino de Eŭropa Unio la termino „biomaso” signifas biologiajn produktojn, plantajn kaj animalajn kaj aliajn produktojn malkomponigeblajn biologie. Speciale por akiradi biomason oni kultivas plantojn, ekzemple kanon, volvsalikon kaj poligonon. Por tiuj kultivaĵoj estas speciale oportunaj plantoj, kiuj havas grandan plimultiĝon de la maso kompare kun malgrandaj kreskotempo kaj postuloj de grundo.

Biomaso estas verŝajne la plej frue konata por homoj energiportilo. Ĝi estas uzata de la tempo, kiam homoj ekposedis la misteron de fajro. Biomaso ne influas la kvanton de varmigaj gasoj en la atmosfero, ne emisias nocivajn forbrulaĵojn, nur tre malgrande pligrandigas la kvanton de sulfurdioksido. Pro tio biomaso estas tre pura kaj facile alirebla natura energifonto, tria en la mondo koncerne la kvanton de naturaj energifontoj.

Diversaj specoj de biomaso havas diversajn ecojn. Por energetikaj celoj oni profitigas lignon kaj restaĵojn el ĝia prilaborado, plantojn el porenergetika kultivado, organikajn industriajn restaĵojn, agrokulturajn kaj municipajn. Ju pli seka kaj densa estas biomaso des pli valora ĝi estas kiel brulmaterialo. Ekzemple tre valora brulmaterialo estas briketo produktata el dispecigitaj lignaj restaĵoj. Plinobligitan brulmaterialon, ekz. briketojn oni akiras tra sekigado, muelado kaj premado de biomaso.. Kosto de varmigado per uzo de tiu brulmaterialo estas nuntempe pli malgrandaj ol kosto de varmigado per uzo de hejtoleo.

Biomaso ekzistas en diversaj aglomerstatoj. Krom biomaso-solidaĵo ekzistas ankaŭ biomaso en formoj likvaj kaj gasaj. Apud purigejoj de elfluaĵoj kaj sur deponejoj de forĵetaĵoj, tie, kie putriĝas organikaj rekremento ekzistas biomaso kiu ĉefe estas miksaĵo de metano kaj bioksido de karbo, ĝi estas ankaŭ nomata marĉa gaso. Ĝi ekestas dum senoksigena fermentado de organikaj substancoj, povas esti profitata interalie por la produktado de elektra energio en turbinoj aŭ varmenergion en kaldronoj.

Grava estas ankaŭ la fakto, ke utiligo de metano, kiu estas varmiga gaso, ŝirmas kontraŭ ĝia emisio al atmosfero. Kaj ju malpli da varmigaj gasoj en la atmosfero, des pli malgranda la intenseco de la varmiga efekto, do des malpli ligitaj kun la tergloba plivarmigado kaj malavantaĝaj ŝanĝoj de la klimato. Nuntempe en Pollando la biomaso utiligata en la energetika industrio devenas el du branĉoj de la mastrumado: el agrokulturo kaj forstokulturo.

Konvene preparita biomaso havas altan valoron kiel brulmaterialo. Spite al populara opinio ĝi estas produktiva. Du tunoj de seka biomaso - pajlo aŭ ligno - donas la saman kvanton de energio kiel unu tuno de la karbo. Varmigado per la uzo de biomaso estas malpli kosta je 50-70%. Restituo de elspezoj je konformaj instalaĵoj ekestis dum la lastaj 2- 4 jaroj. Biomaso kiel amasaĵbrulmaterialo povas esti uzata por produktado de elektra energio, same en individuaj kiel en amasaj varmigsistemoj kaj ankaŭ en konvenaj turbinoj en elektrocentraloj. Biomaso post konvena preparado (sekigo kaj formigo) estiĝas konkurenca rilate al ĉiuj nuntempe alireblaj specoj de brulmaterialoj.

Tutmonda produktado de biomaso estas taksata je 146-200 miliardoj da tunoj jare. Usono profitigas la renoviĝeblan energion en kvanto ĉirkaŭ 7,5 % de sia tuta energetika bilanco. Inter tiuj fontoj de energio, biomaso okupas duan lokon (43%) post la energio de fluanta akvo, superante la sunan energion, la energion de ventoj, la energion elfosatan el eno de tero (ekz. kiel varma akvo, gejseroj).

En Usono oni planas triobligon de la energetika utiligo de biomaso ĝis 2010 jaro kaj pli ol dekfojan pligrandigon de la uzo de bioenergio ĝis la jaro 2020. Analizo farita per UNGED (Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj por Medio kaj Progreso) taksas, ke biomaso povas kovri ĉirkaŭ 50 % de tutmonda energi-bezono jam en la jaro 2050.

Biomaso estas unusola organika substituaĵo de nafto, kiu estas renoviĝebla. Membroŝtatoj de la Eŭropa Unio kiel ekzemple Aŭstrio, Belgio, Francio, Germanio, Italio, Portugalio kaj Hispanio uzas ankaŭ aliajn likvajn biobrulmaterialojn (ekzemple sunfloran oleon).

Laŭ taksaj prognozoj en Nov-Zelando kaj kelkaj aliaj landoj, la bioenergio kun la energio de ventoj kaj la energio de fluanta akvo kaŭzos plenan kovron de ilia bezono por energio ene de la sekvaj 26 jaroj. Raportoj el Britio, Svedujo, Nov-Zelando kaj kelkaj membrolandoj de la Eŭropa Unio ankaŭ indikas je ĉiam pli granda uzado de biomaso. Utiligado de biomaso, konsiderante ekologiajn, tekonologiajn kaj ekonomiajn restriktojn estis aprobata en Svedio per la ŝtata komisiono por energetiko jam en la jaro 1995.

Nuntempe ankaŭ en Pollando estas gvidataj sciencaj esploroj koncerne eblecoj de utiligado de biomaso por energetikaj celoj kaj pri influo de tiu agado por la natura medio.

Esperantigis *Bronisław Kieres* (2009)



Andrzej Pisowicz

(Uniwersytet Jagielloński, Kraków, Pollando)

Esperanto kiel ŝanco por la kaŭkaza regiono? (memore al la Profesoro Gurgen Sevak)

La termino „Kaŭkaza regiono” en ĉi tiu teksto havas larĝan signifon, kiel teritorio situanta norde kaj sude de Kaŭkazo – la montĉeno pli alta ol 5000 metroj, prezentanta la naturan limon inter Eŭropo kaj Azio. La Kaŭkaza montokresto mem, certe ankaŭ konstituas tiun regionon kaj ĝi estas la interna linio, kiu dividas ĝin disde la teritorioj de Norda kaj Suda Kaŭkazio.

La tuto de la Kaŭkaza regiono estas difinita ne nur laŭ la geografio, sed ankaŭ laŭ la politiko. Temas pri teritorio, kiu apartenis integre, ekde la komenco de la 19a jarcento ĝis la jaro 1918 al Rusio, kaj inter la jaroj 1929 kaj 1991 al Sovetunio. Nun la Norda Kaŭkazio situas en la teritorio de Rusa Federacio. Tiun teritorion konstituas la respublikoj, kies nomoj estas ligitaj al etnaj grupoj loĝantaj en la respektiva tereno. Tiel progresante de okcidento al oriento, situas proksime unu al la alia la jenaj administraciaj unuoj de Rusa Federacio (nomitaj respublikoj): Adigeio, Karaĉajio-Ĉerkesio, Kabardio-Balkario, Nord-Osetio (Alanio), Inguŝio, Ĉeĉenio, Dagestano.

La teritorio de Suda Kaŭkazio estas dividita al tri sendependaj ŝtatoj: Kartvelio, la Azerbajĝana Respubliko kaj la Armena Respubliko. Kontraŭe al la du unuaj, la tria ŝtato ne samlimas kun la Rusa Federacio kaj ne kuntuŝiĝas kun la kaŭkaza montokresto.

La tri ŝtatoj de Suda Kaŭkazio estas homogenaj nek etnografie nek politike. En Kartvelio troviĝas tri regionoj, pri kiuj post la falo de Sovetunio (1991) daŭris konfliktoj, eĉ militoj inter kartveloj kaj la loka loĝantaro subtenata de Rusio, kiu deziris konservi influon en la teritorio elglitiĝanta el sia kontrolo. Tiuj regionoj estas: Abĥazio (la nord-okcidenta parto de Kartvelio), Sud-Osetio (en la sudaj deklivoj de la centra parto de Kaŭkaza montaro) kaj Aĝario (la sud-okcidenta parto de Kartvelio). La du unuaj el la menciitaj regionoj proklamis, kun la subteno de Rusio la sendependecon post la rusa-kartvela milito de aŭgusto 2008. Kontraŭe, Aĝario post dekelkajara periodo de fakta sendependeco de centraj aŭtoritatoj de Kartvelio, nun agnoskas apartenon al tiu ŝtato kaj estas kontrolata de la registraro en Tbiliso (la ĉefurbo de Kartvelio).

La Azerbajĝana Respubliko konsistas el la ĉefa parto kun la ĉefurbo Bakuo kaj el malgranda enklavo situanta okcidente de la ĉefa parto de la ŝtato, inter Armenio kaj Irano. Tiu enklavo oficiale nomiĝas: Aŭtonoma Naĥiĉevana Respubliko. Ĝia ĉefurbo estas Naĥiĉevano.

En la okcidenta parto de Azerbajĝano situas regiono nomita Montara Karabaĥo kun ĉefurbo Stepanakert (la azerbajĝana nomo de tiu urbo estas *Chankendi*). Post la milito okazinta en la jaroj 1993-94 la lokaj Armenoj, kiuj konsistigas konsiderindan plimulton de la tiea loĝantaro, proklamis la sendependecon de Respubliko de Montara Karabaĥo, ne agnoskita formale de iu ŝtato, sed fakte aliancita kun la Armena Respubliko. Sub la kontrolo de Armenoj el Montara Karabaĥo restas iuj regionoj ĉirkaŭigantaj ĝin, kiel ekzemple la tiel nomata „Laĉina koridoro” (kun la urbo Laĉin). Tiu distrikto, kiu formale estas armena enklavo, dank’ al la Laĉina koridoro, fakte samlimas kun la teritorio de la Armena Respubliko, kies ĉefurbo estas Erevano (armene: Jerevan). En la tereno de Armena Respubliko mem ne estas iu politike disputebla teritorio.

La politikaj limoj dividantaj la regionon de Kaŭkazo disde la respublikoj de Norda Kaŭkazio, apartenantaj al Rusa Federacio, kaj la tri sendependaj ŝtatoj de Suda Kaŭkazio nur pli malpli kongruas kun la etnaj limoj. Kaj tiuj lastaj ligiĝas kun la lingva aparteco de specifaj nacioj kaj etnaj grupoj. Etne kaj lingve la regiono de Kaŭkazo estas escepte komplika tereno. En la teritorio de ĉirkaŭ 300 mil kvadrataj kilometroj (do preskaŭ tiel granda kiel ekzemple Pollando) loĝata de ĉirkaŭ 16 milionoj da homoj, estas uzataj pli-malpli 50 diversaj lingvoj. Sekve, tio estas la regiono, en kiu devus esti uzataj lingvoj kun transnacia statuso, uzataj dum reciproka komunikado inter la loĝantaraj grupoj, kiuj

parolas en sia propra medio la propran lingvon. Antaŭ ol ni proponos propagandi Esperanton kiel lingvon, kiu povus anstataŭi la rusan, funkciantan ĝis antaŭ nelonge kiel *lingua franca*, ni rigardu de pli proksime la aktualan lingvan situacion de la Kaŭkaza regiono.

La plej grandan lingvistikan makro-grupon de la Kaŭkaza regiono konsistigas ibero-kaŭkazaj lingvoj. La unua parto de tiu nomo ligiĝas kun la antikva Iberio, lando situanta en la centro de Kartvelio (nuntempe: Kartlia). Tiu makro-grupo konsistas el ĉirkaŭ 40 lingvoj (kiel supre menciite, en la Kaŭkaza regiono oni parolas ĉirkaŭ 50 lingvojn).

La komuna origino de la ibero-kaŭkaziaj lingvoj ĝis nun ne estis pruvita, do rilate al tiuj lingvoj ni ne uzas la terminon „lingva familio”, kiu ampleksas lingvojn parencajn unu al la alia, kaj devenatajn el unu pralingvo (tian familion konstitigas ekzemple la hindoeŭropaj lingvoj).

En la sfero de la ibero-kaŭkazia makro-grupo oni povas distingi tri grupojn:

1. okcident-kaŭkaziaj lingvoj (alie: Abĥazo-Adiga grupo)
2. orient-kaŭkaziaj lingvoj (alie: Ĉeĉeno-Dagestana grupo) kun du subgrupoj:
 - a) centra (Naĥa) kaj
 - b) nord-orienta (Dagestana)
3. sud-kaŭkaziaj lingvoj (alie: Kartvela grupo)

Jen pli detala revizio de la specifaj grupoj.

Al la unua apartenas la lingvoj: abĥaza (uzata en Abĥazio – Nord-Okcidenta Kartvelio), abaza (en Karaĉaj-Ĉerkesio), adigea (en Adigeio) kaj kabardio-ĉerkesa (en Kabardio-Balkario kaj Karaĉaj-Ĉerkesio).

La dua grupo konsistas el du subgrupoj. La Centra subgrupo (Naĥa) ampleksas la proksime parencajn lingvojn: la ĉeĉenan (origine: *noĥĉi*) kaj inguŝan. La Nord-Orienta grupo (Dagestana) ampleksas multajn lingvojn, el kiuj la plej gravaj estas: avara, lezga, laka, dargana kaj tabasarana.

En la tria grupo (Kartvela) dominas la kartvela lingvo (origine: *kartuli ena*). La parencaj kun ĝi estas la lingvoj: megrela kaj svana, uzataj parole de konforme nomataj (Megrel, Svan) subetnaj grupoj en la sfero de la kartvela nacio. Megreloj loĝas en Okcidenta Kartvelio, en parto de la teritorio de antikva Kolĥido. Kontraŭe, svanoj loĝas alte en la montaroj, en la regiono de Kartvelio kiu nomiĝas “Megrelia kaj Supra Svanetio”, situanta rekte oriente de Abĥazio. Skribe megreloj kaj svanoj uzas la kartvelan (kiun, kompreneble, ili scipovas ankaŭ parole).

Al la homogenaj skriba versio de la kartvela literatura lingvo, en individuaj regionoj konformas pluraj senskribaj dialektoj. Unu el ili estas uzata de Aĝaroj, kies prauloj apartiĝis el la kartveloj sekve de akcepto de islamo. Skribe Aĝaroj uzas la kartvelan lingvon.

Laŭ la nombro de la loĝantaro uzanta respektivan lingvon, en la sfero de la ibero-kaŭkazia makro-grupo, plej gravas la kartvela, parolata de ĉirkaŭ kvar milionoj kaj duono da homoj. La duan pozicion okupas la ĉeĉena (ĉirkaŭ 900 mil uzantoj), kaj la trian – la avara (pli ol duonmiliono da uzantoj).

Se temas pri literaturaj tradicioj, nur la kartvela estis notita skribe jam en la antikva tempo: ekde la kvina jarcento, lige kun la akcepto de kristanismo en Kartvelio en la unua duono de la kvara jarcento. Ĝis hodiaŭ kartveloj uzas la originalan propran skribaĵon, kiu nuntempe estas bazata sur 33 literoj (sen distingo de majuskloj kaj minuskloj). Tiuj literoj aspekte estas similaj nun al malgrandaj rondetoj (en la antikva tempo ili estis pli precize dirite krudrande-rektangulaj).

La aliajn lingvojn de la ibero-kaŭkazia makro-grupo oni komencis noti nur en la 20a jarcento. Tiuj lingvoj uzas la kirilan alfabeton (la rusan skribon) kompletigitan per suplementaj signoj servantaj por noti konsonantojn nekonatajn en la rusa (antaŭ ĉio temas pri la tiel nomataj glotizitaj konsonantoj).

Iuj lingvoj, uzataj de malgrandaj etnaj grupoj, ĝis hodiaŭ ne estas notitaj skribe, kiel ekzemple la ĥinaluga lingvo, parolata de apenaŭ du mil homoj. Ĝiaj uzantoj skribe utiligas aliajn lingvojn, ekzemple la loĝantoj de la vilaĝo Ĥinalug, kiuj nomas sin *ketŝ*, interparolas kun si ĥinaluge, kaj por kontaktoj kun aliaj nacioj, ili uzas ĉefe la azerbajĝanan el la tjurka grupo (vidu sube). Por multaj el ili, la azerbajĝana iĝas preskaŭ la gepatra lingvo.

La ibero-kaŭkaziaj lingvoj konsistigas la plej malnovan lingvan tavolon de la Kaŭkaza regiono. Post ili, en la unua jarmilo antaŭ Kristo en tiu teritorio aperis lingvoj apartenantaj al la hindeŭropa familio, kiu ampleksas interalie la latinidajn, ĝermanajn, slavajn, la grekan, kaj la tiel nomatajn ariajn

lingvojn: hindariajn kaj iranajn.

Kronologie la unua hindeŭropa lingvo en la Kaŭkaza regiono estis la armena (origine: *hajeren*) notita skribe komence de la 5a jarcento lige kun la akcepto de kristanismo inter armenoj komence de la 4a jarcento. Armenoj uzas la originalan alfabeton prilaboritan de la monako Mesrop Maŝtoc proksimume en la jaro 400. Tiu alfabeto nombras nun 38 literojn (majusklojn kaj minusklojn), baziĝantajn sur krudrandaj (ofte rektangulaj) formoj.

La armena lingvo apartenas al la hindeŭropa familio, kiel ĝia unika, izolita elemento, simile kiel ekzemple la greka. Alivorte, kaj la greka kaj la armena ne havas iujn proksimajn lingvajn “parencojn” kaj estas ligitaj al la ceteraj hindeŭropaj lingvoj pli malproksime ol ekzemple la slavaj lingvoj inter si.

La nombro de armenoj en la mondo, konsiderante amasan elmigradon el Turkio (post la genocido, kies viktimo iĝis konsiderinda parto de la armena loĝantaro de tiu ŝtato en 1915) verŝajne sumiĝas je pli ol ses milionoj da homoj. En la Armena Respubliko loĝas ĉirkaŭ tri milionoj da ili.

La hindeŭropaj lingvoj, kiuj apartenas al la irana subgrupo (en la sfero de tiel nomataj ariaj lingvoj) estas interalie: la oseta kaj la kurda. La osetan parolas ĉirkaŭ 600 mil osetoj en la nordaj kaj sudaj deklivoj de la centra Kaŭkaza montaro. Ili nomas sin mem *iron*, kaj sian lingvon: *iron ævzag* (*aevzag*). Ili estas posteuloj de la antikvaj skitoj kaj mezepokaj alanoj, kiuj antaŭ la fino de la unua jarmilo de la kristana erao loĝis norde de Kaŭkazo, en stepoj de Ukrainio kaj Suda Rusio.

La dua el la iranaj lingvoj de la Kaŭkaza regiono estas la kurda (origine: *kurdi*), uzata de kurdoj kaj jezidoj (religia grupo) en Armenio. Ili uzas, simile kiel osetoj, la rusan skribon.

La hindeŭropa lingvo, kiu en la Kaŭkaza regiono de antaŭ ducent jaroj ludas grandegan rolon, estas la rusa. Ĝis hodiaŭ ĝi estas la oficiala lingvo en la Rusa Federacio, al kiu apartenas la respublikoj de Norda Kaŭkazio. Ĝis 1991 ĝi estis ankaŭ la oficiala lingvo, paralele al la kartvela, azerbajĝana kaj armena, en Kartvelio, Azerbajĝano kaj Armenio, kiuj estis la uniaj respublikoj konsistigantaj Sovetunion.

La ruslingva enmigrinta loĝantaro ne konsistigas plimulton en la Kaŭkaza regiono, sed la rusa lingvo ĝuas tre altan kulturen prestiĝon kaj estas uzata grandparte kiel la baza lingvo de interkompreniĝo por la loĝantoj de la Kaŭkaza regiono, kiuj uzas diversajn lokajn lingvojn. En la tuta Kaŭkaza regiono ekzistas ruslingvaj lernejoj, en kiuj kleriĝas ne nur la junularo parolanta ĉiutage ruse, sed ankaŭ pluraj uzantoj de aliaj lingvoj. Unu el la kialoj de tiu situacio estas la fakto, ke la rusa lingvo – kontraŭe al la lokaj lingvoj – certigas aliron al la monda literaturo, egale al beletraj kaj scienca literaturo (teknikaj, medicinaj studoj ktp.)

Post la hindeŭropa, la sekva tavolo de lingvoj, kiuj aperis dum jarcentoj en la Kaŭkaza regiono, estas – sufiĉe parencaj unu al la alia – la tjurkaj lingvoj. Laŭ la nombro de la uzantoj kaj prestiĝo, la plej grava inter ili estas la azerbajĝana, la oficiala lingvo de Azerbajĝana Respubliko. Ĝis la komenco de la 20a jarcento, la Kaŭkazaj azerbajĝanoj (tiam nomataj „Kaŭkazaj tataroj”) uzis la araban skribon, same kiel iliaj parencoj – turkoj. Dum la periodo de Sovetunio, por noti la azerbajĝanan oni uzis komence la latinan skribon, kaj sekve – la rusan. Ekde la komenco de la 21a jarcento azerbajĝanoj uzas denove la latinan alfabeton, en la versio modelita laŭ la turka alfabeto (uzata en Turkio).

Azerbajĝanoj estas la plej multnombra nacio de la Kaŭkaza regiono. Ilia suma nombro estas taksita je ĉirkaŭ 23 milionoj da homoj. El tiu nombro, preskaŭ 8 milionoj loĝas en Azerbajĝana Respubliko kaj la ceteraj 15 milionoj en Nord-Okcidenta Irano.

Al la tjurka lingvaro – krom la azerbajĝana – apartenas kelkaj lingvoj de Norda Kaŭkazio: karaĉaja (en Karaĉajio-Ĉerkesio), balkara (en Kabardio-Balkario) kaj kumika (en Dagestano).

Al la supre prezentita etno-lingva klasifiko de la Kaŭkaza regiono surmetiĝas religiaj subdividoj. Kristanoj estas (krom rusoj) kartveloj (ne kalkulante la muzulmanajn aĝarojn), armenoj kaj ankaŭ la plimulto de osetoj kaj parto de abĥazoj. Krom armenoj, tiuj kristanoj estas ortodoksoj. Kontraŭe, armenoj apartenas al Armena Apostola Eklezio, kiu ne estas parto de la grupo de ortodoksaj eklezioj.

Osetoj, kiuj parolas digoran dialekton estas muzulmanoj, simile kiel la cetero de loĝantaro de la Norda Kaŭkazio (kompreneble krom rusoj) kaj parto de abĥazoj. Azerbajĝanoj estas ankaŭ muzulmanoj.

Kiel menciite supre, ĝis antaŭ nelonge la rusa ludis la oficiale rolon de interetna lingvo en la Kaŭkaza regiono, kaj nuntempe ankaŭ ludas la saman rolon, sed ne ĉiam oficiale. Tamen okazas

esceptoj de tiu regulo. Ili rilatas al etnaj grupoj, kiuj interkontaktiĝis jam antaŭ la anekso de la Kaŭkaza regiono al Rusio, do antaŭ la 19a jarcento.

Ekzemple armenoj loĝantaj en la teritorio de la nuna Azerbajĝana Respubliko, por kontaktoj kun azerbajĝanoj ofte uzis la azerbajĝanan anstataŭ la rusan. Azerbajĝane ofte interparolas ankaŭ uzantoj de diversaj ibero-kaŭkaziaj lingvoj de la Dagestana grupo.

Kurdoj en Armenio parolis kaj plu parolas kun armenoj ĉefe en la armena, la lingvo kiu iĝis por ili la dua post la gepatra (la tria ofte por ili estas la rusa).

Ĝis antaŭ nelonge armenoj, kiuj loĝas en la distrikto Ĝavaĥeti en la Suda Kartvelio, por kontaktoj kun kartveloj uzis la rusan, kaŭze de ilia nesufiĉe bona scio de la kartvela. Tiu situacio lastatempe perturbiĝis. La kartvelaj aŭtoritatoj komencis uzi la kartvelan por la korespondo kun lokaj armenaj aŭtoritatoj de Ĝavaĥeti. Tio vekas malkontenton de la armena loĝantaro kaj intensigas la separatisman agordon: la ideon pri anekso de tiu distrikto al Armenio.

Laŭ tiu ekzemplo oni vidas, ke la valoro de la rusa lingvo kiel *lingua franca* malaltiĝas en la Kaŭkaza regiono. Tiun proceson akompanas samtempa la kreskanta rolo de la angla kiel internacia lingvo, precipe en la sendependaj ŝtatoj de la Suda Kaŭkazio. Dum la lastaj jaroj kreskis la politikaj influoj de Usono en Kartvelio kaj Azerbajĝano. En Kartvelio tio rilatas al la tendencoj de tiu ŝtato por serĉi en la Nord-Atlantika Traktat-Organizo kontraŭpezon kontraŭ la dependeco de Rusio. En Azerbajĝano la influoj de Usono rilatas al la interesiĝo de amerika kapitalo pri la petrola riĉo de tiu lando kaj al ĝia najbareco al la malamika, kontraŭusona – Irano. Kontraŭe, en Armenio kvankam la simpatioj de la aŭtoritatoj estas orientitaj al Rusio, la rolon de la angla lingvo kreskigas en tiu lando intensaj kontaktoj kun armena emigracio, kiu multnombro loĝas en Usono (precipe en Kalifornio).

En tiu situacio de la malkreskanta rolo de la rusa lingvo en la Suda Kaŭkazio, kaj ankoraŭ rilate la malaltnivelan scipovon de la angla en la tuta Kaŭkaza regiono, la ŝanco por disvastigo de Esperanto kiel interetna lingvo povas kreski, kondiĉe ke estos subtenata per agado de influaj centroj de aŭtoritato kaj edukado. Tiaj valoroj de Esperanto, kiaj estas la neŭtraleco kaj facileco de lernado, povas montriĝi konkurencaj al la proponoj de altrudado de la kartvela lingvo, tre malfacila por fremduloj, en rilatoj de aŭtoritatoj de tiu ŝtato kun abĥazaj, osetaj aŭ armenaj separatistoj.

Tia ŝanco estas videbla jam de kelkaj jaroj (ekz. interesiĝo pri Esperanto en la medio de pojoj loĝantaj en Armenio), kvankam dume la lanĉado de edukado de Esperanto renkontas malakcepton. Ekzemple somere 2005 oni planis organizi Esperantan konferencon en la ĉefurbo de Dagestano, Maĥaĉkala, sed ĝi ne efektiviĝis kaŭze de la minaco de bomba atenco. Verŝajne por iuj potencoj gravis torpedi la promocion de Esperanto. Sekve, necesas ŝanĝi la strategion, profitante de la sperto de kaŭkaziaj esperantistoj. Unu el ili estis armeno, prof. d-ro Gurgen Sevak, kiu vere nomiĝis Grigorjan (Sevak estis lia pseŭdonomo). Sekve, precize lia antaŭnomo kaj familia nomo estis: Gurgen Grigorjan. Li naskiĝis en Tbiliso en 1904 kaj mortis en Erevano en 1981. Ekde la jaro 1948 li estis doktoro, profesoro de la armena lingvo en la Erevana Universitato. De 1971 – membro de la Scienca Akademio de Armena SSR. Li scipovis samnivele tri naturajn lingvojn: la armenan, la kartvelan, la rusan kaj la internacian lingvon Esperanto. En la jaroj 1929-36 li estis prezidanto de la Armena Esperanto-Asocio. Ekde 1932 li estis membro de la Akademio de Esperanto. Li tradukis el la armena al Esperanto armenajn poeziaĵojn, interalie la faman (ankaŭ por polaj legantoj) poemon de Avetik Isahakian, titolatan “Abu-Lala Mahari”. El tiu Esperanta traduko, ekestis la tradukoj al la japana kaj hebrea. Li estis entuziasmulo pri Esperanto kaj se Stalin ne estus persekutinta la sovetajn esperantistojn (kadre de altrudo de la rusa en sia imperio), li certe estus farinta ankoraŭ pli multe ol tio, kio montriĝis ebla, por daŭrigi la verkon de Ludoviko Zamenhof en Armenio.

La aŭtoro de tiuj vortoj en la jaroj 1961-63 estis studento de profesoro Gurgen Sevak en la Ŝtata Universitato en Erevano, la ĉefurbo de Armena SSR. La profesoro G. Sevak estis la gvidanto de la katedro de la armena lingvo, kiun lernis tie la subskribanto de ĉi tiu teksto, volante en la estonteco fari tiun lingvon objekto de siaj esploroj.

Ĉi tiu teksto estu la postmorta dankesprimo de la aŭtoro de ĉi tiuj vortoj por sia majstro, Profesoro Gurgen Sevak, kiu estis nobla kaj saĝa homo!


Hans Dieter Quednaŭ

(Universitatoj en Bonn kaj Munkeno, Germanio)

Prahistorio de Poloj ekde la prahindeŭropanoj ĝis la reĝoj Mieszko I kaj Bolesław Chrobry

33 % de la nuna loĝantaro de Eŭropo estas Slavoj – pli ol anoj de la ĝermana kaj la romanida lingvogrupoj.

Ĉi-tie vi vidas la ŝtatojn, kies oficiala lingvo estas unu el la slavaj lingvoj – de la okcidentaslava branĉo en helverde, de la orientaslava branĉo mezverde kaj de la sudaslava branĉo malhelverde kolorigitaj.



La deveno de la nomo ne estas certa. Kelkaj supozas, ke ĝi venas de la vorto „slowo“ = vorto, aliaj kredas, ke ĝia radiko estas la vorto „sláwa“ = gloro, kaj ekzistas ankaŭ pluaj hipotezoj. Parenteze – la du vortoj slowo kaj sláwa venas de la sama hindeŭropa radiko kun la signifo „aŭdi“.

La simileco de la diversaj slavaj lingvoj estas multe pli granda ol ekz. inter la ĝermanaj kaj romanidaj lingvoj.

Ĝis la tempo de la popolmigrado ekzistis tre malmultaj mencioj pri ili – la unua estas de Tacitus, kiu menciis ilin per la nomo „Venethi“.

De kie ili venas? – Ili apartenas al la hindeŭropa lingvobranĉo, al kiu hodiaŭ apartenas la granda plimulto de la lingvoj parolataj en Eŭropo. Tamen inter la sciencistoj estas konkordo, ke ili ne estis la unuaj loĝantoj de Eŭropo, kaj al meza kaj okcidenta Eŭropo venis nur en la neolitika epoko (la pli juna parto de la ŝtona epoko, dum kiu oni uzis jam agrikulturon), pli precize: ili venis de la oriento. Sed kun tiu konstato jam finiĝas la konkordo inter la sciencistoj – pri la ekzakta situo de la prapatrio de la hindeŭropanoj oni ankoraŭ disputas.

Mi tamen volas prezenti al vi la teorion, kiu hodiaŭ trovis la agnoskon de la plimulto de la koncernataj sciencistoj (lingvistoj kaj arkeologoj) – teorio evoluigita en 1956 de la litov-usona arkeologino **Marija Gimbutas** – la tiel-nomata **kurgán-hipotezo**.

Ŝi supozas, ke la prahejmlando de la hindeŭropanoj estas norde de la Nigra Maro kaj la Kaspia Maro. En la centro de tiu areo estas la riveroj Don kaj Wolga.

La karakterizaj arkeologiaj spuroj de tiu pra-popolo estas la **kurganoj** – specimenon vi vidas ĉi-tie:

Ili estas grandaj tumuloj (tombo-montetoj), en kiuj estis tombigitaj precipe la nobeloj. Do – Gimbutas supozas, ke la konstruintoj de la kurganoj estis la praaj hindeŭropanoj.



Norde de la kurgan-popolo troviĝis tiam la praparolantoj de la urala lingvobranĉo, al kiu apartenas ekz. la hungara, la finna kaj la estona. Fakte la lingvistoj trovis komunaĵojn inter la praaj hindeŭropa kaj la praaj urala branĉoj, kiujn oni ne povas interpreti kiel nura transpreno de unu lingvo al la alia, sed kiu supozigas, ke ambaŭ lingvobranĉoj havas komunan praulon, kiun oni parolis en la orianta Eŭropo aŭ okcidenta Siberio – longe antaŭ la neolitiko. Tiu lingva parenceco forte subtenas la kurgan-teorion.

La kurgananoj jam konis la agrikulturon kaj spertis precipe pri bredado de brutoj. Precipe ili ŝatis la ĉevalon, kiu estis ĉe ili sankta besto. Ilia socia strukturo estis patriarka, kun disdivido inter nobeloj kaj ne-nobelaj liberaj viroj.

Dum la 5a jarmilo antaŭ Kristo okazis en la regiono klimata ŝanĝo, kiu kondukis al malhumidiĝo kaj dezertiĝo de la tero. Pro tio la hindeŭropanoj serĉis novan vivareon kaj disvastiĝis en pluraj ondoj okcidenten kaj ankaŭ suden (al Hindio). Ĉi-tie estas ilia origina hejmlando montranta la unua ondon al centra Eŭropo...




...kaj ĉi-tie la postaj ondoj – la disvastiĝo al Hindio ne estas montrata.



Supozeble la antaŭ-hindeŭropaj loĝantoj de tiu regiono havis tute alian kulturon – oni eĉ supozas, ke ilia soci-sistemo estis matriarka. Do okazis kunfrapiĝo de tre diversaj kuturoj kun malsamaj mondkonceptoj. Tamen la du kulturoj intermiksiĝis, kvankam kun pli granda influo de la hindeŭropa branĉo, precipe venkis la hindeŭropa lingvo. Sed oni rekonas en la diversaj postaj hindeŭropaj lingvoj konsiderindan parton de ne-hindeŭropa influo. Ankaŭ en la religio oni vidas tiun kunfandiĝon: Ofte ekzistas du grupoj de dioj: Tiuj de la ĉielo (en la helena kulturo la *olimpikaj* dioj) - verŝajne hereditaj de la kurgan-popolo, kaj tiuj de la tero, responsa pri la fertileco kaj bona rikolto (en la helena la *ĥtonaj* dioj) – verŝajne devenaj de la eŭropa antaŭ-hindeŭropa praloĝantaro.

La efiko de la intermiksiĝo de la kurgan-popolo kun la praloĝantaro estis la estiĝo de diversaj kulturoj, kiujn oni povas arkeologie distingi.


Aparte interesa por ni estas la kulturo, kies areo – inter la riveroj Elbe/Laba kaj Wisła - estas sube viole kolorigita.



Tiu estas la luzacia kulturo, kies plej bone konservita restaĵo troviĝas en norda Pollando, en Biskupin – ĉi-tie vi vidas rekonstruitan domaron:



Ĉar la areo de tiu kulturo troviĝas tie, kie poste vivis slavoĵ, multaj arkeologoj supozas, ke ĝi estas la pra-slava kulturo. Kvankam tio ne estas certa, oni tamen povas supozi, ke la luzacia kulturo havis konsiderindan rolon en la etnogenezo de la slavoĵ.



Tiu etnogenezo disvolviĝis en la arbaroj inter la Balta Maro kaj la stepoj norde de la Nigra Maro:

Plej proksimaj al ili estis la popoloj de la balta lingvogrupo, kiu ŝrumpis de antaŭa grandega areo ĝis kiam hodiaŭ restis nur la litovoj kaj latvoj. Tre antikvaj rilatoj oni trovas ankaŭ kun la ĝermanoj kaj la irananoj.


Ekde la lasta jarcento antaŭ Kristo la ĝermanoj disvastiĝis, inter alie al norda Pollando (la Gotoj), al la regiono de Elbe/Laba ĝis oriente de la Odra (ekz. Vandaloj en Silezio) kaj al Bohemio, Moravio (Markomanoj) kaj finfine eĉ Slovakio. Sed poste granda parto de ili formigris por konkeri

partojn de la Romia imperio, kaj en la nun maldense loĝatajn regionojn sekvis slavoĵ (ekde la 5a jarcento). La restoj de la tie loĝantaj ĝermanoj asimiliĝis, do estis slavigitaj.

Ĉi-tie vi vidas la disvastiĝon de la slavoĵ en la 8-a jarcento. (Sude ili disvastiĝis ĝis Greklando – Atiko kaj eĉ Peleponezo – grupon oni eĉ setligis en Anatolio.)



kaj ĉi-tie vi vidas la areojn de la diversaj okcident-slavaj triboj



Tamen oni devas rimarki, ke la slavaj lingvoj aŭ pli bone dialektoj estis tiutempe ankoraŭ tiom similaj, ke la famaj misiistoj Kyrillos kaj Methodios, kiuj venis de Thessaloniki ĉe la egea maro, havis neniun problemon komuniki kun la slavoĵ en la grand-moravia regno. Ilia traduko de la biblio al la slava lingvo, kiun ili komencis en 863, estis komprenata de ĉiuj tiamaj slavoĵ. La lingvon de tiu traduko oni nomas hodiaŭ eklezi-slava.



La Elbe/Laba restis lingvo-limo inter la slava kaj la germana ĝis 1150, kvankam politike la regiono ĝis la Odra (kaj ankaŭ Bohemio) apartenis al la germana imperio.

Ĉi-tie vi vidas la tribojn, kiuj poste kunfandiĝis al la **pola** popolo. La nomon ricevis la popolo de la tribo **Polanoj** – ĉirkaŭ kiuj la estiĝanta pola popolo kristaliĝis. La nomo *Polanoj* venas de la radiko pol = kampo.

En tiu tempo estis ankoraŭ tute ne antaŭvideble, ke de la diversaj okcident-slavaj triboj formiĝos poste tri popoloj: la poloj, la ĉeĥoj kaj la slovakoj, kaj kiu tribo iros al kiu popolo.

La vislanoj en la krakova regiono unue apartenis al la grand-moravia regno, poste iam al Pollando, iam al Bohemio. La silezianoj unue apartenis al Pollando, pli poste al Bohemio, de kiu ĝin forrabis en la 18-a jarcento Frederiko la Dua de Prusio.

Origine la polaj triboj estis kompreneble politeistoj. Ilia ĉefa dio estis la kvarkapa Świętowit. Sed por havi iun rolon en Eŭropo kaj eviti la perfortan kristanigon fare de najbaraj landoj, kiu nepre rezultigus perdon de la memstareco, la pola reĝo **Mieszko I** – el la dinastio de la **Piastoj** – akceptis la bapton en la jaro 966, unu jaro post la surtroniĝo, kaj liaj subuloj devis sekvi. Estis grave, ke li baptigis sin laŭ la **latina** rito – ne laŭ la bizanca. Tiamaniere Pollando fariĝis parto de la okcidenta mondo – male ekzemple al Ruslando kaj Ukrainio.

Tuj estis instalita biskopejo en Poznań, senpere sub la papo, do ne dependa de iu germana ĉefepiskopo.

Mieszko estis ankaŭ la pola reĝo, kiu regajnis la krakovan regionon de Bohemio. Lia posteulo – Bolesław Chrobry (la brava) fondis episkopejojn en Gniezno, Kraków, Wrocław kaj Kolobrzeg.

LIBER PRIMVS CHRONICORVM REGNI POLONIAE I
LECH CZECH



Tiutempe ja ekzistis la pola kaj la bohemia regno, tamen ankoraŭ ne du diversaj kaj bone distingeblaj popoloj pola kaj ĉeĥa. Pro tio okazis provoj unuigi la du regnojn por krei unu grandan ŝtaton. Unue tion provis Bolesław Chrobry. Tamen li ne sukcesis, ĉar la germana imperiestro nepre volis eviti, ke tiom granda ŝtato ekestu en lia najbareco. Rezultis 16-jara milito, post kiu Bolesław devis rezigni pri sia plano. Pli poste, kiam Pollando havis malfortan reĝon, provis unuigi la du regnojn la reĝo de Bohemio. Denove intervenis la germana imperiestro kaj ĉi-foje alianciĝis kun la pola reĝo.

Post la definitiva establo de du apartaj landoj – Pollando kaj Bohemio, ekestis la legendo pri du prapatroj de la du popoloj, nomitaj Lech kaj Ĉech, ĉi-tie montrataj sur mezepoka bildo.

Por fini ankoraŭ kelkaj vortoj pri tiuj okcident-slavoj, kiuj vivis plej okcidente kaj fariĝis nek poloj nek ĉeĥoj nek slovakoj. Kiel jam dirite, la lingvolimo inter la germana kaj la slava resis ĉe la rivero Elbe/Laba ĝis proksimume 1150. Poste iom post iom disvastiĝis la germana ĝis trans la Odro al Silezio, Pomeranio kaj Mazurio. Tamen ĝis hodiaŭ restis slavparolantoj en orienta Germanio – la soraboj, kiuj loĝas ĉirkaŭ la urboj Bautzen (Saksonio) kaj Cottbus (Brandenburgio). Sube vi vidas dulingvan strat-indikilon (germana/malsupra soraba) en Brandenburgio



Teruhiro Sasaki

(Universitato Saitama, Japanio)

Esperanta edukado en japanaj universitatoj - Mia sperto

En Japanio nun la edukado de fremdaj lingvoj estas en tragedia situacio. Verŝajne, jam delonge komenciĝis iu intelekta regreso. Post kiam japanoj ekfieris pri rezulto de ekonomia disvolviĝo, ili kredas, ke povas vivi sen kono de fremdaj lingvoj. Laŭ ilia opinio, nur per japana lingvo ili povas ĉerpi necesan informon por scienco kaj por vivo. Preskaŭ ĉiuj gravaj literaturaj verkoj en la mondo estas tradukitaj en la japanan lingvon. Aŭ se diri alimaniere, kio ne estas tradukita en la japanan lingvon, tio estas malpli grava. Aldone, la angla lingvo estas deviga en japanaj mezlernejoj kaj altlernejoj. Per la japana kaj angla lingvoj sufiĉas akiri ĉiun sciencon kaj literaturon en la mondo. Sen aliaj lingvoj oni povas produkti japanajn plej novajn aŭtomobilojn. Kial malŝpari tempon por lerni aliajn malfacilajn fremdajn lingvojn? Nia vivo estas mallonga.

Estas malfacile konkeri tiun antaŭjuĝon, bazitan sur aparta fiereco de izolita rano, kiu estas kontenta je malvasta puto. Sed ĉi tiu rano ne estas sufiĉe kontenta je la deviga angla lingvo. Kvankam ĝi devas lerni la anglan, tamen la angla en ĝia puto ekzistas kiel la lernobjekto por ekzameno. Tio estas torturilo por japanaj ranoj en puto.

Sed aliaj fremdaj lingvoj, ekzemple la franca, la germana, la rusa, la ĉina, ne povas anstataŭi la anglan, ĉar ankaŭ ili fariĝas torturiloj, se instruistoj estas malbonaj. Laŭ mia opinio, la plej bona senvenenigo kontraŭ la angla toksigo restas nuntempe nur Esperanto. Tamen oni tion preskaŭ ne scias en Japanio; scias pri tio nur tiu, kiu lernas Esperanton. Mi kredas je tio, ke Esperanto estas ne nur la antidoto kontraŭ la deviga angla lingvo, sed ankaŭ la fenestro, tra kiu penetras la lumo de tutmonda homa scio.

Antaŭ kvar jaroj mi ekinstruis Esperanton en nia Saitama Universitato, kiu estis unu el la Japanaj Ŝtataj Universitatoj. Mi diras, ke "estis", ĉar ĝuste tiam ĉiuj ŝtataj universitatoj transiris de ŝtata organizo al sendependeco de la ŝtato, t. e. al privataj entreprenoj. Tial do ĉiu eksa ŝtata universitato mem devas klopodi pri sia financa problemo. En nia Universitato nur la angla lingvo restis deviga, kaj aliaj fremdaj lingvoj estis ekskluditaj. Mi apartenas al la fakultato de prihomaj sciencoj, al la kurso de Eŭropa kulturo. Neimageblas la instruado de Eŭropa kulturo en la franca, la germana, la rusa, kaj aliaj eŭropaj lingvoj.¹

Mi kaj mia kolego, kiu estas germanisto, decidis instrui Esperanton anstataŭ eŭropajn lingvojn. Multe da studentoj eklernis Esperanton. En 2005 lernis pli ol 300 studentoj. Kaj en sekvantaj jaroj ĉiam pli ol 50 studentoj daŭras lerni Esperanton. En unu semestro estas kvar monatoj, unu lekcio daŭras 90 minutojn. Por instrui bazan Esperantan gramatikon necesas du monatoj (t. e. ok lekcioj). Post tio mi donis al lernantoj legi fabelojn de Andersen, tradukitajn de Zamenhof. Mia kolego, kiel germanisto, donis al ili legi fabelojn de Grimm.

Niaj lekcioj sukcesis. Preskaŭ ĉiuj ekŝatis Esperanton. Kaj plimultiĝis la nombro de studentoj, apartenantaj al la kurso de eŭropa kulturo. Multe da lernantoj post Esperanto komencis lerni ankaŭ la francan kaj la germanan lingvojn, ĉar pere de Esperanto fariĝas pli facila lernado de alia eŭropa lingvo. Esperanto por japanoj povas esti la fundamento de baza gramatiko de eŭropaj lingvoj. Ŝajnas al mi, ke Esperanto estas plej bona lingvolernilo propedeŭtika al lingvolernado. Sed Esperanto havas pli da eblecoj. Mi instruas rusan literaturon. Ĝis nun multe da bonaj klasikaj literaturoj estas tradukitaj en Esperanton spite al subpremo de Stalin. Traduko de Eŭgeno Onegin havas pli ol ses variantojn. Esperantigitaj estas kelke da verkoj de Lermontov, Gogol, Tolstoj, Dostoevskij, Ĉeĥov, k. a.

Mi ekpensis utiligi tiujn esperantigitajn verkojn por lekcio pri rusa literaturo. Mi jam provis kvar fojojn lekcii tiamaniere rusan literaturon pri Puŝkin, Lermontov, Gogol kaj Ĉeĥov. Ekzemple ĉi-jare mi donis lekcion pri malgrandaj rakontoj de Gogol por la ducentjara jubileo de lia naskiĝo. En la

komenco de la lekcio mi donis al studentoj la japanan, anglan, rusan kaj Esperantan tekstojn. Dum du monatoj mi lekciis japanen pri specifaj valoroj de Gogol. Kaj poste ni komencis legi la tekston de la verko „Palto” por gustumi la stilon de Gogol. Unue ni kune deklamis ĉiun frazon unu post la alia en Esperanto, ĉar Esperanto estas tre facile prononci por japanoj. Kiu lernis Esperanton, tiu tradukis el Esperanto en la japanan. Kiu sciis rusan, tiu tradukis el la rusa. Kaj kiu lernis nek Esperanton, nek rusan, tiu tradukis el la angla en la japanan.

Montriĝis, ke Esperanto povas ludi gravan rolon por legi rusan klasikaĵon. La esperanta traduko estas tiel fidela, ke estas transmetitaj preskaŭ ĉiuj vortoj de la rusa lingvo. Mi konvinkiĝis, ke klasikaĵoj en la tuta mondo devas esti esperantigitaj kiel eble plej multe, por konservado de nia homa intelekta heredaĵo. Mi, kiel japano, devas traduki japanajn klasikaĵojn en Esperanton laŭeble bone. Tiele do iam en la futuro la homaro povos legi tutmondajn klasikaĵojn Esperante.

Posedi Esperanton estas pli facile ol aliajn lingvojn, do dum du monatoj, kiam mi prelegas pri la ĝenerala enhavo de la rusa literaturo, studentoj mem povas posedi la bazan gramatikon de Esperanto. Estas sufiĉe, ke oni donu al ili malgrandan lernolibron. Se duono el la studentoj en la klaso jam scipovas legi Esperanton, ili povas helpi al tiuj, kiuj ankoraŭ ne scias. Kiam oni instruas al aliaj, tiam oni mem altiĝas. Instrui estas la plej bona rimedo por ellerni.

Sed oni povas demandi min, kie troviĝas disciplino de lernobjekto? Se instrui lernobjekton en la Universitato, nepre devas esti disciplino. Esperanton nun oni instruas sub la nomo de „Interlingvistiko”.

Laŭ mia opinio, kvankam estas konvene uzi la terminon "Interlingvistiko" ene de la fako "Lingvistiko", tamen estas malfacile uzi ĝin en aliaj fakoj. Por instruistoj, ne apartenantaj al la lingvistika fako, necesas alia nomo por la lernobjekto. En japanaj universitatoj nepre troviĝas lernobjekto "Legado de klasikaĵoj". Mi utiligas tiun legadon de klasikaĵoj por la legado de esperantigitaj tekstoj. Tiu ĉi metodo nun funkcias tre bone. Oni povas nomi la metodon instruado "ne por Esperanto", sed "per Esperanto".

La esperanta movado en Japanio havas brilan historion ekde 1906 ĝis nun. Ju pli brila la movado estis, des pli multe da antaŭjuĝemuloj. Esperanto en Japanio estis longe opresata kiel danĝera lingvo. Forte restis ankoraŭ tiu antaŭjuĝo. Malfermi kurson de Esperanto en japanaj universitatoj kaj altlernejoj estas ankoraŭ tre malfacile. Sed nun ŝancoj por Esperanto-instruado pligrandiĝas, ĉar detruigis instruado de ĉiuj fremdaj lingvoj. Laŭ la ironio de sorto mi komencis instrui Esperanton en japanaj universitatoj. Mi estas instruisto de la rusa lingvo, sed pro diversaj kaŭzoj mi jam ne povas labori kiel tia instruisto. Tial mi nun instruas Esperanton.

Krom en la Saitama Universitato mi instruas Esperanton en aliaj universitatoj, ekzemple en Tokia Universitato kaj en Tokia Instituto de Teknologio. Tie estas instruata Esperanto sub la nomo "La Mondo de Esperanto". Ne povas daŭri longe tiuj lekcioj, ĉar ili estas nur starigitaj per propra volo de la dekano aŭ fama profesoro, kiuj estas miaj amikoj. Sed eĉ tiaj eventualaj lekcioj de Esperanto estas tre utilaj por alfronti antaŭjuĝemulojn. Peza pordo nun malfermiĝas nur iomete.

Antaŭ nelonge aperis artikolo pri la situacio de Esperanto en japanaj universitatoj en la gazeto "Revuo Orienta". Mi petas legu ĝin. Leginte, vi komprenos, kiel malgranda estas la skalo de Esperanta edukado en Japanio. Sed, se guto al guto aliĝas, maro fariĝas.

Witold Stepniewski
(Politekniko, Lublin, Pollando)
kaj *Zofia Stepniewska*
(Katolika Universitato, Lublin, Pollando)

Kiu lingvo por estonta eŭropo kaj mondo?

1. Enkonduko

La problemo de lingva komunikado en estonteco estas tre interesa ne nur ekde hodiaŭ (eg. Pei, 1958). Ĝi havas ne nur lingvistikan sed ankaŭ demografian, kulturan, ekonomian kaj politikan dimensiojn. La aŭtoroj analizas la situacion de lingvoj hodiaŭ kaj provas trovi respondojn je la supre starigita demando.

2. Mortantaj lingvoj

La nuna tempo karakterizas sin per rapida malaperado de la lingvoj de etnaj minoritatoj (Crystal, 2000). Lingvistoj jam delonge scias, ke miloj da mondaj lingvoj estas en serioza danĝero perei (Gibbs, 2002). Ĝis nun nur malgranda frakcio da lingvoj estas priskribita sufiĉe bone por konfirmi teoriojn pri universala gramatiko, pri evoluo de lingvoj kaj pri multnombraj neresponditaj demandoj el la kampo de lingvistiko kaj antropologio.

Lau Gibbs (2002) en la hodiaŭa mondo kalkulanta pli ol 6,2 miliardoj da loĝantoj la nombro da ekzistantaj lingvoj estas pritaksata je 5000 – 7000. El tio 52% de la monda loĝantaro parolas 20 plej grandajn lingvojn. Nur 4% de la monda loĝantaro vivtenas 96% da lingvoj de la mondo. Oni devas substreki, ke apenaŭ 0.3% de la monda loĝantaro uzas 3340 lingvojn, el kiuj ĉiu havas malpli ol 10.000 parolantojn. Oni pritaksas, ke 50% ĝis 90% de la ekzistantaj lingvoj estas minacataj je malapero dum la nuna jarcento (Graddol, 2004).

3. Novaj lingvoj

La dua trajto de la hodiaŭa lingva situacio estas aperado de novaj etnaj lingvoj, formiĝantaj en grandaj urboj kun enmigrantoj. Tiumaniere perdo de malnovaj, kamparaj lingvoj estas kompensata per formado de novaj, hibridaj lingvoj en urboj. Kiel ekzemplon oni donas centojn da versioj de la angla kiuj dissemiĝis en la mondo (Crystal, 2003).

Krom novaj etnaj lingvoj oni observas kreadon de novaj planaj (konstruitaj) lingvoj proponataj kiel neŭtralaj helpaj pontolingvoj por faciligi internacian komunikadon. En la historio estis ĉirkaŭ milo da diversaj provoj krei tiajn planlingvojn (Dresen, 1967). Naskiĝis interlingvistiko, nova scienca disciplino dediĉita al la problemoj de la planlingvoj. La bezonon krei planlingvon oni sentis jam delonge. Unu el la plej malnovaj provoj estis tiu de araba ŝejko Mohyieddin, kiu en la 16-a jarcento kreis specimenon de tia lingvo nomata „balaibalan“ (Korytkowski, 1986). Poste, en la 17a jarcento tian bezonon akcentis tiom elstaraj filozofoj kiel R. Kartezio, J.A. Komensky kaj G.W. Leibniz, (Korytkowski, 1986).

La plej konataj planlingvoj estas Volapuko, Esperanto, Ido, kaj Interlingua. Estas rimarkinde, ke dum la dua mondmilito Ficowski prilaboris planlingvon nomatan Paraglot (Ficowski, 2005), kaj Interlingua estis publikigita en la jaro 1951. La plej sukcesa el la planlingvoj estas ĝis nun Esperanto.

Konsiderante la eblecon de sukcesa disvastigo de unu aŭ pli el la planlingvoj oni ne povas ne menci la unikan sukcesan revivigon de la moderna hebrea lingvo, kreita de la lingvisto Eliezer Ben-Jehuda, en turnopunkto de la du lastaj jarcentoj (Sáenz-Badillos, 1993). Ĝis nun ne estas alia ekzemplo de la lingvo sen denaskaj parolantoj kiu fariĝus nacia kaj gepatra lingvo kun sep milionoj da

parolantoj. Interese, ke la kreinto de la moderna hebrea lingvo naskiĝis en jaro 1858 en la vilaĝo Luĵki, proksime de Grodno en Bjelarusujo, tio estas unu jaron antaŭ Ludoviko Lazaro Zamenhof, kreinto de Esperanto, kiu naskiĝis en 1859 jaro en Bjalistoko, Pollando en la sama regiono de Eŭropo (je distanco ne pli ol 100 km unu de la alia). Alia interesa fenomeno estas rapida disvastigo de la modifita indonezia lingvo (Bahasa Indonesia), kiu el la lingvo de unu malgranda tribo fariĝis denaska lingvo por pli ol 140 milionoj da parolantoj.

4. Deveno kaj evoluo de hindoeŭropaj lingvoj

La deveno de hindoeŭropaj lingvoj (kiel ankaŭ tiu de aliaj lingvoj) estas intense studata sed ankoraŭ ne estas tute klara (Balter, 2003; Bellwood kaj Renfrew 2002; Christiansen kaj Kirby, 2003; Mithen, 2003; Pennisi, 2004). Ekzistas du ĉefaj hipotezoj pri la origino de tiu plej vaste disĵetita lingvofamilio de la mondo.

Unu el ili estas la tiel nomata “Kurgana Hipotezo” kiu estis la reganta paradigmo inter lingvistoj kaj arkeologoj de la 20-a jarcento. La ĉefa advokato de tiu hipotezo estis Marija Gimbutas (Balter, 2003). Laŭ tiu hipotezo Kurganaj ĉevalrajdistoj, kiuj vivis antaŭ 6-7 jarmiloj norde de la Nigra Maro (nun Ukrainio) kaj parolis protohindoeŭrope disiĝis poste al aliaj teritorioj kaj disvastigis la lingvon, el kiu naskiĝis 144 etnaj lingvoj. Laŭ dua hipotezo subtenata ĉefe de Colin Renfrew, Anatoliaj terkulturistoj, kiuj vivis antaŭ 8 mil jaroj, sude de la Nigra Maro en Anatolio (Turkio) parolis protohindoeŭrope kaj de tie devenas la tuta familio de la lingvoj (Balter, 2004).

5. Savi malaperantajn lingvojn

Lingvistoj nur lastatempe iniciatis organizitajn agadojn por savi mortantajn lingvojn. Ekzemple en 1996 lingvisto Luisa Maffi helpis organizi grupon nomatan Terralingua por altiri atenton pri la ligo inter biodiverseco kaj lingva diverseco, kiuj ofte koncentriĝas en la samaj landoj (Gibbs, 2002). En 2001 UNEP konkludis ke “Perdo de lingvo kaj ties kultura kunteksto estas kiel bruligo de unika referenclibro de natura mondo” (UNEP, 2001).

Tre interesa kaj unika projekto estas la “Rozetta Projekto” (Hejmpaĝo de Rozetta Projekto) naskiĝinta dum lastaj jaroj. La bazo (radiko) por tiu projekto estis la historio de la hieroglifa lingvo de antikvaj egiptanoj, kiu estis perdita ĝis kiam soldatoj de Napoleono trovis la 1.000-jaran bazaltan ŝtonegon en la Nila vilaĝo Rosetta. Sur ties flanko estis gravurita la sama teksto en tri lingvoj: demotika, la greka kaj hieroglifa egipta. Havante tiun ŝlosilon sciencistoj povis malŝlosi kaj malkovri la kaŝitan antaŭ jarmiloj historion de Egipto. La historio de la Rozetta ŝtono inspiris malgrandan grupon da inĝenieroj kaj sciencistoj krei artefaritaĵon, kiu povus savi kaj konservi bazan scion pri la nuntempaj lingvoj de la mondo por antropologoj de la fora estonto. La nova “Rozetta ŝtono” estas fakte “Rozetta disko” portanta paralelajn tekstojn en 1500 lingvoj. La tekstoj kaj informoj pri la lingvoj estas gravuritaj sur tri-cola nikela disko kaj la literoj havas mikrometrajn dimensiojn. Entute sur la disko troviĝas 13000 paĝoj da informo, kiun oni povas legi havante mikroskopon kiu kapablas grandigi la vidon miloble. La aspekto de la Rosetta disko videblas sur la Foto 1.





Foto 1. Rosetta disko (<http://rosettaproject.org>)

6. La lingvo por estonto?

La nunaj konsideroj rilatas al la realeco, kiam la angla estas la plej vaste uzata lingvo de la mondo kaj kiam milionoj da homoj anoncas la Mandarinan kiel lingvon de la estonto, kaj - relative malmulaj - postulas Esperanton pro ties avantaĝoj kiel facileco, neŭtraleco, kaj propedeŭtika valoro. Oni pritaksas, ke ĉirkaŭ 100 milionoj lernos la Ĉinan kiel fremdlingvon en 2010. Estiĝas do la demando, kiulingve parolos niaj nepoj? Ĉu ili elektos la anglan, la Mandarinan Ĉinan aŭ Esperanton?

La kontribuo de denaskaj parolantoj de la plej gravaj lingvoj de la mondo en la monda loĝantaro estas montrita en Diagramo 1. Antaŭ ol analizi la datenojn sur la diagramo oni devas substreki, ke la kontribuo de la ĉina lingvo, kiu ne estas montrita sur la diagramo, estas dum la tuta tempo je la nivelo de ĉirkaŭ 20% kaj tiel restos ĝis almenaŭ la jaro 2050. La kontribuo de la angle parolantoj, kiu en 1950 konstituis 9% de la monda loĝantaro, malkreskos ĝis ĉirkaŭ 5% en la 2050 jaro. Intertempe la kontribuo de la hispana, hindi-urdua kaj de la araba kreskos ĝis, pli malpli, la sama nivelo.



Diagramo 1. Procento de la monda loĝantaro parolanta la anglan, la hispanan, la hindi/urduan kaj la araban en la periodo 1950 ĝis 2050 laŭ oficialaj statistikoj de OUN. La ĉina lingvo restas dum la tuta periodo je la nivelo de 20%. Modifita de Graddol, 2004.

Tabelo 1. montras la pritaksatajn nombrojn de junaj (15-24 jaraĝaj) denaskaj uzantoj de la dek plej gravaj mondaj lingvoj. Sur la unua loko estas la ĉina, kaj la angla okupas la kvaran lokon post la hindi/urdua kaj la araba. La kvinan lokon okupas la hispana kun simila nombro da parolantoj.

Tabelo 1. Pritaksataj nombroj de denaskaj parolantoj de la dek plej gravaj lingvoj de la mondo en la jaro 2050. (Laŭ Graddol, 1997 kaj 2004).

Numero	Lingvo	Nombro de denaskaj parolantoj 15-24 jaraĝaj - en milionoj
1	ĉina	166
2	hindi/urdua	74
3	araba	72
4	angla	65
5	hispana	63
6	portugala	33
7	bengala	32
8	rusa	15
9	japana	11
10	malaja	10

Tre interesa estas la loko de Esperanto, kiu estas la plej vaste uzata kaj aplikata el la planlingvoj. Laŭ finna lingvisto J. Lindstedt (1996) la nombroj rilataj al Esperanto uzantoj en la mondo estas jenaj:

- ◆ 1,000 uzas Esperanton kiel gepatran lingvon
- ◆ 10,000 parolas ĝin flue
- ◆ 100,000 povas uzi ĝin aktive
- ◆ 1,000,000 komprenas pasive ties grandan parton
- ◆ 10,000,000 studis ĝin iugrade, iam

Specialan substrekon meritas la tre bona pozicio de Esperanto en interreta komunikado. (vidu: statistiko de Esperantujo). Alia forta apogo por Esperanto devenas de ties propedeŭtika valoro. Ĝi baziĝas sur la fakto, ke lerni duan fremdlingvon estas multe pli facile ol la unuan. Esperanto kiel la unua kaj tre facila lingvo akcelas multe lernadon de la sekvaj lingvoj.

7. La karakterizo de nuna tempo kaj de la proksima estonto

Lau Graddol (2004) ni vivas en neordinara momento de la lingva historio. La monda lingvosistemo alvenis al punkto de krizo kaj rapide evoluos kaj restrukturiĝos. Ni observos kelkajn jardekojn de rapidaj, eble disorientigaj ŝanĝoj, post kiuj emergos nova lingva ordo. La demografia estonto estos jena: la pozicio de la Ĉina restos je la nuna nivelo de ĉirkaŭ 20%. Kontribuo de la loĝantaro denaske parolanta angle malkreskos de 9% en 1950 ĝis 5% en la 2050 t.e. al la nivelo de la hispana, araba kaj hindi/urdua.

Konsiderante la estonton de la lingva diverseco oni devas memori, ke 50 ĝis 90% de la ekzistantaj 5-7 mil lingvoj estas minacataj je malapero. Perdo de malnovaj, kamparaj lingvoj estos kompensata per formado de novaj, hibridaj lingvoj en urboj.

Se temas pri la sorto de modernaj lingvoj oni atendas malaltiĝon de la signifo kaj degradon de pli malgrandaj naciaj lingvoj (e.g. sveda, flandra ktp). La sekva trajto estos fornormigo de grandaj lingvoj (angla, hispana...) kiuj perdis armeon da lingvokontrolantoj (goluloj). Aperado de interreto kaj libera presado ebligas al ĉiuj publikigadon de libroj, revuoj, blogoj... kaj tio akcelos nekontrolatan evoluon de lingvoj (kiel okazis antaŭ la eltrovo de presado).

La daŭra kresko de la hispana en Usono, de la ĉina en Azio kaj de la angla en Eŭropo videbla nuntempe, estas simptomoj de pli vasta, mondskala tendenco al dulingvismo aŭ multlingvismo.

Literaturo

- Balter, M. (2004), Search for the Indo- Europeans. Why Anatolia? Science, vol. 303, February
- Bellwood, P., Renfrew C. (Eds.) (2002), *Examining the Farming/Language Hypothesis*. McDonald Institute for Archaeological Research, Cambridge
- Christiansen, M.H., Kirby, S. (Eds.) (2003), *Language Evolution*, Oxford University Press, Oxford
- Crystal, D. (2000), *Language Death*. Cambridge Univ. Press, Cambridge
- Crystal, D. (2003), *Cambridge Encyclopedia of the English Language* (Cambridge Univ. Press, Cambridge, ed 2, 2003)
- Drezen, E. (1967), *Historio de la mondlingvo. Tri jarcentoj de serĉado*. Osaka, 1967, (kvara eldono, Moskvo, 1991).
- Ficowski, T. (2005), *Paraglot. Język powszechny*. (en la pola) (Redaktis: A. Sakaguchi). Eldonejo „Rys”, Poznań
- Gibbs, W.W. (2002), Saving Dying Languages; Scientific American Magazine; August 2002

- Graddol, D. (1997), *The Future of English*. British Council, London
- Graddol, D. (2004), *The future of language*. Science, vol. 303
- Hejmpaĝo de Rozetta Projekto: <http://www.rosettaproject.org>
- Korytkowski, G. (1986), *Internacia Lingva Komunikado en la Eklezio kaj Nuntempa Mondo*. Eldonejo "Ritmo", Varsovio
- Lindstedt, J. (1996), "Re: Kiom?" (posting). DENASK-L@helsinki.fi
- Mithen, S. (2003), *After the Ice. A Global Human History 20,000-5000 BC*. Wiedenfeld and Nicolson, London
- Pei M. (1958), *One Language for the World and How to Achieve it*. Devin Adair, New York
- Pennisi E. (2004), *Speaking in tongues*. Science, vol 303
- Sáenz-Badillos, A. (1993), *A History of the Hebrew Language* (trans. John Elwolde). Cambridge, England: Cambridge University Press
- Statistiko de Esperantujo: http://eo.wikipedia.org/wiki/Statistiko_de_Esperantujo
- UNEP, United Nations Environmental Programme, Press Release, February 2001.



Kristin Tytgat

(Instituto Erasmus Bruselo/Brusela Libera Universitato)

EU-programoj: eblecoj por Esperanto

La Eŭropa Unio ofertas abundon da programoj por interuniversitata kunlaboro kaj ili ne nur celas la membroŝtatojn.

Estas do bona ideo esplori, kiuj programoj povus utili al la Esperanto-movado. En tiu rilato Esperanto povas esti ligilo inter universitataj profesoroj, kaj ne devas esti nepre celo. Estas ja multe da universitatoj kie instruas esperantistoj kiuj ne nepre instruas Esperanton. Ili spertas pri sia fako sed konas Esperanton aŭ eĉ aktivas en la Esperanto-movado. Esperanto povus do esti aldona valoro, plia ebleco en la interuniversitata kunlaboro.

Ĉar EU estas demokratia, burokratia organizo, oni devas tre strikte sekvi la regulojn de tiaj programoj por ricevi subvenciadon. Tio estas klara kondiĉo por havi ŝancon partopreni en ili. Kelkfoje esperantistoj emas adapti gvidliniojn al siaj bezonoj aŭ prioritatoj. Tio ne eblas en tiu ĉi konteksto. EU permesas kaj stimulas kunlaboron pri kio ajn inter universitatoj, tiel longe kiel la studobjekto antaŭenigas la eŭropan dimension kaj la agantoj obeas la regulojn de la projektoj.

En tiuj kondiĉoj devas esti ŝanco por esperantistaj profesoroj eniri iun eŭropan kunlaboron. Problemo de la lastaj jaroj estas ke la EU-projektoj fariĝas multe tro grandaj. Certe al la Esperanto-movado mankas la homfortoj realigi aŭ eĉ partopreni tiajn ampleksajn projektojn.

Kio estas realigebla por ni ?

Unue ni devas decidi kion ni volas atingi per tiuj programoj:

- Ni povas interŝanĝi studentojn aŭ/kaj profesorojn.
- Ni povas krei aŭ partopreni eŭropajn retojn inter universitatoj. EU tre ŝatas ke fakuloj havu kontaktojn, interŝanĝu siajn sciojn kaj regule renkontiĝu. Tion ĉion esperantistoj ankaŭ ŝatas.
- Ni povas entrepreni komunajn esplorprojektojn, ekzemple pri temoj ŝatataj de la Esperanto-movado: multlingveco, interkultura komunikado, ... Mia universitato jam membras en reto pri multlingveco subvenciata de EU.
- Ni povas organizi renkontiĝon de profesoroj kvankam EU ne subvencias sciencajn kongresojn.
- Aliaj eblecoj kiel la organizo de intensivaj programoj aŭ staĝoj por studentoj estas verŝajne ne tro realismaj por la Esperanto-movado.

Ni unue parolu pri la Erasmus-programo de EU kiu plej verŝajne ofertas konkretajn eblecojn por la Esperanto-movado sen tro da peza prepara laboro.

1. LLP
- 1) **Erasmus**

EU jam dum 20 jaroj organizas la programon Erasmus kiu ĉefe celas interŝanĝojn kaj nun estas parto de la grandega LLP-programo (lifelong learning programme = programo por la lernado dum la tuta vivo). Oni ofte diras ke la plej sukcesaj atingiĝoj de EU estas la eŭro kaj ... Erasmus.

31 landoj (do pli ol la 27 EU-membroŝtatoj) kaj 3100 universitatoj partoprenas en LLP. Tio estas 90% de la universitatoj en Eŭropo. Dum 20 jaroj (1988-2008) jam proksimume 1,7 milionoj da studentoj studis en alia lando kadre de Erasmus. EU donas stipendion por tiu studperiodo en

eksterlando. La studorezultoj de la studento eksterlande devas esti agnoskitaj en la hejma universitato pere de kreditpoentoj. Ĉio okazas en la kadro de la proceso de Bologna, kiu volas harmoniigi kaj unuformigi universitatajn studoprogramojn en Eŭropo.

La nomo Erasmus rememorigas al la klerulo Erasmus de Roterdamo (1465-1536) kiu studis vojaĝante tra Eŭropo kaj laboris en la tiamaj grandaj universitatoj de Eŭropo, en Parizo, Lovenjo kaj Kembriĝo.

Komence EU elektis por siaj programoj belajn nomojn de eŭropaj kleruloj (Socrates, Leonardo kaj aliaj). Lastatempe pli kaj pli bedaŭrinde ĝi elektas anglalingvajn akronimojn kiuj estas unuavide sensignifaj kaj kiuj krome estas tre malfacile memoreblaj: ACP, TEP, ICI ECP, LLP... Komence fakte la nomo Erasmus ankaŭ estis mallongigo sed ne tro indas nun mencii la plenan komencan nomon.

La LLP-programo validas nun de 2007 ĝis 2013 kaj disponas pri 7 miliardoj da eŭroj. La universitatoj kiuj partoprenas devas esti agnoskitaj de EU. En LLP ekzistas centralizitaj kaj malcentralizitaj agadoj. Malcentralizitaj estas grandparte organizitaj de la membroŝtatoj mem: Erasmus estas ekzemplo de tio, kio signifas ke ekzemple la alteco de la stipendioj povas tre malsami de unu lando al la alia. La centralizitaj agadoj estas en la mano de la Eŭropa Komisiono de EU, pli precize de la EACEA, Plenumagentejo por Edukado, Aŭdvida Sektoro kaj Kulturo.

Oni povas nomi la Erasmus-programon la motoro de la modernigo kaj alproksimiĝo de la diversaj edusistemoj en Eŭropo. Leonardo da Vinci kiu ebligas praktikajn staĝojn por studentoj nun ankaŭ estas parto de LLP. Cetere, en tiu ĉi artikolo mi pritraktas nur la LLP-programerojn kiuj celas la kunlaboron inter universitatoj. Ekzistas ja ankaŭ Comenius, Grundtvig kaj aliaj programeroj por kunlaboro je aliaj niveloj.

Studi kaj labori eksterlande donas al EU-civitano pli larĝan konon de la kulturoj de Eŭropo, altigas la interkulturajn kapablojn kaj ankaŭ la konon de si mem. Pro tio la interŝanĝoj estas grava ero en la edukpolitiko de EU. Tiuj celoj estas ankaŭ tre valoraj por esperantistoj. Tial ni esploru kiel ni povas partopreni en LLP/Erasmus.

La avantaĝo de Erasmus estas ke ne temas pri vera projekto kun multe da farena laboro en malmulte da tempo, sed pri duflanka kunlaboro inter universitatoj. En la duflanka kontrakto la du partneroj mem decidas kion ili entreprenos komune.

Mi menciu ĉi-rilate konkretan ekzemplon: mia instituto en Bruselo jam kunlaboris dum jaroj kun la Universitato A. Mickiewicz en Poznano. Ni organizis interŝanĝojn por studentoj kaj profesoroj rilate la polan kaj la nederlandan lingvojn. Estis sufiĉe facile por d-ro Ilona Koutny el Poznano kaj mi konvinki ambaŭ universitatojn plilarĝigi la kontrakton tiel ke ankaŭ la interlingvistikaj studoj de Poznano fariĝu parto de la Erasmus-programo kaj, ke la interŝanĝoj povu ricevi EU-subvenciojn.

Interŝanĝotaj studentoj povas ricevi stipendion nur de la propra universitato. La minimuma periodo por studi eksterlande estas tri monatoj, la maksimuma 12. Ili devas kandidatiĝi laŭ la proceduroj de la hejmuniversitato, prezenti por la eksterlanda studperiodo studoprogramon kiu enhavas sufiĉe da kreditoj kaj kiu estas aprobita de la hejma kaj de la gastuniversitato. La ekzamenrezultoj poste devas esti agnoskitaj de la hejmuniversitato. Studentoj ne pagas registriĝmonon eksterlande kaj povas tie studi ekde la dua studojaro. La alteco de la stipendio dependas de la hejmlando.

Profesoroj povas viziti la eksteran partneron dum periodo de kelkaj tagoj ĝis ses semajnoj por priparoli la interŝanĝojn de studentoj aŭ por mem instrui (minimуме 5 instruhoroj). Profesoroj ricevas ankaŭ stipendion de la propra universitato sed ankaŭ ĉi tie la altecon de la subvencioj decidas la hejmlando.

Ankaŭ administra personalo povas vojaĝi kaj trejniĝi eksterlande.

Por la malmulte uzitaj kaj instruitaj lingvoj EU donas apartajn subvenciojn por lingvokursoj en la koncerna lando antaŭ la komenco de la semestro (EILC-lingvopreparado). La kursoj daŭras de tri ĝis ses semajnoj, enhavas 60 instruhorojn kaj donas studokreditojn.

Universitatoj povas organizi intensivajn programojn (IP) kun siaj kaj kun eksterlandaj studentoj. La aranĝo daŭras kelkajn tagojn.

Pli realigebla por la Esperanto-movado estas eble la ellaboro de komunaj studprogramoj (CD): oni povas plibonigi ekzistantajn aŭ krei novajn programojn helpe de la alia(j) partnero(j).

“Universitatoj povas evoluigi studprogramojn, kiuj aktive subtenas multlingvecon, lingvistikan diversecon, interkulturajn interŝanĝojn en la eŭropa socio.” (El la LLP-gvidlinioj: propra traduko)

Por esplori eblan estontan kunlaboron, EU antaŭvidas preparajn vizitojn por profesoroj.

2) En la **transversa agado (agado numero 2)** lingvoj ludas gravan rolon. Ci tie eblas peti **multflankajn projektojn** kun atento je :

- malofte uzataj lingvoj
- mondaj lingvoj: rusa, japana, ĉina, araba,...
- interkultura kompreniĝo
- evoluigo de metodologioj por instrui lingvojn
- stimulo de multlingva interkompreniĝo
- stimulo de lingva diverseco.

Oni povas ankaŭ sub tiu ĉi agado **krei retojn** por ke eŭropaj universitatoj estu en kontakto. En tiu ĉi konteksto oni povas krei ekzemple katedron pri multlingveco kaj interkultureco aŭ esplori la lingvolernadon de junaj infanoj.

3) La programero **Jean Monnet** en LLP koncentriĝas je la eŭropa integriĝo kaj povas okupiĝi pri instruado, esplorado kaj reflektado pri tiu ĉi temo. Ebla laborkampo povas esti: «EU kaj la dialogo inter popoloj kaj kulturoj».

2. ERASMUS MUNDUS

Ĉi tie temas pri kunlaboro de EU-landoj kun universitatoj en la tuta mondo kun la celo altigi la kvaliton ĝenerale kaj stimuli la interkulturan kompreniĝon.

Aparte interesa ĉi tie estas la agado numero 2 kiu temas pri partnerecoj por la interŝanĝoj de profesoroj kaj studentoj.

Mia konsilo al esperantistoj ĉi tie estus provi aliĝi al la jam ekzistantaj projektoj de via universitato ĉar la konkurenco en EU por akiri financadon inter la diversaj projektoj estas tre granda.

3. TEMPUS (CARDS-TACIS-MEDA)

Tempus subtenas la modernigon de universitatoj en la okcidentaj balkanoj, en lando de eksa Sovetunio krom la baltaj ŝtatoj kaj en landoj apud la Mediteraneo krom la EU-landoj. Car temas pri grandegaj projektoj, ili eble ne estas celitaj al esperantistoj.

4. Edulink, ACP Scienca kaj Teknologia Programo

Tiu ĉi programo estas por Afriko, Karibaj kaj Pacifikaj landoj. Ĝi estas esplorinda.

5. TEP (Transatlantaj Interŝanĝaj Partnerecoj) kun Kanado kaj Usono (Atlantis)

Por tiuj ĉi projektoj ekzistas malgranda ŝanco je sukceso ĉar ili devas enhavi elementon de renovigo kiu estas tre malfacile trovi.

6. ALFA III/ALBAN

Tiu ĉi programo estas por landoj de Latinameriko kaj devus esti kontrolitaj de esperantistoj rilate la realajn eblecojn.

7. ASEM-DUO

Ĝi estas interŝanĝoprogramo por profesoroj kaj studentoj inter Eŭropo kaj Azio.

8. ICI EP

Temas pri programo inter EU kaj Aŭstralio, Nov-Zelando, Japanio kaj la Korea Respubliko.

KONKLUDO

Por ĉiuj programoj ekzistas gvidlinioj en la reto kiujn oni devus atente pristudi antaŭ ol komenci iun ajn preparlaboron por projekto.

EU estonte specife esploros la kunlaboreblecojn kun jenaj landoj: Ĉinio, Hindio, Israelo, Brazilo kaj Meksikio. Temas pri landoj kiuj estas ĉiuj ankaŭ gravaj en la Esperanto-movado. Ni sekvu do la direkton en la eksteraj rilatoj de EU.

LLP: <http://ec.europa.eu.llp>, kristin.tytgat@ehb.be

Aldono:

Demandaro pri universitata kunlaboro

1. Nomo de la universitata kunlaboranto, titolo kaj ĉiuj detaloj por kontaktiĝo?
2. Specialiĝo de la persono?
3. Nomo kaj profilo de la universitato. Ĉu la universitato estas agnoskita de EU?
4. Pozicio de Esperanto en la universitato?
5. Sperto kun interuniversitataj EU-programoj?
6. Intereso, ebleco kaj preteco kunlabori en tiuj programoj?
7. Deziro informiĝi pri tiaj programoj?
8. Rilato en la universitato kun la oficejo pri internaciaj rilatoj?
9. Kampo de ebla interuniversitata kunlaboro kaj la eventuala rolo de Esperanto en ĝi?
10. Prefero pri kunlaboro kun du aŭ pli da partneroj?
11. Kunlaboro kun kiuj landoj, kontinentoj en la mondo?
12. Speco de kunlaboro?: vidu kelkajn eblecojn en la artikolo.
13. Financaj eblecoj por la universitata kunlaboranto: komplete dependa de EU-financado, ebla subteno de la universitato, ebla preteco mem finance kontribui?
14. Tempo disponebla por la planado, kunordigado, realigo de projektoj aŭ aliaj aktivecoj?
15. Ebleco, preteco vojaĝi? Por interŝanĝoj de profesoroj, studentoj aŭ personalo aŭ por aliaj kaŭzoj de internacia kunlaboro?
16. Aliaj rimarkoj?

Jerzy Żabowski

(Altlernejo Włodkowic, Płock, Pollando)

La postdiplomaj studoj kiel formo de la senĉesa klerigado (surbaze de la altlernejo je la nomo de Paweł Włodkowic en Płock)

Pri ekesto de la postdiplomaj studoj en la Altlernejo je la nomo de Paweł Włodkowic en Płock decidis antaŭ ĉio tri premisoj:

1. La sociaj bezonoj
2. Preteco de la estraro de la Altlernejo je la nomo de Paweł Włodkowic (sube – mallonge – Altlernejo Paweł Włodkowic) al realigo de la sociaj bezonoj
3. Preteco de la Instituto de Matematiko en la Pedagogia Universitato je la nomo de la Komisiono de la Nacia Edukado en Krakovo al la didaktikaj eksperimentoj ligitaj kun edukado kaj perfektigado de instruistoj.

Ni priparolu ilin laŭvice.

La unuaj jaroj de la 21a jarcento antaŭdiradis grandan bezonon de la instruistaj medioj pri kompletigado de la profesiaj kvalifikoj, akiritaj en altlernejoj klerigantaj instruistojn. La planitaj reformoj de edukado postulis klerigon de multaj instruistoj, pretaj por realigado de novaj taskoj, precipe por instruado de diversaj lernobjektoj kaj taskoj. La dokumento enkondukanta ĉi tiun reformon, el februaro 1999, ŝanĝas principe la rolon kaj pozicion de la instruisto en lernejo. En la tiel nomata ‘Programa bazo de la ĝenerala edukado por la sesjaraj elementaj lernejoj kaj por gimnazioj’ ni legas do pri ĝeneralaj taskoj de instruistoj:

“Instruistoj devas strebi al la ĉiufanka progreso de lernantoj kiel supera celo de la eduka laboro. La lerneja edukado celas harmonie realigi pere de instruistoj la taskojn de instruado kaj klerigado. La taskoj kreas reciproke kompletiĝantajn kaj ekvivalentajn kampojn de la laboro de ĉiu instruisto”.

Instruistoj do ne respondecas nur pro realigado de la propra instruobjekto kaj eventuale pro la eduka laboro. La reformo devigas instruistojn respondi pri harmonia, tutisma, kompleksa progreso de ĉiu lernanto, sendepende de la lernobjekto. Krome, ĝi postulas de ili la krea aktivecon, memstarecon, scipovon alpreni decidojn kaj tian organizadon de la laboro de lernantoj, kiu certigos disvolviĝon de iliaj aktiveco kaj memstareco dum akirado de scioj. Tio simptomas interalie en neceso elekti konvenan programon por instruado aŭ krei propran programon kaj ankaŭ ĝustan por la klasa kolektivo elekton de la lernolibroj. Ni aldonu, ke lastatempe aperis tiom multe da programoj kaj lernolibroj, ke la adekvata pritakso de ili kaj la ĝusta elekto postulis grandan fortostreĉon kaj tre altajn scipovojn.

Jam ĉi tiuj supre menciitaj kondiĉoj de la instruista laboro en la reformata lernejo sufiĉe motivas serĉadon de novaj formoj de la klerigado de novaj instruistoj kaj perfektigadon de instruistoj jam laborantaj. La klerigaj aŭtoritatoj organizis do diversajn kursojn kaj konferencojn, kaj ankaŭ instigis al organizo de aŭtodidaktikaj kolektivoj en lernejoj kaj en didaktikaj centroj.

Ankaŭ diversaj altlernejoj, ne nur pedagogiaj, komencis organizi edukadon en la instruistaj fakoj. Ĉio supre menciita okazadis nesufiĉe, kaj foje pro bezonoj de jam laborantaj instruistoj simple maltrafe. En tiu situacio aperis ankaŭ en la Altlernejo Paweł Włodkowic la ideo pri la fonda de postdiplomaj studoj, komence nur por instruistoj. Konvenan projekton proponis la aŭtoro, tiam vic-rektoro de tiu ĉi altlernejo.

Relative nova (ĉar ekestis en 1992), kvankam unu el la plej malnovaj kaj la plej grandaj inter la neŝtataj lernejoj, Altlernejo Paweł Włodkowic de la komenco de sia agado aktive reagis al bezonoj de ne nur la loka socio. Atestas pri tio interalie la unuaj fakoj de studoj organizitaj en tiu lernejo, komence oni fondis la fakon de Direktado kaj Merkatiko, kaj jam en la jaro 1993 oni varbis studentojn por ĝi kaj por la nova fako de Administrado. Dum la sekvaj jaroj ekestis laŭvice: Pedagogio (1994), Informadiko, Politologio kaj Sociaj Sciencoj (1966). En la jaro 1999 jaro mi akiris aprobon de la rektoro kaj de la kanceliero por organizado de la postdiplomaj kvalifikaj studoj por instruistoj de matematiko. La elekto de specialaĵoj ne estis hazarda. Multaj instruistoj de lernobjektoj realigitaj dum malmultaj lernohoroj, decidis kompletigi siajn studojn por certigi al si la stabilecon kaj plifortigi sian pozicion en lernejo, kaj la matematiko povis perfekte servi por tiu celo.

Mi bone komprenis la neceson kaj eblecon organizi tiujn studojn, kiuj certigus atingi la kvalifikaĵojn. La taskon oni povis entrepreni disponigante pri konvena scienco-didaktika kadro. Helpon mi serĉis en konata de miaj studaj tempoj Instituto de Matematiko en la Krakova Pedagogia Universitato, en kiu laboris la plej nombra kaj la plej altkvalifikita grupo de didaktikistoj de matematiko, inter la polaj altlernejoj. La interparolaj kun la direktoro de la Instituto - prof. dr hab. Bogdan Nowecki - ne estis facilaj. Antaŭ ĉio nevenkebla malfacilaĵo ŝajnis esti la granda distanco inter Krakovo kaj Plock. Tamen pli grava ol tio estis argumentoj pri la karaktero de la postdiplomaj studoj, ebleco por la sufiĉe libera formado de la plano kaj de la instruprogramoj, la elekto de la eduka enhavo kaj de la formoj kaj metodoj de laboro kun aŭskultantaro.

Por la profesoro Nowecki tiuj argumentoj montris eblecon realigi la ideojn postulitajn de jaroj, ligitajn kun la postdiploma klerigado de la instruistoj de matematiko, kies realigado en la rigidaj kadroj de formalaj procedoj antaŭe ne estis ebla. Temis antaŭ ĉio pri tre ekvilibrigaj, precize elektitaj kaj konvene realigitaj enhavoj de la matematikaj instruobjektoj kun forta akcento pri neceso de ŝanĝo de la didaktika rilato al instruado de matematiko en lernejo. La tradiciaj metodoj de la instruado kaŭzis, ke plimulto da lernantoj ne povis lerni kun kompreno matematikon. Esploroj faritaj de pedagogoj, psikologoj, didaktikistoj de matematiko kaj ankaŭ de kelkaj matematikistoj interesitaj pri la instruado malkaŝis, ke lernantoj ne kulpas pro tia stato. Okazis ankaŭ, ke ĉe konvena selekto de la materialo por instruado, organizo de la procezo de lernado kaj aplikado de labormetodoj kun lernantoj, direktita al aktivigo de lernantoj, oni povas atingi pozitivajn rezultojn de la instruado, eĉ se temas pri lernantoj, kiujn ĝenerale oni opinias nekapablaj por sukcese lerni matematikon. La kondiĉo por atingi tiun celon estas – kiel montris la menciitaj esploroj – la ĝisfunda rekonstruo de la konscio de la instruisto pri matematiko, ŝanĝo de lia rilato al lernantoj kaj al siaj devoj kaj la senĉesa perfektigado de siaj fakaj scipovoj.

Kiel komencajn kondiĉojn de la postdiplomaj studoj de matematiko oni akceptis, ke ili ne estos limigitaj nur al la strikte esenca didaktika pretigo de matematik-instruistoj. Temis pri tio, ke la studoj certigu ankaŭ pli profundan psikopedagogian scion, kaj stimulu la disvolviĝon de la ĝenerala kulturo de aŭskultantoj (muziko, teatro, arto).

En la perspektivaj planoj de la Altlernejo Paweł Włodkowic pri la postdiplomaj studoj oni premisis dekomence ilian disvolviĝon en du kampoj. De unu flanko temis pri la eliro el la rondo de personoj plenumantaj la instruistan fakon kaj pri direktigo de la eduka oferto al diversaj fakaj grupoj laŭ la aperantaj sociaj bezonoj. Tio postulis la konvenan situon de ĉi tiuj studoj en la strukturo de la Altlernejo Paweł Włodkowic.

La tradicia modelo de la ligado de la apartaj fakoj, funkciaj en la kadroj de la postdiplomaj studoj, kun la konvenaj fakultatoj ne konformis al niaj celoj pro diversaj kaŭzoj. Tial la estraro de la lernejo decidis establi por tiuj studoj apartan organizan fakon - Instituton de Postdiplomaj Studoj - kun sufiĉe vasta aŭtonomio, direktitan komence de prokuristo de rektoro (en la rango de prorektoro), subigita senpere al la rektoro kaj la kanceliero de la lernejo. La esencan protekton pri nivelo kaj pri la enhavo de la klerigado, plenumas en tiu Instituto la Scienca Konsilantaro, kiun kreas la profesoroj kaj doktoroj, estantaj zorgantoj al la apartaj fakoj.

La laŭvica tasko, akcentita en la fazo de organizo de la studoj, koncernas la konvenan selekton de la didaktika kadro. La kriterioj, kiuj estis gravaj dekomence, ne estis nur la esencaj, altaj kvalifikoj. Temis pri la specialistoj, bone komprenantaj bezonojn de aŭskultantoj, specialistoj - havantaj altvalorajn, praktikajn kvalifikojn kaj didaktikajn scipovojn, kiuj estas impresigemaj je problemoj de aŭskultantoj kaj kiuj konfirmis sian kompetenton kiel instruistoj “organizantoj de la procezo de akirado de scienco, zorgantaj pri ĝia korekta realigado kaj kontrolantaj ĝian rezulton”.

Ni premisis, ke la lekcianto dum tiuj studoj devas esti amiko kaj la vera partnero por aŭskultantoj, kaj ne formala aŭ eĉ la formalista komunikanto de informoj kaj plenumanto de la atingataj rezultoj de lernado. Ni premisis ankaŭ, ke en la instruista grupo troviĝu personoj, kiuj laboras aktuale, aŭ laboris antaŭ nelonge en la vivdomenoj ligitaj kun la konvenaj postdiplomaj studoj, ekz. la eminentaj instruistoj, direktoroj de lernejoj, juĝistoj, financistoj, ekonomiistoj, politikistoj, estraranoj. Tio postulis dungi rilate multajn didaktikajn laboristojn, ne etatajn, plenumantajn difinitajn komisiitajn taskojn; ĝi postulis ankaŭ la konvenan preparadon de multaj personoj por gvidado de didaktikaj okupoj. La respondecon pro tio akceptis la sciencaj gvidantoj de apartaj specialaĵoj.

Post fino de la postdiplomaj studoj la studentoj ricevas la atestilojn konkorde al ordono de la Ministerio por Nacia Edukado el la jaro 1993.

La Altlernejo Paweł Włodkowic jam de dek jaroj konvene al aktualaj bezonoj de personoj, kiuj deziras tiuforme kleriĝi, gvidas la postdiplomajn studojn en tre diversaj fakoj. Valoras substreki, ke la eduka oferto estas senĉese perfektigata, kio rezultas egale el strebado al pli kaj pli plena realigado de atendoj de la aŭskultantoj, kiel ankaŭ el la juraj ŝanĝoj okazantaj en la pola kleriga sistemo kaj el la kresko de propraj organizaj kaj edukaj eblecoj. Tion ilustras la suba listo.

En estonteco ni povus organizi en la Altlernejo Paweł Włodkowic la interlingvistikajn studojn kun la lingvo internacia esperanto.

Laŭvica numero	TEMARO DE LA POSTDIPLOMAJ STUDOJ	TEMPOSPACO DE FUNKCIADO
1.	Administracio	ekde 2007/8
2.	Sekureco kaj higieno de laboro	ekde 2004/5
3.	Bibliotekokono kun scienca informo kaj legant-mediuma eduko	konstante
4.	Biologio	2000/1 – 2006/7
5.	Kemio	2000/1 – 2005/6
6.	Faka konsilado	ekde 2003/4
7.	Eduko por sekureco-profesie lertigata defendo	konstante
8.	Eduko por eksterordinaraj statoj	2002/3 – 2004/5
9.	Frulerneja eduko kun integrita instruado	ekde 2005/6
10.	Frulerneja eduko kun integrita instruado kaj antaŭlerneja edukado	2000/1 – 2004/5
11.	Frulerneja eduko kun frua lernado de la angla lingvo	ekde 2008/9
12.	Fiziko kun astronomio	2000/1 – 2006/7
13.	Geografio	2000/1 – 2006/7
14.	Historio	ekde 2002/3
15.	Historio kaj scio pri la socio	2000/1 – 2005/6
16.	Informadiko	2000/1 – 2005/6

17.	Informadiko kaj la informa teknologio	ekde 2005/6
18.	Eŭropa integrado	2000/1 – 2004/5
19.	Integrala eduko frulerneja kun la angla lingvo	ekde 2003/4
20.	Pola lingvo	2000/1 – 2006/7
21.	Logopedio	2000/1 – 2002/3 kaj ekde 2004/5
22.	Merkatiko kaj direktado pri kadroj en entrepreno	2000/1 – 2004/5
23.	Matematiko	konstante
24.	Manaĝero de klerigo – direktado pri klerigo	ekde 2008/9
25.	Manaĝero de klerigo kaj kulturo – direktado pri klerigo kaj kulturo	konstante
26.	Manaĝero de sanigistaro – direktado pri sanigistaro	konstante
27.	Manaĝero de turismo kaj ripozo – direktado pri turismo kaj ripozo	ekde 2008/9
28.	Gardo de la sekretaj informoj kaj de informoj jure ŝirmitaj	2004/5
29.	Mediprotektado	2007/8
30.	Oligofrenopedagogio	konstante
31.	Organizado de la socia helpo	konstante
32.	La integranda pedagogio kaj la pedagogia terapio	2003/4 – 2005/6 kaj ekde 2008/9
33.	Korekt-kompensa pedagogio kaj lerneja logopedio	ekde 2002/3
34.	Zorg-eduka pedagogio, la lerneja pedagogio	konstante
35.	Rehabilit-terapeŭtika pedagogio	konstante
36.	Politiko pri ŝtata sekureco	2005/6
37.	Perado pri negoco de nemovitaĵoj	ekde 2008/9
38.	Entreprenemo	konstante
39.	Pedagogia pretigo	konstante
40.	Naturo	konstante
41.	Kalkulado kaj impostoj	2003/4 kaj ekde 2006/7
42.	Resocialigo kaj la socia profilaktiko	ekde 2001/2
43.	Socioterapio de la infanoj kaj junularo	2003/4 kaj ekde 2008/9
44.	Tekniko	ekde 2005/6
45.	Tekniko kaj la informa teknologio	2002/3 – 2004/5
46.	Kulturoscienco	2001/2 – 2004/5
47.	Scio pri la socio	ekde 2002/3
48.	Eduko al familia vivo kaj al seksa edukado	ekde 2002/3
49.	Korpaj ekzercoj	konstante
50.	Muzika kaj plastika eduko – muziko kaj plastiko (arto)	2000/1 – 2006/7
51.	Muzika eduko – muziko	2005/6 – 2006/7
52.	Plastika eduko – plastiko	2002/3 – 2006/7
53.	Antaŭlerneja eduko	ekde 2004/5

54.	Direktado pri kemiaĵoj en entrepreno	ekde 2008/9
55.	Direktado pri la strukturaj fondusoj de la EU	ekde 2003/4
56.	Direktado dum krizo – la unua emocia helpo, trejnado	ekde 2008/9
57.	Direktado pri la nemovitaĵoj	ekde 2007/8
58.	Direktado pri protektado de la medio	ekde 2008/9
59.	Direktado dum la krizaj situoj	2005/6 kaj ekde 2007/8
60.	Direktado pri la homajprovizoj en entrepreno	ekde 2005/6
61.	Direktado pri la publika sano kaj la sana eduko	ekde 2008/9
62.	Aplikado de la informadiko	2000/1 – 2004/5 kaj ekde 2006/7
63.	La publika sano kaj la salubra eduko – organizado kaj direktado	2007/8

Esperantigis *Zbigniew Duda* (2009)

